

B.TRAVEN

ROZO BLANKA



romano

Aŭtoro	B.Traven
Titolo	Rozo Blanka
Tradukis	Dorothea Kaiser & Hans-Georg Kaiser (Donjo & Cezar) lau la unua eldono de la romano „Die weiÙe Rose“ Librogildo Gutenberg Berlino 1929
Aranĝis	Frank Vohla Hans-Georg Kaiser
Finredakto	je la 31-a de aŭgusto en la jaro 2016

ROZO BLANKA

Meksika ranĉokanto

Ĉe la rando de l' Barranca
banate tage de l' sunor'
karesate de Lun' en nokt',
Floras vi, ho, Rosa Blanca.

Ĉiutage kaj jam frue
kantas birdoj nur por vi.
Kiel Dio kreis vin,
floru, Rozo Blanka ĝue.

Se diros mi velkinte „ĝis“,
Rozo Blanka, vi plu floru.
Mia lasta viva spir'
estu la adiaŭkis'.

PARTO I

ĈAPITRO 01

01

Condor Oil Company estis inter la grandaj usonaj naftokompanioj etendintaj siajn entreprenojn al Meksiko, efektive ne la plej potenca, kaj ankaŭ ne la plej forta.

Sed ĝi havis la plej fortan apetiton.

Por la evoluado de individuo, tiel kiel por la evoluado de tuta popolo, la apetito estas decida. Bona apetito estas eĉ pli kaj tute speciale decida por la evoluado de grandkapitalista kompanio. La apetito decidas la tempon de la potencdisvolviĝo, kaj la apetito tial ankaŭ decidas la elekton de la rimedoj uzataj por atingi la celon: nome por fariĝi influriĉa kaj aŭtoritata potenco en la internacia ekonomia vivo. Moderna grandkapitalista kompanio distingiĝas malmulte de ŝtato pri sia konstruo, esenco, celoj kaj labormetodoj, tiel kiel ankaŭ pri siaj problemoj.

La ununura videbla diferenco estas certe nur tiu, ke grandkapitalista kompanio kutime estas pli bone organizita kaj gvidata, pli prudente kaj pli lerte, ol ŝtato.

Condor Oil Company estis la plej juna el la kompanioj, kiuj en Meksiko kune kaj unu kontraŭ la aliaj batalis, se temas pri la superregado sur la merkato. Ĉar ĝi estis la plej malnova, tial ĝi estis la plej vorema. Pri la elekto kaj uzado de la rimedoj por gajni influriĉan rangon en la konkurso kun la malnovaj kaj potencaj kompanioj, ĝi sciis nek skrupulojn nek indulgon. Se ĝi efektive havis principon rilate la manieron de la batalo, jen tiun: La milito, kiu estas entreprenata plej brutale, daŭras plej mallonge, kaj tial ĝi estas la plej humana.

Tial ĝi trovis samtempe moralan senkulpigon de siaj agoj, tiel, ke la kompanio, sin mem praviginte, povis diri, ke ĝi batalas plej humane, kaj ke tuj estos paco, kiam ĝi estos gajninta la batalon.

La potenco de naftokompanio dependas ne nur sole de la nombro de putoj produktantaj nafton, kiujn posedas kompanio. La potenco dependas multe pli de tio, kiom da

terposedaĵo ĝi havas aŭ tenas sub kontrolo. Kaj en tiu kazo estas tri terspecoj, kiuj konsiderindas.

Terposedaĵo, kiu tute certe portas nafton; terposedaĵo, kiu laŭ la ekspertizo de la geologoj devas porti nafton; kaj terposedaĵo, kiu laŭ la instinkto de la naftistoj verŝajne havas nafton. La tria speco de terposedaĵo estas tiu, kiu ebligas spekuladojn kaj kiu lasas enspezi milionojn da dolaroj, sen tio, ke eĉ nur unu barelo da nafto estas produktenda.

Tiel la batalo de la kompanio temis pri tio gajni pli kaj pli da terposedaĵo. Oni laboris kun pli granda fervoro kaj pli da lerto konkeri ĉiun terposedaĵon, kiu povus havi nafton, ol poste je tio ekspluati la terposedaĵon de la kompanio ĝis la lasta hektaro kun ĉiuj teknikaj kaj sciencaj rimedoj.

Ĉar *Condor Oil Company* ne pro sia kapitalo kaj la riĉo de siaj produktantaj putoj povis eniri en la antaŭan vicon de la gigantaj naftokompanioj, tial ĝi devis uzi la duan vojon: Gajni pli da naftosuspekta terposedaĵo ol havas tiun iu alia pli granda kompanio. Posedante gigantan amason da terposedaĵo kun nafto au eble kun nafto, kaj

tial necesa por kontentigi la naftomerkaton, ĝi povis dikti prezojn kaj povis kontroli naftokompaniojn, kiuj sekve de sia giganta kapitalforto ŝajne estis nevenkeblaj kaj nekontroleblaj.

Tiel certe facile klarigeblas, kial ne ekzistis iu fiago aŭ krimo, kiun la agentoj komisie laborantaj por la kompanio ne estus farintaj por havigi la terposedaĵojn, por ricevi la deziratan terposedaĵon, se tio ŝajnis necesa por la kompanio.

Condor Oil Company havis dek ok produktantajn putojn. Tie, kie ĝi nur flaris terposedaĵon, kiu povus havi nafton, aŭ terposedaĵon, kiun povus aĉeti eble iu alia kompanio, ĝi tuj aktiviĝis.

Ĉe la senkompataj negocoj krude forigante terposedaĵojn, kompreneble neniam iu el la direktoroj kunagadis; neniam iu el iliaj plej altrangaj oficistoj, kaj nur tute malofte ĝi lasis labori usonanon en tiu ĉi branĉo. La direktoroj nur tiam aperis, kiam la terposedaĵo, kiun volis havi la kompanio, jam estis en tiuj manoj, kiuj devis teni ĝin preta por la kompanio. La kompanio estis ĉiam nur la

dua aĉetinto. La fiajn negocojn disvolvis meksikaj aŭ hispanaj, ĉeokaze ankaŭ germanaj subagentoj.

Kondor-kompanio havis sian ĉefkomandejon en San-Francisko en Kalifornio. La meksika ĉefkomandejo estis en Tampiko, Meksiko. Ĝi havis filiajn komandejojn en Panuko, en Tukspam kaj en Ebano; ĝi prepariĝis aranĝi ankoraŭ du pluajn oficejojn, unu el ili ĉe la Istmo kaj la alia en Campeche.

Ĝi laborigis bonegajn usonajn, anglajn kaj svedajn geologojn, kiuj estis pagataj bone. Tiuj okupigis grandan stabon de topografoj, kiuj devis registri kaj mezuri la terenon. La topografoj estis jam ne tiom bone pagataj kiel la geologoj, ĉar oni taksis ilian laboron malpli grava. Tial la topografoj iradis sufiĉe ofte mizere aspektante kaj en ĉifonoj kiel vagabondoj. La geologoj jam iom pli proksimis al la direktoroj, ekonomie kaj socie; ĉar ili povis flustri bonajn konsilojn pri riĉa naftoterenon en la orelojn. Sed la topografoj male al tio pli proksimis al la proletaro, kaj ĉar ili ne volis koncedi tion libervole, ĉar ili ja estis studentaj, ili devis pli kaj pli streĉe labori ol la laboristoj, al kiuj estis kvazaŭ supo aŭ buljono, ĉu oni

rigardis ilin proletoj ĉu ne. La topografojn oni multe pli rapide elĵetis ol fortikajn konstruistojn de borstacioj. Topografoj ekzistis multnombre. Dume la borstaciaj konstruistoj estis impertinentaj kiel stratkoto, ĉar ili ne hontis ĉeokaze ankaŭ konservigi tomatojn, se ili ne povis konstrui borstaciojn, aŭ se oni elĵetis ilin, ĉar ili traktis per pugnoj la gvidanton de la laborgrupo.

Rimarkoj

Barranca del Cobre = en Meksiko ĝi estas nomata Kupra Ravino aŭ Copper Canyon, jen montara formacio de la okcidenta *Sierra Madre*

Isthmus = Istmo en Meksiko

En la regiono de Kondor-kompanio, preskaŭ tute ĉirkaŭata de terposedaĵoj riĉaj je nafto, kiuj ĉiuj estis en la posedo aŭ luprenitaj de la kompanio, troviĝis la bienego *La Rosa Blanca*.

La bienego Rozo Blanka havis amplekson da ĉirkaŭ okcent hektaroj. Ĝi apartenis al la indiĝeno Hacinto Yanyez.

Iliaj produktoj estis maizo, fazeoloj, kapsiko, ĉevaloj, bovoj, porkoj, krome sukerkano, kaj tiel ankaŭ sukero, kaj plie oranĝoj, citronoj, papajoj kaj ananasoj.

Ĝi situis en la naftozono en la norda parto de la federacia ŝtato Verakruco.

La bienego ne riĉigis sian posedanton, eĉ ne bonstatigis tiun. Ĉar ĉio estis kultivata kaj mastrumata laŭ malnova tradicio. La vivo en la bienego estis senhasta kaj hejmeca.

Neniu ekscitiĝis. Oni ne hastis, neniu estis pelata, kaj se oni foje sakris severe, jen okazis nur pro distriĝo kaj ĉar la

vivo deruliĝus ja tro enuiga, se la ventiloj ne ĉeokaze povus ellasi aeron.

La helpantaj manoj en la bienego estis kaj indiĝenoj kaj la posedanto. Ili ne ricevis altajn salajrojn. Certe ne. Sed ĉiu familio havis sian kabanon kun ampleksa korto. La familio rajtis teni bruton laŭ plaĉo, kaj sur la parcelo, kiu estis asignita al ili laŭ la nombro de la familianoj, ili rajtis kultivi tion, kio ŝajnis al ili necesa por sia vivteno.

Ĉiuj tiuj familioj, kiuj loĝis tie, vivis de generacioj sur la bienego. Ili estis preskaŭ ĉiuj parencigitaj kaj boparencigitaj kun la posedanto. Kelkaj el la familioj dankis sian ekeston de la granda naskoforto de unu el la antaŭuloj de Hacinto. Hacinto estis la patrono de preskaŭ ĉiuj infanoj naskitaj sur la bienego, kaj sinjorino Yanyez estas la patronino.

La patrono, el *padrino*, kaj la patronino, la *madrina*, havas en Meksiko multe pli gravan rangon interne de la familia societo ol en iu alia lando surtere. Tio devenas de pramalnovaj tempoj, el longe pasintaj tempoj de la indiĝenoj. Sekve de la tre tre oftaj edziĝoj de hispanoj kun

indiĝenaj inoj, konserviĝis en la moroj de la meksika popolo multnombraj kutimoj kaj moroj de la indiĝenoj ĉi tie, se temas pri kuirejo, domo kaj familiaj rilatoj, do en tiuj aferoj, pri kiuj la viro kutime estas pasiva kaj neŭtrala, ĉar ili koncernas la praterenon de l' ino.

La patrono havis en la malnova indiĝena Meksiko – kaj havas ankaŭ nun en Meksiko – same tiom da signifo por la infano kiel la patro mem. En multnombraj kazoj, se la patro mortas aŭ pro multaj diversaj kialoj montriĝas kiel nekapabla esti la edukanto de la infano, la patrono transprenas ĉiujn rajtojn kaj devojn de la patro. La patrono devas zorgi sin pri la bonfarto de la infano, al kiu li estas patrono. Kvankam la publika leĝo ne devigas lin plenumi sian devon al la infano, kiu bezonas la helpon, li tamen ne povas retiriĝi el tiu devo; ĉar li pro tio perdis same tiel certe siajn estimon kaj reputacion en la socio – kiu ja konsistas el familioj – kiel en la kazo, se li fiagus iel alie, kion eble pardonus la leĝo, sed ne la societo al kiu li apartenas.

La patro de la infano nomas la patronon de la infano *compadre*, tio signifas kunpatro, kaj la patroninon li

nomas comadre, tio signifas: kunpatrino. Ambaŭ, patrono kaj patro nomas sin reciproke *compadre*, kaj patronino kaj patrino nomas sin reciproke comadre. Kaj kiam la patro de la infano la patroninon vokas, jen li ankaŭ ne diras señora sed li vokas ŝin comadre.

Pro tiuj kialoj rigardas sin la patro de la infano kaj la patrono de la infano reciproke kiel fratoj, kaj la rilato inter ambaŭ estas ofte pli elkora ol tiu inter samsanga paren caro, ĉar la elekto estas libervola kaj la elekto dependas de simpatio, kiun tiuj du homoj sentas reciproke.

Se la indiĝena farmlaboristo elserĉas la patronon, la mastron de la bienego kiel patronon por sia infano, jen la mastro venas. Li estas neniam tro fiera por tio; ĉar li rigardis ĝin granda honoro, ke li estas elektita patrono. Tio estas en la indiĝena sango. Kaj ekde tiu momento, kiam la mastro fariĝis patrono de la infano de tiu farmlaboristo, diras la farmlaboristo ekde nun ne plu „patrono“ al la mastro, sed *compadre*. Kaj la mastro ne plu diras „He, Juan!“ al la laboristo, sed li diras samtempe *compadre* al li, kvankam la pure ekonomia

rango de ambaŭ reciproke ne ŝanĝiĝas. Ili estas de nun fratoj, kaj traktas sin kiel fratoj.

Tiu rilato ekzistas en ĉiuj bienegoj de Meksiko, kie la posedanto kaj la bienegaj homoj estas de indiĝena sango. Tia rilato estigas cirkonstancojn, kiuj alie surtere certe ne troveblas.

Al la patrono apartenas la bienego, ĝi apartenis jam al lia familio antaŭ ol Kolumbo estis naskita. La antaŭulo, la fondinto de la familio estis ja indiĝena princo, la tribestro de tribo de la huastekoj, kiu en tiu tereno havis sian sidejon. Sed la patrono rigardas sin nur kiel utiliganton de la bienego. Li sentas sin respondeca por la bonfarto de ĉiuj, kiuj vivas en la bienego; ĉar li estas ja la *compadre* de ĉiuj, kaj ĉiuj estas liaj *compadres*. Li ne vestas sin pli riĉa ol tiuj, kiuj laboras en la bienego. Li vestas sin per la tilmo, kiel ili, kaj kiel ili iras li kun sandaloj. Li manĝas tortiljojn kaj *frijoles* kiel ĉiuj ceteraj. Sed tamen la rilato estas tute alia ol la patriarka rilato sur la malnovaj eŭropaj kamparanaj kortegoj, kie ĉiuj subuloj kaj servistinoj sidas je la sama tablo kun la gekamparanoj.

Ĉi tie ĉiuj estas memstaraj, ĉiuj havas sian propran familion, sian propran mastrumon. La patrono estas la juĝisto de ĉiuj iliaj aferoj, ilia konsilanto, ilia leterskribisto – se li kapablas skribi – , ilia kuracisto, ilia advokato, ilia defendanto kontraŭ instancoj, kiuj postulas neeban, ilia prizorganto en malbonaj rikoltoj kaj la prizorganto de iliaj vidvinoj kaj orfoj. Sed li estas neniam 'la' mastro. Li riĉigas sin neniam je siaj homoj. Li havas pli da bruto ol la aliaj, havas pli da maizo, pli da fazeoloj, kaj havas iom pli da mono. Iom pli. Ne multe. Ĉar vivas tro da familioj en la bienego. La familioj pliiĝas. Ili pliiĝas sufiĉe. Kaj ĉiuj junaj geoj fondantaj novan familion, volas restadi en sia hejmejo, do en la bienego. Kaj por ĉiuj havigendas terpecoj kaj konsiloj. Kaj la patrono havigas ilin. La patrono devas havi iom pli ol la ceteraj, ĉar li havas dudekfoje pli la devojn ol ĉiuj ceteraj.

Kie la patrono estas meksikano de neindiĝena sango aŭ eble eĉ hispano, aŭ ankoraŭ pli terure, eĉ germano, la aferoj deruliĝas tute alie. Jen trovas sin mastroj kaj subuloj, ĉar en tiu kazo devas esti gajnita mono, jen oni devas fari la bienegon enspeziga, por ke ĝi povas esti

vendata kun mil procentoj da gajno al iu, kiu plian fojon volas enspezi je ĝi mil procentojn. Jen ankaŭ ne ekzistas *compadres* kaj ne *comadres*.

Sed Hacinto Yanyez, la patrono de la bienego *La Rosa Blanca* estis indiĝeno. Kaj ĉar li estis indiĝeno kaj sekvis al malnovaj indiĝenaj leĝoj, sen scii la laŭvortan tekston, ĉar li havis tiun en la sango, tial kunpuŝiĝo de usona naftokompanio kun li devis konduki al tragedio. Ĉar la armiloj, kiujn li sciis uzi, kaj kiujn uzi li estis kutimiĝinta devis fiaski kontraŭ usona grandkapitalista kompanio, kiu devis enspezi milionojn por garantii al siaj akciuloj la posedon de luksojaĥto kaj aĉetojn en la bulvaroj de Parizo.

Rimarkoj

compadre = baptopatro, kunpatro

comadre = baptopatrino

el padrino = la patrono

frijoles = fazeoloj

la madrina = patronino

tilma = tilmo estas kruda kotona mantelo uzata de indiĝenaj meksikaj kampuloj, nodita sur unu ŝultro.

tortillas = tortiljoj, rostitaj maizoflanoj

La ceterajn bienegojn, bienojn kaj ranĉojn de la regiono Kondor-naftkompanio akiris laŭ la kutima maniero. Tiel kiel oni povas gajni terposedon ĉimaniere. Tiuj terposedoj estis parceligitaj al *Lotes*. Al *lote* nr-o 1, al *lote* nr-o 2, kaj tiel plu ĝis *lote* nr-o 78. *Lote* estas proksima al parcelo aŭ al tereno.

Sed en la familia ornamaĵo de Kondor-kompanio mankis perlo. La plej bela perlo inter ĉiuj, la bienego *La Rosa Blanca*, Rozo Blanka.

Ĉirkaŭe troviĝis la plej suka naftoregiono. La plej naftoriĉaj putoj, kiuj elŝprucigis la nigran oron je dikaj strioj tiel potence, ke ĝi dum la unua elblovado pafiĝis kvincent metrojn alten en la nubojn, kun la orelsurdiga muĝado de giganta akvofalo aŭ kun la furioze laŭta spirsiblado de kvindek unuiĝintaj ekspreslokomotivoj, kiuj samtempe malfermas siajn ventilojn. Tiuj plej produktivaj putoj situis ĉe la limoj de la bienego.

Kondorkompanio devis atingi la posedrajton de Rozo

Blanka, eĉ en tiu kazo, se ĝi devus provoki pro tio militon de Usono kun Meksiko. Iliaj direktoroj kaj akciuloj ja neniukaze kunmarŝis en la militon. Ili estis tro maljunaj por tio, kaj se ili ne estus tro maljunaj, tiukaze la kuracistoj estus konstatintaj, ke ili estas kormalsanaj, malsana je diabeto aŭ havas malfortajn pulmojn.

Oni antaŭofertis al *señor* Hacinto Yaniez kvindolaran jaran farmopagon por ĉiu hektaro da tero dum dudek jaroj, kaj krome okprocentan partopagon de la gajno.

Sed Hacinto diris al la agentoj: „Tion mi ne povas fari. Mi ne povas farmdoni la bienegon. Mi ne rajtas tion. Ankaŭ mia patro ne farmdonis ĝin. Ankaŭ ne mia abuelo, mia avo. Ankaŭ ne ties patro. Mi devas reteni ĝin por tiuj, kiuj venos post mi. Ankaŭ tiuj volos manĝi. Kaj tiuj devas reteni ĝin por tiuj, kiuj venos post ili. Tiel tio estis ĉiam. Mi ja ricevis la oranĝarbojn kaj nukсарbojn de mia patro. Se li ne estus plantita tiujn, mi ne havus oranĝojn kaj neniujn citronojn kaj ne nuksojn. Tial mi ree devas planti junajn arbojn, por ke ankaŭ tiuj, kiuj volos vivi post mi, havos oranĝojn kaj citronojn kaj nuksojn. Tio estas la sama rilate al la bienego. Tion vi ja povas kompreni,

señor Pallares, ĉu?“

Señor Pallares, la agento, la aĉetisto de Condor Company kompreneble ne povis kompreni tion, ĉar li neniam posedis teron. Kaj tial, ĉar lia patro neniam havis terposedon. Li estis nur advokato, advokato, tiel, kiel lia patro.

Li venis al la kompanio kaj diris tie, ke Hacinto estas freneza.

Al tio diris la direktoro: „Se Hacinto estas freneza, tiukaze oni ja povus sendi lin en frenezuldomon.“

Hacinto ne estus la unua, kiu estis sendita en frenezulejon kaj tie runiĝis kaj mortis, ĉar naftokompanio ne alie povis ricevi ties posedon. Dekoj da homoj estis senditaj en la frenezulejon. Ĉar frenezas ĉiu, kiu rifuzas akcepti pagoprezon por peco da tero, kiu estas milope pli kara ol estis la aĉetprezo por tiu terposedo, antaŭ ol oni trovis nafton proksime.

Venis alia agento. Denove meksikano. Kaj denove licenciado, advokato sinjoro Perez.

Li venis kun la granda monsako, tuj kunportis la trembrilantan oron. Ne ĉion. Sed tamen grandan parton. Li esperis, ke la aspekto de la bele monerigita mono farus cedema Hacinton.

Advokato Perez ne ofertis farmopagon. Li volis aĉeti la bienegon. Tio enspezigus pli da mono, kaj tial estis pli granda tento.

„Sed mi ja ne povas vendi la bienegon, *señor licenciado*“, diris Hacinto laŭ sia trankvila stoika maniero. La tempo por li ne estis difinita nocio, tial li ankaŭ ne lasis urĝigi sin ĉe la parolado. „Mi vere ne povas vendi la bienegon. Ĝi ja tute ne apartenas al mi.“

„Kiel?“ demandis sinjoro Perez. „Ne apartenas al vi. Tio estas ja nova. Ĝi legeblas ja en la registroj kiel via propraĵo.“

Hacinto ridis: „Kompreneble ĝi apartenas al mi, Rozo Blanka, tiel, kiel ĝi iam apartenis al mia patro. Sed ĝi ankaŭ ne plu apartenas al mia patro. Mi opinias, la bienego ne apartenas al mi tiel, ke mi povas fari kun ĝi,

kion mi volas fari. Ĝi apartenas ankaŭ al tiuj, kiuj volas vivi post mi. Por tiuj mi estas respondeca. Mi estas nur la administranto por tiuj, kiuj pli poste volos vivi kaj vivos. Kiel mia patro estis nur la administranto, kaj ties patro, kaj ties patro, kaj tiel ĉiam plu en la estintecon. Kaj tiel ĉiam plu en la estontecon.“

„Tio estas ja sensencaĵo, *señor* Yanyez. Lasu nur zorgi pri si la aliajn. Tiuj povas ja doni al siaj infanoj la monon aŭ postlasi. Tiuj povas fariĝi direktoro en Meksiko aŭ advokato. Aŭ ili povas aĉeti al si belan magazenon, kie ili povas bone enspezi kaj ili povas aĉeti al si aŭtomobilojn.“

„Sed ili havas ja ne terpecon“, diris Hacinto obstine. „Tiuj devas ja manĝi. Kiel ili manĝu, se ili ne kultivas maizon.“

„Nu, ne estu tiel ŝtipkapula“, diris sinjoro Perez. „Iliaj posteuloj povas ja aĉeti al si la maizon por la tortiljoj, ili tiam havas ja sufiĉe da mono.“

„Sed la maizo devas ja esti kultivata. Iu ja devas planti maizon. Sed por tio oni bezonas terpecon. Aŭtomobilo eble estas tute bona, sed ĝi ja ne estas maizo. Kaj viando

same mankus. Kaj ankaŭ fazeoloj kaj kapsiko.“

Sinjoro Perez rezignis pri tio tiel plu paroli kun la stulta indiano. Li atakis de nova flanko.

„Vi ja iam fariĝos olda, ĉu ne?“

„Ne“, respondis Hacinto, „mi ne fariĝos olda. Kiam mi fariĝas maljuna, mi estos morta. Tiam mi mortas. Olda mi ne fariĝas. Ankaŭ mia patro ne maljuniĝis. Li estis tuj morta, kiam li supozis, ne plu povi labori. Li ne estis maljuna. Li laboris ĝis la lasta tago. Kaj mi ne povas vendi la teron, ĉar ankaŭ tiuj, kiuj postvenos, devos havi terposedon.“

Li nun komencis ree ĉion rakonti laŭvice, kion li jam estis dirinta al la advokato Pallares, pri la oranĝarboj kaj nuksarboj kaj pri la pli postaj generacioj, kiuj kulpigus lin, ke li fie zorgis pri ili, kaj ke ili devas malsatmorti, ĉar li fordonis la teron.

Sed kiam li rememoris, ke li diris ĉion tion jam iam pli frue al iu, kaj kiam li vidis, ke liaj vortoj faris eĉ ne la plej etan impreson al sinjoro Perez, kiam li ekkonis, ke sinjoro

Perez, kvankam li estas edukita advokato, tute nenion komprenis pri tero kaj devoj kaj pri ĉiuj ĉi aferoj, kiuj tiom gravis al Hacinto, jen li ekhavis novan ideon. Ĝis nun li, se li parolis pri tiuj, kiuj venos post li, kaj volas manĝi, pensis nur pri siaj propraj infanoj kaj posteuloj kaj nur pri posteuloj ĝenerale.

Sed nun, kvazaŭ iu sur la rekta vojo de penstransigo volus rememorigi lin pri tio, li ekkonsciiĝis pri tio, ke li havas ja ankoraŭ multe pli grandajn devojn. Pli altajn devojn ol tiuj por siaj propraj posteuloj. Kion do okazu kun siaj *compadres*, kun siaj *comadres*? Kion okazu kun la sesdek familioj, kiuj vivas sur lia bienego? Tiuj ĉiuj estus senhereditaj, senterigitaj, elradikigitaj, se li vendus la bienegon. Ili ĉiuj estis ja liaj infanoj, siaj protektatoj, siaj zorgatoj, siaj ordonitaj ŝirmatoj. Kiel li povus forlasi ilin kaj forpreni la teron de ili? Ili estis lia sango kaj lia animo, same al siaj korpaj infanoj. Kaj ĉiuj ja iutage estos entombigitaj kaj sekvataj de tiuj, kiuj iam sekvos ilin, sed antaŭe ili bezonas teron por povi esti en la mondo.

„Ne“, „mi ne povas vendi la bienegon, *licenciado*.“ Li diris ĝin nun eĉ pli decidite ol antaŭe. „La bienego ne

apartenas al mi, ĝi apartenas ja ankaŭ al miaj *compadres*.
Kion tiuj tiukaze faru?“

Sinjoro Perez bruligis cigaredon al si, ludis certan tempon kun la vaksfadenetoj, kvazaŭ li serĉus pro la plej bona respondo, por venki Hacinto per unu frazo por ĉiam.

Kiam li estis elfraĝinta la fadeneton, li diris: „La homoj, ĉu? Tiuj ĉiuj povas labori en la borstacioj. Perlaboras multe pli ol ĉi tie en la bienego. Ja kiom ili rcevas ĉi tie? Kvindek centavojn po tago. Eble okdek. En la borstacioj ili enspezas kvin pesojn, ok pesojn, kaj laboras nur ok horojn. Havas ĝin multe pli facile. Povas aĉeti botojn al si kaj al siaj edzinoj silkajn robojn kaj lakŝuojn kaj parfumitan sapon. Se ili ŝparas, kaj ne ĉion fordrinkas, ili baldaŭ povas aĉeti al si magazenon.“

Hacinto ne komprenis tion. Li tute ne sciis, pri kio estas la parolo. En sia kapo estis ĉiam nur unu penso, ununura penso. Sed tiu sola penso estis tiel forta, ke ĝi ampleksis kaj klarigis por li la tutan mondon kaj ĉiujn ĝiajn problemojn. Ĉiuj taskoj en tiu ĉi ununura granda penso por ĉiam estis solvata por li. Li ne povis esprimi tiun

person kun la belaj vortoj de poeto, ankaŭ ne kun la arabeskaj frazoj de sciencisto kaj ankaŭ ne kun la nombropelmelo de ekonomo. Li ĉiam povis nur diri ĝin per mallonga simpla frazo: „Sed ili tiam havas ja ne plu pecon da tero, kaj ili ja tamen ne povus kultivi maizon.“

La vorto maizo havis por li, la indiĝenon, la saman signifon kiel por la eŭropano la frazo: „Nian ĉiutagan panon donu al ni hodiaŭ“. Hodiaŭ, hodiaŭ, kara Dio; ĉar ni ne povas atendi ĝis morgaŭ, ni malsatas hodiaŭ, kaj se ni ne havos la panon hodiaŭ, tiukaze ni morgaŭ estos mortaj.

Sed por la advokato la eterna ripetado de la sama frazo, kiun Hacinto sciis, estis enuiga. Hacinto sciis efektive neniun alian frazon, ĉar en la frazo ja ĉiu lia saĝo kasiĝis, kiel la saĝo de ĉiuj homoj de eterne radikas en la frazo: „Tero estas pano, kaj pano estas vivo“. Nenion pli oni bezonas!

Sed la advokato Perez sciis, ke oni povus aĉeti maizon ĉie. Oni bezonas ja nur la monon. Kaj la monon oni povas perlabori al si. Facile enspezi. Por la mono, kiun la

kompanio promesis al li, se li havas sukceson pri la aĉeto de Rozo Blanka, li povus aĉeti al si tutan ŝipkargon da maizo. Maizon, maizon kaj maizon. Pri io alia ĉiuj tiuj stultaj indianoj ne pensis laŭ li.

Tamen: spite al ĉiu sia prudento kaj ĉiu sia edukiteco pri juro la advokato Perez ne pensis pri tio, ke la maizo ja tamen devas esti kultivata, se oni volas ĝin havi aŭ aĉeti. Ie la maizo devas esti kultivata. Sed la advokato vivis ja en alia mondo, kie oni povas disigi maizon kaj teron, sen tio, ke oni konsciiĝus pri la problemoj evoluigantaj el tio. En sia mondo la rilato maizo kaj tero, homo kaj tero estis tute disigitaj. En lia mondo oni jam ne plu pensis pri maizo, sed oni pensis nur pri la produkto. En lia mondo oni diris: „Kion koncernas nin tiuj, kiuj venos post ni? Post ni la mondopereo kun sendrata filmprezentado en la dormoĉambro. Tero, tero, tero, kio estas tero? Ni bezonas la teron por nafto, por ke ni povu nutri niajn aŭtomobilojn. Maizo, ĉu? Teron por maizo, ĉu? Al la infero tiujn stultiĝintajn indianojn! Se ni bezonas maizon, ĉar ni foruzis la tutan teron por nafto, jen ni faros ĝin per maŝino kaj aĉetos ĝin per konservoskatoloj.“

Rimarko

licenciado = advokato

„Hacinto“, diris nun sinjoro Perez konfide. Kaj li parolis insiste kiel viro, kiu persvade parolas al sia frato de hejme forkurinta, por instigi lin reveni hejmen, ĉar la patrino kordisŝire ploradas. „Hacinto, nun estu do foje prudenta. Mi ja ne volas trompi vin.“

„Tion mi vere ne supozas, ke vi volas fari tion“, respondis Hacinto.

„Mi volas honeste aĉeti la bienegon de vi por bona prezo.“

„Sed *señor licenciado*, mi la teron ja ne povas ...“

„Haltu, haltu“, interrompis lin sinjoro Perez laŭ maniero, kun kiu oni parolas al malsanulo, kiun oni ne rajtas ekscitigi.

„Tamen, Hacinto, vi povas vendi.“

„Ne, mi ne povas“, diris la indiĝeno pli obstina ol antaŭe.

„Mi ne havas rajton por tio. La haciendo ne apartenas al

mi.“

„Ripetu nun ne pluan fojon, mi petas vin, tiun sensencaĵon. Mi trarigardis la registrojn kaj trovis, ke la terposedaĵo apartenas al vi. La posedopaperoj estas en la plej bona ordo. Mi neniam vidis tiajn bonajn kaj purajn posedopaperojn laŭleĝajn. La bienego apartenas al vi, kaj vi povas fari kun tio, kion volas vi. Vendi aŭ fordonaci aŭ farmdoni.“

„Sed miaj *compadres* kaj tiuj, kiuj postsek...“

Sinjoro Perez, ekzercita pri la trukoj de lerta advokato, ne lasis tempon al la indiĝeno sin denove kroĉiĝi al la malnovaj obstinaj pensoj. Li sciis nun jam, kio sekvus denove, kaj li tial tuj ree atakis: „Ĉiuj ĉi viroj de la familoj, kiujn vi havas ĉi tie en la bienego, ricevos laboron en la borstacioj de Kondor-kompanio. Tion mi promesas al vi. Mi skribos ĝin aldone en la kontrakton kiel aĉetkondiĉon. Neniu el la homoj enspezu malpli ol tri pesojn ĉiutage, kaj se ili lertiĝas kaj spertiĝis pri la laboro, jen kvar aŭ kvin pesojn.“

„Jes, tion mi kredas al vi“, opiniis Hacinto, „tiom enspezas la peonoj en la borstacioj. La muchacho, la filo de José ĉi tie, laboras en borstacio kaj ricevas kvar pesojn. La filo de Pedro same laboras en borstacio, li volas enspezi monon, ĉar li volas geedziĝi kaj la bopatro postulas bovon kiel donaĵon por la knabino. Sed Marcos, kiu same laboris en la borstacioj, ree estas ĉi tie. Li diras, ke li neniam volas reiri en borstacion, kaj se oni donus dek pesojn al li ĉiutage. Li volas prefere restadi ĉi tie en la kamparo. Li diras, ke li ĉiam estis malĝoja en la borstacio, kaj ĉi tie li ridas ĉiam.“

„Li simple estas stultulo, la bubo. Oni simple devas kutimiĝi al tio, se oni volas enspezi monon“, diris la advokato. Kaj li pravis. Kiel ĉiuj de lia profesio.

Li nun pro ŝanĝo deturnigis la interparoladon al alia flanko: „Se vi ĉi tie havos tiun sumegon da mono, Hacinto, jen vi povos aĉeti aŭtomobilon al vi.“

„Mi ne bezonas aŭtomobilon“, diris Hacinto indifere.

„Sed, viro, *hombre*, jen vi povas esti post tridek minutoj

en Tukspam.“

„Sed mi ja tute ne volas esti post tridek minutoj en Tukspam. Mi ja volas interparoli kun la homoj ĉevojje kaj rigardi kiel ilia maizo kreskas, kaj kion faras la idoj, kiujn mi ĉiujn konas, kaj mi volas rigardi, ĉu la bluaj anemonoj jam ekfloras, kaj ĉu la grandaj testudoj ĉe la laguno metis ovojn en la sablon kaj ĉu la peza mahagonarbo, kiu antaŭ kvar jaroj derompis kaj metiĝis transverse de la vojo, ankoraŭ nun ne volas putri. Mi jam dufoje submetis fajron, por ke ĝi trabrulu. Sed ĝi ne trabrulas kaj ni nun devas ĉiam rajdi ĉirkaŭ ĝin.“

„*Estupido*, stultulo, stultulo“, diris sinjoro Perez meze laŭte kaj tiam laŭte: „ – sed vidu, en aŭtomobilo...“

„Se mi volas iri al Tukspam por vendi porkojn aŭ por kunporti novan ĉapelon por Nazario, tiukaze mi prenas la flavan mulon Macho kaj ekrajdas frue je la tria kaj tridek kaj estos je la naŭa en Tukspan. Tio estas tiam la ĝusta tempo por mi. Kaj mi vidis ĉion sur la vojo, kaj mi parolis kun Rafael, kiu metis al si novan palmtegmenton sur la *jacal*-on, sur sian remizan domon, ĉar la alia estis tro

malnova kaj likis, kiam pluvis. Tiam mi ankoraŭ estas sufiĉe frutempe en Tukspam. Mi ne bezonas aŭtomobilon. Vere ne, *licenciado*.”

Sinjoro Perez sentis sin denove senespera, kostis al li evidente granda peno trovi novan ideon, por fari alloga al Hacinto la posedon de multe da mono.

Sed antaŭ ol li povis elpensi ion novan, kio eble estus povinta pli proksimigi Hacinton al la mondo de la monuloj, la indiĝeno fine estis trovinta respondon al la oferto enlaborigi ĉiujn *compadres* kiel laboristojn en la naftokampadejoj. Li ne povis enkaŭpe tiom rapide labori kiel advokato ekzerciĝinta pri tio. En lia kazo daŭris pli longe. Sed kvankam daŭris pli longe, li trafis tamen la decidan punkton. Kaj li trovis ĝin pli precize ol sinjoro Perez estis atendinta tion.

Li diris: „Tio estus vere bona, se la viroj ĉi tie ricevus laboron an la naftokampadejoj. Povas ja esti, ke ili tie povos labori kaj enspezos monon. Sed, se la putos estos borita, tiam ja ne plu estos laboro por la homoj. Jen ili ankaŭ ne plu ricevos monon.”

„La kompanio ne boras nur ĉi tie putojn, ĝi havas multe da terposedaĵoj. Jen la homoj de ĉi tie estos do senditaj tien.“

Hacinto estis nun evidente sur la ĝusta vojo, ĉar li diris nun: „Sed tie, kien oni sendos la homojn tiam, estos ja tamen la homoj de tiu regiono, kiuj volas havi laboron . Kion tiuj tiam faros?“

„Sinjoro Perez sentis, ke li estas superruzita. Li ne trovis la fadenon el ĉi tio. Sen multe pensi pri tio elkreis el li: „Tiu homoj do devos iri plu por rigardi, kie ili trovos laboron.“

„Sed oni ja la teron foraĉetis de ili, kiel ili do tiam vivos, se la viroj alvenos de ĉi tie? Ili ja ne havos teron plu. Ili ĉiuj devus morti, se la viroj venos de ĉi tie. Oni ankaŭ ne por eterne boros. Iam estos ja elĉerpita, la nafto. Tiam ĉiuj viroj estos forgesintaj kiel oni kultivas maizon.“

Tiel simple kiel ĉiuj problemoj estas, se disponeblas sufiĉe da tero kaj se la homoj komprenas kultivi ĝin, tiel komplikitaj fariĝis subite la plej simplaj demandoj, tuj se

la homoj estis forŝiritaj de sia tero. Tion nun eĉ sinjoro Perez ekakceptis. La indiĝeno tute ĵetis lin el sia sekura pozicio interne de la homa socio. Li eĉ katapultis lin el ĉiuj tiuj saĝoj, kiujn sinjoro Perez akiris en lernejoj kaj en la vivo. Se estus estinta antaŭ li alia advokato, alia edukita viro, ja, se estus estinta nur komercisto el pli granda urbo, tiukaze li iel estus povintau solvi la problemojn. Kun alia viro, kiu vivas en la urbo kaj en urbaj enspezebloj, li povintus priparoli tiujn demandojn. Ili certe atingus solvon, kiu kontentigus ambaŭ personojn, ĉar ili ambaŭ parolas la saman lingvon. Ili povus paroli pri leĝoj, tiuj tiukaze necesus, pri parlamentdecidoj, pri dekretoj de la prezidanto, pri pli bonaj transportebloj, pri amasproduktado de necesaj agrikulturaj produktoj, pri amasproduktado sekve de ampleksiĝanta uzado de ege fortaj maŝinoj kaj sciencaj instruoj. Kompreneble la demando ĉiam restus malferma: De kie ni prenu la teron por tio? Ĉar la aserto, ke oni povas fari maizon el la rubproduktoj de la nafto aŭ el la skorio de la ŝtonkarbo, ŝajnis eĉ al *licenciado* iom troigita.

Kiel ajn tio estis, kontraŭe al la perpleksiga simpleco, per

kiu Hacinto vidis la problemojn de la homa socio kaj de la homa estado, sinjoro Perez sentis sin tre malkapabla. Li ne povis atingi la indiĝenon. Estis tiel, kvazaŭ la indiĝeno starus sur alia planedo, al kiu oni neniam kaj kun neniuj rimedoj povus transvojaĝi ekde tiu planedo, sur kiu staris la licenciado.

La indiĝeno ne sentis, ke li venkis la advokaton, ĉar li ne komprenis, ke iu povus pensi alie ol li mem, o li, la indiĝeno, kiu vivis sur la tero kaj kun la tero, kiel produkto de la tero. Simile al arbo.

Rimarkoj

el estupido = stultulo, ŝtipkapulo

el jacal = la remizo

mulo = estas miksaĵo el vira azeno kaj ina ĉevalo Tial li ankaŭ ne estis venkebla per la lasta armilo, kiun la advokato supozis la plej forta armilo kaj kiun li tial ĝis laste retenis.

Sinjoro Perez manprenis la blankan tolsaketon. Li takse pesis ĝin dum certa konsiderinda tempo kaj tiam elverŝis kun rapida movo la tutan enhavon. Ili ĉiuj estis dek-pesaj ormoneroj. Hidalgoj. Ĉar sur ĉiujn oni stampis la bildon de la meksika liberiga batalinto Hidalgo.

Sinjoro Perez komencis nombri la monon, kvazaŭ la aĉeto jam estus okazinta.

Li suramasigis la monerojn kiel kolonetojn, po kvindek hildagoj, unu sur la alian. Tio aspektis tre beleta.

Finfine li estis stariginta kvarcent kolonetojn, laŭ vicoj kiel soldatojn.

Plaĉe, preskaŭ kontemple, li transrigardis la regimenton kaj diris: „La kompanio pagas al vi kvincent pesojn, *500 pesos oro nacional* por hektaro. Okcent hektaroj estas kvarcent mil oraj pesoj. Tio estas nur ducent mil da ili. Vi do ankoraŭfoje ricevos la saman monton. Jam morgaŭ, se vi volas tion.“

Sed la impresoj, kiun sinjoro Perez esperis vekigi per tio, tute ne ekestis. La indiĝeno por tiu sumo da oro vere ne havis komprenon. Se oni estus metinta antaŭ li monton da maizo aŭ kvincent porkojn, li estus kompreninta tion. Kompreneble li ankaŭ por tio ne estus vendinta la bienegon Rozo Blanka. La maizo iutage estus formanĝita, kaj la porkoj iutage estus manĝitaj. Kaj kio poste? Malsato por tiuj, kiuj postvenos. Fidinda estis nur la tero. Ĝi naskis de eterneco ĝis eterneco, nelacigeble donaceme, de eterneco ĝis eterneco ripetiĝante kiel virgulino, tremante pro amo, arde akceptante, jubile naskante, kontente velkante kaj tiam denova kvietaj kaj sankta ekĝermado de kortuŝa virgulineco, tremante de amo kaj tiel plu kaj tiel plu, de eterneco ĝis eterneco, kiel Suno, kiel Luno, kiel tago kaj nokto.

Sed la mono, la maizo, la porkoj, kiom ajn ili estis, ĉio ĉi estis nur unufoja kaj neniam denova.

Ankaŭ Hacinto sciis sufiĉe bone la valoron de hidalgo. Tio estis cent aŭ cent kvindek aŭ nur okdek kilogramoj da maizo, laŭ la merkata prezo. Estis elkreskinta porko de meza kvalito. Unu hidalgo, dek pesoj, estis multe da

mono. Tre multe da mono. Sed tiu regimento de ormoneroj, kiuj ĉi tie laŭvicigis sin sur la tablo, ne faris impreson al Hacinto. Ties valoron li ne kaptis. Tio estis iluziaĵo. Tia valoro ne ekzistas.

„Tio aspektas tre bele, *señor licenciado*“, li diris fine por dediĉi ĝentilan rekonon al la ludado de la advokato.

„Tio ĉio apartenas al ci, Hacinto“. Sinjoro Perez subite ciis lin por montri sin sufiĉe frateca. „Tio ĉio apartenas al ci kaj ankoraŭfoje tiom multe, ĉar tio estas nur duono del' tuto. Por Rozo Blanka.“

La advokato ankaŭ tute bone estus povinta oferti la monon al Hacinto por la rajto tranĉi la koron el ties vivanta brusto.

Tiel okazis, ke tiu regimento de mono ne viviĝis por Hacinto. Ĝi ne vekis sonĝojn en li. Ĝi ne inspiris esperon en li. Tiuj ĉi kolonetoj ne havis potencon pri li kaj ne povis gajni potencon pri li, ĉar en liaj okuloj staris io pli granda, io pli grava, io sankta.

Kion li posedis, tion li iam transprenis de siaj patroj, ne

por posedi ĝin kiel proprajon, sed por konservi ĝin kaj iam doni ĝin plu al la posteuloj. Kion li posedis, estis nur pruntedonita al li, estis nur lia posedo por administri ĝin por la venontaj generacioj. Lia plej grava devo estis pludoni la pruntedonitan havaĵon nemalpliigite, kiam lia horo venis. Kion li povus diri, se li iam renkontus siajn patrojn en la ĉasterenoj de la eterneco kaj ili demandus lin: 'Kion vi faris kun nia havaĵo? Kion vi faris kun la havaĵo de niaj nepoj kaj pranepoj?' Pro honto li devus kaŝi sin en la plej foraj kaj plej tenebraj anguletoj de la arbustaĵoj, kien neniam penetras Suno kaj neniam Luno lasas ŝvebadi sian softan arĝenton. Kaj kion, se eĉ ĉiuj ĉi patroj de siaj kompadroj venus kaj demandus lin: 'Kion vi faris kun niaj filoj kaj filinoj?' Kaj tio tiel irus plu ĝis la praeternaj foraj tempoj. Ĉiujn tridek aŭ kvardek aŭ kvindek jarojn novaj viroj venus supren en la verdajn ĉasterenojn kaj demandus lin: 'Kie estas la havaĵo, kion viaj patroj konfidis vin por ni?' Ili elŝirus lin el siaj malhelaj anguletoj kaj tiam reĵetus lin, se li ne povus respondi. Tiel tio irus plu de eterneco ĝis eterneco. Kaj neniam estus trankvilo. Neniam trankvilo.

Kaj tiel, dume la oro antaŭ li ne ekricevis vivon, Rozo Blanka en tiu momento, kiam oni batalis por ĝi, ricevis la tutan. Ĝi alprenis formon. Ĝi parolis al li. Ĝi ridis al li. Ĝi iĝis persono. Li aŭdis ŝin kanti.

Li ne plu povis elteni tion. Li ekstaris kaj paŝis al la malferma pordo.

Rimarko

hidalgo = 10 pesoj

Tie li staris kaj vidis la tutan korton. La korto laŭaspekte laŭordis, kiel plej ofte, ankaŭ hodiaŭ ne tro. Tion kaj ĉi tion li volis jam pli ol centfoje ŝanĝi. Ĉiam, kiam li vidis la korton, li volis ŝanĝi ion, sed ĉiam la korto tuj poste estis forgesita kaj aspektis plu tiel.

Tie en angulo proksime de la latbarilo kuŝis malnova disrompita ĉarrado de muloĉaro, je kies ekzisto neniu plu povis rememori en la haciendo.

Tiu ĉarorado putris tre lante, ĉar ĝi estis farita el fere dura ligno. Ĉiun sabaton ĝi estis forportenda, kaj je dimanĉo matene, kiam li paŝis en la portikon, kuŝis la ĉarrado ankoraŭ tiam en sia angulo.

Li rememoris, ke ĝi jam kuŝis tie, kiam li estis kvinjara. Tiam lia patro estis dirinta: „La malnovan ĉarradon oni foje forbrulu. Manuel, dishaku ĝin hodiaŭ vespere kaj portu la lignon al la sinjorinoj en la kuirejon.“

Oni forgesis la komision kaj ne dishakis la radon.

Tiam la patro foje rediris, kiam li vidis ĝin: „La radon oni eventuale povus uzi por io, mi parolos kun Manuel, kion li pensas pri tio, kion oni povus fari kun ĝi.“

Hacinto tiam, kiam li estis proksimume okjara, cirkaŭgrimpadis en la spokoj kun la intenco fari sian korpon elasta, simile al serpento.

Dum certa tempo ĝi servis por firmligi junan kojoton, kiun li kaptis kun aliaj knaboj. La kojoton oni volis dresi, por uzi ĝin kiel hundon. Sed iunokte la kojoto tramordis la ŝnuron kaj fuĝis.

Tiam oni refoje volis bruligi la radon. Tiam oni, kun la helpo de Manuel, denove intencis uzi ĝin por io alia. Tiam, kiel junulo, Hacinto vespere sidis sur la rado kaj – estis en lia amtempo – revis pri la koramata, kiu poste edziniĝis al li. Sidante sur la ligno, li zumkantis dolĉajn ranĉokantojn. Kaj kelkajn noktojn li kaŭris sur la ligno kaj kviete ploradis por si mem, kiam li supozis, ke ŝi ne ŝatas lin.

Tiam, certan tempon poste li kun ŝi nokte kaŭris sur la

ligno kaj tranĉis noĉojn en dek aŭ eĉ pli da lokoj por ĉiu ĉirkaŭbrako de ŝi, aŭ por kio ajn estis eble. Li sciis bone, kio estis, por kio li faris la noĉojn.

Tiam mortis la patro.

Sed la malnova disrompita ĉarrado, kuŝis ankoraŭ tiam tie. Kaj eĉ plu sur la sama loko.

Tiam mortis ankaŭ la maljuna *mayordomo*, Manuel, kiu tiom ofte ricevis la komision dishaki la radon aŭ uzi ĝin por io alia.

Sed la rado ne lasis ĝeni sin pro la morto de ambaŭ viroj.

Ĝi kuŝadis tie kaj kuŝadis tie.

Kaj nun de jaroj, ĉiun sabatan, kiam oni ordigis la korton, Hacinto ordonis, ke la rado lastfine estu forigita. Kaj ĉiun dimanĉon matene, kiam li paŝis en la portikon kaj rigardis pro la vetero, la ĉarrado kuŝis ankoraŭ tiam tie. Ĝis la sekva *sabado*. Sed dimanĉe certe io mankus sur la kortego, se la ĉarrado ne plu kuŝus tie.

Kaj tiel ĝi ankaŭ nun kuŝis tie. Paceme, hejmece, impertinenta, eltenema kaj memkonscia kaj atendis la finan forputriĝon.

Lia plej maljuna knabo, Domingo, sidis nun ofte sola kaj mondperdita sur la rado kaj faris ĉeokaze entranĉojn, kiel li, la patro bone rimarkis. Li sciis ankaŭ, pri kiu knabin temas.

Sed kion li sciis plej bone, estis la jena, ke tiu ĉarrado ankoraŭ tie kuŝos, kiam li iutage estos forvokita. Ĉar la rado ne nur estis senviva peco de maljuna mahagona ligno detruata de la vetero. La rado estis simbolo. Simbolo de la raso. La ĉarrado fariĝis sentempa.

Hacinto rigardis flanken, kaj tie kaŭris Emilio, la filo de la kuiristino, de la *cocinera*. Li kaŭris tie sur la planko, havis antaŭ si korbon el fragmito kaj eligis la maizajn grajnojn el la maizspadikoj kun la helpo de spadiko jam sengrajnigita de maizo. Tiel, ĝuste tiel, oni sengrajnigis la maizon ĉi tie jam antaŭ kvin mil jaroj, eĉ pli frue, antaŭ dudek mil jaroj. Sengrajniga maŝino, kiu dum kvin minutoj pli elgrajnigis ol la knabo dum du horoj, kostis

sesdek pesojn aŭ eĉ malpli, nur kvardek kvin pesojn. Oni intencis jam aĉeti ĝin, kiam la patro ankoraŭ vivis.

Hacinto jam centfoje volis aĉeti ĝin. Sed eble ankoraŭ irus plu tiel dum certa tempo. Iris ja tiel dum kvin mil jaroj.

Kial nun per unu fojo tiel rapide? Emilio ja jam sen tio ne devas fari ion alian kaj ĉasas ĉiam nur kuniklojn. Kaj li scias eĉ tre bone sengrajnigi la maizon. Pro tio li havas fortajn manojn kaj fingrojn. Tio al li povas esti nur utila en la vivo.

Transe, proksime de la latbarilo, kiu ĉirkaŭbaras la vastan korton, staras Margarito, la *mayordomo* de la bienego kaj kurace traktas du mulojn, kiuj sekve de sia portista laboro trafrotis la dorson al si. Li zorgeme ellavas la vundojn per nigra sapo kaj varmega akvo kaj kantas ĉe tio.

Li kantas la pramalnovan ranĉokanton pri la bela indiĝena knabino, kiu amis indiĝenan knabon, aĥ tiom, aĥ, tiom amegis lin. Sed tiam algalopis la meksikano kun granda ruĝa ĉapelo kaj kun pezaj arĝentaj spronoj, aĥ, tiom fierega, tiom fierega algalopis sur blanka ĉevalo, aĥ, algalopis sur tiom, sur tiom blankega ĉevalo. Kaj la fiera mastra meksikano sur blanka ĉevalo kaj kun grandaj

arĝentaj spronoj parolis multajn miele dolĉajn vortojn, aĥ, tiom dolĉegajn, tiom dolĉegajn *palabras*. Kaj li kondukis en pekon la indiĝenan knabineton, kiu, aĥ, tiom tre, tiom tre estis en timo pro la fiera meksikano kun la granda ruĝa, aĥ, tiom grandege ruĝa, tiom grandege ruĝa ĉapelo. Kaj fine la indiĝena knabineto naskis bebon, aĥ, tiom ete etan, tiom ete etan bebon; kaj la knabineto, la *mamacita tan morena*, mortis kun sia infaneto sekrete en la profunda, aĥ, tiom profundega, tiom profundega vepro, kaj blua floro, aĥ, tiom blua, tiom bluega floro, falis sur ŝian tombon, kiun la formikoj, aĥ, tiom agemaj, tiom agemaj, ekkonstruis super la mortan knabineton.

Dume nun Margarito kantas la cent dudek strofojn, aŭ kiom ajn estas – aŭdas Hacinto en sia animo la tutan longan kanton dum kvarona horo; ĉar ankaŭ li scias ĝin kaj kantis ĝin en sia amotempo – kaj dume Margarito kun devoto kaj pasio kantas kaj ripetas kaj ripetas la rimojn melodie, li interrompas sin de fojo al fojo kaj kriadas al la muloj: „*Caramba*, fulmotondro, *cabron*, virkapro, de ĉiela dio damnita kaj fikema filo de putino, ekstaru fine sen movo aŭ mi vere tretas vin – ĉe la plej

sankta kaj plej pura enĉiela Virgulino, *por Santa Purissima* – tamen ankoraŭ en vian damnitan postaĵon, stinkanta filo de maljuna putino, kiu vi estas.“

Sed tiu ĉeokaza refalado en la brutalan nudan realecon de la dura laborriĉa vivo tute ne ĝenas la sekretoplenan kantadon de Margarito. Li kantas post tiu surtera elreliĝo sen tertremiga disonanco tuj denove laŭ kortuŝa maniero melodie pri la bela indiĝenknabino, kiun fiera meksikano kun ruĝa ĉapelo kaj sur arda blanka ĉevalo kondukis en pekon kaj forkondukis. Disonancoj estas fremdaj al Margarito, ĉio rimas sin kaj ĉio estas en harmonio.

Hacinto estas *compadre* de Margarito, li estas baptopatro al ĉiuj liaj infanoj; kaj la patro de Margarito estas baptopatro de la du plej maljunaj infanoj de Hacinto, krome de la knabo Domingo, kaj de la plej maljuna knabino Juana . La patreco de Margarito ne estas tute klara. Almenaŭ oni ŝajnigas tion tiel. Sed en la tuta bienego oni scias tion, kaj al ĉiu, kiu volas scii tion, oni rakontas, ke la patro de Hacinto estas ankaŭ la patro de Margarito. Margarito mem trovas tiun fakton verŝajna. Ĉiukaze li neniam kontestas ĝin. Kaj lia patrino, kiu

ankoraŭ vivas en la haciendo, kiu prizorgas la kokinojn kaj kunhelpas en la domo, diras nek jes, nek ne. Ŝi nek fieras pri tio nek hontas pri tio. Se ŝia Dio favoris ĝin per la graco beni ŝin per infanoj, tiukaze por si mem tio estas egala, kiu estas la patro. La patro estas sendata de Dio kiel rimedo por la celo. Alimentaj demandoj ne ekestas, ĉar kreskas maizo kaj kreskas fazeoloj en la bienego abunde; kaj ĉiu, kiu vivas tie, havas rajton je maizo kaj je fazeoloj kaj je kokinoj kaj je porkoj. Ĉio ĉi estas negravaj aferoj, ĉu tie manĝas dudek aŭ kvindek pliaj infanoj, se la infanoj distribuiĝas al la familoj kaj, se la patro rigardas ĝin honoro kaj ĉiela beno rajti esti la patro, eĉ se li ne estas. La patrono de la haciendo tute ne rigardas tien. La infanoj, ĉiuj infanoj, estas senditaj de la ĉielo, kaj tial ili havas rajton je vivo. Se tie ne troviĝas patro, jen ĉiam ankoraŭ ceestas la patrono de la bienego, kiu nutras la infanojn, kiu devas nutri ilin, laŭ indiĝena leĝo, kaj kiu nutras ilin eĉ kun ĝojo, ĉu laŭ leĝo aŭ ne laŭ leĝo. Leĝoj, kiuj ne estas en la sango, ja tamen ne havas valoron.

Kaj Hacinto rigardas transen al la dissemitaj kabanoj kaj oblikvaj *adobe*-domoj, kie ili ĉiuj loĝas, la idoj de tiuj, kiuj

vivis kun siaj patroj ĉi tie. Malgranda popolo, sed aŭtentika popolo kun aŭtentika reĝo. Kie la reĝo ne estas reganto, kie la reĝo ne vivas en lukso de tio, kion lia popolo sklavlaboras por li, kie la reĝo estas nenio pli ol administranto, ol konsilanto, kie liaj tutaj rajtoj kiel reĝo konsistas en tio, esti respondeca por la bonfarto de tiuj, kiuj estis konfidataj al li de siaj patroj. Konfidataj ne kiel subuloj, sed kiel samrajtuloj, kiuj interkonsentiĝis post la spertoj el miloj de jaroj, ke unu familio administras la teron de la popolo por eviti, ke post la morto de la estro de la familio la viroj de la tribo komencas sangan batalon por elbatali la rajton al si decidi, kiu estas administranto kaj gvidanto por la sekva generacio. Por tiaj bataloj la homoj ne havas tempon, kaj ili ne havas tempon trankviligi la malamon, kiu restus post tiaj bataloj en la popolo. La virbovoj faras ĝin tiel en la brutaroj. Sed la indiĝenoj ne rigardas sin samaj al bruto. Tiajn etajn popolojn oni ĝenas ĉiam nur tiam rilate la ordon, la hierarkion por ni ŝajne primitivan kaj la solidarecon, se aperas etna grupo aŭ tribo de urbuloj kaj konstruantoj de urboj. Urboj devas ensuĉi amasojn de homoj por povi ekzisti kaj evoluiĝi. Kaj ĉar tiuj amasoj priloĝas multe

malpli da tero ol nepre necesas, por nutri ilin, ili invadas tiujn popolojn, kiuj senpere kunkreskis kun la tero, kaj ili starigas ordon, en kiu la urbulo fariĝas la tirano kaj la kamparano la heloto.

El la kabanoj penetris la fumo de la fornoj tra la ĉiam malferma pordo kaj la fendoj de la muroj. Antaŭ kelkaj kabanoj surgenuis la inoj antaŭ la *metate*, la frotmuelilo, kaj frotis la maizon. La porkoj, la kokinoj, la meleagroj, la azenoj, la birdoj kaj bestoj de la vepro kaj de la ĝangalo, kiuj estis breditaj kaj kutimigitaj al la domo, kapreoletoj, lavursoj, hundoj kaj katoj iradis sur la kortoj, premis sin dense al la indiĝenino, kiu kaŭris antaŭ la frotmuelilo. Se ŝi iom rektiĝis por viŝi la ŝviton de la frunto, jen ŝi eble ĵetus bulon de la maizpasta inter la malsatajn gastojn de la korto, kiuj komencis sovaĝan batalon pri ĝi. Tiam ridis la ino kaj iris denove kun freŝaj fortoj al sia laboro. Al tiu laboro, kiun manmuelilo finas post nur tri minutoj kaj je kiu la indiĝenino sidas tutan horon kaj devas uzi por tio ĉiujn fortojn, kiujn ŝi havas en si. Sed la manmuelilo kostus dek kvin pesojn, kaj kion oni faru kun la cetera tempo, se oni havas preta la tortiljopaston, *la masa*, post

tri minutoj? Sed estas pli granda plezuro havi ĉiujn ĉi bestojn ĉirkaŭ si kaj ĉiujn ĉi infanojn inter si. Dum la tri minutoj je la manmuelilo la bestoj ne povus kolektiĝi, la infanoj ne povus petoladi kun la bestoj kaj kriĉadi, oni ne povus vidi tiom multe, kaj ne povus travivi tiom. Se oni vidis kiel la lavurso atakis la katon, aŭ la hundo estas tradraŝita de la meleagro, tio estis vivo. La manmuelilo ne estis vivo, ne ridado; kaj oni ne povis rakonti ion al la edzo, se li envenas de la kampo, tiel ke ankaŭ li devas ridi.

En malnova pendigita bareloferringo ĉe alia kabano sidis papago. Ĝi ne estis firmligita kaj faris kapriolojn kontraŭ la infanoj, kontraŭ la kato, kontraŭ la hundo, kontraŭ la porkoj. Se ĝi tiam dum la manĝado sidis sur sia breto kaj ricevis siajn du tortiljojn, li manĝis nur malmulte de la tortiljoj. La plej multajn pecojn li lasis fali por certa porko, kiun ĝi preferis. Estis malgranda, sovaĝe griza turpa porko. Sed Loro, la papago, amis ĝin. Li lasis fali la pecojn nur tiukaze, se tiu porko staris sub la breto. Se estis alia tie aŭ se kuradis kokinoj tie, por kapti ion al si, la papago ne lasis fali ion. La porko, tiom amata de la papago, rigardis supren al ĝi kiel al dio, kiu fordonacas

mondojn. La familo, kiu loĝis en tiu kabano, rigardis tion milfoje; sed ĉiun tagon tagmeze elvenis la infanoj aŭ ankaŭ la patro aŭ la patrino, por vidi tion denove. Ili ne povis rigardii ĝin sufiĉe ofte. Se alia porko kaptis la bulon, kiun la papago lasis fali por sia favorato, jen la papago kriis kiel obsedite: „*Cochino! Cochino!* Porko! Porko!“ Estis la ununura, kion li povis paroli krom „*Como estas?*“ Kiel vi fartas?

Kiam Hacinto staris sur la verando, li aŭskultis la kriĉadon „*Cochino, Cochino*“. Li sciis ĝin, konis la papagon, konis la familion, sciis ĉion, ĉion. La kriĉanta kriado de la insultanta papago venis al li ne kiel sola sono, ĝi venis al li nur kiel plia tono, kiel noto en la cent mil sonoj de la eterne sama intima kaj hejmecca kantado de Rozo Blanka. Ĉiuj sonoj, ĉiu bruo, la muĝado de la bovinoj, la gruntado de la porkoj, la klukado de la kokinoj, la kokerikado de la koko, la ekscitite gluglanta bojado de la meleagro, la jubilado de la infanoj, la hurletanta plorĝemeto de beboj, la ĉeokaza bojado de hundoj, la klakado de tortiljoj en la kavanoj, la zumado de la muŝoj, la babilado kaj gakado de la inoj en la kuirejo

de lia domo, la sakrado kaj la abĵuroj de Margarito, kiu kuracadis la mulojn, la grincanta ŝrikado de la postpordo, kiu estis malfermata en tiu momento, la blekado de knabo, kiun lia patrino ŝajne vangopfrapis, ĉar li disrompis kruĉon, la vokado de indiĝeno ekstere en la kampoj, la violonado de la cikadoj kaj griloj. La mallaŭta sonorilado de la suninundata blua aero super li, ĉio ĉi miksiĝis al ununura kunigita kantado por li. La praterna kantado de meksika haciendo. En tiu kazo la precipa kantado de Rozo Blanka.

Malproksime post la kabanoj li vidis suprenveni indiĝeninojn la monteton, kun la kruĉoj sur la kapo, en kiuj ili portis la akvon de la riveroj al siaj hejmoj. La inoj iris nudapiede, kun nigra hararo longa kaj neligita. Ili estis lavintaj ĝin ĉe la rivero. Ili portis longajn, ruĝe kaj verde striitajn jupojn vualitajn ĉirkaŭ la sveltajn koksojn kaj blankajn bluzojn kun kurtaj manikoj kaj ruĝaj brodaĵoj sur la mamoj. Kun tia vesto vestis sin ankaŭ lia edzino. Precize tiel. Nur se li kunprenis ŝin al Tukspam, al *la Plaza*, al la foirplaco, ŝi vestis sin per lana robo kaj ŝuoj. Sed ĉapelon ŝi havis neniam, neniam estis havinta

en sia vivo, ĉiam nur la ŝalon de la lando, *la rebozo-n*, la ŝultrotukon.

De la kampoj la viroj revenis senhaste promenante hejmen por manĝado. Ili portis la maĉeton mane kaj pioĉojn trans la ŝultroj. Kelkaj fumis. Kelkaj faffis. La junuloj, kiuj estis kun siaj patroj ekstere, persekutis sin reciproke kaj kriaĉis. Je la malgranda kapelo la pordo estis ornamita per freŝa verdaĵo por la festo je la sekva dimanĉo.

Rimarkoj

adobe-domo = kabaneca dometo farita el argilaj tegoloj

cabron = Ziegenbock

cocinera = ĉefino de de kuirejo

cochino = fi porko

Como estas? = Kiel vi fartas?

compadre = baptopatro

la masa = la tortiljopasto

la Plaza = la foirplaco

mamacita = rendevupanjo

mayordomo = mastro por domo kaj korto

metate = frotmuelilo

rebozo = meksika ŝultrotuko

sabado = sabato

Santa Purrissima = Sankta Nemarkulita (Sankta Virgulino)

tan morena = la knabino

Ĉion ĉi Hacinto vidis nun tiel kvazaŭ li vidus ĝin la unuan fojon en sia vivo. Neniam antaŭe en sia vivo li aŭskultis la kantadon de Rozo Blanka tiel amplekse kiel nun. Kaj neniam antaŭe li tiom forte sentis, ke li estas ĉi tie la kerno de l' tuto, ke tiukaze, se li solviĝus ĉi tie de sia respondeco, ĉio kolapsus. La familoj disfalus, praeternaj ligoj estus disŝiritaj, la filo ne plu ekkonus sian patron, la nevo ne plu sian onklon. Rozo Blanka ne plu estus la pramalnova hejmo de tribo, en la memoro de la infanoj ĝi estos la ranĉo, kie laboris iam la patro. Nenio plu ligas la infanojn en ilia animo al Rozo Blanka. Rozo Blanka estos sama al la fabriko, en kiu la patro laboras en la urbo. Io, kio necesas, sed io, al kio oni ne havas personan ligon. Oni ŝanĝados lokon je lokoj, por trovi laboron, por povi vivi. Nenio plu estos sekura. Hodiaŭ bona salajro, morgaŭ sen laboro. Rozo Blanka havis ĉiam laboron, ĉiam nutraĵojn, tiom longe, kiom la Suno leviĝas kaj malleviĝas. Sed, ke ekzistas io en la mondo, kio garantias al homo la sekurecon de la vivo kaj de la nutrado, tion la infanoj estos forgesintaj. Nutraĵojn ebligos nur la fabriko,

la naftokampo, la kuprominejo, la fabriko de tekstilaĵoj, kie ĉiuj estas numeroj kaj ĉiuj havas numerojn, kiuj vespere ĉe la forlasado de la fabriko estas kroĉataj je tabulo.

Ĉion ĉi Hacinto ne sciis. Li sciis nur, ke okazus io terura kun ĉiuj siaj *compadres*, estantaj preskaŭ liaj infanoj, se ili ne plu havus Rozon Blankan, kiu estas ilia prahejmo. Okazus io kun ili, kio estas sama al tio, kio okazas al fiŝo, kiun oni ĵetas sur la sablon, kio okzas al arbo, kiun oni elfosas kaj lasas kuŝi sur ŝtonmonteto en la suno.

Hacinto staris malpli ol kvin minutojn tie sur la verando por pripensi, ĉu estas elirvojo. Al li tiuj kvin minutoj aperis kiel tuta vivo. Li vivis dum tiuj kvin minutoj ne nur en la nuntempo, sed ankaŭ en la antaŭtempo kaj la posttempo. Li parolis kun antaŭpatroj, kiujn li ne konis, sed pri kiuj li sciis, ke ili estas liaj antaŭpatroj. Li parolis kun siaj posteuloj, pri kiuj li same sciis, ke ili estas de lia sango, de lia tribo, kvankam li ne konis ilin. Estis jam pli komplike trovi la posteulojn. En sia spirito li vaste devis serĉadi ilin, vaste en la granda respubliko kaj ĝis supren en la Unuiĝintajn Ŝtatojn de Norda Ameriko. Ĉar ili ne plu estis en Rozo Blanka.

Rozo Blanka estis *lote* nr-o 95 ĝis *lote* nr-o 144 de *Condor Oil Company Inc.* Rozo Blanka estis tereno plenplena de altaj sobraj naftaj arganoj.

Kie iam kreskis la oranĝo-kaj citronarbetoj, kie iam balanciĝis la kronoj de la papajaj arboj en la tremanta aero, por bani siajn maturajn fruktojn en la suno, kie iam estis la verdaj maizkampoj, kaj kie la staŭdoj interflustris

dum la maturiĝo de la oraj spadikoj siajn eternajn fabelojn, tie ĝemis kaj bruas nun senpardone kamionoj kun ŝtalaj ĉenbendoj trans la turmentatan teron, kiu baŭmis tie en doloro, kaj kiu tie kolere grincante trudiĝis inter la ŝtalajn bendojn por disrompi ties brutalan potencon.

Konfuzaĵo de feraj tuboj kovris la kampojn. Kaj sur tio estis reto el lumkabloj kaj telefondratoj.

Kien ajn oni rigardis, estis siblado de vapornuboj, plumbloviĝado de pezaj dikaj nebulbuloj.

La grundo estis ŝlima kaj marĉa de nafto, kiu terure stinkis kaj eligis miasmojn.

Kaj ĉie estis kriado kaj komandado kaj insultado kaj bruado. Vaporfajfiloj hurlis. Dratŝnuregoj moviĝis kriĉe akre trans anhelantajn radojn kaj trans grincantajn rulcilindrojn.

Tuboportantaj vicoj de indiĝenoj marsis trans la kampoj kiel sklavoj en ĉenoj, pelataj de sakrantaj kontrolistoj.

Kaj la sune inundata aero, kiu iam estis tiom plena de jubila kantado, estis nun plenigita kun la ĝemado kaj anhelado, kun la bruo kaj krakado de la ĉenbendoj, kun la stamfado kaj pumpumado de la maŝinoj kaj pumpiloj.

De la posteuloj de Hacinto neniu plu estis ĉi tie, krom unu el ili. Kaj tiu ununura marŝis stumblante en la vico de la tuboportistaj sklavoĵ ricevantaj du pesojn kaj kvindek centavojn ĉiun tagon; kiujn oni maldungis, se ili ne estis servemaj, aŭ se tubo falis sur piedon de ili kaj dispremis tiun.

Tiun ununuran el siaj posteuloj Hacinto tie renkontis en la spirito. Li stopis lin kaj demandis: „Kiel plaĉas al vi ĉi tie, *hijito*, filo mia?“ Jen la najbaro respondis: „Bone, *padre*. *Gracias*. Mi ricevas du pesojn kaj kvindek centavojn. En Pachuca, en la arĝentominejoj mi ricevis nur unu peson kaj sepdek centavojn. Mi havas ok infanojn, estas tre streĉige transvivigi ilin. La maizo kostas nun po kilogramo dudek du centavojn, kaj duono de ĝi estas vaka de vermoj. Sed mi ne rajtas stari pli longe ĉi tie kaj paroli kun vi, *padrecito mio*; ĉar, se la *foreman*, la skipestro, vidus min stari kaj babili ĉi tie, li elĵetus min.

Ne estas tiel facile trovi alian laboron. Kaj mi havas ok infanojn.“ Li kliniĝis super la manon de Hacinto kaj kisis ĝin. Tiam li resaltis rapide en la vicon de la marŝantaj tuboportistaj sklavoĵ.

Rimarkoj

gracias = dankon

lote = parto de terposedaĵo, parcelo

padre = patro

padrecito mio = paĉjo mia

Hacinto ne estus devigita pripensi tion. Li estis ja la laŭleĝa posedanto de Rozo Blanka. Sed li tamen opiniis ĝin bona certan tempon interkonsiliĝi kun si mem. Li sciis tion de aliaj ranĉistoj: Se usona petrolkompanio volas havi iam terposedon, tiukaze estas malfacile defendi sian terposedaĵon. Tiom oni ne povas pagi al siaj advokatoj, kiom pagas kompanio al siaj. Oni devas eble eĉ defendi sin kontraŭ sia propra registaro, kaj tio estas same tiel malfacila kiel kontraŭ usona naftokompanio. La registaro gajnas riĉajn enspezojn el la eksportdoganoj por la nafto, tial ĝi zorgas pri tio, ke sufiĉe multe da nafto estas produkata kaj eksportata. La registaro bezonas la monon, por konstrui lernejojn kaj stratojn kaj por pagi al la parlamentaj diputados, al la deputitoj, grandajn tagosalajrojn. La registaro bezonas la deputitojn kiel amikojn. Deputito estas negoco kiel brandofaristo aŭ silkkomercisto aŭ eldonanto de gazeto. La deputito ne povas fari tion por centavito, se li interkonsiliĝu pri la bonfarto de la popolo. Tiel, kiel ankaŭ la pastro en la eklezio ne povas savi animojn por nenio kaj por nenio

prediki la dogmon de la vera graco. Pri la rekompenco de Dio, pri kiu oni diras ke ĝi estas tiom dolĉa, atendas ĉiam nur tiuj, kiuj saĝiĝas neniam. Sed la deputitoj kaj pastroj apartenas al la prudentaj homoj. Ĉu ne jam Dio diris tion: Estu do prudentaj kiel serpentoj kaj prenu al vi tie, kie vi povas ricevi ion; ĉar ŝargitaj estas la laborantaj, kaj se vi estas la regantoj, tiukaze la aliaj devas submetiĝi al vi, por ke ankaŭ la du leptoĵ de la vidvino ne estu ignorataj.“

Rimarkoj

diputado = parlamentano, deputito

NT: Sankta Mateo 10,16 (Estu do prudentaj kiel serpentoj)

NT: Mateo 11, 28 (laborantaj kaj ŝargitaj)

NT: Sankta Marko 12, 41-42 (du leptoĵ de la vidvino)

NT: Tito 3, 1 (Memorigu ilin, ke ili submetiĝu al regantoj)

Hacinto vekigis el sia mondfora kontemplo.

„*Oye, compadre*“, li vokis transen al Margarito, kiu traktis la mulojn per nigra sapo, per varmega akvo kaj ranĉokantoj. „*Oye, ven aca*, venu foje ĉi tien.“

„*Que paso*, pri kio temas, *compadre*?“ demandis Margarito, dum li promenis tra la korto“.

Kiam Margarito staris antaŭ li, Hacinto diris: „Jen *caballero* atendanta en la *sala*. Li serĉas laboristojn por la naftostacioj. Ĉu vi ne volas akcepti?“

„Mi? Akcepti, ĉu? Kiel vi opinias tion, *compadre*?“ demandis Margarito mirigite.

„Kiu en tiu kazo estu ĉi tie la *mayordomo*, la estro de la korto?“

„Tion ni ja aranĝus iel“, diris la patrono.

Margarito pripensis tion dum momento, kaj tiam li

demandis: „Kiom li pagas, tiu sinjoro?“

„Ĉiutage kvar pesojn.“

„Ĉiutage, ĉu?“, Margarito demandis nekredeme.

„Jes ja, ĉiutage.“

„Multe da mono. *De veras*, serioze, multe da mono.“

„Claro.“

„Kiom longe daŭras la laboro?“ demandis Margarito.

„Tiom longe, kiom vi volas. Tri monatojn, ses monatojn aŭ por ĉiam“, respondis Hacinto.

„Tio estas tro longe. Tiom longe mi ne volas foresti. Tri monatojn mi certe akceptas. Tiam mi revenos“, diris Margarito.

„Ne. Reveni vi tiam ne povos“, opiniis Hacinto.

„Kion, *compadre*? Ne plu reveni. Kiel do? Ne plu reveni, ĉu? Kial?“ Tion Margarito ne komprenis, ke li ne plu

revenus al Rozo Blanka. Ne plu reen en sian hejmlandon.

„La *caballero* la laboristojn akceptas nur, se ili laboras plu ĉe la kompanio. Ĉiam. Se ĉi tie en la proksimo la laboro estas finita, la peonoj estas forsendataj al aliaj stacioj“, klarigis Hacinto laŭvere.

„Ne plu reen al Rozo Blanka, ĉu? Neniam plu reveni?“ filozofumis Margarito por si mem. „Ne, tien mi ne iros. Ĉiutage kvar pesojn, *caramba!* Tio estas suka mono. Sed ne plu reiri kaj por ĉiam devi esti en la naftostacioj, kie tiom fetoras, kaj kie la homoj ĉiam interbatalas kaj kverelas. Ne, *compadre*, diru al li, ke mi prefere ne iros tien. Kvar pesojn, *muy buen dinero*. Sed ne, mi ne faras tion. Vi diru al la caballero ankaŭ, ke li ĉi tie ne ricevos virojn, se ili ne rajtos reiri kaj se estas por ĉiam. En la urbo li ja ricevas sufiĉe da homoj. Sed de ĉi tie foriros neniuj.“

„Foriris jam tri junuloj de ĉi tie“, memorigis lin Hacinto.

„Jes, kompreneble“, diris Margarito, „sed unu el ili, Marko, ree ĉi tie estas. Li diras, ke li neniam denove

foriros en la naftostaciojn. Li diras, ke tio ne havas valoron. Ĉiam nur laboro, kaj tute ne ŝercoj. Ĉiam la *foreman* sidas sur la nuko kaj pelas kaj insultas la laboristojn, kiom ajn ili laboras. La junulo de Pedro estas ja nur tial tie por pli rapide kunhavigi la nuptomonon por sia muchacha. La junulo de Jose ne plu rajtas reveni. Jose ne plu lasas lin en la domon. Ĉar li havas aferon kun salonsinjorino, kiun li volas edzinigi. Jen la afero pri li. Kvar pesojn. *Hola. Bueno.* Sed mi prefere ne kuniros, *compadre*. Estas tro multe da fetoro tie. Kaj ĉiam kriado kaj insultoj. Kaj kion faru la muloj kaj la ĉevaloj, se mi ne plu estas ĉi tie? Tiuj obeas ja ja nur al mi. Krome mi ne plu vidus, kiam la bovido suĉas la bovinon kaj kiam la taŭroj elbatalas, kiu taŭro estas la plej forta. Kaj la porketoj kaj la kokidoj. Kaj ankaŭ la infanoj estus solaj. Se mi kunprenus ilin al la stacia kampadeja vilaĝo, ili ne havus lokon kaj ne sciuz, kion fari la tutan tagon. Kaj cetere, *compadre*, se mi ne povus reveni ĉi tien al Rozo Blanka, fakte vi diru al la *caballero*, ke mi ne volas fari tion, kaj ke ankaŭ neniu alia de ĉi tie volas fari. Tiuj krome ĉiuj volus reveni. Ni ja apartenas ĉi tien. Mi nun devas reiri al la muloj, tiuj aspektas aĉe kaj bezonas

bonan kuracadon. Javier estus devigita pli bone atenti. Li tute ne komprenas kiel ŝarĝi la bestojn.“

Margarito ree promenis tra la korto, fajfante la kanton pri la indiĝena amatino. Kiam li pli proksimiĝis al la du muloj kaj vidis, ke unu el la bestoj estas maltrankvila kaj ke la alia provas mordi, li ree interrompis sian kanton kaj kriis: „*Macho*, kojoto de mulo malbenita de la ĉiela Dio, mi tuj saltos al vi kaj tretos vin en la ...“ Sed kiam li nun vere atingis ĝin, li ne tretis kaj ne puŝis la beston, sed tiris ĝin nur for de la alia mulo, tiel, ke la mordado finiĝis per si mem.

Rimarkoj

caballero = sinjoro, ĝentlemano

caramba = fulmotondro

claro = klar

de veras = serioze

macho = virviro

muy buen dinero = multe da mono

sala = ĉambro, gastĉambro, enirhalo ktp...

Que paso? = Pri kio temas?

Kion Hacinto povus fari post tiu interparolado kun Margarito? Estis tiel, kiel li atendis tion. Ili apartenis ĉi tien, ĉiuj. Ĉiuj estas infanoj de Rozo Blanka. Ili kaj Rozo Blanka estas unueco nedisigebla. Oni povas disigi infanon de la patrino, ambaŭ transvivas la doloron. Sed oni ne povas disigi tiujn homojn tie de Rozo Blanka. Se oni disigus ilin de ĝi, la haciendo kaj ili ĉesus esti tio, kio ili estas. Rozo Blanka povus plu ekzisti kiel ranĉo aŭ bienego; sed ĝi ne plu estus Rozo Blanka. Ĝi estus bienego kiel multaj miloj de ili. Eĉ des pli, se ĝi fariĝus naftokampo. Kaj se la homoj forirus de ĉi tie, kiuj havas siajn radikojn ĉi tie de jarcentoj, ili ne plu estus la samaj homoj. Ili estus tiam nur plu konfuzaj kaj disigitaj senhejmaj kamplaboristoj aŭ peonoj en la naftostacioj aŭ vagabondoj en la stratoj de urbo. Ili estus homoj ŝiriaj el siaj radikoj, uloj, kiuj perdis sian vivosencon kaj sian vivfadenon, ĉar ili apartenus plu nenien. Il perdus ne nur la vivfadenon, kiu ligas ilin kun la tero, ili perdus eĉ plian, pli grandan. Ili perdus siajn koron kaj animon, kiuj estis unuecaj kun Rozo Blanka, kie ilia historio radikiĝas; kie

naskiĝis kaj vivas iliaj lulkantoj, iliaj amkantoj, iliaj fabeloj, iliaj fantomhistorioj, iliaj aĉaj koboldoj, iliaj tergnomoj. Iliaj feinoj kaj feoj kaj arbonimfoj.

Margarito nur konfirmis al Hacinto, kion Hacinto sciis longe antaŭe, kaj kion sciis lia patro kaj lia avo kaj ĉiuj antaŭpatroj, ke la haciendo Rozo Blanka ne apartenas al li, ke li ne estas la posedanto, ke li estas nur la adminstranto de tio, kio estas la posedaĵo de ĉiuj, de tiuj, kiuj vivas ĉi tie kaj kiuj vivis ĉi tie de eternaj, ŝajne praeternaj tempoj. Ĉiu volas reveni, ĉar li devas. Li povas labori ie aliloke, ie aliloke enspezi monon, sed vivi li povas nur ĉi tie. Tial Hacinto ne havis la rajton, ne la solan rajton je Rozo Blanka. Kaj se li estus kunvokinta konsilion de viroj, kiel preskaŭ ĉiumonate okazas por priparoli la laboron, sed ĉifoje nur por demandi: 'Ĉu ni vendu Rozon Blankan kaj ricevu multe da mono?' Jen ĉiuj estus dirintaj, ke oni ne povas fari tion, ĉar tie vivas ja ankoraŭ la infanoj.

Hacinto iris en la loĝoĉambron. La advokato ankoraŭ sidis ĉe la tablo kun la kolonetoj antaŭ si. Li ne kuraĝis forlasi la tablon, por iri al la verando, li timis, ke ormonero estos ŝtelita kaj li devus nombri ĉion denove. Sed ĉu tie troviĝus unu ormonero sur la tablo aŭ dek aŭ mil da ili, li estus povinta lasi la tablon sola kaj neprotektata dum horo aŭ dum duono de tago, kaj se li estus reveninta, li ne devintus renombri la ormonerojn. Nenio mankus. Sed li estis advokato, kaj tial li ne fidis al la homoj. Eĉ ne en vidodistanco.

„Nu, do, Hacinto“, diris sinjoro Perez, kiam li vidis enveni la indiĝenon „tiel do nun Rozo Blanka estas vendita. Jen, ankoraŭfoje nombri la monon.“

Hacinto ne sidiĝis. Li diris trankvile: „Rozo Blanka ne estas vendita. Kaj Rozo Blanka ne estos vendita, eĉ se vi dekfoje pli da mono metus sur la tablon. Tiu ĉi mono tie ne havas valoron por mi. Oni tute ne povas ŝanĝi terpecon por mono.“

„Ĉia speco de lando estas ja interŝanĝata aŭ vendata por mono“, interdiris sinjoro Perez, nur por diri ion.

Hacinto, ankoraŭ nun staranta, diris pri tio: „Terpeco estas eterna. Mono ne estas eterna, tial oni ne povas ŝanĝi pecon da tero kontraŭ monon.“

„Do, sekve ne“, koleriĝinte elvokis la advokato post certa tempo. Dume li ensakigis la monon, li aldonis: „Vi estas idiota olda ŝtipkapulo. Jen tio, kio estas vi. Oni devus sendi vin en la azilhejmon por frenezuloj, al la *Castaneda*. Jen la loko, kien vi apartenas kaj ni tamen ankoraŭ ricevos la Rozon Blankan. Pri tio vi povas esti tute certa. Kaj ni ricevos ĝin malkare. Pri tio fidu al mi. Tre multe pli malkare. Vi ellasis vian okazon. Hermanito, frateto. Nur tiom mi diru al vi. Ni ja kaptos vin.“

„Vi ĉiuj tute ne povas kapti min“, vokis Hacinto, nun same iom koleriĝinte. „Vi ĉiuj povas grati min ĉe la postaĵo, tion vi rajtas. Kaj timigi min vi tute ne povas. Vi ne. Kaj neniu. Kaj vi ricevos eĉ ne unu viron de Rozo Blanka por la stacio por laboro. Ankaŭ tion mi povas diri nun al vi. Ĉu vi volas ankoraŭ havi *copita*-n, glaseton?

Bonan habanero de San Juan Bautista?“

Li enverŝis la glasetojn, la advokato diris: „*Salud!*“

Hacinto tenis alte sian glaseton kaj respondis: „*Salud!* Je via sano!“, kaj ili enverŝis la enhavojn de siaj glasetoj.

La advokato firmligis la tolsaketon, vokis sian mozo-n, sian servistknabon, alkonduki la ĉevalojn, surseliĝis, adiaŭis Hacinton kun ĉiuj ĝentilecoj, kiujn meksikano ne forgesas eĉ tiukaze, se li estas seniluziiĝinta aŭ ĉagrenita, kaj forrajdas.

Rimarkoj

castaneda = azilhejmo por frenezuloj

copita = glasteo

habanero = skotviskio kun kapsiko kaj pliaj ingrediencoj.

San Juan Bautista = Johano la Baptisto

Kiam Hacinto staris sur la verando kaj postrigardis la forrajdantojn, li pensis nur pri unu afero: “Kiel li povas meti min en la *castaneda*-n? Mi ja tute ne estas freneza. Mi ja estas tute prudenta, tute klara en la kapo.”

Tiam li promenis transen al Margarito, observis lin dum certa tempo ĉe la kuracado de la muloj kaj fine diris: „Sekvan semajnon ni povus peli la junan brutaron en la stalon kaj stampi ilin per la brulmarkoj. Kaj dimanĉe ni ambaŭ foje rajdos al la Concordia. Don Federico havas bonegan virazenon, kiun li volas vendi. Li portas *carga*-n, ŝarĝon da okdek kilogramoj sen zigzagado. Kun ĝi ni faros altkvalitan bredaron de muloj.“

„Tion mi antaŭdiris nun jam kvin jarojn al vi, *compadre*“, opiniis Margarito. „La muloj nun havas tre bonajn prezojn, kaj tiel bone fareblas io pri mulobredado.“

„Lasu la du malsanajn mulojn ĉi tie ankoraŭ du semajnojn sur la paŝtejo sen laboro, por ke ili resaniĝu rapide“, diris Hacinto.

Tiam li iris en la domon. De la verando li vokis al la inoj en la kuirejo, ke li volas havi kafon, ĉar li soifas.

PARTO II

ĈAPITRO 02

01

La raporto de la advokato Perez atingis la ĉefkvartiron de *Condor Oil Company* en San-Francisko.

Kion pensas tiu *chunk*, tiu kota ŝtipkapula indiano, kiu li estas, kaj al kiu li rilatas ĉi tie?!“ diris la prezidanto de la kompanio, *Mr. Collins*. „Terposedaĵo, kiun mi volas havi kaj ne povas ricevi, ne ekzistas en la tuta universo. En tiu ĉi universo certe ne. Se mi volas havi iun terposedon, kaj se ĝi troviĝus sur Jupitero, tiukaze mi ricevas ĝin, as sure *as death*.“

Tiu ĉiu eldiro de la prezidanto estis rigardata kiel bona ŝerco, ĉar diris ĝin la prezidanto mem. La ŝerco rondiris tra ĉiuj oficejoj de la kompanio kaj ĉiu salajrulo sentis sin devigita ridi, ĝuste tial, ĉar estis ŝerco de la prezidanto. Nur la plej juna oficeja komizo, dekkvarjara senrespekta bubaĉo ne ridis pri tio, sed diris al la plej juna

oficejkomizino, kiu estis same tia impertinenta flavbekulo kiel li mem: „Tia kaĉo, kaj li nomas sin Prezĉjo, sed kiel li povus atingi Jupiteron? Ĉu bona ŝerco de la prezĉjo? Jen iu devas tikli min ventre, kaj eĉ tiam mi ekplorus.“ Tiam ambaŭ subridetis kune ĝis la ĉefo blekis al ili: „Estu kvietaj tie! Kokidogrimaculoj, kiuj vi estas!“ Tiuj du kokidoj efektive ne devis ridi pri la ŝerco de la prezidanto; ĉar ili ne devis zorgi pri familio, kaj por kvar dolarojn semajne ili ankaŭ aliloke povus enspezi ion.

Rimarkoj

As sure as death = certa kiel la morto

chunk = ŝtipkapulo, malsaĝulo

Prezidanto *Mr.* Collins estis sperta kaj lerta. Tio certis. Se li volis atingi ion, jen ekzistis nenio, kio estus povinta deteni lin ĝin ricevi. „Vi devas nur serioze voli havi ion, kaj jam vi ricevas ĝin kun certeco!“ Jen unu el liaj multnombraj devizoj, kiujn li estis amasiginta ĉirkaŭ si.

Sur la giganta skribotablo tuj malantaŭ lia inkujo kun la eleganta tenilo „*always ready*“, ĉiam preta por tuja uzado, staris aŭtentika arĝenta kadro kun enmetita japana paperfolio de la plej kara speco, sur kiu estis presita kun ruĝaj gotikaj presliteroj:

SMILE, SMILE, SMILE

ALWAYS

AND FOREVER

SMILE

Tio signifas: Ridu, ridu, ridu, ĉiam kaj por eterne ridu. En malgranda skribo sub tio legeblis rimita, ke oni ridu ankaŭ tiukaze, se oni suferas korpajn dolorojn, se la plej kara estas forŝirata de oni, se oni estas forlasita de ĉiuj

amikoj kaj se oni perdas sian tutan havaĵon.

Maldekstre de tio legeblis alia orlitera proverbo:

SMILE

WORK

AND GIVE

THE POOR

tio signifas: Ridu, laboru, kaj donu al la povruloj. Dekstre de tio estis plia enkadrigita proverbo:

HONESTY

IS

THE BEST

POLICY

tio signifas: honesteco estas la plej bona politiko.

Malantaŭ li ĉe la vando, tiel ke ĉiu devu legi ĝin, kiu sidas antaŭ li kaj interparolas kun li, troviĝis en granda kadro la proverbo:

YOUR TIME

IS

OF HIGH VALUE

SO IS

MINE

Via tempo havas grandan valoron, sed mia ankaŭ. „*Time is money*“ fariĝis tro simpla por pendigi ĝin en la oficejo de prezidanto de granda kompanio en arĝenta kadro.

Sur lian tablon li krome metis bildon de sia edzino, kiu estis jam sufiĉe graskorpa. Kaj bildo de sia filino, kiu ankoraŭ ne estis graskorpa, sed pri kiu oni povis ekscii jam sur la bildo, ke al ŝi en tiu ĉi mondo estas kaŝita nenio plu. Krome ŝi tute aspektis kiel filmaktorino.

En tirkesto sur la dekstra flanko sub negocaj paperoj li ankoraŭ kaŝis kelkajn fotojn de la ĥordamoj de „*Follies*“. La knabinoj sur la bildoj aspektis impertinentaj kaj multekostaj.

En la sama tirkesto estis plia bildo en papera kolektujo. Sur tiu bildo legeblis: *To my beloved Daddy from your Flossy*; al mia amata paĉjo de via Flossy. Li tute ne estis la paĉjo de Flossy, sed estis afable de ŝi, ke ŝi

diris tion tiel kare. Ŝi kostis ĉiun monaton ĉekon mildolaran, sen donacoj kaj sen la vesperoj, kiujn li pasigis kun ŝi en la kluboj aŭ en la hoteloj ĉe la aŭtovojoj ekstere de la urbo.

La ĥorknabinoj ne estis skribintaj ion sur siajn bildojn. Li ankoraŭ ne konis ilin tiom longe, kiom la damon Flossy. Sed por tio ili estis pli multekostaj. Flossy same estis ĥordamo en tiu tempo, kiam ŝi konatiĝis al *Mr. Collins*; sed ŝi estis forgesinta tion kaj oni ne rajtis memori ĝin pri tio, sen furioziĝi, kio ĉiam fariĝis sufiĉe multekosta por *Mr. Collins*.

Jen ankoraŭ damo, de kiu li posedis nur tute malgrandan bildon, kiu tamen troviĝis en bele ornamita ora kadreto. Ĝi kuŝis en la pli grava tirkesto je lia maldekstra flanko, en ebona kesteto, kiu ĉiam estis fermita. Tiun ĉi bildeton li metis de tempo al tempo antaŭ sin sur la tablon, se li devis labori dum pli longa tempo kaj ne estis ĝenata kun escepto de ŝia Unua Sekretariino. Kiam venis tute neatendita vizitanto, eble eĉ de lia edzino, jen la bildeto rapide malaperis enmane aŭ en vestopoŝo.

Al tiu damo en la eleganta kaj tre kara ora kadreto, li devis aĉeti lastan semajnon aŭtomobilon. Sed ne ekskurskestaĉon por dekdu cent dolaroj. Ne por ŝi, se li de ŝi celis ion. La aŭto estis altkvalita objekto kun ĉia komforto kaj kun ĉiaj ĝuindaĵoj kaj delogaĵoj. Kiel saloneto. Ĝi kostis dek ses mil dolarojn. Je tiu tempo ĝi estis la plej eleganta aŭtomobilo okcidente de la Rok-Montaro. De kiam ŝi havis la aŭtomobilon ŝi turmentis lin nun ĉiutage kvarfoje per tio, ke ŝi devas havi ankaŭ garaĝon, kien ŝi povus meti la aŭtomobilon, kaj la garaĝo estis havebla nur kun aldona tre eleganta loĝodomo.

Dufoje ĉiusemajne vespere, propradire estis nokto, ŝi intertikladis afable kun li; sed en la hela tago ŝi nomis lin fia ĉe la telefono, ĉar li ne estis sufiĉe rapide rilate la garaĝon. Li elturnis sin per tio, ke li ankoraŭ ne trovis la ĝustan ĝis tiam. Sed tio iris tiel nur kurtan tempon. Tiam li devis certe aĉeti la garaĝon kaj kompreneble la domon al tio, aŭ li devis konti la aŭton kiel perdon. Ĉar tiukaze, se li estus tro fia havigi la garaĝon al ŝi, ŝi certe povus trovi alian, kiu rigardus ĝin honoro doni la garaĝon al ŝi.

Du el la ĥoristinoj, kiuj iom pli intimis al li, estis same

komplikitaj aferoj, kiel negoca rilato, sed ankaŭ en ĉiu alia rilato. Ĉiu havis siajn precipajn dezirojn. Kaj ĉiuj deziroj havis neniun alian koncernon ol elspezojn, kiujn li pagis ĉiujn el sia kaso.

Rimarko

always ready = ĉiam preta por uzado

Tial oni certe komprenas, ke la prezidanto de granda usona naftokompanio ne kuŝas sur lito de rozoj kaj, ke li havas siajn senfinajn zorgojn kaj aĉajn embarasojn, el kiuj li apenaŭ povas saviĝi en la vivo por kunigi la finaĵojn de ambaŭ ekstretoj. Tio postulas la tutan diligentecon kaj saĝon de homo esti prezidanto de naftokompanio, se oni trovas tiajn malfacilaĵojn en la mondo, kiajn oni devas solvi, kaj bone devas solvi, se oni volas esti prezidanto kaj daŭrigi sian prezidantecon. Al la prezidanto de naftokompanio oni ne riproĉu, ke li eble estas nigra makulo en la delikata blanka korpo de la homa socio. Tio ja ne damaĝus al la nafto, sed certe al la akciuloj. La akciuloj pli ol li mem rajtas agi laŭplaĉe; ĉar ĉiu unuopulo tute respondecas por si mem. Sed la prezidanto de naftokompanio havas pli gravajn devojn kaj pli grandan respondecon. Li prezentas ideon, principon. Li havas la respondecon por la solideco de kolono en la konstruo, en la strukturo de la ŝtato. Tiel ankaŭ kutima membro de paroĥa komunumo povas permesi al si pli da liberoj o la pastro. Paroĥano eventuale povas stumbli. Tio ne

damaĝas la eklezion en sia funkcio kiel kolono de la ŝtato. Sed se la pastro transpaŝas la limojn, la tuta preĝejo povas ekŝanceliĝi, la tuta ideo, sur kiu baziĝas la eklezio.

Kiom multe estas la mizeraj tricent mil dolaroj, kiujn ricevas tia plagata kaj ĉasata kompatinda prezidanto de naftokompanio kiel jaran salajron? Tio apenaŭ sufiĉas por la salo en la supo, kiun li manĝas. La prezidanto de naftokompanio havas devojn. Tiel simple tio ne estas, tiel simple kaj glate la vivo ne deruliĝas kiel eble pensas tion tia mizera je tri kvaronoj idiotiĝinta indiĝeno. La vivo estas multe pli komplikita. Multe pli, ĝi vere estas konfuziga. Kiel oni ankoraŭ trovu la fadenon en la afero?

Jen la granda domo en la urbo kun dudek ok ĉambroj. La prezidanto ne povas vivi en indiana kabano. Por kio oni alikaze estu prezidanto de naftokompanio? Jen la servistaro. La homoj ne estas sklavo kaj ne sklavinoj. Ili estas en Usono. Ili estas *hired persons*, luprenitaj homoj, dungitoj, dompersonaro. Ili devas esti pagataj bone.

La domo devas havi la plej bonajn meblojn kaj multe da mebloj. La domo devas havi ĝardenon, bone flegatan

ĝardenon, inda je prezidanto de naftokompanio.

Bona eleganta aŭtomobilo por li mem. Tre eleganta aŭtomobilo por sinjorino prezidanto. Ŝi devas havi ŝoforon; ĉar oni devas purigi la aŭtomobilojn. Kaj oni devas surmeti novajn pneŭojn, enmeti novajn sparkilojn. Oni devas ŝarĝi la bateriojn. Kaj farendas ankoraŭ aliaj laboroj.

Ankaŭ la filino devas havi sian elegantan aŭtomobilon. Ŝi volas ekskursi kun siaj geamikoj por pasigi agrablan tempon. Oni ja ne estas sur la mondo por ĉiam melankolie kaj malgaje kaŭri en angulo. La filino ne havas ŝoforon, ŝi veturas mem la aŭton. Kaj ŝi veturas ĝin bone. Sed la dek, kvindek aŭ cent dolaraj por punoj trafikdeliktaj pro rapidega veturado aŭ pro tio, ke ŝi lasis stari la aŭton proksime de fajorhidranto, fakte pluvegas sur ŝin. Ĉeokaze en veturo ŝi renversigas ankaŭ kolportiston, kiu starigis sin intence en la vojon por esti transveturita kaj por ekprocesi pro dolorkompensaĵo. Estas sufiĉe da advokatoj, kiuj faras nenion krom procesi kontraŭ iuj pro la dolorkompensaĵo por transveturitoj, ĉar ili postulas de ĉiu akuzita sumo kvindek aŭ eĉ kvardek

procentojn. La plendanto, kompatinda povrulo, ne povas pagi honorarion, tial li dividas la sumon kun la advokato. Tial ĉiam gajnas la advokato, ĉar li gajnas por si mem. Kaj se la prezidanto ne pagas, jen pagas asekuro, kiu same ne faras tion por nenio. Sed finfine la prezidanto tamen devas pagi.

La edzino postulas ĉiumonate mildolaran ĉekon, por la malgrandajn elspezojn, kiujn ŝi havas, por kudrilaĵa mono, kvankam ŝi neniam prenas manen kudrilon aŭ pinglon. Sed jen la glaciaĵoj, jen la masaĝistino, kaj jen la dancestro. Ŝi ankaŭ ludas kartojn, kaj ŝi ludas fervore kaj perdas en briĝoludo kun siaj amikinoj, kun la edzinoj de aliaj prezidantoj dum du horoj tri mil dolarojn. La kalkulojn por ŝiaj vestaĵoj el Parizo, ŝiaj subvestaĵoj el Liono, ŝiaj strumpoj el Nova Jorko, ŝiaj ŝuoj el Vieno oni sendas al *Mr.* Prezidanto en la oficon. Tio estas kromaĵoj. Kaj kromaĵoj estas ankaŭ la ĉapeloj, kiujn ŝi ĉiujn uzas nur kvin tagojn. Ankaŭ viskioj kaj likvoroj estas multekostaj. Des pli ekde la prohibicio.

La filino ricevas po monato nur tricent dolarojn por elspezetoj. Sed en vero ĉiumonate fariĝas tri mil dolaroj.

Tiuj ne estas kalkulataj. Ili estas pagataj el la konto por ĝeneralaĵoj. La filineto, kiam ŝi denove foje estas en bezono – kaj ŝi estas kvarfoje ĉiusemajne en bezono – rapidegas foje en la privatan oficejon; kaj *Mr.* Collins, la feliĉa patro, ĝojas, ke li estas interrompata en sia trista laboro, ke li trovas senkulpigon, babili stultaĵojn kaj ridindaĵojn kun sia filineto sur siaj genuoj. Kaj li imagas, ke nun estas sunbrilo en la senfantazia oficejo, se ŝi tiklas lin nuke kaj lin kisas sur la nazpinton kaj gakas seninterrompe: „Vi estas la plej dolĉa kaj plej kara paĉjo en la tuta mondo“ Tiel ŝi forkuras, hodiaŭ kun ducent dolaroj, morgaŭ kun kvindek, postmorgaŭ kun dudek, tiam ree kun cent dolaroj kaj tiam denove: „Dolĉa ratovosteto, paĉjo, hodiaŭ vi fartos vere malbone, mi bezonas hodiaŭ kvin cent dolarojn, sed por tio mi volas esti tute kara dum la tuta resttempo de la monato.“ Tri tagojn poste la monato jam ree finiĝis, kiun ŝi opiniis, kvankam la kalendaro sur la tablo kurbiĝas pro stomakaj doloroj, ĉar ĝi ne plu trovas la fadenon en la afero kaj ne plu fidas pri si. Sed kostas denove kvincent dolarojn. Havi sunbrilon en la oficejo de prezidanto de naftokompanio ja kostas monon.

Sed *Mr. Collins* rigardis al sia devizo: „Ridu kaj donu al la povruoj!“ Tiel li do ridas kaj faras donacojn al tiuj, kiuj bezonas ĝin. Ĉar tiu, kiu bezonas ion, estas povraj.

Kaj povraj estas la ĥordamoj de la *Follies*.

Havi neniun ĥorknabinteton, estas honto. Li ridindigus sin en la klubo. Oni lin ĉiutage, se li lasus sin vidi, kvazaŭ salte atakus per la kompatmiena demando, per kiu oni parolas al malsanulo: „He, *Greasy*, he naftulĉjo!“, lia kromnomo en la klubo, kiu havas rilaton al lia profesio kiel prezidanto de naftokompanio, „he, *Greasy*, ĉu plaĉus al vi stimula tubeto kun fosfor-arsenik-piloloj?“ Tiel tio irus ĉiutage, kun ĉiu, kiun li renkontus en la klubo. Ĉar, se ili iam kaptis ion, pri kio ili supozas, ke ĝi estas sprita, tiukaze estas tiom longe knedita kaj ripetita ĝis oni povas freneziĝi pro tio. Antaŭ ol tiuj viroj, kiuj povas enspezi milionojn da dolaroj per mangesto kaj ankaŭ enspezas tiujn, eltrovas novan ŝercon aŭ eĉ eltrovas ŝercon kaj komprenas tian, kia entenas spriton kaj humuron, povas pasi generacioj. La vivo estas vere komplika.

Devi uzi fosforarsenikon estas signo, ke oni estas olda aŭ

proksimiĝas al la maljuneco. Sed la prezidanto de naftokomapanio neniam rajtas levi la suspekton, ke li estas maljuna. Jen li ja povas fariĝi prezidanto de Usono, por tiu ofico oni bezonas nek saĝon nek junulforton, ĉar en tiu kazo tiuj aferoj estas eĉ malhelpaj, kiel pruvas la plimulto de la ekzemploj. Sed li ne plu povas esti prezidanto de naftokompanio. La ofico de prezidanto de naftokompanio postulas fortikecon, brutalecon, senskrupulecon. Nek oldiĝanta viro nek filozofo, nek verkisto taŭgas por tio.

Tiel, por deflankigi la suspekton, ke oni bezonas refreŝigajn rimedojn – la tutan fidelecon al propra edzino oni ne fidis – por deflankigi la suspekton, ke oni ne estas tute kontraŭ ŝminkiĝintaj knaboj, la ĥorknabinoj enpaŝas la respondecan vivon de la prezidanto. Li tute ne akceptas ilin kun aĉa humoro. Kvankam li estas bona kristo, fidela al la metodistoj aŭ la bapistoj – kaj se li volas rangi tre alte – al *Episcopal Church*, li opinias kiel homo kaj edzo tamen, ke Mohamedo estis granda profeto, kiu komprenis la animon de edzo tiel bonege, ke li kreis leĝojn, kiuj plifaciligas la vivon de edzo kun multaj zorgoj.

Rimarkoj

Episcopal Church = usona protestanta eklezio, kiu ankaŭ en aliaj landoj ekzistas, nun ne plu tiom grava, ĉar nur unu procento de la usonaj estas membroj de tiu eklezio. Tamen kvarono de la usonaj prezidantoj estis membroj de tiu eklezio.

hired persons = luprenitaj personoj

Mr. Collins estas potenca viro en la naftoindustrio. Dum kelkaj tagoj li povas skuadi la merkaton tiom, ke centoj da aliaj industriaj branĉoj komencas ŝanceliĝi kaj pluraj falas, tiel, ke inter la malgrandaj kaj mezaj financistoj en Wallstreet komenciĝas paniko, kiu transiras al la granduloj, kiuj ekmaltrankviliĝas, pasigas sendormajn noktojn kaj devas cirkligi cables, kablotelegramojn, trans la tutan surfacon de l' Tero, kiuj kostas dek mil dolarojn, por restabiligi la merkaton kaj reinstali la kvieton, kiu nepre endas, por ke la gigantoj povu deruligi siajn grandajn negocojn kun sekureco.

Ridinda apenaŭ rimarkinda afero povas maltrankviligi la merkaton tiel, ke interne de du horoj kvincent milionoj da dolaroj ŝanĝas sian posedanton.

Jen kompanio, kiu produktis motorojn, ĝi estis tute nekonata. Neniu iam vidis motoron de tiu kompanio. Sed la kompanio produktis, ĉiam esperante, ke ĝi povus moviĝi supren. Ĝi ne pagis dividendojn kaj havis ĉiam negativan bilancon. Ĝiaj akcioj troviĝis je kvardek ses, kaj

neniu volis havi ilin por tio. Subite la akcioj grimpis supren, je la unua tago tuj je sesdek kvin, je la dua tago je okdek du, je la tria tago je cent dek. Neniu sciis, pro kio. Neniu sciis, kiu estis la kunaĉetisto de la akcioj, ĉar la *brokers*, la makleristoj, tiuj, kiuj aĉetis la akciojn, ne malkaŝis la nomojn de siaj komisiistoj. Eĉ la plej sekuraj motorkompanioj kiel *General Motors*, komencis fali kaj falis plu. Ĉe tia neatendita suprenirado de nekonata akcio la onidiroj povas havi efikon. La plej frenezajn onidiroj estas fidataj kaj ekscitigas la borson. Jen cirkulis la onidiro, ke tiu motorkompanio akiris patenton, kiu laŭdire kreas tute novan specon de motoro, motoro, kiu bezonas nur dekonon de la gazolino, kiun bezonas kutima motoro, kaj kiu estigas laŭdire okfoje pli da forto kun tiu dekonon da gazolino. Per tio ĉiuj aliaj motoroj fariĝus senvaloraj. Neniu plu aĉetus motoron de la malnova modelo. Tiel, ĉiuj kompanioj konstruantaj motorojn, kaj ĉiuj kompanioj produktantaj aĵojn kun rilato al motoroj komencis ŝanceliĝi. La akcioj de la naftokompanioj fariĝis malsekuraj, ĉar, se la motoroj nur plu uzus dekonon de la gazolino, kien tiukaze do la multan nafton? Kaj tamen ĉio estis nenio plu krom malgranda manovro de *Mr. Collins*,

kiu volis aĉeti kelkajn malgrandajn naftokompaniojn, pri kiuj li sciis, ke ili ne povus transvivi la panikon. Li efektive ricevis ilin. Kaj la akcioj de tiu nerimarkinda motorkompanio falis en sian antaŭan kvietan kaj kontemplan estadon.

Mr. Collins devas reteni nur cent milionojn da naftohektolitroj kaj la merkato ekscitiĝas, ĉar la ludantoj ne scias, pri kio temas, la onidiroj tuj komenciĝas kaj estigas damaĝon. Aŭ *Mr. Collins* povas ĵeti en la merkaton cent milionojn da naftohektolitroj, kiujn li retenis por tiaj spekulaciaj celoj en rezervo, por tiel elvoki prezpanikon, kiu kunŝiras ĉiujn valorojn de la merkato. Ĉar ĉiuj valoroj kaj produktoj en tiu sistemo, kiun kreis la homo, estas tiel interplektitaj kaj kunmiksitaj, ke valorŝanĝo de la nafto tuj sekvigas valorŝanĝojn de produktoj, kiuj havas tute nenion komunan kun la nafto. Prezfalo de nafto povas esti gigantan prezaltigon de tritiko aŭ de kotonon aŭ de la akcioj de fervojo - kaj vaporŝipkompanioj.

Tio okazas tute logike. Multe pli logike ol ruleto. Ĝi okazas tiel logike, ke prudenta viro, kiu havas sufiĉe da

kapitalo je dispono kaj bone scias kaj trastudis la leĝojn, laŭ kiuj la movoj en tiu kazo sufiĉe logike devas evoluiĝi, ĉiam devas gajni. Sed eĉ la plej granda giganto ne havas la stoikan trankvilon, kiu necesus por persekuti sian planon kun matematika sekureco. Ankaŭ la plej granda giganto lasas kunŝiri sin de la maltrankvilo, ĉar li estas homo kaj estas venkata de homaj sugestoj. Ĉe teatrobrulo eĉ la plej trankvila kaj plej memgardema lasas kunŝiri sin de tiuj, kiuj batalas pri la eliro, kvankam ili ĉiuj povus eliri senlezitaj, se ili irus rapide, sed sen interpuŝiĝo, tra la plej proksima pordo, kaj se ili ne formus tie ekstere, ekstere de la domo, homajn bulojn pro scivolo kaj por rigardi, ĉu sekvos post ili la parencoj.

Mr. Collins estis grava viro en la naftoindustrio. Sed rilate la kvar inojn, li tamen estis nur kutima viro, kiu distingis sin de la aliaj eble nur per tio, ke li povis pagi pli sen ricevi pli por tio, ol viro povas ricevi de junulino. Kion viro povas ricevi de ino estas ĉiam la sama. Neniu ino povas doni pli ol ŝi havas. Kaj se ŝi estas doninta, kion ŝi kapablas doni, la viro lernas la grandan saĝon, ke ĉiuj inoj en tiu punkto, pri kiu nur temas, ĉiuj estas similaj. La inoj – tute certe – pensas la samon pri la viroj. Post multaj spertoj la viro fine ekkonas, ke el ĉiuj inoj havintaj, la unua estis la plej bona, ĉar la memoro pri ŝi plej malnovas, kaj estas plej proksima al la memoro pri lia juneco, kiu ŝajnas al li romantika, ĉar ĝi estas tio, kio pasis. Ankaŭ por ino la viro, kiun ŝi unue amis, estas tiu, kiun ŝi pensas la plej bona, kaj kiun ŝi ĉiam amos. La kaŭzo estas la sama kiel ĉe viro.

Oni ŝatas tion plej multe, kio estas plej multekosta. Eĉ la ĝojdiino amas nur tiun viron sincere, por kiu ŝi devas enspezi la monon, kaj kiu eĉ tradraŝas ŝin ĉeokaze.

Inter la kvar pruviloj, kiujn *Mr.* Collins havis, por pruvi al siaj amikoj, ke li troviĝas en plena vivoforto, estis Betty la plej ŝatata momente. Ĉar ŝi estis la plej multekosta.

Flossy, kiu ricevis sian ĉekon kun mil dolaroj ĉiun monaton kun la reguleco, kun kiu edzo devas pagi la monon por la dommastrumado, troviĝis en lia imago kaj en lia sentado preskaŭ jam en la sama rango kun lia edzino, *Mrs.* Alice Dawis Collins. Li malkonkordis kun ŝi, li kverelis kun ŝi, li sentis sin vokata kaj rajtigita kritiki ŝin kaj la noktoj, kiujn li kun ŝi pasigis en geedzeca komuneco en la lito, estis precize regulitaj kaj ordonitaj. Li forlasis ŝian domon regule je la kvara matene, se li devis plenumi siajn geedzecajn devojn al ŝi, ĉar li ne volis reveni hejmen pli malfrue, por ĉiam ankoraŭ povi diri, ke li estis tiel longe en la klubo. Kiel al sia edzino, tiel li devis permesi al Flossy du vojaĝojn ĉiujare, en vintro vojaĝon al Palm Beach en Florido kaj somere vojaĝon al Kanado aŭ al Europo. Li kompreneble vizitis ŝin laŭ devo en *Palm Beach*, pasigis tie kun ŝi proksimume dek tagojn kaj tiam transiris al Havano, kien li kunprenis ŝin, kaj tiam al Tampiko, kien li ne kunprenis ŝin, ĉar li devis veturi al

Tampiko komisie de la kompanio. Tiel la tuta vojaĝo estis pagita per konto de Kondor-kompanio, per kio konsiderinde malkariĝis la pagenda somera ripozovojaĝo de Flossy. Li estus povinta kunpreni Flossy ankaŭ al Tampiko. Sed estis pli malkare resendi ŝin de Havano al *Palm Beach*. Krome estis por li pli oportune. En Tampiko li trovis ĉiam jam je la unua vespero tion, kion li bezonis. Kaj li povis agrable ripozi de Flossy ĉe alia haŭt-harar-kaj okulkoloro. Li ja ne komprenis kion la brunhaŭta ino en Tampiko parolis al li pri amo. Sed tio ne necesis; ĉar ambaŭ sciis, kion ili volis de la alia flanko, kaj por tiuj deziroj la lingvo estas internacia. La brunhaŭta en Tampiko povis sufiĉe bone elparoli angle la vorton '*money*', eĉ la nombrojn, kiujn ŝi ligis al la vorto '*dolaro*'. Plian nek ŝi nek li devis scii. La ripozo de Flossy, post kiam li daŭre estis kun ŝi dek aŭ dekkvar tagojn, estis tre bonfartiga al li. Ĉar Flossy komencis fariĝi pli kaj pli simila al lia edzino. En ĉiuj aĵoj. En la lito. Dum paroloj. Rilate la vestaĵojn. Pri la grumblado. Ĉe la farado de predikoj. Li ne estis tiom filozofa por scii, ke du inoj, kiuj troviĝas dum sufiĉe longa tempo sub la influo de certa viro, de kiu ili dependas laŭ ekonomia vidpunkto, fariĝas

similaj kiel ĝemeloj.

Flossy estis, se *Mr. Collins* faris la finkalkulon, la plej malmultekosta el liaj amikinoj. Tial ŝi estis la plej fidela. Kaj tial li povis enuigi kaj tedi sin kun ŝi same tiel bonege kiel kun sia edzino.

La du ĥordamoj pli freŝdataj, ankoraŭ ne estis rigardataj plenvaloraj, kvankam ili jam pli kostis ol Flossy, por la nuraj proksimigaj donacoj donendaj de li. Provizore ambaŭ ŝajne havis plu iujn aliajn devojn, de kiuj ili finfine volis solviĝi, tuj, ekde kiam ili scias precize, kiom valoras *Mr. Collins*. Ne kiom li valoras kiel viro aŭ amato. Sed kiom li valoras rilate la pagokapablon kaj la pagovolon. Kompreneble neniu el la ĥordamoj sciis ion pri la alia, ke ankaŭ tiu troviĝas en la proksimiĝa fazo al *Mr. Collins*. Tion *Mr. Collins* sciis malhelpi; ĉar tiukaze, se ambaŭ komencus batali pri tio, kiu el ili gajnos la prezidanton *Mr. Collins*, jen fariĝus multekoste por *Mr. Collins*. La damo, kiu perdus la batalon, komencus fari malfacilaĵojn al li, por savi tion, kio saveblas. Kaj tio, kio savendis, ĉiam estis granda sumo, pro la virgulineco ĝis tiam ne tuŝita – laŭdire ne tuŝita ĝis tiam – kiu ĉe la batalo pri la objekto

perdiĝis, kiu devis esti ĝuste remetita en la originan staton.

Tio deruliĝis ĉiam tre simple. Oni agis ĉiam laŭ la sama aŭ almenaŭ laŭ tute simila recepto. Laŭ tiu recepto okazis ankaŭ al *Mr. Ayres*, prezidanto de *Grannis and Cosland Refining Company*.

Rimarko

money = mono

Mr. Ayres iumatene trovis en sia oficejo leteron de *Simmons & Simmons, Attorneys at Law*. La advokatoj skribis al li, ke *Miss Minnie White*, kantistino kaj dancistino de l' *Vanity*-teatro, intencas plendi kontraŭ *Mr. Ayres* pro rompo de la geedziĝpromeso, kaj ke *Miss Minnie White* sumigas sian financa damaĝon, kiun ŝi suferis ĝis tiam, je sepcent kvindek mil dolaroj, sumo, kiu rilate la bonstatecon de *Mr. Collins* devus esti rigardata kiel ridinde eta sumo.

Mr. Ayres neniam promesis la geedziĝon al *Minnie*. Tion sciis *Minnie* tute bone, kaj tion sciis ankaŭ tute bone la advokatoj, sen diri tion. Ankaŭ *Mr. Ayres* sciis sufiĉe bone, ke *Minnie* kaj ankaŭ la advokatoj sciis tute precize, ke li neniam promesis la geedziĝon al *Minnie*. Sed *Minnie*, la advokatoj kaj *Mr. Ayres* sciis, ke en Usono damo, kiu scias bone prezenti sian kazon, ĉe la asizaj juĝantoj ĉiam havas sukceson rilate tion, kion ŝi celas sukcesigi. Tial oni telefonis tien kaj ĉi tien kaj interparolis tien kaj tien, kaj *Minnie*, kies koro finfine moliĝis,

konsentis rekompenciĝi sian damaĝon finfine per cent mil dolaroj. Ŝi ricevis nur sesdek mil dolarojn retikuleten, ĉar la advokatoj postulis kvardek procentojn de la priplendita sumo por si mem.

Ĉar en tiu kazo, se ili perdus la proceson, ili ricevus nenion, ĉar *Miss Minnie* havis ja nenion. La advokatoj tial transprenis la riskon.

Mr. Ayres povis pagi eĉ ne la cent mil dolarojn sen sukcesa bankrompo, ĉar li havis familion. Lia salajro estis alta, sed ne tiom alta, ke li tiel simple estus povinta pagi cent mil dolarojn.

Tiel oni do transdonis la plendon al juĝejo. Nun oni jam ne plu atendis, ke *Mr. Ayres* pagus la plenan sumon, alie li ne estus plendinta, sed ke li aranĝiĝus. Sed la plendo devis esti transdonita, por trovi okazon lanĉi la aferon en la gazetojn. Tuj kiam estis procesafero, oni povis uzi la gazetojn kiel kunagantojn.

Mr. Ayres apartenis al la supera socio, kaj lia ofico kiel prezidanto de unu el la plej potencaj kompanioj faris el li

interesan personon, kiun vidi implikita en skandalon, plej bone kontentigis la sensacibezonon kaj la klaĉemon de la homoj. La kompatindaj homoj, al kiuj estis malpermesataj aŭ tiom cenzurataj kaj obscenaj filmoj kaj maldecaj romanoj kaj sukaj voluptoludoj, ke ili fariĝis tiel senerotikaj kaj enuigaj kiel la merkreda vesperoprediko en la metodista eklezio, do tiuj ĉi kompatindaj homoj trovas subite novajn refreŝigajn instigojn en sia seka vivo, se ili povas legi suko- kaj spermoriĉan historion sur la unua paĝo de gazeto. Ĉi tie la cenzoristo ne rajtas interveni, ĉar estas ja juĝeja afero. La juĝejoj estas publikaj, kaj ili devas esti publikaj en aŭtentika respubliko por malhelpi koruptiĝon kaj maljustajn verdiktojn.

Kion la gazetreporteroj faras el la simpla historio, tion legi estis mirinda. Ĝi forgesigis ĉion, kion la cenzoroj en la lastaj dek du monatoj malpermesis legi kaj rigardi al siaj ŝirmatoj. De la oldaj sekiĝintaj preĝfratinoj de la alta kaj sole sankta *Episcopal Church* fluis la muka salivo el la malksekaj buŝanguloj, kiam ili rajtis legi kiel aliaj homoj kondutas, homoj, kiuj rezignas pri tio amuzi sin sola kun

si mem.

En grasaj gigantaj presliteroj legeblis sur la frontpaĝo de
la matenaj gazetoj eĉ sur du linioj:

*PRESIDENT OF BIG CORPORATION SEEN WITH
DANCE OF THE VANITY THEATRE ONLY WITH
STOCKINGS ON*

La prezidanto de unu el plej grandaj kompanioj estis rigardata kun dancistino de la *Vanity*-teatro, kiu estis vestata nur kun siaj silkaj ŝtrumpoj.

Sub tio en malpli grasaj presliteroj:

*DENIES HAVING PROMISED MARRIAGE BY GIVING
ENGAGEMENT RING SAYS RING WAS ONLY GIFT OF
FRIENDSHIP WITHOUT MEANING*

*Is Already Married has Three Children Eldest
Collegegirl Dancer to be Mother soon asks Three
Quarters of Million Dollars Damage*

Li promesis al ŝi la geedziĝon per tio, ke li ŝovis la ringon de gefianĉiĝo sur ŝian ringfingron . Li neas tion kaj asertas, ke la ringo estas nur malgranda donaco pro amikeco, kiu tute ne havas signifon kaj neniel celis promesi geedziĝon. Li jam estas edzigitaj kaj havas tri infanojn, el kiuj la plej maljuna filino jam frekventas la

universitaton. La dancistino atendas baldaŭajn patrinogojn kaj postulas kiel damaĝorekompenco tri kvaronojn de miliono da dolaroj. En eĉ pli malgrandaj presliteroj, sed ankoraŭ nun sufiĉe atentofrape sekvis nun:

Names of the Parties Concerned Still Withheld by Court Order will be Published Very Soon

La nomoj de la plendantino kaj de la plendanto provizore estas ankoraŭ retenataj pro precipa decido de la kortumo, sed ili tre baldaŭ estos publikitaj.

Tiu ĉi retenado de la nomoj estas precipa truko de la advokatoj, kiuj volas doni tempon al *Mr. Ayres*, por interkonsentiĝo kaj pagado. Sed la gazetoj same havas intereson pri tio ankoraŭ ne nomi la nomojn, ĉar *Mr. Ayres* ja ankoraŭ povas interkonsentiĝi kun la gazetoj. La gazetoj ne estas subaĉetebaj, precipe en Usono. Sed pri reklamanoncoj ili estas tre akceptemaj; kaj granda kompanio ĉiam disdonas multekostajn anoncojn, eĉ se estas nur la jarfinaj kalkuloj, kiuj ripetebblas arbitre ofte, por havigi grasajn reklamanoncojn. Ankaŭ la gazetistoj

ne estas subaĉetebraj, nenie malpli subaĉetebraj kiel en la federaciaj ŝtatoj de Ameriko. Sed ili volonte aŭskultas bonajn konsilojn, por sukcese spekuli borse.

La kortumo ĝis nun ankoraŭ nenion decidis, do ankaŭ ne la retenon de la nomoj. La kortumo ankoraŭ scias nenion, kaj la juĝisto legas la gazeton en la tramo kun la sama ĝojo kiel la elsekigitaj paroĥanoj. Sed li ja jam legas ĝin kun pli da homa kompreno, kaj li legas ĝin precipe kun kompatato por la povra prezidanto; ĉar li, la juĝisto, jam morgaŭ povus sidi en la sama kaĉo. Li ne havas dancistinon de la *Vanity*-teatro. Tion li ne povus pagi. Sed li havas stenotipistinon. Kaj se ŝin iutage kaptas kvazaŭ rabio kaj se la ekzisto kiel stenotipistino fariĝas tro ridinda por ŝi, jen ankaŭ la juĝisto povas trovi detale prikribitajn siajn fiagojn kaj la malsuprenglitintan mamzonon de sia stenotipistino en grasaj presliteroj sur la unua paĝo de la matenaj gazetoj. Provizore li ankoraŭ ne scias, pri kio temas en tiu kazo. Neniu de la kortumo scias tion ankoraŭ. La advokatoj faris ĝis tiu momento nenion krom plendi por damaĝa rekompenco, *Jane Doe vs. Richard Roe, Simmons & Simmons, Attorneys at*

Law, donintaj la aktujan nombrojn G918 al la dokumentoj de la kortumo.

Mrs. Ayres, la edzino de *Mr. Ayres* same legas la sukan rakonton, kaj ankaŭ ŝi legas ĝin kun memdediĉo kaj volupto. Ŝi ja ankoraŭ ne scias, ke estas ŝia fidela edzo, kiu estas ĉi tie kulpigata de la reporteroj pri intencita bigamio. Kaj tial ŝi povas delektiĝi kun brilaj okuloj je la rakonto, kiun ŝi trovas tiel suke eĉ ne en la francaj romanoj.

Vespere, dume ŝi sidas kun sia edzo ĉe la tablo oni kompreneble ĝisdetale parolas pri tiu ĉi sensacio, por elgustumi kaj eldiboĉi ĝis la lasta ĝemelspiro la surteran ĝojon, kiun ofertas tia historio. Ili provadas ĉiudirekte solvi la enigmon, kiu povus esti la prezidanto kaj kiu la dancistino. Li ja devus scii la prezidanton de la Rotaria Klubo aŭ de la '*Elks*', de la loĝio '*La Alkoj*'. Ĉio estus ankoraŭ pli beatiga, se oni sciis lin kaj la dancistinon, se oni povus vidi iliajn bildojn en la gazeto. Ke ŝi estis vestata nur kun silkaj ŝtrumpoj kaj krome kun nenio kiam ŝi kaj li estis observataj tra la fenestro, kies kurteno ne estis tute fermita, tion oni scias nun. Sed oni volus scii

ja ankaŭ kiel ŝi aspektas laŭ vizaĝo kaj entute ekde la verdaj ŝtrumprubandoj supren. Eble la gazeto baldaŭ publikos bildon de ŝi en bankostumo aŭ en la kostumo de la ĥorknabinoj de *Vanity*-teatro, kiuj dum prezentadoj ja ne surhavas ŝtrumpojn, sed nur ŝuojn kaj rubandeton ĉirkaŭ la koksojn kaj du saketojn sur la mamoj, kiuj estas ornamitaj kun briletantaj vitroperletoj.

Mr. Ayres, kiu kompreneble sciis, pri kiu temas, ĉar lin tuĵ demandis la advokatoj en la sama mateno per telefono, ĉu li jam legis la gazeton, indigniĝas pri la abomeno de la gazeto kaj insultas lian edzinon, ke ŝi estas tiom voluptema legi tiajn sensacirakontojn en la ĵurnaloj kaj, ke ŝi volas tiom sinki esti avida je la bildoj de tiuj homoj.

La tuta urba loĝantaro kaj la homoj de la ĉirkaŭa regiono aĉetis je la sekva mateno kaj dum la sekvaj tagoj la gazetojn kiel freneziĝintoj. Ĉiuj esperis, ke ili trovos la publikitajn nomojn. Ĉiuj interesiĝis pri la demando, ĉu la dancistino, kiu nun baldaŭ fariĝos patrino, jam estas en tia stato, ke ŝi ne plu povos prezentadiĝi. Ĉiuj esperis, ke ŝi ankoraŭ ne atingis tiun staton, kaj ke ŝi almenaŭ

kelkajn fojojn plu prezentos sin, por ke oni povu rigardi ŝin en la teatro reale kaj vivoplena. Tuj kiam ŝia nomo estus konata, la biletkomercistoj de la teatro elaĉetus la biletojn por la tuta domo, kaj ili altigus la prezon de la biletoj je ducent procentoj.

Ĉar la gazetoj ja nun estis vendataj amase, pro la espero, ke la nomoj estos publikitaj, ne plu necesas publikigi la nomojn. Intertempe leviĝas nova skandalo, same tiel grasa kaj same tiel suka kiel tiu de la prezidanto kun la dancistino, kaj la prezidanto kaj la dancistino estas forgesataj. Se la nomoj tamen iutage aperus, ilin apenaŭ iu plu legus. Intertempe okazis tiom da skandaloj, koruptadoj, politikaj mensogoj, sukcesaj transflugadoj de oceanoj, ne sukcesintaj grimpadoj de la Himalajo, rompŝteloj en bankoj, revolver- kaj bombatencoj en Ĉikago, atakoj de trajnoj en Meksiko, murdoj al usonaj animsavantoj en Ĉinio, ke oni ok tagojn poste vere ne plu povis scii, pro kio propre ĉi tie estas publikita la nomo de prezidanto de enuiga kuprokompanio kaj la nomo de dancistino, kiun oni trovas presita neniam sur teatra programfolio. Oni havis tiumomente multe pli da intereso

pri tio, kiom da cent mil dolaroj perlaboris *Ma*
Fergusson, la guberniestrino de Teksaso je la konstruado
de ŝtata aŭtomobilstrato, kaj kion ŝi intencas fari kun la
mono.

Sed *Simmons & Simmons Attorneys at law* ne povas atendi tiun interesoŝanĝon en la opinio de la gazetlegantoj; ili ne povas atendi ĝis *Mr. Ayres* eble eĉ rakontas al sia edzino, pri kio temas kaj ŝi absolvas lin por relative malkaraj kostoj; ili ne povas atendi pri tio, ke *Mr. Ayres* konvinkas eble plurajn membrojn el la tuta kontrolkonsilio de sia kompanio, ke ĉi tie nur temas pri fia ĉantaĝo, kaj ke la tuta kontrolkonsilio avertas la gazetojn, ke ili ne pelu la aferon ĝis la ekstremo. Jen la gazetoj estus finitaj por ĉiam, ĉar troviĝas inter la membroj de la kontrolkonsilio pluraj, kiuj povas rompi la nukon de tiuj gazetoj interne de ok horoj tiel perfekte, ke la gazetoj forgesas, kiel ili nomiĝis hieraŭ kaj kiuj estis ties ĉefredaktoroj.

Tiajn neantaŭvideblajn incidentojn *Simmons & Simmons*, ne povas atendi. Ili laboras rapide kiel diabloj por fiŝhoki kaj varmigi kompatindan animon, kiu rompiĝis en glacio kaj dronis, por ke ankaŭ la infero plenumu sian celon.

La advokatoj eluzis la unuajn horojn post apero de la gazeto. Se ili ne gajnas la proceson en tiu tempo, jen povas fariĝi longtempa afero. Kompreneble ili gajnas la proceson, kiom ajn longe tio daŭrus. Sed la mono povus fuĝi de ili. *Mr.* Ayres aŭdace povus riski ion kaj sekurigi ĉion tiel bone, ke ne plu gajneblas multe da mono. Li atendus la skandalon en Eŭropo, kaj se li revenus, la afero fariĝus tiel malkara, ke ne plu valorus la penon por la advokatoj. Kio fariĝas el *Miss Minnie*, estas indiferenta al ili, estis ĉiam indiferenta al ili, kaj al ili ĉiam estos indiferenta.

Je la tuta historio ne estas multe da vero. Ĝi estas sorĉtroigita nur tial, por kontentigi la avidon de la legantoj pri voluptaj rakontoj, kiujn ili povus kontentigi nenie alie sekve de la cenzero kaj de la bigoteco. Ĉe tio la gazetoj enspezas monon.

Ĉu la prezidanto perdas sian postenon, ĉu lia edzino maledzinigas sin de li, ĉu la dancistino dronigas sin, tio ne interesas la gazeton. Tio ekinteresas ilin nur tiukaze, se unu el tiuj sekvoj ebligas plian fojon sensacian historion.

Miss Minnie White tre ofte renkontiĝis kun *Mr. Ayres*, kiam ŝi surhavis nenion krom siaj silkaj ŝtrumpoj. Plej ofte ŝi surhavis eĉ malpli da vestoj. Sed neniu iam povis observi ŝin tra ne tute fermita kurteno. Rilate al tio, ili estis multe tro memgardemaj. Ne pro denaska hontemo, sed pro simpla utilo kaj kaŭzoj de oportuno. Efikas ĝenante kaj deflankigas de la esenca afero, se oni havas la senton, ke oni eble estas observata. Sed *Simmons & Simmons* estas ĉiam pretaj. Ili tenas por tio privatan detektivon en la rezervo, kiu ĉiutempe povas priĵuri kaj priĵuras, ke li vidis damon nur kun silkaj ŝtrumpoj kun sinjoro, kiu same ne surhavis multon en la sama ĉambro. *Miss Minnie* devas nur diri la lokon, do la domon, kie povus esti okazinta tio, kion vidis la privata detektivo. Por ĉio alia zorgas la privata detektivo kaj *Messrs. Simmons & Simmons Attorneys at law*. Tiam ankoraŭ aldoniĝas lavistino aŭ ŝoforo, ambaŭ priĵuras, ke ŝi aŭ li vidis iri *Miss Minnie* kaj *Mr. Ayres* en tiun domon. Kontraŭ la lavistino neniu povas atingi ion. Ŝi estas la honesteco kaj vero en persono. *Mr. Ayres*, tiel perfekte sidante sur la ardanta rostkrado, devas koncedi, ke estas la vero. Li gardos sin ĵuri la malon; car li scias, ke ankaŭ aliaj

personoj vidis lin tie.

Miss Minnie White tute ne atendas patrinajn ĝojojn. Tion scias *Mr. Ayres* tute certe. *Miss Minnie* estas multe tro lerta por elmeti sin al tia nedezirata okazaĵo. Infanoj ĉiam estas molestaj kaj certe ne beno de la ĉielo. Ŝi scias tion el sia junaĝa tempo en Mineapolo. Ŝi havis kvin fratinojn. Nek ŝia patro laboranta en kofrofabriko, nek ŝia patrino laboranta en ĉemizofabriko kiam ajn parolis pri beno de la ĉielo, ĉiam nur pri la brats, pri la bastarda idaro, kiu tiom manĝas kaj tiom da vestoj disŝiras kaj eterne kaj por ĉiam krias, ke ili havas malsaton.

Ankaŭ *Messrs. Simmons & Simmons* scias, ke *Miss White* ne atendas bebon. Ili dirus tion impertinente al ŝi vizaĝen, ke ili supozis ŝin pli prudenta, ĉar ŝi certe jam dum sufiĉe longa tempo eltretis siajn beboŝuojn por povi fari distingojn.

Eĉ pli certe sciis tion la gazetoj, ke *Miss Minnie White* ne troviĝis en tia situacio. Se ŝi vere estus atendinta la ĝojojn de patrino, la gazetoj evitus mencii tion kun plej granda zorgemo. Tio estus povinta konduki al multspecaj

malagrablaĵoj por la gazetoj. Ke la dancistino sentas sin patrino, la reporteroj skribis nur tial, por ke la historio fariĝu pli suka. La advokatoj aludis ion tian, el kiu la reporteroj povis ellegi tion, kio plaĉas al ili. Tia sciigo servis tamen nur al la tuto. Nomoj ja ankoraŭ ne estis nomitaj. Kaj se fariĝus necese nomi nomojn, jen *Miss Minnie* povis pruvi per siaj pliaj sinprezentadoj en la *Vanity-teatro*, ke estis blago de la reporteroj.

Kvankam do je la tuta historio estis malmulte da realo, la advokatoj tamen atingis sian celon. *Mr. Ayres* estis pelata en timon. Li devis timi, ke ĉi tie okazas granda skandalo. Li ja ne sciis, kiom riskus la advokatoj. Estis eĉ ne necese, ke la nomo de la dancistino estis publikita. Sufiĉus, ke lia nomo publikiĝus, kaj ke la gazeto nomus lian nomon por montri al la legantoj, kiom netimigebla la gazeto estas kaj kiom fervore ĝi atentis pri tio liberigi la usonan popolon de malĉasto kaj malvirteco, en kiun ĝin provis implikigi unuopaj senskrupulaj membroj, ĉar tio laŭ la gazeto estas unu el la ĉefaj taskoj de la gazeto, kaj ke oni ne ekzercas indulgon, eĉ se temas pri membroj de la plej supra klaso, ke oni multe pli pretas senkulpigi la laborantan klason kaj

la povrulinon, la dancistinon, kiu ja ankaŭ apartenas al la laboranta klaso, pli ol tiuj magnatoj, kiuj supozas, ke ili povas fari en libera respubliko de honorindaj civitanoj laŭplaĉe ĉion, kion ili volas fari, nur ĉar ili havas pli da mono. Tion la gazeto estus dirinta kompreneble nur tiam, kiam ĝi jam precize sciis, ke la kontrolkonsilio de la kompanio, kies prezidanto estis *Mr. Ayres*, deziras, ke *Mr. Ayres* estu disrompita en mil pecojn, ĉar oni volis liberigi sin de li pro tiu aŭ tiu kaŭzo, kaj ĉar oni ne povis flankenŝovi lin alimaniere.

Ankaŭ *Mr. Ayres* ja ne ĉiam sciis, kiel lia kontrolkonsilio rilatas al li. Ĉu ĝi defendus aŭ ne plu subtenus lin. Tion *Mr. Ayres* ne povis riski. Krome li ne sciis kiel reagus lia edzino. Eĉ malpli li sciis kiel oni rigardus tion en la kluboj, kies membro li estas. Skandalo de tia maniero povus lamigi lin por longa tempo, kaj li devus diable streĉite labori por ree fari karieron.

Ĉiujn tiajn eblojn li pripensis, kaj tiam li iris al Messrs. Simmons & Simmons kaj komencis agi. Li pagis al la sinjoroj dek mil dolarojn por la elspezoj, kiujn ili havis.

Post tio *Messrs. Simmons & Simmons* petis *Miss Minnie White* al si en la oficejon.

Mr. Henry Simmons akceptis sinjorinon *White*: „Antaŭ tridek minutoj ni havis sufiĉe longan interparoladon kun *Mr. Ayres*. Li finfine klarigis, ke li pagos nenion kaj, ke li trankvile riskas kaj la proceson kaj la skandalon. Li diris, kaj mi pensas, ke li pravas pri tio, ke li, se ni pelus ĝin ĝis la skandalo, perdus sian postenon kaj tiam tute ne plu povus pagi ion. Egale, kiel finiĝus la proceso. Kun ploroj en la okuloj li konfesis al ni ĉi tie, ke li amas vin sincere, kaj li petis nin, ke ni parolu bonan je lia favoro al vi. Li ne povas vivi sen vi, kaj li volas aĉeti ankaŭ la *Stutz*-aŭtomobilon, kiun vi jam tiom longe deziris al vi. Mi vere ne povus akcepti, *madam*, kial du tiaj afablaj homoj kiaj vi ambaŭ estas, ne komprenu kaj amu sin reciproke? Kiun sencon havu tia kverelado? Ankaŭ vi iom kulpas tion, *madam*. Ne estu tiel kruela al li. Ankaŭ li havas ja siajn zorgojn kaj ĉagrenojn.“

Miss Minnie ekploris, estis aŭtentikaj ploroj; ĉar nun ne plu havus sencon estigi plorojn por elvringi sumeton.

„Ankaŭ li estas ja turmentata, pelata kaj ĉasata, tiu kompatindulo. Kiel ni ĉiuj. Ankaŭ kiel vi, *Miss White*.“

Ŝi ploris eĉ iom pli, ĉar apud la kompatato por li ŝi nun ankaŭ ekhavis kompaton por si mem, kiam ŝi aŭdis, ke ankaŭ fremdulo povas senti, kiom turmentata kaj ĉasata ŝi estas en la vivo kaj eterne persekutata de homoj, kiuj volas havi monon de ŝi. Ĉiuj supozas, ke ĥorknabino de *Vanity-teatro* disponas pri milionoj de dolaroj. Ĉiu paro da ŝuoj, kiun alia damo ricevis por dek kvin dolaroj, ŝi devis pagi kun dudek kvin dolaroj. Tiel ŝi spertis tion rilate al siaj ŝtrumpoj, al siaj subvestoj, al siaj ĉapeloj. Kaj ĉiuj tiuj, kiuj ricevis krommonojn, atendis de ŝi la trioblon de tio, kion ili ricevis de aliaj homoj. Kaj se ŝi ne pagis la trioblon de sumo oni rigardis kaj traktis ŝin malestime, kvazaŭ ŝi estus knabino el la malhelaj stratanguloj.

Rimarko

madam = sinjorino

Kiu estas la mastro de l' vivo? Ĉu la prezidanto de naftokompanio? Ĉu la advokato, kiu transprenas la plej fiajn eksgeedzigajn procesojn kaj ĉantaĝajn manovrojn? Ĉu la dancistino de revua teatro? Ĉu Rockefeller? Ĉu Sinclair? Ĉu Morgan? Ĉu la prezidanto de Usono? Neniu el tiuj, kiuj aperas kiel la mastroj de l' mondo, kiuj povas aĉeti kontinentojn kaj vendi ilin, kiuj naskas respublikojn kaj povas detrui ilin, kiuj kronas reĝojn kaj eksigas ilin, kiuj vekas revoluciojn kaj sufokas ilin, neniu el tiuj estas la mastro de l' vivo. Ili ĉiuj estas en la maŝino, kiu nomiĝas: „La moderna erao“. „Nia nuna vivo“. Ili estas kirlataj kaj ĵetataj en ĝi kiel etaj sableroj, jen supre, jen malsupre, jen enmeze, jen angule, jen dekstre, jen maldekstre.

Eble Hacinto, la indiĝeno, estis la mastro de l' vivo, kiu posedis Rozon Blankan sen posedi ĝin. Li eble estis la mastro de l' vivo ĝis tiu tago, kiam oni eltrovis, ke Rozo Blanka portas nafton en sia tero.

Tiam ankaŭ Hacinto Yanyez ne plu estis la mastro de l'

vivo; ĉar nun ankaŭ li fariĝis sablero ĵetata en la maŝino tien kaj tien.

Eble Margarito estis la mastro de l' vivo, tiu Margarito, kiu kuracadis la mulojn, kiu komprenis la lingvon de la muloj, kiu infere kapablis sakri kaj melodie kanti dolĉajn baladojn en la sama momento.

Eble la *compadres* de Rozo Blanka estis la mastroj de l' vivo. Tiom longe, ĝis ili perdis sian hejman regionon.

Eble la mastro de l' vivo estis la leono en la ĝangalo. Sed la puloj estis pli fortaj ol ĝi, ĉar ili molestis ĝin. Kaj ĝi ne povis defendi sin kontraŭ ili; dorno, kiun ĝi tretis en sian piedegon, estis pli forta ol ĝi, ĉar la dorno lamigis ĝin; la venena serpento, kiu mordis ĝin en la nudan nazon, se ĝi estis neatentema, povis faligi ĝin, kaj tial ĝi estis pli forta ol la leono.

Eble la mastro de l' vivo estis la kolorriĉa papilio, kiu ŝvebis kiel ondo de floro al floro kaj zorgis pri nenio, ĝuis sian vivon, ĝis ĝi kaptiĝis en la reto de araneo, kiu estis pli forta ol ĝi.

Eble la mastro de l' vivo estis la klasfiera laboristo, kiu boksis sian skipestron teren kaj sufiĉe draste tradraŝis lin, ĉar la skipestro, kiu sentis sin pli forta kaj pli potenca, kriis lin vizaĝen. Sed la diligenta laboristo pli produktis ol la merkato povas uzi, kaj la fabriko ne plu povis pagi la viron kaj devis maldungi lin; kaj liaj infanoj ŝiris la karnon de la laboristo, ĉar ili estis malsataj kaj sentis sin kiel mastroj de l' mondo, kies sklavo kaj subulo estu laŭ ilia opinio la propra patro.

Rimarko

compadre = baptopatro, kunpatro

De la oficejo de siaj advokatoj *Miss Minnie White* telefonis al ŝia amiko *Mr. Ayres* kaj petis pri pardono pro ĉio, kion ŝi faris al li. Ŝi diris, ke ŝi estis freneza, kaj ke ŝi lasis inciti sin de amikino. Ŝi demandis, ĉu li volus esti ree bona al ŝi, kaj ŝi diris, ke ŝi amas lin pli ol ĉion.

Ankaŭ *Mr. Ayres* petis pri pardono pro ĉio, kion li faris, kaj li deklaris, ke li sole kulpas tion kaj, ke li estas pli ol nur feliĉa ree rajti nomi ŝin 'mia kara'.

Du tagojn poste ambaŭ vojaĝis en lia turaŭtomobilo al San Diego. La veturado dum horoj sur la romantika aŭtovojo laŭ la bordo de la Pacifiko ambaŭ pli intime kunigis ol ili iam estis antaŭe.

La kverelo estis finita kaj forgesita. Ĝi povis trovi finon, post kiam la advokatoj estis atingintaj – por si – kion ili volis.

La plua vivo de *Mr. Ayres* kaj de *Miss Minnie White* provizore ne plu trovis la intereson nek de *Messrs.*

Simmons & Simmons nek de la gazetoj. La negoca flanko de la afero estis kontentigita, kaj interesiĝi pri la privata vivo de du homoj, el kiuj momente ne lasis elvringi sin dolaro, estas malĝentlemana aŭ fia. Sed oni ne povas diri pri usonano, ke tiu estas malĝentlemana aŭ fia. Tiu estas helpopretulo kaj gastamanto en unu persono.

ĈAPITRO 03

01

Mr. Collins nun ofte devis pensi pri la afero de *Mr. Ayres*. Tiu estis lia intima amiko. Ili ambaŭ frekventis la saman kolezion kaj ambaŭ apartenis al la samaj kluboj. Tial *Mr. Collins* estis iniciita en ĉiujn detalojn de tiu afero. La konkreta scio de tiu rakonto estis utila por li. Ĝi helpis lin esti memgarda.

Sed kiel oni estu memgarda, se la suba duono de la korpo postulas pli ol en la aĝo de dudek jaroj? Kun dudek jaroj oni havas romantikajn ideojn, en kiuj kelkaj pure naturaj deziroj de la korpo ŝajnas obsceni kaj oni fidas pri la ĉasteco kaj pureco de la amo. Ne ĉar la viro en tiu aĝo estas pli nobla, sed, ĉar li estas pli timema al junulino kaj flaras misterojn tiajn, ke li supozas, ke li ne povas solvi ilin sen evito de dangerego.

Kun kvindek jaroj, trovinte sur sia veturvojo dudek kvin jarojn da geedziĝo kaj kvindek ĉeokazajn bigamiojn kun ĉiuj ŝtormoj, uraganoj, tajfunoj, rifoj, sablobenkoj,

sunbrilo kaj pluvelverŝiĝoj, kiujn oni estas superinta pli-malpli kuraĝe kaj sukcese, la kutimo de la matura viro anstataŭis romantikajn azenaĵojn. Ĉiuj aĵoj de la vivo nun senescepte estas rigardataj pure laŭ faktoj kaj sobre. La imago, ke ino aŭ eĉ la amo povus kaŝi iujn misterojn, tiu supozo malaperis por ĉiam. La inoj ja de tempo al tempo ankoraŭ disvastigas misterojn, ĉar oni neniam ellernas inojn, kaj ĉiam ili kaŭras saltoprete por fari ion, kion oni neniukaze estus atendinta de ili. Nur sole tiu mistero faras la inon, precipe tiun, kiun oni estis geedziginta, ankoraŭ eltenebla. Eltenebla en tiu grado, kiun oni esperas vidi ĉe averaĝa homo post sufiĉe longa geedziĝo. Ĉiuj tiuj kvietaj kaj kontemplaj plezuroj, kiujn oni delectiĝis kiel dek-ses-jarulo – aŭ kiel dek-ses-jarulino – tute perdis sian ĉarmon kaj per tio sian altirforton. Nenio restis krom pura laŭfaktecio kaj fridsanga sobreco. Al la kutimo oni nun devas sekvi. Ĉio ĉi tiel okazas kaj ĉe la viro kaj ĉe la ino.

Atendi amon pro siaj belaj okuloj aŭ pro sia junuleca ardo, tiu espero estas malaperinta por ĉiam, kaj se ino aŭ junulino volas rakonti tion al ni, ni sentas nin flatata, sed

ni ne plu fidus pri tio. La saĝeco de vivfilozofo, kiu oni fariĝis, ne plu permesas tian fidoforton. La komprenado kaj palpado de ina beleco rafiniĝis. Oni ne plu iras en ĉiun kaptilon de glata grimaco. Oni fariĝis elektema, kaj oni estus nun tre atentema pri la elekto de sia geedza kunulo.

Ĉu oni trovas ĉion tion, kion filozofo devas pretendi, do belecon de la ino, spriton – aŭ anstataŭ sprito la talenton amuzi la partneron – , guston pri vestoj kaj pri la konduto kaj por ne la laste forgesi tion, ĝojpretan bone flegatan korpon, ĉu oni povas havi ĉion ĉi aŭ ne, dependas nur plu de la pagokapablo intertempe akirita.

Estas ja tre malofte, nu, por diri la veron, okazas neniam surtere, ke oni trovas ĉion tion kunigita, do belecon, spriton, amuzkapablon, neenuigon, bonan guston, ĝojpretan kaj bone flegatan korpon en ununura ina persono. Tia ne ekzistas. Ĉar tio estas kontraŭ la naturleĝoj. Ke io tia ekzistas, oni akceptas nur inter la dekseka kaj la dudek-kvina jaroj, kaj tio estas la tempo, en kiu oni faras sian plej grandan stultan agon, tio estas, edzinigi la malĝustan.

Ĉar oni do ne trovas ĉiujn tiujn avantaĝojn en unu ino – tiun saĝon oni jam akiris – la prudenta viro, tiu, kies suba korpoparto kreskis je forto kaj sopirado kaj kies supra korpa parto je saĝeco, devas entrepreni ankaŭ en sia ripoza vivo tiun specialigadon, kiun li intertempe jam estas entrepreninta en sia negoco kaj en sia profesio. Nur, se li intertempe fariĝis specialisto en sia profesio, li povas havigi la rimedojn, kiujn li bezonas, por esti ankaŭ specialisto en sia privata vivo. Li helpas sin per tio, ke li kvazaŭ estas la patro de damo pro ŝia beleco, sed al kiu mankas la prudento. Por tio li akiras al si alian, kiu havas tiun prudenton, sed en la korpo montras malpli da volupto kaj ĝojemo. Por tio do ekzistas plia.

Tial oni preterlasu la fian riproĉon de la piuloj kaj la ekscititajn insultaĉojn de la komunistoj, ke *Mr.* Collins, devas esti nomata diboĉulo, ĉar li havis apud sia edzino ankoraŭ: unu Flossy, unu Betty kaj du ĥorknabinojn, kiuj provizore ankoraŭ atendis esti envicigitaj tie, kien ili apartenis laŭ siaj specialaj kapabloj. *Mr.* Collins vere ne estis diboĉulo. Li estis produkto de sia tempo. Grajnero, kiu estis tien kaj tien kirlata en la granda maŝino „Nia

hastanta epoko“, sen povi defendi sin, sen povi fari ion kontraŭ tio. Inter tiaj homoj, kie oni ne geedziĝus poreterne, kie neniu estus devigata geedziĝi laŭ sia rango, laŭ sia socia pozicio kaj sia posedo, kie la plenkreskigo de la juna generacio kiel tuto estus transdonita al la socio, kie homo, kiu havas la talenton evolui vere geniajn kapablojn en la organizo de la naftoproduktado ne estus devigata posedi elegantajn vilaojn, elegantajn aŭtomobilojn, luksajn vestojn por sia familio kaj si, multekostajn kutimojn por la propra persono, ĉio tio nur por ricevi kaj konservi tian pozicion, tie, kie li povus montri siajn geniajn kapablojn, inter tiaj homoj *Mr. Collins* estus nek diboĉulo nek bigamiulo, nek murdisto de miloj de ekzistoj. Inter tiaj homoj la prezidanto de Kondor-kompanio estus homo tia bona kia mi, verŝajne eĉ multe pli bona kaj pli nobla ol mi. Ĉar li posedis ion, kion posedas nur tre malmultaj homoj: grandon. En nia tempo li povis montri tiun grandon nur helpe de brutaleco, helpe de senrespekteco al aliaj, helpe de senskrupuleco. Ne estis kulpo lia.

Betty estis telefoninta al li, ke ŝi nepre devas paroli lin. Li respondis al ŝi, ke li nun ne povas paroli kun ŝi, ĉar li troviĝas en grava konferenco kun altrangaj personoj de sia kompanio. Tio ne interesis la amatinon Betty. Ŝi tuj kuregis en la konstruaĵon de Kondor-kompanio. La Dua Sekretariino diris al ŝi, ke Betty neniel povas paroli kun *Mr. Collins*, ĉar li estas en konferenco.

Ion tian oni ne povis fari al Betty. Ne al ŝi. Ĉu konferenco, ĉu ne konferenco! Se ŝi, Betty, devis vidi sinjoron Collins, jen ŝi vidos lin, kaj se li jam estus entombigita. Ĉi tiu temperamento kaj tiu sovaĝa aŭdaco estis ja ĝuste unu el ŝiaj esencaj specialaĵoj, la kaŭzo, kial ŝi estis akceptita de *Mr. Collins* en la grupo, kiu formis tiun unuecon de perfekta ino. kiun *Mr. Collins* bezonis, por resti rezistokapabla kaj vigla kontraŭ sian ekscitigan vivon.

Se lia propra edzino estus havinta la kuraĝon fari tion, kion nun faris Betty, li estus mortpafinta ŝin, kaj la tribunalo senkulpigus lin. Ĉar la nevokita eniro en la plej sanktan ĉiam sekvigas mortopunon. Grava konferenco de

membroj de kontrolkonsilio de usona miliardo-kompanio estas multoble pli sankta ol la plej sankta sanktaĵo en Tibeto.

Kiu scias la radomekanismon, devas koncedi, ke tia konferenco efektive estas pli sankta ol io, kio havas rilaton al religio. Kaj tio estu ĉifoje legata sen ironio. Ne el la *White House* en Vaŝingtono, sed el tia konferenco povas eliri – kaj eliris – la rifuzo de ofertitaj senditoj de eksterlandaj potencoj, ŝanĝo de propraj senditoj, malsano kaj ekŝigo de ŝtatestretarioj, armita enmiksiĝo en la bolŝevistan Ruslandon, ĉesigo de la libero de parolo por komunistoj, sekreta komploto por nova revolucio en Meksiko, subteno de la turkoj kontraŭ Britlando, minimuma dudekjara puntempo por *Wobblies*, libera komerco por kontrabandistoj de viskio, forsendo de kirasitaj ŝipoj kaj de mararmeaj trupoj al Kolumbio, enmarŝo de usonaj trupoj en Pekino, satigo de laŭdire malsatiĝantaj infanoj en Armenio kaj Greklando per la malbonkvalitaj laduoj, kiuj sekve de tro haste farita repacigo ne plu vendeblis al la propraj soldatoj kiel ties nutrado, nelimigitaj kontinentaj kaj maraj rajtoj por

Usono en la sendependa-dependa respubliko Nikaragvo, refreŝigita espero por la iama germana imperiestro denove povi preni la sceptron manen, eksigo de ducent mil urbestroj kaj ties anstataŭigado fare de aliaj, silentigo de la usona prezidanto, eksigo de la politika redaktoro de la gazeto *New York Times*, de la ekonomia redaktoro de *New York World*, devigita vendo de la gazeto *Chicago Tribune*, torento de antisemidaj artikoloj en la gazetoj, torento de porsemidaj artikoloj en la gazetoj, ŝanĝo de la profesoroj por popolekonomio kaj por profesoroj de la internacia juro je la universitatoj en Kolumbio, Ĉikago kaj Kalifornio, malaltigo de la prezoj por biblioj, koncedo de grandaj longtempaj kreditoj al la germana industrio, koncedo de kreditoj al la bolŝevista Ruslando, deportado de pacifistoj kaj de similaj pacŝalmblovisoj, konstruado de dek ok novaj kirasŝipoj, kontrakto por ĉiuj popoloj ne plu fari militon sen antaŭa peto pri permeso, Ligo de la Nacioj kontraŭ la homaro kaj por la profito, gratultelegramo al Germanio pro la liverado de militzepelino, propagando por la vigligo de l' moralo en la laboranta klaso, malpermeso de la prostituado por nur du dolaroj kaj malpli, instigo al prostituado por aŭtomobilo

por la refreŝigo de la usona aŭtomobilindustrio batalanta pri sia ekzisto, subteno de la partopaga ideo kaj de similaj intencoj por la sklavigo de tiu proletara loĝantaro, kiu ne tiom aĉetkapablas, rifuzo de kreditoj al kooperativaj societoj kaj al unuiĝoj, kiuj konstruas domojn por povi ludoni loĝejojn je la kostoj de la financado, kaj ankoraŭ kelkaj pliaj tiaj aferoj.

Se oni pripensas ĉiujn tiujn konferencojn, kiuj povas eliri el la interkonsiliĝoj kaj decidoj de la konferencoj de grandaj kompanioj, tiukaze oni certe komprenas, ke temas tie pri sanktaj aferoj. Neniu dio estis iam tiom potenca, ke li estus povinta krei pli komplikajn kombinojn ol tiajn, kiuj tie estis kreaĵoj. Temis pri homoj kaj popoloj, temis pri kristana, mahometana kaj budhisma religioj, temis pri dioj kaj demonoj, pri transmetigo de montaroj kaj pri trapikado de kontinentoj, oni kunigis oceanojn, kiuj ne kunapartenis, kaj oni disigis landojn kaj popolojn, kiuj estis kunkreskintaj de praaĵ tempoj. Ion tian Dio povis fari nur dum milionoj de jaroj, kio nun estis farita tie per nura decido. Kaj tie, kie tia decido estas farata, ĉu en la ĉielo ĉu

en la Olimpo aŭ en konferencejo de usona miliardo-kompanio, jen la plej sankta troviĝas, tie kaj nenie aliloke devas troviĝi la plej granda sanktaĵo de la homaro.

Rimarkoj

White House = Blanka Domo en Usono, registarejo

Wobblies = membroj de la plej radikala maldekstra sindikato en Usono kaj Meksiko

Je la pordo de la konferenca ĉambro pendis afiŝo, sur kiu estis presita:

DO NOT DISTURB – KEEP OUT

Bonvolu ne ĝeni, restadu ekstere.

Tio validis por oficejaj skribistoj, por magnatoj, por la usona prezidanto, por la reĝo de Britlando kaj por Jehovo. Sed ĝi ne validis por Betty, kiu volis havi sian garaĝon kaj la domon krome. Betty devis havi tiujn tuj, ĉar ŝi estis rakontinta al siaj amikinoj, ke ŝi jam havas la garaĝon kaj la domon kaj lunde vespere intencis festi sian housewarming party, sian ekloĝan festenon, kun tia prezentado, ke la filmreĝoj kaj filmreĝinoj en Holivudo krevus pro envio. Malgranda naĝbaseno el marmoro necesus. Tiun oni plenigus per varma akvo. Nokte je la unua ŝi tiam farus la proponon, ke ili ĉiuj senvestigu sin por bani en tiu lago. Ŝi havus ĉemane elegantajn travideble fajnajn silkajn banvestaĵojn. Se tiam la viretoj kaj inetoj estus en la naĝejo, ŝi kunkolektigus ĉiujn vestojn, interŝanĝus kaj kaŝigus ĉion. Dum la lasta parto

de la nokto oni dancus nur en bankostumoj.

„Mi ne vidas, kiel tio estas la ŝerco“, diris Majory, unu el ŝiaj amikinoj. „Ion tian faras la filmistoj en Holivudo ĉiutage.“

„Atendu unue, May“, diris Betty, „kio poste sekvos.“

Ŝi havis ĉion – sed ĝis nun nur en sia plano, ĉar mankis la domo ja ankoraŭ – jam preta. Tuj kiam oni dancus en bankostumoj, ŝi kaj kelkaj iniciitoj iam ŝtelirus kun letermalfermiloj al la danculojn kaj distranĉus ĉiujn tiujn fajnajn silkovestojn, kiuj ja pro la akvo kaŝis jam nenion plu, ĉiu kostumo estus distranĉita en du duonojn kaj falus malsupren.

Tiun planon ŝi ne elbabilis, ĉar estu unu el la surprizoj. Ŝi ankoraŭ elpensis pliajn surprizojn, kiuj tute ne estis malpli bonaj, sed grandigus la plezuron.

Oni devas koncedi, ke Betty posedis artan guston kaj ankaŭ riĉan fantazion. Tio estis ŝia dua specialaĵo kiel parto de la perfekta ino, kiun sopiris *Mr. Collins*.

Ŝi havis bonan guston, rilate siajn vestojn kaj sian konduton, en hotelo kaj en eleganta restoracio, tiom longe, kiom ŝi ne estis grave ebria. Sed eĉ tiam ŝi retenis sian bonan guston, ŝi komencis fariĝi nur diable frivola, je la plezuro de ĉiuj ĉeestantoj. Ŝi diris la plej nekredeblajn aferojn kaj ŝi faris tion kun la gestado kaj la esprimmaniero de nescianta infano.

Se ŝi enpaŝis kun *Mr. Collins* la halon de kafokabaredo aŭ de luksa restoracio, supozis eĉ la plej dorlotita, ke enpaŝas princino. Princino, ne kiel princino estas, do malmoderna, nelerta, kaj kun kamparana vizaĝo, sed principon, kiun imagas romanleganto al si kaj kiel ili ĉeokaze aperas en filmoj.

Tiu princina konduto kaj tiu princina sinteno transiĝis kompreneble al la reputacio de *Mr. Collins*. Tiu, kiu aspektis ne ĝuste princa kaj apenaŭ elstara, kaŝanta sian malsekurecon – kiu kaptis lin de tempo al tempo en eleganta ĉirkaŭejo – nur per bubeca, laŭta, kolegema kaj manpremega maniero, kreskis gigante antaŭ la okuloj de siaj amikoj, de siaj konatoj kaj de siaj negocaj kontraŭuloj en la ĉeesto de princino Betty. Li gajnis pli je materia

valoro ol je persona. Viro havanta tian bonegan guston por posedi tian eksterordinare aperantan damon kiel amatinon, tia viro estas timenda en negocaj aferoj. Oni devas gajni ĝin kiel amikon, ĉar tia viro kapablas al ĉio. Kiom da mono la viro devas enspezi por povi reteni ĉe si tian principinon. Ke Betty ne estis lia edzino, sciis ĉiu. Kun sia edzino oni ne frekventas tiajn restoraciojn, kie la vespero kostas ne malpli ol kvincent dolarojn. Neniu vestigas sian edzinon laŭ tiel malŝparema maniero. Kaj neniu riĉulo havas edzinon, kiu aspektas kiel principino. Tiel aspektas ĉiam nur amatino.

Viro, kiu enspezas tiom da mono, ke li povas vivteni krom sia familio kaj certe ankoraŭ kelkaj sinjorinetoj de la teatro tiun ĉi principinon, tia viro estas potenca. Li estas ne nur potenca. Li estas potenco. Potenco, kun kiu oni ne ludas, sed kiun oni faras amiko al si, kaj se tio ne sukcesas, respektas lin. Ve al tiu, kiu provas skuegi tiun potencon aŭ provas fari malagrablajojn al li! Tiu viro murdas sen respekto, por venkigi siajn negocajn planojn. Ne pro murdovolupto, sed por povi reteni tiun principinon, por esti inda al tiu principino. Tial neniu kuraĝus ludi kun

Mr. Collins, se temas pri negocoj.

Al la sinjoroj de la kompanio, al la akciuloj, kiuj havas influon kaj komandas sen tio, ke la publiko scias ties nomojn, la princino Betty estas parte samranga al kunnegoculino, parte al bona reklamo. La princino levas la reputacion kaj la potencon de *Mr. Collins*. Kaj kompanio, kiu havas honoratan kaj potencon prezidanton, kiu estas respektata kaj samtempe timata, gajnas sian ludon kun pli granda sekureco ol kompanio, kiu havas troŝpareman, elsekigitan, pesimisman, timidan kaj timeman vireton kiel prezidanton. La saĝecon, kiun la timida vireto eble havas, validas multe. Sed *Mr. Collins* kun sia vivoforto, kun la neceso sur sia nuko devi enspezi plurajn milionojn da dolaroj ĉiujare, por povi vivtenadi siajn princinojn kaj kortegajn damojn, venkas la avarulon per nura mangesto. La avarulo estas memgarda pri siaj riskoj, ĉar li ne bezonas multon por si mem kaj la sekurigitan ne volas perdi. *Mr. Collins* estas senrespekta kaj brutala rilate al siaj riskoj. Ĉar li ĉiam nur povas perdi, tial li devas gajni, tute egale, kiom kostas, tute egale, kio aŭ kiu pereas pro tio. Lia volo neniel estas

libera. Li estas produkto, kiun li ne kreis mem. Li estis kreata. Oni ne povas akuzi lin. Nur liaj gepatroj eble kondamnindas. Sed liaj gepatroj estas: la tempo. Oni kondamnu la tempon, se oni supozas, ke oni devas kondamni ion.

La maniero laŭ kiu postulas Lia Pastra Moŝto, la plej supra bonzo de la Unua kaj plej Sankta kaj Ununure Justa Usona Baptista Eklezio eniron en la ĉielan sanktaĵon kaj ricevas la permeson de la timigita enĉiela kontrolkonsilio, kiu zorgas sin pri sia olimpia kvieto kaj digno, estis superatutita multoble de Betty. kiu staris antaŭ la pordo de la plej granda sanktaĵo de la usona nacio kaj antaŭ si ekvidis la afiŝon: Bonvolu ne ĝeni, restadu ekstere! Kun la peza ora tenilo de sia kurta ombrelo ŝi puŝis dufoje tiom dure kaj tiom forte, rifuzante ĉiun respekton, kontraŭ la pordon, kvazaŭ ŝi volus puŝi truon tra ĝi.

La Dua Sekretariino, vidante tian, paliĝis, ĉar ŝi sciis, ke ŝi nun estis perdinta sian oficon. Konservi sian oficon, ŝi nun povus plu nur per tio, ke ŝi kaptus la principinon Betty ĉe la elirado kaj ŝin petegus kun ploromarkitaj okuloj, ke ŝi petu *Mr. Collins*, ke tiu ne maldungu ŝin, sed puni ŝin nur per minusigo de dudek kvin dolaroj. La sekretariino povis pruvi per montrado de dika blue ŝvelanta tubero sub ŝia maldekstra okulo, ke ŝi provis defendi la eniron al

la plej granda sanktaĵo, eĉ preta pro tiu oferi sian vivon, sed devis cedi al perforto pli supera kaj pli brutala. La bluan ŝvelaĵon oni eble interpretus je ŝia favoro kaj tiu eble eĉ helpus al ŝi ŝpari la minusigon de dudek kvin pundolaroj.

Sen eĉ atendi nur du bonkonduktosekundojn, por ke oni eble voku de interne: „*Come in!*“ Betty malfermŝiris la pordon per vasta svingo.

Ŝi atakis per tia rigardo ĉiujn ĉeestantojn sidantajn tiom digne kaj solene kune kiel kardinaloj ĉe elekto de la papo, kvazaŭ ŝi volus diri: „Vi estas ĉiuj eksigitaj.“

Paŝon ŝi iris plu, brue fermis la pordon post si kaj vokis al la diopatro de tiu konferenco: „*What's the bloomin' idea, you little shrimp?!*“ Kion vi propre imagas al vi, vi eta kompatinda, avaraĉa, plorsingulta lamentvermeto, kiu vi estas!“

Rimarko

„*What's the bloomin' idea, you little shrimp?!*“ = Kion vi propre pensas al vi, malkuraĝa nano!

Betty parolis tre zorgeme kaj trafe, sen tio, ke tio iam sonus afekte aŭ nenature. Plej ofte ŝi parolis tre trankvila kaj pripensema. Por juna ino ŝi havis profundan voĉon. Sed la voĉo estis mola kaj plena; kaj ŝi havis tiun varman rondan amplekson de la voĉo de grandaj tragediinoj, kies potenco baziĝas nur sur la voĉo. Sed, se Betty estis en granda ekscitiĝo aŭ, se ŝi volis doni al siaj vortoj certan fortan emfazon, ŝi parolis slange. Ne, ĉar ŝi ne plu kontrolis sin aŭ, ĉar ŝi forgesis sin, sed ŝi parolis slange kun tuta intenco, por atingi pli grandan efikon. Tiel, kiel ankaŭ diligenta *business-man*, negocisto, komencas paroli slange – kvankam li frekventis certan *college*, certan kolegion kaj universitaton – se li volis vendi al obstina kliento sian varon. Slango trompas nin ĉiujn, kaj ni perdas tiel nian memgardemon.

Betty devenis el Seatlo. Ŝiaj gepatroj ankoraŭ vivis kaj supozis, ke Betty estas privata sekretariino ĉe eldonisto de gazeto en San-Francisko. Se ŝiaj gepatroj ne supozus tion, jen tio same ne interesus la filinon Betty. Ŝia patro havis magazenon por varoj pri ŝipoj, kaj la familio vivis

en bonaj kaj ordigitaj rilatoj. Betty frekventis la kolecion, kaj sian ekzamenon ŝi faris en literaturo kaj en historio. Ŝi parolis france, germane kaj iom la hispanan. Ŝi estis dum certa tempo instruistino en urbeto en Kalifornio, sed pro malbona konduto oni elĵetis ŝin el la lerneja direktorio. La malbonan konduton oni konstatis tial, ĉar ŝi iam rakontis al la infanoj, ke oni ne devas akcepti laŭvorte la Genezon, sed, ke la homo evoluigis lante dum multaj milionoj de jaroj el pli besteca kreitaĵo al sia nuna formo. Kun tiu maldungiga atesto en la mano ŝi kompreneble en la urboj de l' okcidento ne plu povis trovi novan okupon kiel instruistino. Kaj en la grandaj urboj de oriento kaj en la nordo ĉiuj okupoj je jaroj estis antaŭnotitaj. Ŝi fariĝis tiam redakcia sekretariino en taggazeto en San-Francisko. Unu el la junaj redaktistoj invitis ŝin al vespera manĝo en kabaredo kaj pere de amiko de *Mr.* Collins, kiu samtempe estis amiko de tiu juna redaktisto, ŝi konatiĝis je tiu vespero al *Mr.* Collins. Ŝi perdis sian okupon en la gazeto ĉar ŝi dufoje rifuzis vespermanĝan inviton de la gvidanta redaktisto. Matene post la dua rifuzo, estis dirita al ŝi, ke ŝia laboro ne estas sufiĉe bona, ĉar ŝi ne sufiĉe rapide povas noti la diktaĵojn

kaj, ke oni rekomendas al ŝi rigardi al alia okupo. Ĉe tiu rigardado pro alia okupo ŝi renkontis sinjoron Collins surstrate, kiu alparolis ŝin, menciante la reciprokan konatiĝon en la kabaredo, kaj kiu invitis ŝin al lunĉo. Ŝi volis ŝpari la elspezon por lunĉo kaj akceptis la inviton.

Ĝis tiu momento ŝi estis junulino kiel ĉiu alia usona bone edukita junulino, kiu tiam devis perlabori sian vivtenon mem. Sub la influo de *Mr.* Collins kaj en la rilato kun tiu viro, kiu ŝajne enspezis cent milojn de dolaroj por neniu alia celo ol por tio povi elspezi tiujn malŝpareme, ŝi evoluiĝis ene de kvar monatoj al unu el la plej elegantaj damoj de San-Francisko sen povi esti kiam ajn envicigita en la klason de la sufiĉe mondumaj damoj. *Mr.* Collins estis ŝia ununura viro, kvankam ŝi tenis lin poreterne en la atendo, ke li morgaŭ jam ne plu povus esti ŝia ununura. Ke ŝi regis lin, oni ne povis diri. Ŝi eĉ evitis tion supozigita al li, ke ŝi regas lin. Sed ŝi sukcesigis ĉion, kion ŝi volis atingi. Ŝi estis multe pli edukita kaj pli prudenta ol li, kaj ŝi posedis ankaŭ pli da intelekto. Kaj ŝi estis en sia interna vivo pli nobla kaj pli ĝentila ol li. Ŝi estis por li la instigo, kiun potenca viro en la industrio tiom multe

bezonas kiel artisto. Grandanimeco kaj genieco en la arto radikas ja en la sama grundo kiel grandanimeco kaj genieco pri la enspezado de mono. Kiel la vera koramatino de artisto ŝi estus vivinta laŭ la enspezoj de tiu artisto, kaj ŝi estus estinta same tiel feliĉa kiel tiam, en tiu luksa vivmaniero, kiu laŭas al la enspezoj de la prezidanto de unu el la plej potencaj naftokompanioj en Usono. Ŝi amis *Mr. Collins* sincere. Kaj nur ĉar ŝi vere amis lin, ŝi neniam ekpensis, ke ŝia situacio povus esti rigardata alie de aliaj homoj ol ŝi mem rigardas sian situacion. Ŝi estis konvinkita, ke ŝi estus lojala al *Mr. Collins* ankaŭ tiukaze, se li falus de sia alto malsupren. Lian grandanimecon ŝi estimis, kaj ŝi admiris lin pro tio. Sed lian rangon ŝi tute ne respektis. Kaj tial estis ankaŭ tute egale al ŝi, ĉu ŝi kun sia pasie temperamenta eniĝo jes aŭ ne skuas je liaj negocaj sanktaĵoj. Ŝi kredis je lia nevenkebla forto. Ŝi supozis, ke li, eĉ se li falus, ĉiam denove ekstariĝus, kaj ke tiukaze, se fariĝus por li tro komplika fari ĝin sola, ke tiutempe ŝi kapablus tiel sproni lin, ke li devus leviĝi, eĉ kontraŭ sia volo. Tamen – kaj tion ŝi sciis – ŝi neniam edziniĝus al tiu viro, kaj ŝi apenaŭ estus edziniĝinta al li, eĉ tiukaze ne, se ŝi havus okazon

por tio.

Geedziĝo havis por ŝi nur ununuran sencon: povi havi infanojn. Alie geedziĝo estis sensencaĵo kaj amo pli bona. Kvankam ŝi akceptis ĉion de li, ĉion deziris de li, ununuran ŝi tamen ne deziris, kaj tio estis infano de li. La patron de sia infano ŝi imagis alie. La patro de ŝia infano devus havi: animon. Kaj se ŝi tre bonŝancus: la animon de artisto. Sed ĝuste tio estis io, kio plej mankis al *Mr. Collins*: animo. Tiu aĵo, kiu lasas priskribi sin nur kiel: animo.

Betty estis tamen ne tiom perfekta, ke ŝi elradiis nur lumon. Ŝi estis nek sanktulino, nek anĝelo. Ŝi havis fortajn ombrojn. Kelkaj el tiuj ombroj jam ekzistis, kiam ŝi ankoraŭ estis infano. Kiam ŝi pli elkreskiĝis, ŝi devis eklumigi iom tiujn ombrojn, por tragliti spite al tiuj sen puŝoj la vivon. Sed sub la influo de *Mr. Collins* tiuj facilaj ombroj, kiuj alie eble estus ŝanĝiĝintaj al feblaj nebuloj, densiĝis al enormaj ĵetataj ombroj.

Mr. Collins estis eminenta viro, kiel ajn oni eble juĝas liajn agojn. Li estis en sia profesio geniulo. Geniulo povas esti geniulo ĉie, ne nur en la arto, ne nur kiel batalestro, sed ankaŭ kiel ŝufabrikisto, kiel bankiero, kiel naftomagnato. Sufiĉe ofte ankaŭ krimuloj estas geniuloj, ĉar ilia genieco interne de leĝaj limoj ne trovas kampon por povi efiki. Esence ĉiu geniulo estas krimulo, ĉar ĉiu geniulo transpaŝas ekzistantajn kaj elprovitajn leĝojn kaj faligas tiujn. Tial geniuloj estas ĉiam timataj de la bona civitano, kies ekzisto baziĝanta nur sur obstineco, estas minacata de geniuloj.

Ino, kiu volas esti kaj resti la amatino de eminenta viro, certe rilate al multaj de siaj ecoj devas esti la neŝanĝebla malo de tia viro, kaj samtempe ŝi tiom devas simili lin rilate al multaj ecoj kvazaŭ ŝi estus parto de li mem. Geamantoj ne devas kompreni sin reciproke pri multaj aferoj, por trovi ĉiam ion novan, ion neatenditan kaj fremdan je la alia. Tio malhelpas la monotonecon, kiu ekestas en ĉiu bone gvidata geedzo, se ĉiu estas sekura pri la alia.

Kaj geamantoj samtempe pri multaj aferoj devas esti tiom similaj, ke ili tuj komprenas sin per signo en la intonacio.

Rilate al sia edukiteco, sia bona gusto, sia arta sentado, siaj filozofiaj konceptoj Betty estis la akra malo de *Mr. Collins*. Pro tiuj ecoj li admiris ŝin, respektis ŝin, sentis sin mizerulo rilate al ŝi, timis ŝin kaj forgesis sin neniam kiel ĝentlemano. Ŝi male admiris lin pro ties negoca brutaleco, pro ties masiva aŭdaco kaj pro lia memcerteco, kun kiu li juĝis negocajn okazaĵojn, trarigardis ekonomiajn evoluojn kaj antaŭdiris okazaĵojn de la merkato pli klara kaj pli preciza ol la malnovaj orakoloj.

Tio estis iliaj kontrastoj.

Ilia simileco antaŭ ĉio troviĝis en la materia sfero. Ambaŭ amis lukson, ambaŭ ŝatis ĝin frapi la atenton kaj lumi. Li diris: Terposedo, kiun mi volas havi kaj ne povas ricevi, tio ne ekzistas en la tuta universo. Se mi volas havi terposedaĵon sur Jupitero, tiukaze mi ricevas ĝin.“ Li opiniis ĝin laŭvorte tiel. Li ankaŭ volis aĉeti Germanion post la milito. Sed kiam li aŭdis, ke tie alumeto kostas kvin miliardojn da markoj, li ree nuligis siajn

aĉetintencojn, ĉar kun tiaj negocmalkapablaj homoj kiel estis la germanoj laŭ li, entrepreneblas nenio.

Simile, ne, tute same estis kun Betty. Se ŝi volis ion, kaj kiam ŝi konvinkiĝis pri tio, ke tio havigeblas, kion ŝi volas havi surtere, jen ŝi devis ricevi ĝin. Rilate al tiu volo ŝi estis senpardona kaj senrespekta. Kaj simile ŝi estis al li laŭ temperamento. Li estis pli sobra temperamente, ĉar li sciis, ke tiukaze, se li lasas forŝiri sin de la temperamento, li povus fari stultaĵojn. Sed pri negocaj manovroj oni ne rajtas fari stultaĵojn. Sed la temperamento ekzistis, kaj ĝi ekflamiĝis en la lasta kurkonkurso ĉe sukceso, kiun li jam decidis grandparte je lia favoro, tiel, ke stultaĵoj tiutempe ne plu fareblis. Li tiam povis peli sian temperamenton tiom, ke li draŝis sian kontraŭulon per pugno en la vizaĝon, por devigi lin koncedi.

Tiu ĉi propra obstino venkigi sian volon, kaj tiu temperamento, kiun Betty havis ekde sia infaneco, kaj kiun ŝi devis subigi pli kaj pli, plenkreskiĝante en la lernejo, kiel instruistino kaj kiel sekretariino, ree kreskis sub la influo de *Mr. Collins*, ĝis ĝi fine ekfloris en sia tuta pompo.

Mr. Collins, estis aĉetinta la deziritan aŭtomobilon. La plej elegantan aŭtomobilon surmerkatingitan. Rilate la garaĝon li diris, ke li okupiĝos pri tio Li ripetis tion tro ofte, tiun „mi okupiĝos pri tio“. Tial tio fariĝis enuiga al ŝi. Kaj pri la same tiom ofte ripetita elturniĝo „Mi ankoraŭ ne trovis la ĝustan“ ŝi ĝisgorĝe satiĝis tiom, ke la katastrofo devis okazi, tiu perforta kaj tondrobrua romppenetrado en la plej grandan sanktaĵon de la nacio.

En lian privatan domon ŝi neniam estus penetrinta. Ĉar ŝi evitis lian edzinon. Ne, ĉar ŝi eble timis ŝin, sed, ĉar tio estus povinta sekviĝi komplikaĵojn. Eble eĉ divorcon. Tion ŝi volis eviti. Freŝe divorcita edzo post longa geedzeco, kiu fariĝis kutimo, kondutas ofte sufiĉe senhelpa. Kiel infano, kiu perdis la patrinon. Pro tiu senhelpeco ŝi eble eĉ lasus sin persvadi, edzigi lin. Tion ŝi tute ne volis. Tial estis pro puraj kaŭzoj de saĝeco, ke ŝi neniam miksiĝis en lian geedzan vivon. Eĉ ne per vorto. Ŝi eĉ urĝigis lin ne tro neglekti la edzan vivon kaj la edzinon. Ĉu sinjorino Collins sciis pri la ekzisto de Betty, tio ne estis certa. Sed oni povas supozi, ke ŝi estis

informita, kaj ke ankaŭ ŝi evitis tion levi skandalon. Ĉe divorco en ŝia aĝo ne multe gajneblis por ŝi. Ŝi estus povinta elprocesi pension. Certe. Sed ŝia socia rango estis pli alta je la flanko de *Mr. Collins* ol sen li. Tiel ŝi kondukis tiel, kvazaŭ ŝi scias nenion. Kaj se amikino kuraĝis rekte informi ŝin pri tio, jen ŝi diris: „Babilaĉo, nenio krom babilaĉo! Mi konas lin pli bone. Li havas sian ĝuon kaj iom da distro kun ŝi, tio estas ĉio. Mi volonte lasas la plezuron al li. Li devas labori tre streĉite. Ĉu vi vidis la novajn modelojn ĉe *Boiret & Martin*? Mi aĉetos morgaŭ kvar da ili.“

Betty staris ankoraŭ proksime al la pordo. Ŝi atendis aŭ ŝajnis atendi je la unua timida signo de rekonsciiĝo de ĉiuj ĉeestantoj, kiuj estis kvazaŭ en stato de narkozo pro ŝia tondrobato.

Mr. Collins en tiu tago ne havis la prezidon en la konferenco. Li estis transdoninta la prezidon al la dua vicprezidanto, por esti por si mem pli libera en la traktado de la interkonsiliĝendaj temoj. Li ĝuste staris, havis folion en la mano, de kiu li ŝajne ĵus antaŭlegis ion en tiu momento, kiam okazis la tondrobato.

La sinjoroj ĉiuj ekstaris en ĉeesto de la damo. Ili puŝadis kaj ŝovetadis siajn seĝojn, ĉu por povi stari pli bone, ĉu por oferti seĝon al Betty, kion ili ŝajne estis pretaj, kvankam troviĝis sufiĉe da vakaj seĝoj en la konferencejo.

La unua privata sekretariino de *Mr. Collins*, kiu partoprenis en la konferenco por surskribi diktaĵojn, rigardis supren al *Mr. Collins*. Li movis iom la palpebrojn, kaj la sekretariino ekstaris. Ŝi propre ne ekstaris, sed ŝi moviĝis kiel serpento de sia seĝo

malsupren kaj rampis kviete kiel vermo sen frapi la atenton kaj tute senbrue el la ejo, kvazaŭ ŝi estus kriminta ion. Ŝian eliradon rimarkis neniu.

Kelkaj el la sinjoroj konis sinjorinon Betty, aŭ pli ĝuste *Miss Betty Cuttens*. Tiuj sinjoroj, akompanataj de siaj amikinoj, hazarde renkontiĝis iam en la sama kabaredo kun *Mr. Collins*, kiam li estis tie kun Betty, por pasigi plezurigan vesperon. Tiel okazis, ke tiuj sinjoroj estis okupantaj komunan tablon kun *Mr. Collins*; kaj okazis tiam, ke ĉiu unuopulo el tiuj sinjoroj unufoje aŭ dufoje dancis kun Betty en tiu vespero, dume *Mr. Collins* pro ĝentila venĝemo laŭvice petole saltante dancis kun la amikinoj de tiuj sinjoroj en la eta, sed tre luksa halo. *Mr. Collins* estis bona dancisto, bone ekzercita kaj eltenema. Kaj li uzis sufiĉe ofte sian kapablon bone kaj elteneme danci, ĉar li opiniis – kaj certe kun bona rajto supozis tion – ke dancado tenas la korpon elasta kaj tiel juna. En la usona kontinento la viroj multe malpli zorgas sin pri tio ol en Eŭropo, ke ili povus perdis sian indon, se ili dancas kiam ajn troviĝas okazo por tio. En Usono la viroj ne tiel facile perdas sian indon, kiel tio povas okazi en Eŭropo;

ĉar ilia indo ne radikas en la aŭtoritata kredo de tiuj, kiuj per la indo de prezidanto de giganta ŝipvetura kompanio estu malgrandigitaj kaj humiligitaj, la indo radikas antaŭ ĉio en la vere pura praktika kapablo de viro. Estas indo, kiu teorie kaj laŭ supozo povas esti akirata ankaŭ de ĉiu ajn alia viro, se li eluzas je lia favoro la okazojn, kiuj ofertas sin al li. Kaj ĉar la indo, eĉ la indo de la prezidanto de l' respubliko radikas en demokrataj sentoj, tiu indo ne povas perdiĝi pro tio, ke viro kondutas en sia privata vivo kaj en siaj plezuroj tute demokrata. Se ekplaĉas al li, li veturas en la glitejo de *Coney Island* same tiel kriĉante kaj kriaĉante kiel masonisto aŭ kaldronisto, kiu sidas kun li en la sama vagono de la glitejo. Ke viro estas generalpoŝtestro, aŭ ŝtatsekretario pri milito aŭ prezidanto de la Misurio-fervojo-kompanio, por li nur tiam estas temo, se li sidas en sia plej granda sanktaĵo, en sia oficejo. Se iu vere provas aktori la fanatikulon pri indo, oni povas esti tute certa, ke li havas aŭ feblan koron aŭ kronikajn digestoĝenojn aŭ rustiĝintan hepaton. *Mr. Collins* ĉiukaze estis sufiĉe sana por enmeti sian prezidantecon en kapsulo en tirkeston de sia skribtablo, se li volis plezurigi sin demokratie.

Betty certe estis tiel respektata de la amikoj kaj negeckonatoj de *Mr.* Collins, kvazaŭ ŝi estus lia edzino. La sinjoroj ĉiam sciis, ĉu ili povas montri sin konfide al la damo, kiun unu el iliaj amikoj havas ĉe si, ĉu ili ĉeokaze povas ĉirkaŭbrakumi aŭ kisi ŝin aŭ ne. Nek kun Flossy nek kun Betty ili rajtis permesi al si tian intimecon, tiel, kiel ili ne kuraĝus montri intimecon al *Mrs.* Collins. Male al tio oni rajtis rakonti ŝercojn en la ĉeesto de Betty aŭ de Flossy, kiun oni eĉ ne povus aludi en ĉeesto de *Mrs.* Collins. Per tio kompreneble ne estu dirita, ke *Mrs.* Collins ne tiom volonte aŭskultis sukajn ŝercojn kiel iu alia deculino, kiu estas devigita al tio ruĝiĝi je la ĝusta loko de la ŝerco por pruvi sian honestecon; sed ne havas la devon ruĝiĝi, se ŝi pludonas la ŝercon al siaj amikinoj.

Sed por tamen fari diferencon en ĉeesto de Betty oni rajtis konduti multe pli libere, pli gaje kaj pli plezure ol en ĉeesto de la edzino. Oni rajtis senĝenite preni la ĉampanbotelojn el sub la tablo, kie ili devis stari pro la prohibicio, por konservi la eksteran ŝajnon, kaj malferme koncedi, ke efektive estas ĉampano kaj ne *Canada Dry Ginger Ale*, tiu laŭdire tiom sendanĝera venenprodukt

kiel anstataŭaĵo por la sole rekomendinda kaj aŭtentika varo. La ĉampanboteloj kaj la viskiboteloj kaj la kruĉoj de Benedikto staris pro memgardemo sub la tablo. Ĉar tiukaze, se okazus *raid*, atako de la kontroloficistoj pri prohibicio, jen ĉiu individuo povus ĵuri, ke li aŭ ŝi ne estas la posedantoj de tiuj ĉampanboteloj, ĉar neniu estas respondeca por tio, kio staras sen ŝia aŭ lia scio sub la tabloj kaj tie certe jam staris, antaŭ ol ili enpaŝis en la halon, kaj kion certe sub la tabloj postlasis antaŭaj gastoj sen moralo, sen religio kaj sen respekto al la leĝo.

La ĉampanon oni servis en kristalglasoj, ĉar oficiale ja estis supozate, ke temas pri *Ginger Dry Ale* el Kanado. Sed la viskio kaj la martino seka estis servataj en mokatasoj, kun sukerujo kaj kremkruĉeto kvazaŭ efektive estus mokao. Kiu enpaŝis la halon kaj trarigardis la tablojn, tiu gajnis la impreson, ke li troviĝas en la senpeka dancplezuro en fonda festo de la kontraŭalkoholistoj. Se vere okazus *raid* de la kontroloficistoj pri prohibicio, ĉar ili ne estis trankviligitaj sufiĉe bone de la gastejestro per dolaroj, aŭ ĉar la departemento estis ricevinta novan fervoran ĉefon, kiu celis laŭrokronon, kies prezo en

dolaroj ankoraŭ ne estis decidita, aŭ ĉar la oficistoj tamen ĉeokaze devas likvidi „malsekan inferon“, por montri al la bona civitano, kiel serioze oni traktas la leĝojn de la prohibicio, kaj kiom necese estas pligrandigi la buĝeton por la observado de la prohibicio – kaj per tio la enspezojn de la departementa ĉefo – , do se vere okazus oficista atako prohibicia, jen ĉiuj mokatasoj per unu fojo estus eltrinkitaj kaj enverŝata nigra kafo, kiu por tiu celo staris jam preta sur la tabloj por povi neniigi la odoron de la viskio. Neniu novnaskita ŝafido povis esti pli senkulpa ol la bonaj homoj, kiuj kolektiĝis ĉi tie por plezurigi sin post la nervostreĉiga laboro sendanĝere kaj interne de la leĝaj limoj. Kiu estis trovita ebria, tiu ebriigis ie alie kaj jam ebriis antaŭ ol li enpaŝis la domon, kaj la gastejestro vane penis, kiel certe pruveblus, elŝovi trankvile la geon aŭ la viron el la domo. Sed, sen kaŭzi grandan skandalon tio ne estus sukcesinta, kaj tial la gastejestro fine al la geo aŭ al la viro permesis restadi tie, en la kazo, ke ili kondutas honeste. Oni ja ne povis kulpigi la gastejestron pro tio, kion faris kaj trinkis tiu geo en alia restoracio. Betty estis *good sport*, tio signifas, ke ŝi estis preta por ĉio kaj ke ŝi al neniu fuŝis la plezuron aŭ la bonan humoron.

En ŝia ĉeesto la sinjoroj ĉe la tabloj povis senĝenite kisi siajn amikinojn, kaj senĝenite oni rajtis koncedi, ke oni estas jam *a little bit tipsy*, ke oni do jam iom zigzagemas pro ebrieto. Sed ĉiu el la viroj sciis ankaŭ, kiom multe oni povas permesi al si en ĉeesto de Betty.

Sed, se *Mr. Collins* aperis kun unu el la ĵus envicigitaj ĥordamoj, la festo multe pli sovaĝadis. Kaj sufiĉe ofte oni atingis la punkton, kiam ne plu differenceblis, kiu estas la amikino de kiu. Kompreneble iom post iom povis okazi, ke ankaŭ unu el la ĥordamoj devis esti respektata, preskaŭ kiel la edzino. Sed provizore ankoraŭ neniu de ambaŭ ĥordamoj de *Mr. Collins*, povis range tiom alte suprenvingiĝi. Ili staris ambaŭ ankoraŭ en la atendohalo. Kaj ankoraŭ ne diveneblis, kiu el ambaŭ plu veturus en la luksa trajno. Eble neniu el ambaŭ iam veturados en ĝi.

Ĉiuj sinjoroj de la kontrolkonsilio, kiuj tie estis kolektiĝintaj en la plej granda sanktaĵo, jam aŭdis ion pri Betty. Kaj kiam ŝi enkuregis kiel fulmotondro, sciis ĉiu, ankaŭ tiu, kiu ne konis ŝin persone, ke tiu damo estas Betty. Ĉar la edzino de la prezidanto ne estus kuraĝinta fari tion, kion Betty faris. La edzino ekstere estus atendinta en precipa ĉambro, ĝis ilia edzo havus minuton da tempo por ŝi. Kaj ĉiuj sinjoroj, sen escepto, kiuj nun persone je la unua fojo vidis la multe priparolatan principinon, estis ektimigitaj.

Pri principino ili imagis ĉiam multon. Se oni parolas pri la amikino de magnato, ke ŝi aspektas principine, oni tuj havis certajn ideojn kaj imagojn, kiuj estis formataj pere de la filmo. Per filmoj, en kiuj iama vendistino el kravatmagazeno tiom longe estis grandigata per sorĉoj, ŝminkado, diademoj, scintilaĵoj, vitroperloj, sateno, silko, ĝis ĝi kontentigis la principinan bezonon de la stenotipistinoj kaj de la salajrolistaj skribistoj.

Sed kion la sinjoroj nun ekvidis, ne estis Florence-Vidor-

filmpupo kaj neniu senkronigita ŝafpaŝtista reĝino el la mita balkanŝtato Limonia-Silvania laŭ la subridaĉanta maniero de certa Gloria Swanson, ĉar tio, kion la sinjoroj tie vidis antaŭ si, estis centfoje pli ol ili iam ajn atendis povi ekvidi. Ili ne vidis princinon; ili vidis – ja kion do – ne, imperiestrino ŝi ne estis. Ĉar ankaŭ imperiestrinoj estas ekstermodaj kaj kamparanaj. Tio ankaŭ ne estis filmreĝino en stratkostumo. Al la filmreĝinoj alkroĉiĝis ĉiam, neeviteble kaj neforviŝeble la odoro de la oficejo aŭ de la kartonfabriko aŭ de la grandmagazeno, el kiu ili devenis. Al Betty ne kroĉiĝis odoro el sia provotempo kiel instruistino kaj kiel gazetsekretariino. Eble, ĉar ŝi neniam vere estis laŭ sia sento instruistino aŭ sekretariino.

Betty estis naskita princino, kaj ŝi neniam estis io alia krom princino. Ke ŝi nun elpafis frazon slange, ne malaltigis ŝin, sed tio nur konfirmis ŝin en la rango kiel princino. Tiel princino devas trakti siajn subulojn. Subulojn, kiuj provokis la koleron kaj la indignon de sia princino. Tiel kaj ne alie! Kaj la subuloj ĉiuj devas esti silentaj kaj ne rajtas eĉ tuseti, alie ili ĉiuj estus pendigataj.

La senton, ke ili povus esti mortkondamnitaj de tiu

princino, havis ĉiuj ĉi sinjoroj, vidintaj la damon Betty je la unua fojo. Kaj eĉ tiuj sinjoroj, kiuj sidis kun ŝi ĉe la sama tablo kaj eĉ estis dancintaj kun ŝi, sentis sin strange malgrandigataj.

En Usono inoj rajtas ja ĉiam pli fari kaj aŭdaci ol viro rajtus nur pensi. La Unuiĝintaj Ŝtatoj estas la paradizo de la inoj. La ino komandas. Ŝi regas jam en la lernejo, ĉar ne ekzistas viraj instruistoj. Ŝi regas eĉ pli en la domo. Ŝi regas en la politiko. Ŝi rajtas ĉie antaŭenŝovi sin, ĉie per kubutoj flankenpuŝi la virojn; kaj ve al tiu kompatindulo, kiu volas malhelpi ilin aŭ kiu provas postuli klarigon de ili. Ŝi estas la plej libera ino el ĉiuj inoj en la la plej libera respubliko de la universo. Ŝi estas la plej libera tiom longe, kiom ŝi estas bone vestita, tiom longe, kiom ŝi ne portas en laborista asocio la ruĝan flagon, tiom longe, kiom ŝi ne estas strikanta tekstillaboristino, tiom longe, kiom ŝi ne kun ŝrika voĉo insultaĉas salvume, ĉar ilia edzo kiel strikanta minlaboristo de la maŝinpafiloj de la milico estis mortpafita, tiom longe, kiom ŝi ne faras pacifisman propagandon. Tuj kiam ŝi faras tion, oni batas ŝin per policbastano same tiel sur la kranion kiel la edzon.

Tiel libera la libero eĉ en la plej libera respubliko ne povas esti. Limon fine devas havi eĉ la libero, alie oni ja ne scius, kie la libero komenciĝas kaj kio libero estas entute.

Se ŝi estus estinta nur laboristino, kiu tie foje ĉe la kontrolkonsilio persone volus demandi, kial ŝi do devas vivi kun semajna salajro da dek kvar dolaroj, dume la kompanio havas milionojn de dolaroj kiel pluson en jaro, jen ŝi ankaŭ ne povintus tiel fulmotondre enkuri kiel Betty. Se ŝi estis aŭdacinta tion kiel nura laboristino, tiukaze ŝi kaptus al si sesdek tagojn en labor- aŭ pundomo pro maldeca konduto aŭ pro ebrieco, ankaŭ se ŝi estus tiom malmulte ebria kiel Betty, aŭ se ŝi neniam trinkis ion, ĉar ŝi ne povis eldoni dek dolarojn por unu botelo da viskio.

Sed Betty rajtis fari tion, kion ŝi volis fari. Ĉar ŝi estis ino en la plej libera respubliko, kie la inoj ne estas traktataj laŭ sklavo, kiel tio okazas en Europo aŭ en Azio. Ĉar Betty en tiu kazo pravis. Ŝi devis havi sian garaĝon kaj la aldonan loĝdomon, la aldonan ĝardeniston, kiu ankaŭ devis lavi la aŭtomobilon kaj fari ĉiujn metiistajn laborojn

en la domo. Kaj se la domo jam apartenis al la garaĝo kaj la ĝardenisto al la domo kaj al la eleganta aŭtomobilo, jen apartenis al tio ankaŭ ĉina aŭ franca ĉambristino por helpi al Betty pri personaj aferoj, por ke ŝi ne devas mem ordigi sian liton, ne mem devas enlasi la akvon en la banejon kaj mem ellavi siajn silkajn ŝtrumpojn. Mr. Collins ĉeokaze ankaŭ volis manĝi ĉe ŝi, kaj tiel apartenis ankaŭ nigra aŭ irlanda aŭ sveda kuiristino al la bone ekipita kuirejo, kie nenio rajtis manki, kaj kie la manĝilaro estis lavita per elektra maŝino, kaj kie oni devis kuiri nur sur elektra forno por ŝpari laboron kaj por ne havi polvon.

Kiam la sinjoroj de la konferenco aŭdis pri kio temas, ili vere komprenis, kion Betty diris, kaj kial ŝi devis tie enkuri kun fulmotrondro. Ŝi certe ne kulpis tion, ke la sankta konferenco estis ĝenata pro tiaj profanaj aferoj. La kulpulo estis *Mr. Collins*. Kiel li kuraĝis rifuzi ion al la princino Betty? Li pruvis per tio nur, ke li certe venis de tre malsupre, kaj ke li ankoraŭ ne tute forbanis la odoron de peklita bovoviando kun brasiko.

Tiel Betty en ĉiu direkto estis pravigita.

La sinjoroj, kiuj intertempe tiom rekonsciiĝis post la tondrobato, ke ili ne nur komprenis la principon Betty, ne nur tute senkulpigis ŝian sovaĝan enkuradon, ja eĉ konsentis al ŝi, ke estis ŝia devo tamburi per pugnoj la ŝultrojn kaj la bruston de *Collins*, pli kaj pli malproksimiĝis de siaj seĝoj por rigardi principon Betty el la plej granda proksimo kaj senvestigi ŝin en pensoj.

Ĉe tio kreskis *Mr. Collins* en la estimo de la kontrolkomisiaj membroj pli kaj pli; kaj en la okuloj de la

sinjoroj, kiuj vidis Betty la unuan fojon, *Mr. Collins* atingis supernaturan grandon. Estinte jam ĝis nun tre potenca en la kompanio, li fariĝis nun post tiu okazaĵo superpotenca. Kaj lia pozicio fariĝis neskuebla.

ĈAPITRO 04

01

Mr. Chaney Collins ja neniel estis dungito de Kondor-kompanio. Tiel tio ne estis. Li estis prezidanto de la kompanio, sed ne prezidanto en formo de oficisto. Li estis prezidanto, ĉar li fondis la kompanion kaj ĉar li estis unu el la ĉefakciuloj. Tamen li estus povinta perdi sian postenon kiel prezidanto. Se oni implikis lin en skandalon tiel, ke li troviĝus en la centro de la skandalo, tiukaze li devus ekŝiĝi, ĉar skandalo de prezidanto povas skuegi la reputacion de kompanio kaj ties negocoj suferus pro tio. Vidalvide kun la publiko la prezidanto devas esti sen manko. Li devas esti modelo je honorindeco kaj pura moralo, kaj pro la bonaj civitanoj, kiuj investu sian monon en la negocoj de la kompanio, kaj ankaŭ kaj tute precipe pro la komunistoj kaj similaj kritikaĉuloj kaj ŝtatrenversigantemuloj. La banalaj agitistoj, al kiuj mankas la kapablo kompreni la kapitalisman sistemon je ties fundamentaj problemoj kaj ataki ĝin ekde la bazaj problemoj, ĉiam tro facile falas en la stultaĵon ekzameni la privatan vivon de kapitalistaj gigantoj por pruvi pere

de la privata vivo de la granduloj de l' kapitalo, kiom putriĝanta kaj kolapsiĝema estas la kapitalismo.

La proletoj delektiĝas je la klaĉo kaj je la litaj rakontoj de aliaj same tiel, kiel la meztavolo de la popolo, tiel kiel la bonaj civitanoj, kiuj, ĉar ili mem estas tro timemaj kaj avaraj por enscenigi bonan sukan skandalon, elvivas sian emon por obscenaĵoj en la obscenaĵoj de aliaj, egale ĉu la aliaj estas grandkapitalistoj, episkopoj aŭ monarkoj. Kaj la agitisto, se li povas prezenti skandalrakontojn, estas pli sekura pri la aplaŭdo de siaj aŭskultantoj ol tiukaze, se li parolus pri problemoj kaj dismembrigus sistemojn.

Sed por ne tenti la proleton al avido pri ĝuoj kaj tiel inciti lin postuli pli kaj pli grandajn salajrojn kaj krome kunrajtojn pri tio, kion li produktas, necesas en la publiko vivteni la opinion, ke la grandkapitalisto, kiu laŭ la opinio de la agitatoj satigas sin je la ŝvito de la proletoj, estas modelo je morsevereco, je ŝparemo kaj je respekto pri la leĝo.

Tiel embarasiga skandalo povas faligi grandan viron, ĉar la ceteraj granduloj, por povi kaŝi sin kaj por konservi

sian potencon kaj pliigi tiun, devas lasi fali la viron, por publike anonci, ke ili ne havas komunecon kun li kaj, ke ili ne estas tiel, kiel estas tiu.

Se *Mr. Collins* estus implikita en skandalon, li ne plu povus esti prezidanto. Sed li tamen plu estus grava viro en la kompanio, kaj laborante en la fono, li eble estus povinta fari pli por la kompanio ol antaŭe. Sed la kompanio tamen suferus. Ĉar perdi tian potencon kaj kapablan viron kiel prezidanton, kia estas *Mr. Collins*, por kompanio ne estas bagatelo.

Per sia personeco kaj la majesta moŝto, kiun Betty kiel lia amatino havigis al li, li povis atingi sukcesojn por la kompanio, kiuj neatingeblis por ĉiu alia prezidanto. Li kapablis sukcese konstruigi stratojn, kiuj por la negocoj de la kompanio estis gravaj, ĉar ili kreis rapidan ligon al ties naftokampoj, stratojn servantajn nur por la kompanio, kiujn krei pro tio estus devigita la kompanio, kvankam nur la ŝtato konstruis ilin. Ĉar ŝtataj guberniestroj, kongresmembroj, urbestroj, urbopatroj devis fari tion, kion li ordonis. Se ili ne estus farintaj tion, ili ne plu povus esti tio, kion ili prezentis aktuale. Li faris

la politikon, sen tio, ke li iam interesiĝis pri politiko. La politikistoj, kiuj okupiĝis profesie kun politiko, neniam eksciis, ke ili faris ĝuste tion, kion *Mr. Collins* celis, ke ili faru tion. La plimulto de tiuj politikistoj imagis al si esti liberaj kaj sendependaj politikistoj, kiuj servas al la intereso de la politika bonfarto. Multaj el ili estis antaŭ sia propra konscio vere honestaj kaj honorindaj viroj.

Kiel oni faru politikon sen tio, ke la politikistoj eksentas, ke ili agas ne libere, ke ili estas gvidataj kvazaŭ de surtera dio rilate sian volon, siajn pensojn, parolojn kaj agojn, tion *Mr. Collins* frutempe lernis en sia vivo. Li estis la kreinto de tiu ideo. Kaj li fariĝis obsedita de tiu ideo, kiam li estis kompreninta kun sia genia percept- kaj observkapablo la veran historion de granda konstrulaborista striko en Ĉikago.

Mr. Collins devenis de Harrisburg, Pensilvenio. Lia patro havis tie certan *grocery store*, magazenon por koloniaj varoj, por konservoladujoj kaj frandaĵoj. Ne tre elstaran, la jara enspezo sumiĝis ĵel tri mil dolaroj. *Mr. Chaney Collins* devis laboradi kaj malsatadi dum la kolegio. Lia patro donis po monato nur ĉekon kvardek-dolaran al li, kaj okazis plurfoje, ke la monata ĉeko estis malaltigita al nur tridek dolaroj.

Forlasinte la kolegion sen distingi sin per laŭdo kaj sen fari precipan ekzamenon, li ricevis okupon en banko pere de ladskatolfabrikisto, kiu vendadis al la maljuna Collins varojn ĉar li volis konservi la amikecon kaj per tio la negocon kun la maljuna Collins. *Mr. Collins* ricevis komence en la banko dek ses dolarojn ĉiusemajne kiel salajron. Post jaro li ricevis jam dek ok dolarojn en ĉiu semajno. Li transŝanĝiĝis al asekurkompanio, kie li komence ricevadis dudek du dolarojn ĉiusemajne. Kaj post tri laborjaroj ĉiun semajnon kvardek dolarojn.

Nun li eniris en negocon kun gazetanoncoj. Komence por

kvardek dolaroj semajne kaj post kvar jaroj li elvringis cent dolarojn el ĉiu semajno. Jen tute neimageble granda salajro, kiun li akiris, ĉar li ellaboris kelkajn bonajn ideojn kaj proponojn por la propagando de dentbrosilo, de vizaĝhaŭtkremo, de elektra panrostilo, de nova cigaredo, de polurilo por latuno, de kunfaldebla portoseĝo por infanetoj kaj novan eltrovon por kovrado de tegmentoj, kiu konsistis el miksaĵo el cemento kaj gudro. Lia firmao gajnis el liaj ideoj surpluson da kvardek mil dolaroj. Kiam li iutage eksciis tion el la kontorlibroj, lastfine ekaperis liaj saĝodontoj. Li ekkonis, ke li estis ĝis tiam azeno.

Tial li decidis - nun jam provizita kun la saĝodontoj - komenci labori por si mem. Kiam li klarigis, ke li volas forlasi la firmaon, oni ofertis al li cent kvindek dolarojn ĉiusemajne, fine eĉ cent okdek dolarojn, kaj laste ducent dolarojn kaj kvinprocentan gajnoparton el la vendo de siaj planoj, kiujn li havos estontece.

Li rifuzis ĉion ĉi, ĉar li de tiam ne plu volis okupiĝi pri bagateloj.

Lia okupiĝo pri la ellaborado de gazetanoncaj planoj por la nova kovrado de tegmentoj rilatigis lin al la konstruado de domoj, kaj ili interligis lin kun makleristaj spekulantoj.

Li pensis mem pri tio okupiĝi pri terposedaĵoj kaj domkonstruado. Sed jen okazis la granda konstrulaborista striko en Ĉikago. Tute hazarde li eksciis de unu el la spekulantoj, kiu ebrietis kaj fanfaronis kiel ruza li estas kaj kiel li metis ringojn tra la nazo de certaj viroŝafoj. Jen la vera rakonto pri tiu striko.

Estis tie du magnatoj, kiuj okupiĝis pri la *real estate*, do pri terposedaĵoj kaj domspekulado. Ambaŭ batalis pri la superregado. Ĉar tiu, kiu havas la superregadon, faras la politikon en Ĉikago. Kaj kiu faras la politikon, tiu ordonas, kie la tramreloj estas metendaj kaj kie ne, kie fervojstacidomoj konstrueblas kaj kie oni malpermesis tion laŭ la intereso de la loĝantaro, kie la urbo devas starigi hospitalon kaj kie la ĉirkaŭaĵo estas malfavora por la resaniĝo de la malsanuloj. Kiu havis la potencon sciis jam jarojn antaŭe, kie tramo troviĝos. Tiel li povis aĉeti

terposedaĵojn malmultekoste de tiuj, kiuj ne sciis, ke ekzistas la intenco meti tramlinion tie, kaj li povis vendi tiujn kun kvin mil procentoj da gajno, tuj, kiam oni ekmetis la tramlinion. Tiel funkciis ankaŭ pri stacidomoj, tiel pri hospitaloj, tiel pri buĉejoj, tiel pri lernejoj, tiel pri kazernecaj ludomoj, tiel pri ĉio, kio dependas de terposedo, sur kiu oni rajtas konstrui domojn.

Ambaŭ magnatoj samtempe estis konstruantaj plurajn domblokojn, loĝdomojn, oficejajn domojn, magazenojn. Afero, kiu kostis multajn milionojn de dolaroj.

Tiu, kiu unue estus fininta sian konstruprogramon, estus la gajninto. Li povus plenumi ĉiujn lukontraktojn jam subskribitajn precize laŭ la tago, dume tiu, kiu ne estis preta je la fiksita termino devis pagi grandajn konvenciajn punojn al la domaĉetistoj kaj luantoj. Tiu, kiu unue estis preta, ricevis ĉiujn luantojn, kiuj atendis domojn, kaj tiu, kiu laste finis la konstruadon, povus plenigi siajn domojn eble eĉ ne dum monatoj. Neniu aĉetus ilin, ĉar la bezono je malplenaj loĝejoj, magazenoj kaj oficejoj estis kontentigita por la sekvaj monatoj.

Tiel la magnato, kiu volis eldoni plej multe da mono kaj unue havis la ideon, iris al la sindikato de la konstrulaboristoj kaj subaĉetis la sekretarion por dek mil dolaroj. Sub la moŝta influo de la granda kaj neforgesebla laboristogvidanto Samuel Gompers, kiu iam havis la honoron esti naskita inter la laboremaj kaj honestaj proletoj de la geto en Amsterdamo, la gvidado de laborista sindikato estis same tiel negoco kiel la amasproduktado de komplete kunlutitaj sinjorokostumoj aŭ malbone borderitaj insubĉemizoj. Sindikata estro de tiu ĉi maniero, kiu ne havas je sia morto bankbonhavaĵon de kelkaj cent miloj de dolaroj postlasitan al siaj diversaj plorantaj vidvinoj kaj orfoj, ne komprenis sian profesion, sed estis ŝtipkapulo, kiu elvenis el la prizono nur pro tio, por denove eniri ĝin je la sekva tago, ĉar li supozis, ke laborista sindikato havas rilaton al la socialismo.

La subaĉetita sekretario nun eltrovis, ke dekhora labortempo estas tro longa kaj sepdolara salajro tro malgranda, kaj, ke nun, enmeze de tiu vigla konstruada tempo, finfine venis la horo venkigi tion, por kio kelkajn jarojn antaŭe la anarkiistoj en Ĉikago estis pendumitaj.

Por sukcesigi tion, oni ja ne devis striki ĉie samtempe, kiel la sekretario rakontis al la kunvokitaj kunvenoj de konstrulaboristoj, sed oni devas ĝismortstriki unue unu el la magnatoj kaj poste la alian. Tiam laŭ li ambaŭ estus superitaj kaj la konstrulaboristoj estus tiam fine la mastroj de Ĉikago. Li sciis ĉion tion bone kaj bele klarigi, kaj la konstrulaboristoj tute fidis al li, ĉar li estis ja ilia sekretario.

La magnato, kiu unue estis pristrikenda, estis la kontraŭulo de tiu magnato, kiu estis paginta la dek mil dolarojn al la sekretario. La striko eksplodis. Li estis entreprenata kun multe da kolero kaj multe da malamo, kio tiel eblas nur fare de laboristoj, kiuj ricevas anstataŭ sep dolarojn tagsalajro nun nur plu la mizeran striksubtenon. Jen multaj pugnobataloj kun strikrompantoj, oni mortpikis strikantojn kaj strikrompantojn, la polico pafis en ekscititajn amasojn kaj multaj enprizoniĝis.

Fine la magnato, kiu estis subaĉetinta la sekretarion, estis preta kun sia konstruprogramo, kaj la magnato, kiu ne pretis, sekve de la striko, perdis sian posedaĵon kaj li estis

eliminata el la vetkonkurso pri la superregado pri la terposedaĵoj kaj domspekuladoj en Ĉikago.

La laboristoj en siaj kunvenoj diskutis preskaŭ ĝis kunrompiĝo pri la forto de la entreprenistoj kaj la nevenkebla forto de la kapitalismo kaj laboregis kun unuigintaj fortoj por envicigi ankaŭ la lastan neorganizitan viron, ĉar laŭ ili nur forta laborasocio necesis por frakasi la kapitalismon aŭ almenaŭ ricevi sufiĉan tagsalajron, se oni tamen ne tiel frue ekvidus la socialisman mondordon.

La sciado pri la vera rakonto de tiu striko kreis la bazon de l' potenco de *Mr. Collins*.

Mr. Collins memoris pri kunlernanto el sia kolegia tempo, kies patro estis vicprezidanto de unu el la plej grandaj antracitkompanioj en Pensilvanio. Pro tiu lerneja amiko sukcesis al li ricevi konsenton pri interparolado kun la vicprezidanto.

Post kiam la vicprezidanto komprenis la planon, kiun *Mr.* Collins sciigis al li, Collins estis invitita partopreni je precipa konferenco de la kompanidirektorio por tie ankoraŭfoje detale prezenti sian planon.

La plano de *Mr.* Collins estis tiel lerta, ke Collins, kvankam li estis nur socia neniulo, ne trompeblus pri sia ideo. Se la kompanio provus realigi la planon sen interkonsentiĝi antaŭe kun *Mr.* Collins pri la prezo, jen *Mr.* Collins devus iri nur al gazeto, kaj la plano estus fuŝita. Ĉiam ekzistus iu gazeto, kiu, por havi grandan sensacion por si sola, publikus la okazontan manovron de la granda Antracitkompanio kaj eĉ estus paginta *Mr.* Collins por tio.

Tion la direktorio tuj ekkonis, kaj tial oni komencis fari seriozajn intertraktojn kun *Mr.* Collins.

Mr. Collins postulis ok procentojn de la neta profito de la manovro. Oni interkonsentiĝis fine pri kvin procentoj, kiuj estu pagendaj je dekonon kontante kaj je naŭ dekonoj per akcioj de la kompanio. Aldone *Mr.* Collins fariĝis membro en la kompania konsilio kaj je la daŭro de la manovro nomumita privata sekretario de la prezidanto, kun monata salajro da tri mil dolaroj. Praktike li devis fari malmulton; ĉar la Unua Sekretariino por la aktualaj negocoj restadis en la servo. Li nur ĉiam devis esti preta por povi doni siajn konsilojn ĉe ĉiuj trupŝovadoj, kiuj necesus.

Tiam li ankoraŭ ne havis tridek jarojn.

La manovro komenciĝis. Montriĝis, ke la manovro deruliĝis tute tiel, kiel *Mr.* Collins planis kaj aŭguris tion.

La ĉefa truko konsistis en tio, ke aŭdiĝis neniu vorto antaŭtempe.

La kompanioj laborigis ĉiujn siajn minejojn kun superpremo. Plushore kaj plushore. Oni pagis tre bonajn premiojn al la minlaboristoj por eksterordinaraj laborkvantoj. Miloj de novaj laboristoj el Eŭropo estis havigitaj.

Oni plenigis ĉiujn provizejojn per antracitkarboj ĝis la limo. Oni luis grandajn placojn por stoki la elminigitan karbon.

Novajn klientojn oni ne akceptis. Nur la aktualaj kontraktoj kun la ŝip- kaj fervojkompanioj kaj grandkomercistoj pri karboj estis plenumitaj por ne fariĝi suspekta. La agado laŭ la konsiloj de *Mr.* Collins estis tiel lerte gvidata, ĝi okazis tiel trankvile kaj nesuspektige, ke neniu kompanio eĉ nur ekpensis, ke ĉi tie unu el la plej

gigantaj batoj estis preparata, kiu kiam ajn estis travivita en Usono. La manovro estiĝis en tia trankvila kaj sata periodo, kia kutime antaŭiras gravajn ekonomiajn krizojn. Al tiu sata periodo, en kiu oni ne riskas tro sence, ĉar enspezigas la normala iro de la negocoj sufiĉe da gajno kaj tro petola spekulado kondukus nur al malcerteco, kiu tiam estus malagraba al oni. Oni kontentiĝis pri la grasaj komisioj, kiujn oni havas mem, kaj oni ne okupiĝis tiom multe pri tio, kion aliaj faras, ĉar oni nun, havante sufiĉe da komisioj, ankaŭ foje povas ludi la noblulon kaj permesi al si malenvii ion al iu.

Kaj iutage, post kiam ĉio dum monatoj estis antaŭpreparita, komenciĝis la granda bato.

La bato ne komenciĝis kiel fulmo, sed tute trankvile kiel antaŭa palpado, kiel mallaŭta karesado.

La Antracitkompanio anoncis al ĉiuj siaj laboristoj, ke ekde vendredo de la sekva semajno ĉiuj kontraktsalajroj estus malaltigitaj je kvarono kaj ĉiuj taĝsalajroj dek kvin procentojn.

La kompanio laboris laŭ nova sistemo. Ĝi ne aĉetis sindikatajn sekretariojn. Tio tute ne necesis. La sukceso estis multe pli granda sen la kunlaboro de sindikataj sekretarioj, kiuj eble estus fuŝintaj la manovron. Krome kelkaj sekretarioj de la minlaboristoj estis nefidindaj. Ili plej ofte prenas la partion de la laboristoj kaj estas honestaj kamaradoj. Ili staras sur sia *soapbox*, sur sia sapokesto kaj ne lasas silentigi sin pli frue ol ili estas tiom priĵetataj per ŝtonoj ĝissange de la agentoj de la karbomagnatoj, ke ili forportendas de siaj kamaradoj sen konsciio. La dek miloj de laboristoj de la Antracitkompanio tuj alvokis je kunvenoj, sed elvenis nenio. Ili pensis, ke ili ankoraŭ enspezas sufiĉe da mono, ankaŭ post la salajra malaltigo, pro la premiosistemo kaj se ili laboraĉus eĉ pli kaj farus eĉ pli da plushoroj ol antaŭe.

Kelkaj sinjoroj de la direktorio jam komenciĝis fariĝi necertaj. Sed *Mr. Collins* estis plu tute trankvila. Li montris en tiu situacio la unuan fojon sian talenton kiel grandulo inter la magnatoj.

„Ni ja nur komencas tion, ĝentlemanoj“, li diris. „Nur ne

fariĝu nun maltrankvilaj. Mi donas al vi la rajton mortkondamni min, se tio ne sukcesos. Kaj mi volas ekzekucii la verdikton je mi mem kaj mi do pafmortigos min, kiam la verdikto estas decidita. Sed eltenu!“ Oni lasis agadi lin tute libere.

Semajnon poste la premia sistemo estis nuligita.

La duan semajnon poste oni nuligis ĉiujn plushorojn, kaj la laboristoj, kiuj intertempe estis kutimiĝintaj al la premioj, al la pagataj plushoroj, je la bonegaj salajroj, kiuj estis prenintaj kreditojn, aĉetintaj malgrandajn parcelojn, komenciĝintaj konstrui domojn kaj lasintaj frekventi kolegiojn al siaj infanoj, kaj kiuj faris multon aldone, kio nun minacis strangoli ilin, konfuziĝis.

Nova akra sistemo en la minejoj estis enkondukita. Tiu, kiu minuton tro malfrue alvenis en la ŝakto, ne rajtis labori dum la tuta tago, sed devis restadi en ĝi, ĉar por li ne disponeblis ŝaktilifto. Li devis atendi, ĝis lia skipo elveturis per la lifto. Krome por la minuto, kiun li venis tro malfrue, oni minusis de li duonon de la sekva tagsalajro, en kiu li ree laboris.

Okazis eĉ pli. La elminigota karbo estis pli severe kontrolata. Se oni trovis pli ol kvar ŝtonojn, pli ol duonon de ŝovelpeno da polvo aŭ ŝtonetojn kaj se mankis pli ol

kvin funtoj da pezaĵo, tiukaze la tuta ĉaro kun la elminigita karbo estis surskribita kiel nulkvanto. La ministoj ne ricevis salajron por ĝi, sed la kompanio prenis ĝin tamen. Nun la sindikato de la laboristoj estis alvokita por interveni. Oni jam alvokis ilin pro la minusigo de salajroj; sed post longa interkonsentiĝo la konfidinduloj de la sindikato decidis, ke oni unue volas atendi, ĉu tio estas ne nur manovro de la kompanio; ĉar laŭ la raportoj, kiujn studis la sekretario, la aktuala negoco pri antracito estis brilega.

La reprezentantoj de la sindikato ĝentile petis pri *conference* kun la direktorio. La direktorio klarigis, ke ĝi ne povas intertrakti kun fremduloj, kiuj laboras en neniu el la minejoj de la kompanio. Tri tagojn poste, kiam la sistemo pri la nuligo de elminigita karbo ĉiam pli senrespekte estis ekzercita, la konfidinduloj laborantaj ĉe la kompanio kaj elektitaj por tio, ĝentile petis pri *conference*.

Al ili oni permesis la konferencon. Kaj tuj post la unuaj vortoj oni diris al la konfidinduloj, ke ili ricevos rekompencan pro la perdo de tempo, kiun ili havas pro la

conference, kaj, ke tio estas tute laŭnatura.

Tio pacigis la homojn, kiuj estis venintaj, por montri sian ekscitiĝon. Kaj tiuj, kiuj havis la intencon konduki kiel malsataj tigroj en la konferenco, fariĝis tiel malsovaĝaj per ofertitaj bonaj cigaroj kaj per ĝentila petado sidiĝi en la profundajn molajn seĝojn, ke la prezidanto povis meti sian kapon en la faŭkojn de la tigroj sen devi timi, ke li perceptos denton.

Oni klarigis al la homoj, ke estas tiom da tro produktita karbo, ke oni havas la intencon fermi la minejojn dum certa tempo kaj, ke oni volas lasi labori nur la pumpilojn kaj la ĉarpentistojn. Oni eĉ prezentis al la konfidinduloj la librojn kun la aktualaj provizaĵoj en la stokoj.

La homoj ne komprenis legi tiajn librojn, ĉar tio havis rilaton kun kreditoj kaj debitoj, kun debeto kaj kredito, kaj la homoj ne sciis, sur kiu paĝo estas la inventaro kaj sur kiu flanko troviĝas la inventara vendo. Sed ili foliumis en la libroj kaj ŝajnis, ke ili komprenas ĉion. Fine ili devis koncedi, ke ekzistas inventare gigantaj amasoj de nevendita karbo.

La konfidinduloj dum la konferenco, en kiu ili mem malolfte parolis, estis ĉiam alparolata nur per 'ĝentlemano'. Sen tio, ke ili volis koncedi tion, sen tio, ke ili estus koncedinta tion, se oni demandus ilin, ili tamen sufiĉe konfuziĝis pro la ĝentila traktado. Ili havis la sekretan senton, ke ili ĉi tie samtempe estas kontrolkonsiliaj membroj, kiuj kundecidas pri tio, kio okazu nun pri la minejoj.

Kiam ili fine ree estis ekstere, ili ekkonis, ke ili estis neniel pli prudentaj ol antaŭe. Fariĝis diable komplike por ili doni raporton posttagmeze en la kunsido, pri tio, kion ili atingis, kaj kio ĉio estis priparolata. Tiuj inter la spektantoj, kiuj atingus tute la samon, se oni estus elektinta ilin por la konferenco, kriis koleriĝinte al la konfidinduloj supren: „Pantalonmerduloj, fiuloj, vi denove lasis ĝisdetale sapumi kaj meti en sukeron vin, jen ni elektis ja la verajn ŝtelirantajn katpiedulojn. Lasu vin baki en paston kaj ŝovi en la bakfornon!“ Unu el ili kriĉe kriis supren: „Kiom la aĉa hundo do pagis al vi? Nun vi ja povas pagi vian fonografon, he, Billy, he?“ Je tio sekvis ridado en la halo.

Merkrede de la sekva semajno la kompanio sciigis, ke ĉiuj sindikatoj fine de la semajno estos maldungitaj, ke nur tiuj plu rajtas labori, kiuj fordonas siajn sindikatidentigilojn en la oficejo de la kompanio kaj, ke ĉiuj restintaj, kiuj ne fordonas siajn identigilojn per subskribo klarigu, ke ili ne estas membroj de iu sindikato. Se malkaŝiĝus, ke iu donis sian subskribon kaj tamen plu estas membro de sindikato, li tuj estos maldungita, sentio, ke lia ĝis tiam ne pagita salajro estus pagata al li, kaj li devus forlasi kun sia familio la domojn kaj la terenon de la kompanio interne de kvardek ok horoj. Se ne, oni transdonus lin pro nerajtigita enirado en la terenon de la kompanio al la polico. Sabate matene la striko eksplodis en ĉiuj minejoj de la Antracit-kompanio. Eksplodis tiu striko, kiun la kompanio bezonis por povi enkasigi la surpluson de la manovro. Kiel ĉi tie estas, tiel estas ĉiam: laboristoj eble malofte strikas, se estas favore al la laboristo, sed ili strikas plej ofte, se estas favore al la kapitalismo. Ne pro stulteco, sed laŭ eternaj kvazaŭ feraj leĝoj. Kion ajn laboristoj faras, interne de la kapitalisma ekonomia sistemo ili faras tion, kio estas utila al la kapitalismo, ĉar ili estas parto de la kapitalismo, ĉar ili

estas ligitaj al ĝi, dum la regado de tiu sistemo, je morto kaj detruo, je vivo kaj pereco. La aktivulo agas kaj la malaktivulo suferas. Interne de tiu sistemo la kapitalisto estas la aktivulo. Li scias tion, kion li volas atingi. Li volas enspezi monon. La laboristo volas nur parton de ĝi. Li volas fari ĝin same tiel kiel la kapitalisto, li volas havi pli ol sia kunproleto. Se la bakisto strikas kaj gajnas, jen por la ŝufaristo fariĝas la pano pli multekosta, kaj tiam la bakisto devas pli pagi por la botoplandoj. Interne de tiu sistemo ĉio servas al la kapitalismo. Ne pro tio, ke unu el ili estas brutalaj ekspluatistoj kaj la aliaj malsatantoj kaj la ceteraj laboristoperfiduloj, sed ĉar ili ĉiuj troviĝas en la sama maŝino.

Mr. Chaney Collins sciis tiun leĝon kaj li eluzis ĝin je sia favoro. Tio estis lia tuta saĝo.

Nun la Antracit-kompanio komencis enkasigi la monon. Ĝi estis la unua kompanio, kiu faris monon el modernaj ideoj pri proletaraj rajtoj kaj proletaraj liberaj movadoj milionojn de dolaroj kiel gajnon. De tiam oni faris tion tiom ofte, ke fariĝis intertempe kutimo kaj honesta negocmaniero. La ŝtato uzis tiun trukon, kiam ĝi perfortis la pasaĝerŝipon Lousitania por montri, ke ĝia honoro estas distretita, kaj; ke ĝi nun ne povas plu alie agi ol permesi al *Wall Street* la nervotrankviligan universalan kuracilon. Sed je tiu tempo, kiam *Mr. Collins* estis tridekjara, tiu negoco ankoraŭ ne estis trivita kaj ĝi ne havis konkurantojn. Tial ankaŭ de tiam neniu sola kompanio plu enkasigis tiom da milionoj de dolaroj por tiu mistifiko, kiom la Antracitkompanio.

La striko ĉe la kompanio eksplodis. Partoprenis proksimume dudek mil minlaboristoj. La grandaj gazetoj sendis specialajn reporterojn al la kompanio, por ekscii tie ĉion pri la striko kaj ties historio, pri ĉio, kio povus interesi la gazetlegantojn kaj kio per sorĉoj estus grandigebla al sensacio kaj per tio al graslitera

gazetsurskribo.

La direktorio de Antracitkompanio decidis je la propra deziro de *Mr. Collins*, ke tiu nome de la direktorio nutru la malsaton de la reporteraj pri ekscitigaj rakontoj. Sukcese trakti la gazetojn tiel, ke la gazetoj ne sentas, ke ili estas bezonataj por la planoj de Antracitkompanio, kunapartenis al tiuj trupmanovroj, kiujn *Mr. Collins* elpensis zorgeme longan tempon antaŭe.

Oni rakontis al la reporteraj, ke la stokejoj de la kompanio jam ĉiuj estas tro plenigitaj, ke ĉiuj stokejoj do estas jam tro plenŝtopitaj. La vendo de karbo pli kaj pli malkreskis. La kompanio laŭdire ne sciis kien meti la troon da superflua karbo, ĉar la karbobezono tute ne atingis la kvanton de la produktado. Ĉion tion oni pruvis helpe de stokejaj inventarlibroj kaj vendokontraktoj prezentitaj al la reporteraj.

Mr. Collins diris, ke estas prokisma neimagebla prezfalo por karboj. Pro tiu ĉi kaŭzo oni decidis kiel ununuran elirvojon malaltigi la salajrojn por povi elteni la proksiman prezfalegon. Sed la laboristoj ne akceptis la

neceson de tiuj ĉi salajraj malaltigoj, kion oni ja povas kompreni, ĉar laboristoj ne estas sufiĉe bone edukitaj pri popolekonomio. Li klarigis, ke la kompanio ne povas rezigni pri la salajromalaltigo, ĉar daŭrigo de la antaŭaj salajroj sekvigus la ruiniĝon de la kompanio, ja la ruiniĝon de la tuta usona karboindustrio. Laŭ tio, kio koncernas la kompanion, oni ne cedus, ĉar oni ne povus cedi sen ekonomia suicido. Je la demando, kial la kompanio malpermesis al siaj laboristoj aparteni al sindikato, klarigis *Mr. Collins*, ke la laboristoj volonte volis labori por la malaltigitaj salajroj, sed, ke la sindikato ne permesis tion al ili. Laŭ *Mr. Collins* oni ne povis permesi enmiksiĝon de ekstere en la ekonomian politikon de la kompanio sen rezigno pri ĉiuj rajtoj kaj liberoj, kiuj estas garantiataj al la komerco kaj al la laboro pro la konstitucio. Nome de la kompanio *Collins* rekomendis al ties bonvolemaj laboristoj fondi sindikaton, al kiu apartenas nur laboristoj, kiuj havas okupon en la minejoj de la kompanio. Sole tiun sindikaton la kompanio laŭ li volis rigardi kiel rajtigitan reprezentantaron por la laboristoj de la kompanio. Sed ŝajnas, aldonis *Mr. Collins*, ke la laboristoj ne pretas konsenti al la tute

laŭrajtaj kaj necesaj deziroj de la kompanio. Tial, kiel li diris, estis antaŭdirebla kun certeco, ke la striko daŭros tre longe, minimume ses monatojn, eble eĉ ok aŭ eĉ dek kvar monatojn.

La reporteroj dankis por la sufiĉe detalaj klarigoj pri la kaŭzoj de la striko pri tio, kio koncernas la kompanion.

Reporteroj servas nur la veron; kaj ili rigardas ĝin sankta devo serĉi la veron, eĉ se la vero devas esti serĉata en la kloakoj de popolo kaj en la littukoj de individuoj. Ĉar raportoj la veron, kaj nur la veron al siaj legantoj, tio estas la sole sankta respektenda tasko de usona gazeto. Tial ĝi estas la surtera ilo de Dio kaj la punskurĝo por ĉiuj mensogantoj kaj popolvenenigistoj, agitatoroj, judoj, fremduloj kaj eŭropaj enmigrintoj, kiuj plenŝtopitaj kun anarkiistaj kaj similaj socialismaj ideoj surteriĝis je la bordoj de nia gloriĉa respubliko por makuli la honoron de nia bela lando kaj por detrui ĝin. Tial la reporteroj iris ankaŭ al la sindikato por aŭdi la opinion de la alia partio. Sed tie ili ne trovis, kiel ili sciigis tion pli poste al siaj legantoj, la trankvilon kaj sekurecon rilate al la celoj, kiajn ili trovis ĉe la direktorio de la kompanio. Tie ili trovis maltrankvilon, nervozecon, senenhavajn parolojn, anarkiistajn kriulojn, senklarajn esprimojn kaj konfuzajn opiniojn pri profito, pri la komuna efikado de la tuta nacio, pri la rajto de la laboristoj organizi sin, pri laŭdiraj devoj kontraŭ la propra familio, pri frenezaj opinioj rilate al registaroj ĝenerale kaj pri malico kaj malmoraleco de la

kapitalistoj precipe. Sed kiel klara preciza volo aperis la firma neskuebla intenco ne pli frue cedi ol ĝis tiu momento, kiam la organizo estos rekonata kaj la pli fruaj salajroj reatingitaj, ec, se kun kelkaj etaj ŝanĝoj; ĉar – kiel oni diris en la sindikato – la pli fruaj ŝajne tiom altaj salajroj jam estis sufiĉe malaltaj, por ankoraŭ povi kontentigi la multnombrajn kaj ĉiutage pli multnombrajn kaj pli grandajn postulojn de la ĉiutaga vivo. Kaj ankaŭ tiukaze oni konfirmis al la reporteroj, ke oni estas preta je longtempa, ja je tre longa striko kaj, ke oni atendas tre longe daŭrantan strikon, ĉar jam temas ne nur pri salajroj, sed pri principoj, kiuj nun finfine devas esti deciditaj.

Tiel oni klarigis en grasaj superskriboj sur la unua paĝo de la gazetoj, laŭ la vero, ke karbostriko de neantaŭkalkulebla daŭro komenciĝis, kiu minacas lamigi la tutan usonan industrion, ja la tutan usonan ekonomian vivon.

Se *Mr. Collins* mem estus skribinta la raporton, kaj, se li estus paginta la gazetojn, por ke ili presu lian propran raporton, la raporto ne pli bone povus taŭgi por liaj

planoj.

09

Antracit-kompanio antaŭ la komenco de la striko pri ti o estis raportinta al la ceteraj antracit- kaj karbokompanioj – ĉar ankaŭ tio apartenis al la plano de *Mr. Collins*, ke ilia vendo preskaŭ haltas, ke ili devas tro plenigi siajn stokejojn kaj, ke ili sentas sin devigitaj fari konsiderindajn ŝanĝojn rilate la salajrojn.

Tiuj aliaj kompanioj havis pli ol nur sufiĉe da laboro, ĉar Antracitkompanio memgardeme retiriĝis el la merkato. Tial tiuj kompanioj ne komprenis, kial Antracitkompanio tiom malmulte vendadas. Sed, se unu el la plej grandaj kompanioj ne povas vendi ion, devas plenigi stokejojn kaj malaltigas salajrojn, jen io okazas merkate. Tion tuj ĉiuj kompanioj komprenis.

Ili fariĝis memgardemaj kaj komisiis siajn salajrajn inĝenierojn detale ellabori novajn salajroskalojn. Sed la novaj salajroskaloj kun malaltigitaj salajroj ankoraŭ ne estis uzataj, ĉar oni provizore havis ankoraŭ sufiĉe da

riĉigaj komisioj kaj neniel devis elvoki maltrankvilon inter la propraj laboristoj.

Kiam la striko ĉe Antracit-kompanio estis eksplodinta kaj la raportoj en la gazetoj faris tion, kion oni atendis de ili, respondis la borso en Nov-Jorko kun falo de la karboakcioj, kun malsekuriĝo de la fervoj- kaj ŝipkompaniaj akcioj kaj kun klare ekkonebla malfortiĝo de ŝtalakcioj. Komenciĝis kvieto en *Wall Street*. Kvieto, kiu fariĝis post malmultaj tagoj timiga kaj proksimiĝis al tiu kvieto, kiu kutime antaŭiras timigatajn uraganojn en *Wall Street*.

Sed ankoraŭ ne okazis katastrofo, ankoraŭ ne tiu sovaĝa tien- kaj tien-aĉetado de paperoj kaj tiu sensenca disipo de valoroj plej proksimaj al la ciklonocentro. Ŝajnis kvazaŭ oni sin kvazaŭ perforte devigas al trankvilo. Ĉar neniu sciis, kio tie okazis. Ĉiu unue volis atendi ankoraŭ ĝis li ricevos la ĝustan konsilon de iu aŭ eble songas la ĝustan songon aŭ eble ricevas ĝin de aŭguristo. Sed la tuta negoco je la borso ekmalfortiĝis. Du tagojn poste Ĉikago respondis per ekmalfortiĝo, kiun oni ne travivis dum multaj monatoj.

Rigardate kiel tuto la merkato tamen estis stabila, ĉar la valoroj, kiuj havis malmultajn rilatojn al la karboj, restis aktivaj kaj moviĝis laŭ la kutima maniero kun du punktoj malsupren, kun kvin punktoj supren kaj morgaŭ male. Elektraĵoj eĉ grimpis okulfrape. Sed la daŭranta kresko de la elektrovaloroj ŝajne pruvis, ke oni malfidas pli kaj pli al la karbo. Post tiu grimpado de la elektrovaloroj devis sekvi, tio estis klara al iniciito, tre baldaŭ plia malkresko de la karbo. Kaj tiam kompreneble la ŝtormo komencis balai.

Ankoraŭ en la sama semajno la elektrovaloroj, kiuj estis sendependaj de la karbo, ricevantaj sian forton de la akvo, subite vehemente ekgrimpis kaj sturmis dum unu tago dek ok punktojn supren.

Tio estis la unua hurlado de la venonta uragano.

La ŝipvetur- kaj fervojkompanioj, la ŝtalfabrikoj kaj la grandaj karbokomercistoj ne subskribis plu novajn kontraktojn kaj komencis aĉeti nur por la semajna bezono. Prefalo de karbo estis komenciĝonta kaj antaŭ ol oni ne estis scianta la novan prezon kaj antaŭ ol la nova pli malgranda valoro ne fiksiĝis, oni ne povis fari novajn kontraktojn.

Nun la ceteraj karbokompanioj eksentis la inertigantan merkaton. Ili ne estis preparitaj por grandaj stokejoj. Ĉar grandaj stokoj necesigas ampleksajn bankokreditojn. Tiuj bankokreditoj ne havigeblas transnokte; ili postulas interkonsiliĝojn kaj kontraktojn kaj nuligojn de aliaj kreditoj. La bankoj pro la pli-malpli ŝanceliĝanta merkato

fariĝis tre atentemaj rilate al kreditoj por stokoj, ĉar la karbovaloro estis necerta. Se ili efektive kreditis karbon, jen ili kreditis apenaŭ pli ol la netan elminigan salajron por la karbo. Tiel okazis, ke la ceteraj kompanioj ne povis amasigi konsiderindajn karbostokojn.

Ili devis elminigi la karbon pli malkare. Kaj laŭ la kutima sistemo la karbo nur tiukaze estis elminigebla pli malkare, se oni konsiderinde malaltigis la salajrojn de la laboristoj. Por sekurigi sin oni tuj transprenis la salajroskalojn de Antracitkompanio.

La laboristoj ne havis elekton. Ili faris tion, kion *Mr. Collins* deziris, kaj ili do ekstrikis ankaŭ ĉe la ceteraj grandaj kompanioj, ĉar ili ne povis akcepti la salajromalpliigojn. Ĉar unue ili havis honoron kaj due familiojn.

La pli malgrandaj kompanioj, kiuj ja ne devis tiom kunsuferi pro la ŝanceliĝoj de la borso, ĉar ili plej ofte havas malgrandan, sed sekuran klientaron, nun tute ne sciis kion fari. Parto de ili malaltigis salajrojn kaj malpermesis la membrecon en sindikato, dume la alia

parto tute ne volis transpreni riskon kaj simple maldungis la laboristojn kaj fermis la minejojn por atendi, kion nun faros la grandaj kompanioj.

Ĉio ĉi okazis sen planita kaj organizita kunlaboro kaj mikslaboro de la diversaj kompanioj. Laborado kun la aliaj kompanioj estus ĝeninta la planon de *Mr. Collins*. Sed *Mr. Collins* tiel lerte laboris, ke eĉ ne unu kompanio sentis, ke ili intence estis ekskluditaj el la granda rabentreveno. *Mr. Collins* ja ĉion antaŭe sciigis al la aliaj, ke Antracitkompanio havas tro plenigitajn stokejojn kaj, ke ĝi devas malaltigi salajrojn. Tiel li konservis la ŝajnon, ke li laboras en komuneco kun ĉiuj kompanioj. Neniu povis riproĉi lin. Sed kun tiu sciigo li samtempe pli perfektigis siajn planojn kaj ĵetis vualon sur siajn intencojn, kiun li bezonis por povi labori sen ĝeno.

Ducent kvardek mil minlaboristoj strikis. Ducent kvardek mil viroj kun siaj familioj devis vivi de la magra strikosubteno, kiun pagis la sindikatoj al ili. Subteno, kiu pro neceso fariĝis pli malgranda post ĉiu semajno, kiun daŭris la striko. Ĉar ducent kvardek mil familioj havis malpli da mono, ili malpli povis aĉeti. Kaj tio kunŝiris milojn de negocistoj kaj malgrandajn metiistojn, kiuj samtempe malpli enspezis kaj tial malpli povis elspezi, pro kio pliaj ekonomiaj rondoj fariĝis kunsuferantoj. Ĉiun semajnon venis pliaj miloj de homoj al la bankoj por preni monon de sia ŝparita bankmono, ĉar ili devis vivi kaj plenumi devojn. Tiel la mono fariĝis rara en la bankoj. Ricevi kreditojn ĉiusemajne fariĝis pli kaj pli komplike. La intereza normo estis altigita. Ĉio, kio estis sekvestrenda, ricevis malpli kaj malpli da valoro. La homoj devis vendi siajn multekoste aĉetitajn meblojn por dudekono de la origina valoro por ricevi por tio monon por necesaj vivrimedoj. Pro tio suferis meblokomercistoj kaj meblofabrikistoj, tiel, kiel ĉiuj homoj, kiuj vendis aĵojn aŭ produktis ilin. Jen aĵoj, venditaj tiam por prezoj

ege sub la origina valoro.

La laboristoj batalis kun policistoj tiel, ke iliaj kapoj eksangis. Ili kverelis per pugnoj en la kunsidoj, kio estas strikrompanto kaj kio estas nepre necesa laboro, por ke la minejoj ne estu inundataj de akvo. Ili kverelis kaj interdraŝis kun siaj edzinoj, kiuj volis havi monon. Ili akuzis la sekretariojn de la sindikato esti subaĉetitaj agentoj de la kapitalistoj. Ili disŝiris sian membroidentigilon de la sindikato kaj kraĉis sur ĝin. Ili hurlitis ĉe la minskipestro pri la graco denove dungigi ilin kaj ne forgesi ilin, kiam la striko estas finita. Ili ĵuris, ke ili neniam denove strikos, eĉ se oni malaltigus la salajrojn je sesdek procentoj. Kaj ili iris al la haleluja-kantistoj de la metodistoj, de la baptistoj kaj de la Episkopa Eklezio kaj ĵetis sin antaŭ ili sur la polvon de la preĝeja sojlo kaj plorsingultis, ke ilia animo nun estas purigita kaj savita kaj, ke ili fine post tiu severa tento trovis hejmen al nia savanto Jesuo Kristo. Kaj jen la eternaj optimistoj, la eternaj pesismistoj, la eternaj hurluloj, la eternaj insultantoj kaj fine tiuj, kiuj preskaŭ krevis pro forto, kiuj kunmordis la dentojn kaj mallaŭte

diris kvazaŭ al si mem: „Prefere dekmilfoje mortaĉi, ol cedi al tiuj rabistoj eĉ nur cendon!“ Jen ĉiuj, vere ĉiuj estis prezentataj, kiujn oni trovas ankaŭ en revolucio. En ĉiu revolucio. Homoj, kiuj volas manĝi kaj ne havas ion por manĝi. Homoj, kiuj vendas sian animon por regula manĝado. Homoj, kiuj prefere mordas sin en la pugnon ol diri: „Je via servo, sinjoro!“ Homoj kaj homoj kaj homoj. Inter ili la superjustuloj, la fariseoj de la proletara movado.

La uragano estis veninta.

La borso de Nov-Jorko tiom bruis, ke oni povis ĝojegi pri tio, se oni ne posedis valorpaperojn kaj estis nur neŭtrala observanto.

Jen kvazaŭ la plumoj flugadis tra la aero.

La plumoj de la fera kaj admirata ekonomia sistemo.

Hajlis kaj tondris. Ektremis la muroj de la konstruaĵo de tiu fereca sistemo.

La telefonbudoj de la *brokers*, de la borsaj agentoj kraketis.

Tridek punktojn supren. Rapidaj vendoj. Sed antaŭ ol la vendo estas konfirmita dudek punktojn malsupren, kaj neniuj aĉetas la akciojn por tridek malsupren. Kvardek punktojn malsupren. Kvar supren. Espero. Punkto supren. *Cable* trans la terglobon: Merkato ekfirmiĝas. Dek kvar punktojn malsupren. La merkato denove

flagrema.

Tri pafoj en diversaj budetoj de *Wall Street*. Ĉiu budo kostas po kvar mil dolarojn lupago monate. Ĉelo de monaĥo kontraŭ tio estas kavaliera halo.

Dek du punktoj supren. Tri malsupren. Sep malsupren. Kvar malsupren, du supren. Telefonknabinoj ekhavas kramfojn. Telegrafistoj fariĝas frenezaj. En la oficejoj de la bankoj kaj en la ĉambretoj de la agentoj rapidegas la sveltaj blankaj strioj kun la mortverdiktoj kaj la espervivigoj el buŝoj de la privatelegrafoj kun nekredbla rapideco.

Kvar viroj staradas kaj legas. Kaj legas. Kaj legas. Legas la elpafiĝantajn ciferojn, kiuj seninterrrompe kaj fantome ŝanĝiĝas. Ili legas kaj kaptas per nervolarĝa fadeno de sia subkonscio la sencon kaj la signifon kaj la tutan ekonomian kuntekston de tiuj malmultaj literoj, kiuj klakadetas antaŭ la ciferoj kaj kiuj donas la nomojn de la kompanioj, kies valoroj flugas tien kaj tien, al tiuj kompreneble, kiuj apartenas al la iniciitoj. Por la neiniciitoj tiuj literoj same tiom komplike solveblas kiel

malnovegiptaj hieroglifoj. Kaj la viroj, kiu staras ĉirkaŭ la klakadanta aparato, legas kaj legas. Ili legas, ŝirante per la dekstra mano la blankan strion, por ankoraŭ pli rapide elŝiri ĝin el la senfine sputanta buŝo, premegante per la maldekstra mano la telefonaŭskultilon antaŭ la tremantan buŝon por doni ordonojn, tiel rapide doni ordonojn, kiom la displitema cerbo povas kunrimi ciferojn, situaciojn kaj akciojn. Cerboj, buŝegoj, oreloj, buŝoj, lipoj, literoj kaj ŝirantaj manoj estas ĉasataj de potencoj, kiuj ĉi tie nek estas vidataj, nek sentataj, sed nur perceptataj.

La senfine longa blanka strio elpafiĝas, alsaltas kaj flagradas ĉiudirekte.

La malvasta blanka strio kvazaŭ fontas ŝaŭme kaj alsiblas, decidas dum sekundo la sortojn de miloj de diligentaj kaj bonvolemaj laboristoj, kies persono kaj homa individueco ĉi tie estas estingitaj, kaj kiuj havas nur plu la valoron de kelkaj punktoj supren aŭ malsupren en akcioj. Kaj la strio decidas la sortojn de miloj de ruĝvangaj civitanoj, la studplanojn de iliaj filoj, la edziniĝplanojn de la filinoj, la komforton en maljuna aĝo.

Kaj la longa, malvasta blanka strio kuras kaj kuras kaj kuras trans la bobenojn, pelate, ĉasate, ŝirate.

Parolinte sian lingvon, ĝi kvazaŭ baŭmiĝas bule sub la eta tablo, sur kiu la aparato tiktakas kaj tiktakas kaj tiktakas. La tiktaktanta horloĝo de la mondotribunalo por miloj kaj miloj de homoj. La strio amasiĝas kiel bulo, kiu fariĝas pli kaj pli granda ĉe paperkorbo. La ekscititaj viroj staras piede en la bulo, kiu pli kaj pli volviĝas ĉirkaŭ ilin kiel longa maldika serpento.

Post kiam gigantoj kaj pigmeoj provis tiel rapide decidi kiel alsturmas la ciferoj, la ĉifita strio kvazaŭ baŭmiĝis morta kaj forgesita trans la paperkorbon al distordita pelmelo. Neniu havas eĉ tiom da tempo por foje disŝiri la strion. Senripoze ĝi ĉifiĝas kaj ŝveladas kaj baŭmiĝas plu.

Kaj fine la papermonto aspektas kiel skeleto kun miloj de interplektiĝintaj kaj torditaj longmembraj ostetoj.

La kadavro de financiaj pensoj.

Tertremo en *Wall Street*. Tertemo de la ekonomia sistemo.

Ĉiutage suicidoj de viroj, kiuj laŭŝajne estis ankoraŭ hieraŭ grandaj, potencaj, neatakeblaj, nerenverseblaj. Kolonoj de socio, kiu tiel sane kaj fortokreve rigardis en la mondon, kvazaŭ la universo devus kapkliniĝi antaŭ ĝi.

Neniu plu kapablas regi la katastrofon. Ĝi fariĝas pli kaj pli granda.

Tio, kio ŝajne estis tiom potenca kaj fereca, tiu tiel bone organizita, ŝajne tiel prudente pripensita sistemo, tiu laŭdire tiom firmiĝinta sistemo krakadis en ĉiuj siaj fundamentoj, ĉar branĉo fariĝis malsekura: la karbo. La nutraĵo de la industrio.

Neniu povas reteni la radon. Ĝi kuras, ĝi fulmrapide kuras, pli kaj pli rapide kaj ŝiras pli kaj pli profunde en la korpon de la ekonomio.

Bankŝtormoj komenciĝas. La ŝparantoj estas kaptitaj de paniko. Ili timas, ne, eĉ pli terure, ili scias kun certeco, ke ilia mono, kiun ili ŝparis kaj por kio ili suferis, estas perdita. En senfine longaj vicoj ili staras jam antaŭ noktomezo antaŭ la bankoj, por esti la unuaj, kiam la bankoj malfermiĝas. Ju pli frue oni ĉeestas des pli verŝajnas, ke oni ankoraŭ povas savi iom. La ordigita vivo de la bankoj estas disŝirata. Ĉiuj kunlaborantoj devas esti je dispono por elpigi monon. Neniu enpagas ion. Ĉiuj kreditoj estas nuligitaj. Bankoj en aliaj landoj estas petegantaj telegrafe helpi per elpagebla mono kaj per ĉekoj. Ĉiuj rezervoj de la nacia bankunuiĝo estas alvokataj. Sed la vicoj antaŭ la bankoj plilongiĝas.

Kaj tiam la bankoj komenciĝas kraŝi, ĉar ili ne povas elpigi ion. La mono estas pruntedonita; ĉar, se la banko ne povas pruntedoni monon, ĝi ne povas pagi interezojn al siaj ŝparantoj. Unue kraŝas la malgrandaj bankoj. La grandaj helpas sin ankoraŭ per tio, ke ili limigas la kasotempojn je du, fine je unu horo. Tiam ankaŭ ekkraŝas pli grandaj bankoj.

Kaj post tiu konfuziĝo ne kaŝiĝas subita malapero de kontinento, ne kaŝiĝas giganta naturkatastrofo, kiu pereigis valorojn nerevokeblajn. Post ĉi tiu kolapso de la socia ordo kaj de la ekonomia stabileco, ĉiam minacata de ribeluloj, kaŝiĝas nenio alia krom la ĝenata imago de tiuj, kiuj posedas iom, la malcertigita espero de tiuj, kiuj posedas multon, kaj la imago de tiuj, kiuj posedas malmulton. Ĉio, kio okazas en *Wall Street*, baziĝas nur sur tio, ke la pensoj subite, tro subite turniĝis al alia nekutima direkto, amashipnozo, amassugestio. La sugestio, la imago: 'Mi povas perdi!' ŝiras en pecetojn tiun belan, de Dio deziratan, de Dio benitan, de Dio protektatan ekonomian sistemon. Kaj tamen ĉiuj uzvaloroj restis la samaj. La uzvaloroj ne ŝanĝiĝis. Estas same tiom da karbo surtere kiel antaŭe. La tuta mono ankoraŭ ekzistas kaj eĉ ne unu cendo falis malsupren de la terglobo en la kosmon, el kiu ĝi ne plu saveblus per kaptado. Ĉiuj domoj ankoraŭ staras. Ĉiuj arbaroj, ĉiuj akvofaloj. Ĉiuj oceanoj. La fervojoj kaj la ŝipoj ĉiuj estas ankoraŭ sen damaĝo. Kaj cent miloj de sanaj kaj fortaj homoj pretas labori kaj produkti kaj altigi la ekzistantan riĉon de la Tero. Neniu inĝeniero perdis la kapablon,

konstrui novajn maŝinojn. Neniu karboŝakto estas ŝutfermita de naturkatastrofo. Suno troviĝas lumante kaj varme en la ĉielo kiel ĉiam. Pluvas kiel ĉiam. La greno staras sur la kampoj kaj maturiĝas kiel ĉiam. La kotonkampoj floregas. Nenio ŝanĝiĝis rilate la uzvaloron de la ekzistanta riĉo. La homaro rigardata kiel unueco estas same tiom riĉa kiel hieraŭ. Kaj nur tial, kaj sole nur pro tio, ke la posedo de kelkaj unuopuloj estas minacata de ŝanĝo kaj de transŝovado, kvazaŭ eksplodas katastrofo por la tuta homaro. Katastrofo sama al tiuj katastrofoj de pasintaj tempoj, kiam ekestis malsatmizeroj en unu monda parto kaj oni ne povis ekvilibrigi ilin helpe de aliaj mondaj partoj, kiuj kavazaŭ sufokiĝas en superfluo, ĉar mankis transportiloj kaj telegrafoj.

Jen ekonomia sistemo, ekonomia ordo, kreita de homoj, kiuj pri si mem asertas posedi intelekton. Homoj tamen, kiuj spite al sia tiel alte evoluita tekniko, kiun ili kreis, ankoraŭ nun ne lasis post si la primitivecon de tute necivilizitaj homoj, se temas pri bone elpensita kaj bone ordigita ekonomia sistemo.

La ekonomia krizo – timata kiel puntribunalo de la ĉielo kaj monatojn antaŭe aŭ propre ĉiam profete kun levita montrofigro anoncita de komunistoj kaj socialistoj, kiuj asertas, ke ili ion tian scias ĉiam antaŭe – komenciĝis nun forte.

Ekonomiaj krizoj por naŭdek naŭ procentoj de la homoj havas ion sinistran, ion misteran, ĉar naŭdek naŭ procentoj el la homoj, ĉu religiaj aŭ nereligiaj, rigardas ekonomian krizon kiel punvipon de supernatura potenco, kiu ŝajne estas nedisigeble ligita kun la kapitalisma sistemo, kaj kiu evidente ne lasas forturnigi aŭ eviti sin de homoj. Naŭdek naŭ procentoj el la homoj suferas pro krizo. Kelkaj pli kaj kelkaj malpli. Tial ĝi estas rigardata kiel en pasintaj jarcentoj pesto, malsatmizeroj kaj mongolaj atakoj.

Kaj tamen tiuj ekonomiaj krizoj neniel ekestas pro supernaturaj kaj mistikaj potencoj, sed ĉiam nur pro tio, ke unuopulo aŭ grupo de individuoj perforte enmiksiĝas en la regulitan ekonomian vivon, por eluzi ĝin por granda

privata avantaĝo. Se la ekonomia vivo trankvile iras sian vojon plu, sen tio, ke panikoj artifice estas kreataj, tamen ŝanceliĝoj interne de la ekonomio povas okazi, sed neniam povas komenci grava krizo. Ĉar tute tiel kaosa kiel ofte ŝajnas, la kapitalisma ekonomia sistemo estas ja neniukaze. La kapitalistoj faras ĉeokaze stultaĵojn, sed ili ne estas arlekenoj. Kaj nur arlekenoj sensece produktadus ĝis la diablo forportas ilin, sen daŭre rigardi per siaj okuloj al la merkato kaj je ties kapacito. Eĉ eltrovoj kaj eĉ novaj konstrukcioj de pli bonaj maŝinoj ja povas ĵeti tiun aŭ tiun el la selo, sed eĉ ili ne povas ekestigi krizojn. Tion oni almenaŭ jam lernis sur nia kontinento: Ju pli altaj estas la salajroj kaj ju pli mallonga estas la labortempo kaj ju pli granda la edukiteco de la laboristoj, des pli sekura estas la trankvila iro de la ekonomia vivo kaj des pli malfacile estas eĉ por potenculo provoki gravan krizon.

Se cent milionoj kaj cent milionoj da tunoj de la plej bona karbo estas lerte fortiritaj de sia destino sen frapo de atento, do sen tio, ke la homoj povis prepari sin kontraŭ tio, la rezulto devas esti precize la sama kvazaŭ tertremo

aŭ giganta akva inundo detruus la uzvalorojn de granda parto de la Tero. Sed naturkatastrofo ne povas malordigi tiom la ekonomian vivon kiom granda spekulacio. Ĉe naturkatastrofo oni scias, kio okazis, oni scias, kie mankas io, kaj kie kaj kiel oni devas ekagi por reordigi la damaĝon. Sed ĉe spekulacio scias neniu, kio propre okazis. Neniu scias, ĉu karbo estas la kaŭzo aŭ mono aŭ manko de fero aŭ erco aŭ spekulacio je greno aŭ je kotono aŭ je nafto. Tial neniu povas proksimiĝi ĝis la fonto de la katastrofo, ĉar la fonto estas sciata nur de unuopulo, kiu ne perfidas sian sciencon, por trovi sian avantaĝon en la kaoso.

ĈAPITRO 05

01

Fariĝis nun sufiĉe vigla en la lando.

Ekonomoj, grandindustriistoj, bankieroj verkis saĝajn artikolojn en la gazetoj. Ĉiuj venis al la rezulto, ke nur la karbomanko, kiu nun fariĝis tre perceptebla, estas la kaŭzo de tiu tiel neatendite rapide veninta krizo, kaj ke tiukaze, se oni povus forigi la karbomankon, la krizo baldaŭ estus finita. La karbomanko nun efektive estis reala. Ĉar ĉiuj minlaboristoj strikis, tial do post malmultaj semajnoj devis esti foruzitaj ĉiuj karboj.

Per graslitere presitaj linioj la gazetoj alvokis la registaron, ke tiu je ĉiu prezo agu kiel paciga peranto ĉe la striko. Sed tiun proponon rezistis pli ol cent kompanioj kaj miloj de grandindustriistoj, ĉar interveno de la registaro ĉe la striko tuŝus la liberon de la komerco kaj de la laboro kaj do estus kontraŭ la sankta konstitucio.

La registaro montris ankaŭ ne per mieno, ke ĝi volas interveni. Ĝi faris la solan, kion registaro nun ŝajne estas

kapabla: Ĝi sendis milicon kaj mitralojn en la strikdistriktojn. Oni ĵetis eĉ insultojn kaj ŝtonojn sur la soldatojn, ĉar ties ĉeesto ekscitis la strikantojn. Tiel oni suke pafadis en la strikprocesiojn. Hodiaŭ ĉi tie morgaŭ tie. Kaj ĉiuj homoj, kiuj timis la fantomon de la karbomanko – kaj tio estis cent procentoj el la loĝantaro, post kiam oni minusis la strikantojn – diris: „Tio estas bona, ke la registaro tie kreas ordon kaj blovas la cerbon el la kranio de la anarkiistoj; nun la strikantoj certe prudentiĝos.“

Eĉ laboristoj, ja eĉ mem organizitaj laboristoj ne tre afablis al la strikantaj ministoj. Se la karbokverelo longe daŭrus, iom post iom ĉiuj fabrikoj devus fermi la pordojn, kaj ne plu estus laboro. Oni tamen sendis monon al la ministoj, sed oni faris ĝin kun acida mieno kaj oni rongĝis ĉiun cendon antaŭ ol oni vere metis ĝin je dispono.

Al la lante komenciĝinta karbomanko sekvis malsato je karbo. Kaj tiu karbomalsato rapide komencis ŝanĝiĝi en rabion. Okazis aĉetoj pro timo. Oni aĉetis karbojn por jaroj por havi plenan kelon kaj por esti provizita por ĉiuj kazoj. Kaj se la kelo fine estis tiom plenigita, ke la

posedanto povis diri: 'Pro mi la striko povas daŭri kvin jarojn, ĉar mi estas ekipita por ĝi!', tiukaze la viro efektive estis feliĉa. Ĉu lia najbaro ankoraŭ povis kapti kilogramon da karbo, tio estis indiferenta al li.

Jen la simplaj homoj, kiuj bezonis la karbojn nur por la domo.

La grandaj, la fervoj- kaj ŝipveturkompanioj ankoraŭ atendis, ĉar ili ankoraŭ ne klare komprenis, kio okazas, kaj provizore ankoraŭ povis preni la karbojn el siaj stokejoj. Sed la kompanietoj pelis la prezojn supren. Post malmultaj semajnoj kostis unu tuno da karbo en la grosiera komerco tiom, kiom ĝi kostis ĝis tiam en vendo por dek kilogramoj, do en la plej eta komerco.

La grandaj komencis subskribi kontraktojn kun anglaj, germanaj kaj francaj kompanioj, por certigi karbojn al si.

Nun, *Mr. Collins*, kiu ĝis tiam nur observis kiel evoluigis sia plano, ree devis enmiksiĝi, por ke la merkato ne trankviliĝu antaŭtempe.

La reporteraj estis tre malfermaj por tio ekscii novaĵojn de *Mr. Collins*; ĉar ili jam rigardis lin kiel unu el la plej grandaj, kiu antaŭdivenis ĉion. Se oni estus sufiĉe serioze traktinta liajn profetaĵojn, kiam ĉe li la striko ekis, certe la krizo ne estus okazinta.

Kiam la reporteraj nun ree sidis ĉe li por aŭskulti, ĉu li scias ion novan kaj kiel li imagas la plian kuradon de la striko, jen li diris tute trankvila: „La sindikatoj kulpas la tutan mizeron, je kiu suferas nun la nacio, ni facile estus povintaj interkonsentiĝi kun niaj homoj. Ili ĉiuj estas diligentaj, sobraj, honorindaj laboristoj. Escepte de kelkaj malmultaj. Sed ĉiam la agitistoj kaj instigantoj de la sindikato devas trudi sin. Sole ili malhelpas ĉiun interkompreniĝon. La intenco de la sindikatoj estas ja sufiĉe klara: mi ne devas paroli multe pri tio. Vi, kiel spertaj gazetistoj, scias tion multe pli bone ol mi, ĉar mi

estas ja nur negocisto. Estas la intenco de la sindikato konfuzigi la ekonomian vivon de la nacio. Kaj se ĝi estas konfuzita tiom, ke ĉiuj homoj estas sen laboro kaj pano, tiam tiuj uloj volas transpreni la politikan potencon kaj realigi sian socialistan futurŝtaton. Tio estus la fino de nia libera kaj vere demokratia respubliko, por kiu niaj prapatroj tiom glorie batalis kaj suferis kaj mortis honorplene. Imagu al vi, se nia popolo estus enmanigata al tiuj fremdaj ribeligantoj, kiuj pro siaj anarkiaj ideoj estis forpelitaj el siaj malliberaj landoj kaj nun trovis ĉe ni gastafablan akcepton, ĉar ni persekutas kaj forpuŝas neniun pro ties opinioj kaj vivkonceptoj. Danke al tio, ke ni koncedis al ili protekton kaj gastamikecon, ili kondukas nian nacion en la pereon.

Se ni malpermesas en niaj minejoj la sindikatmembrecon, jen ni scias, kion ni faras. Ni ne volas vidi la *United States od America* detruitaj kaj frakasitaj de frenezaj konfuzuloj, sed ni volas konservi kaj elkonstrui ilin al granda bela lando, en kiu estu feliĉa kaj povu feliĉi ĉiu, kiu bonvolemas. Mi kredas firme, fidele kaj optimisme kiel ankaŭ vi, sinjoroj de la gazetoj, je nia

bona kaj elprovita, aŭtentike usona evangelio pri la du booj, pri *bigger and better*, pri 'pli granda kaj pli bona', rilate al nia granda nacio.

La neniigo de la sindikato estas samsignifa kun la konservado de la nacio. Tial ni ne povas cedi, ĉar ni havas pli noblajn interesojn ol la nuran nudan gajnon de mono. La konservado de la ŝtato gravas por ni pli. Tuj kiam ni estos neniigintaj la sindikaton de la ministoj, la sindikato de la transportistoj estos en la vico, post la ministra sindikato ĝi estas la plej danĝera, ĉar ĝi havas la radon de la popolekonomio en la mano.“

Ĉio cetera, kion *Mr* Collins rakontis al la reporteroj, estas negrava. Oni povas legi ĝin en ĉiu traktaĵeto, kiu estas verkita kontraŭ la proletaro. Ankaŭ *Mr*. Collins ne trovis la mankantan tiel grava. Li parolis entute nur plu pri ĉio cetera, por sufiĉe bone kaŝi la kernpunkton. Li posedis diplomatajn kapablojn.

La reporteroj publikis la preĝon de *Mr. Collins* laŭvorte sur la unua paĝo. Tiel la opinio de *Mr. Collins* venis ĝuste al tiuj, kiujn li celis, kaj kiuj nun estis atingitaj sen tio, ke fariĝis necese subaĉeti sindikatsekretariojn per kelkaj miloj de dolaroj. Tiuj, kiuj estis la specialaj adresatoj de la saĝo de *Mr. Collins*, estis la transportlaboristoj.

Kiam ili aŭskultis, ke ilia organizo estu tiu, kiu sekvos, tuj kiam la ministsindikato estas kaĉigita, ili ekkoleriĝis. Ili faris tiun plezuron al *Mr. Collins*. Ili faris ĉion ĝuste tiel, kiel *Mr. Collins* deziris tion. Ili faris tion eĉ multe pli bone ol li tion atendis. Uzu bone elprovitajn receptojn, jen la kuko devas sukcesi.

La transportlaboristoj kunvokis grandegan kunvenon. Ili diris, ke temas pri vivo kaj morto. Oni interkonsiliĝis kaj tondradis. Kaj elvenis la rezolucio, unuanime decidita: „La minlaboristoj devas esti subtenataj. La minlaboristoj ne devi perdi ion. Tial neniu karboŝipo estos elŝarĝita ĉe niaj bordoj, kiu venas el Britlando aŭ el Germanio aŭ el fremda lando. Se necesas, okazu simpatistriko en la tuta

transportista metio, inklude de la fervojo.“

La magnatoj tion ne riskis.

Transportlaborista striko, kiu en Usono ĉiam estas ligita kun grava kaj tre multekosta sabotado de la transportiloj, ĝuste nun estas bezonata plej malmulte. Tio konfuzigus la situacion eĉ pli, kaj oni perdus tiukaze ĉion el la manoj kaj ne plu povus superrigardi kien kondukos tio fine ankoraŭ.

La kontraktoj kun la anglaj kaj germanaj karbofabrikoj ne estis subskribataj kaj ne alvenis karboŝipoj.

Ĝuste tio estis, kion celis *Mr. Collins*.

Rimarko

United States of America = Usono

De nun ĉio deruliĝis kvazaŭ kiel oleite.

Mr. Collins laboris laŭ la recepto en Biblio, laŭ tiu recepto, kiu faris el Jozefo, la filon de Jakobo, iam forgesita karcerfrato, la plej riĉan viron, fine eĉ la vicreĝon en Egiptio. Suferigante multajn en la tiama tempo, estis ree fremdulo kaj denove judo. Jozefo, kiel oni certe bone scias, kolektis ĉiun grenon por malkaraj prezoj en la tielnomataj grasaj jaroj, kiam la prezo tre malaltis, kaj li vendis la grenon tiam en la malsatojaroj por uzuraj prezoj. Biblio, kiom tiom ofte, nur ne rakontis tion ĝuste. Ĝi rakontis ĝin iom vualite, por ke ankaŭ la kara Dio ricevu iom de la famo. Oni ja ne povas lasi al judo ĉiun famon sole. Kaj estas de tiu egipta periodo, ke la sangokunuloj de Jozefo iom post iom transprenis la tutan grenokomercon, precipe en Usono, ĉar ja la kristanoj ne bone scias trakti la grenon, kaj ĉar la judoj havas la pli longan kaj pli riĉan sperton.

Mr. Collins ne estis judo, li volis eĉ malpermesi la enmigradon de la judoj en Usonon. Sed direndas, ke li

estis pli granda ol Jozefo kaj pli granda ol *Earl of Beaconsfield*, kiu lerta kiel Jozefo, komprenis kaj kapablis suprenlabori sin el certa Benjamin Disraeli ĝis la rango de britlanda ĉefministro.

Mr. Collins estis pli granda ol Jozefo kaj pli granda ol *Beaconsfield*; ĉar estas ĉiam tiel: Se iu estas tute granda kaj senrespekta, tiukaze li certe ne estas judo. Kaj tio estas konsolo por tiuj, kiuj ne estas judoj.

Mr. Collins estis pli granda. Kaj li estis pli moderna. Li ne uzis revon, kiun havis alia, sed li uzis la proletaran solidarecon. Tiun proletaran solidarecon, pri kiu oni tiom ofte parolas, kaj kiun oni vidas tiom malofte, kiam mobiliza ordono estas fiksita al la muroj, kaj kiam la soldatoj elmarŝas.

Mr. Collins havis la avantaĝon je sia flanko, ke la homoj kun mono havas mortotimon, ke la solidareco de la proletaro povus fariĝi giganta potenco, kiu kapablas movi la mondon.

Rimarko

ĉefministro = en la originalo de B.Traven 'vicegô (certe kun ironia subsono)

Mr. Collins ne estis sentimentalula. Li enkasigis, li enkasigis la kremon de la nacio. Ha, kiom la nacio devis sangi! Tuno da karbo kostis duoblon de la kutima prezo, la trioblon, la kvaroblon de la prezo. Kaj nun *Mr.* Collins malfermis la pordegojn kaj helpis resurpiediĝi al la mortanta industrio. Li fariĝis la savanto de la nacio. Se li estus havinta politikajn ambiciojn, oni estus elektinta lin prezidanto. Li fariĝus dua Vaŝington.

La kompanio nur enkasigis kaj enkasigis monon, ĝi ne havis elspezojn. Ĉiujn elspezojn havis nur la minlaborista sindikato, kies riĉaj kaso estis malplenigitaj ĝis la lasta kupra cendo. Elspezojn havis nur la proletaro, kiu kolektis kaj kolektis monon, insultante kaj grumblante, sed kiu tamen kolektis monon por la malsatantaj ministoj. La reĝoj faras militon kaj la proletaro elsangas kaj mortas. Magnatoj kaptas riĉan predon kaj la proletaro oferas sian lastan cendon kaj malsatmortas. Ĉiam la proletaro! Kaj ĉiam kaj plian fojon la proletaro. Damnite kaj ankoraŭfoje damnite, proleto, kia granda azeno vi estas!

Mr. Collins enpoŝigis, kiam la batalo estis elbatalita kaj la ekonomia vivo kaj *Wall Street* komencis retrankviliĝi, netan profiton de delikata miliono kaj kvarcent mil da dolaroj.

La laboristojn li nun ne plu bezonis, ili estis nur ŝakfiguroj. Ja en pli aĉa situacio ol ŝakfiguroj. Eĉ ŝakfiguro el ligno scias, ke ĝi estas ŝakfiguro. Sed la laboristoj ne sciis, kaj ili ĝis nun ne spertis ĝin, ke ili estis nur figuroj ŝovataj tien kaj tien, de *Mr. Collins*. La laboristoj levis grandan kriadon, ke ili gajnis la strikon, kiam ili ree rajtis reveni en la minejojn, ke oni malaltigis la salajron nur je dek procentoj al ili, kaj ke oni ree lasis al ili ilian sindikaton, por ke ili povu ĝoji pri ĝi.

La kompanioj ja neniel serioze zorgis sin pri la sindikatoj. Sindikato aŭ ne sindikato. La laboristo malsatmortas, se li ne ricevas laboron. Kaj ĉu li havas laboron aŭ ĉu ne, tion decidus ne lia sindikato, sed tion decidus tiu, kiu ne predikas, sed agas kaj ne estas sentimentalaj. Proleto, vi havas bonegajn instrumajstrojn.

Mr. Collins ne nombris la mortigitojn. Li ne faris perdolistojn de tiuj, kiujn mortpafis la milico, de tiuj, kiuj sidos dum jaroj en prizono. De tiuj, kiuj perdis sian ekziston, de tiuj, kiuj mortis suicide, de tiuj, kiujn oni metis en frenezuldomojn, de tiuj, kiuj troviĝis en hospitaloj.

Estas malbonaj generaloj, kiuj zorgas sin pri la mortigitoj.

Ni havas sufiĉe da laboro kun la vivantoj.

Kaj dum la proleto entombigas siajn mortigitojn, priploras kaj priparolas ilin, lia kontraŭulo gajnas tempon por plani novan batalon kaj por antaŭprepari tiun.

ĈAPITRO 06

01

Mr. Collins nun estis supre, estis plenrajta membro en la generala stabo de la ekonomia vivo de la nacio.

Sed ĉiuj ĉi viroj, kiuj ĝis tiam laboris kun li, do la direktorio de Antracitkompanio, komencis timi lin. Ili ĉiuj ne estis sentimentalaj. Sed ili ankoraŭ posedis sufiĉe da hezitemo por ne iri ĝis la lasta limo.

Kion faris Antracit-kompanio, tio ĉio okazis ankoraŭ interne de la limoj de la leĝo. Ĉiuj ĝiaj agoj estis protektataj per la leĝo. Ĉiu havis la rajton plenigi stokejojn, kiam kaj kie kaj kiom iu volis. Kaj ĉiu havis la rajton malfermi siajn stokejojn, kiam tio ŝajnis plej favore. Antracitkompanio neniam laboris kun mensogoj en tiu granda rabentreveno. Ĝi malferme anoncis, ke ĝi plenigas stokejojn. Kaj ĝi entreprenis la tutan manovron sen iu rompo de la trustleĝo. Ĝi kun neniu alia kompanio subskribis trustsimilan interkonsenton por regi la merkaton. La negoco estis tiel laŭleĝa, tiel honorinda, tiel honesta, kiel negoco povas esti interne de la kapitalisma

sistemo. Ke la homoj lasas peli sin en panikon, oni ne povas riproĉi al Antracit-kompanio. Por tio estas la kara Dio respondeca, kiu kreis ĉion kaj ne lasas mortaĉi eĉ muson, se ne estas laŭ Lia volo. Se homoj ne lasus timigi sin, neniam iu povus gajni milionojn. Neniam iu povus uzi homojn por siaj privataj celoj, se la homoj havus pli grandan memkonfidon kaj pli da kuraĝo kaj ne timus kelkajn tagojn da malsato kaj la vivon kiel pensiulo.

Kvankam la negoco efektive ankoraŭ okazis en leĝaj limoj, la sinjoroj de la direktorio tamen tro malinklinis fari denove similan negocon. Jen ĉiam ĉeestis gazetoj de socialistoj kaj similaj homoj, kiuj grumblis pro envio, kiuj iel povus kapti saĝon kaj malkovri tian manovron. Kaj ĉiuj ĉi homoj, kiuj suferas pro tiu rabentreveno, fariĝas akuzantoj. Kie estas akuzantoj, tie tuj aldoniĝas juĝistoj. Homo nur tiom longe validas kiel honorinda, kiom longe oni ne povas bone kompreni liajn negocojn. Neniu el la viroj de la direktorio kondamneblis al pundo, sed ĉiuj publike povis esti insultataj kiel detruantoj de la ŝtato kaj kiel subtenantoj de socialistaj ideoj. Kapitalisto, kiu pere de tro rigora kapitalistaj manovroj liveras al la socialistaj

propagandistoj kaj anarkiistoj materialon, estas sama al krimulo, kaj li estas pli terura ol anarkiisto.

Tion la sinjoroj de la direktorio ekkonis sufiĉe frutempe. Tiel ili ankaŭ restis nedamaĝitaj de la stormoj, kiuj traskuis kelkajn jarojn pli poste la usonan kapitalismon kaj liveris la dinamiton al la socialistoj. De tiuj ŝtormoj, kiujn kaŭzigis la granda naftoskandalo, la tielnomata *Teapot Dome Scandal*. Ŝtormoj, kiuj eĉ la prezidanton de la usona respubliko *Mr. Harding* tiom traskuis, ke li fariĝis malsana, ke li sternis sin kaj tuj mortis, mortis tiel ĝustatempe, ke oni ne plu povis precize elkalkuli – pro respekto al mortulo, kiu ne plu povas defendi sin – kiom da milionoj li enspezis kun *Mr. Sinclair* koste de la nacio, dume lia kronprinco, *Mr. Coolidge* pro tio perdis la lingvon kaj de tiam estas la plej granda silentulo inter la prezidantoj de la usona nacio.

Tiel la sinjoroj de la direktorio konvinkiĝis, ke estas plej bone elaĉeti sinjoron *Collins*, la tro potenca, el Antracitkompanio.

Mr. Collins ricevis sian partopagon de la gajno en formo

de akcioj de Antracit-kompanio, kiuj nun havis tre bonan oficialan kurzon, ĉar la bezono de karbo estis granda kaj oni ree fervore elminigis karbon. Pro tiu posedo de la akcioj *Mr. Collins* ricevis grandan voĉnombron en la kompanio; kaj li nun estus povinta logi nur per sia voĉpotenco la kompanion plian fojon en manovron, kion la direktorio volis eviti. La direktorio estis sata je tiu unua manovro por longa tempo, ĉar la risko pri skandalo tamen estus tro granda por tiuj sinjoroj. *Mr. Collins* estis rigardata kiel aventuristo, kiu ne zorgis pri skandaloj. Tiam ankoraŭ ne, ĉar li ankoraŭ troviĝis sur la vojo supren. Pli malfrue tio ŝanĝiĝis ankaŭ ĉe li en tiu rilato. Ju pli maljuna oni fariĝas des pli oni atentis pri socia honoro kaj socia rango, pli ol en la juneco, kiam oni ŝajnigas esti bohemiano. Ankaŭ se oni krome havas neniun rilaton al arto.

La sinjoroj ofertis al *Mr. Collins* tre bonan prezon por ties akcioj. Tiel ili deskuis lin de la nuko kaj dankis al Dio kaj donis al la eklezio.

Rimarko

Teapot Dome Scandal = temas pri subaĉetoj pro naftokampoj sur terposedo de la usona ŝtato Vajomingo en la jaro 1921.

Viro en Usono kun unu miliono kaj kvincent mil da dolaroj sur bankkonto, estinta influriĉa membro de la direktorio de la potenca Antracitkompanio, fama kaj konata en ĉiuj grandaj gazetoj kiel lerta kaj sperta fortulo, tia viro devas fariĝi kapitalista potenco, eĉ se li ne volas esti tio. Oni devigas lin al tio. Oni implikas lin en ĉiujn grandajn negocojn kaj ĉiujn grandajn manovrojn. La sistemo ne toleras lin kiel eksterulon kaj ne kiel ekxiĝinton. La sistemo bezonas lian milionon kaj la kvincent mil dolarojn. Kaj la sistemo bezonas lian sperton, liajn sciojn, lian forton kaj lian volon. Grandaj kompanioj donacas akciojn al li, nur por tio, ke li enestas, nur por ke li havu intereson pri la kompanio, nur por ke oni povu peti liajn konsilojn. La bankoj ne lasas lin en paco, li devas partopreni tie kaj tie, ĉar oni ne supozas lin tiel aĉa, ke li povus kontentiĝi je kvar procentoj. Kaj viron kun tia renomo, kiun *Mr. Collins* de tiam havis, logas neneiu per neniaĵoj. Oni iras nur al li, se la aferoj estas sekuraj. Kaj nur kun tiaj negocoj, se dek ok procentoj estas sekuraj kiel la morto. Nur bazarkomercistojn oni

povas forlogi al stultaĵoj. Sed tiun *Mr. Collins* neniam. Kiu vendas terpomojn po kvin kilogramoj kaj petroselon por po du cendoj je fasketo, tiu povas atingi malgrandan komfortan posedon, sed li neniam enkasigos milionojn de dolaroj. Same tiom malofte, kiom iam proleto, kiu laboras ĉiam en la fabriko kaj neniam kuraĝas starigi sin sur la propraj piedoj, kunigos kvindek mil dolarojn por si. Li bezonus por tio dek vivojn, ĉar li ricevas ja ĉiam nur etan parton de tio, kion li produktas. La vere grandajn posedojn faras nur tiuj, kiuj kaptas la nervofaskojn de la nacio, la vivonervojn de la homoj, kaj kiuj kaptas ilin senskrupule.

La vivonervoj de la civilizitaj homoj estas greno, kotono, karbo kaj fero. Kiu regas parton el tiuj kvar eroj, tiu estas pli potenca ol la kara Dio; ĉar li povas konstrui preĝejojn kaj rifuzi preĝejojn, li povas nutri pastrojn kaj povas lasi malsatmorti pastrojn. Kaj se la kara Dio ne plu havas pastrojn oni rapide forgesas Lin. Ankaŭ gravas viando, ledο, domoj kaj terposedo. Sed la homo povas tre limigi sin pri manĝado de viando, povas porti siajn ŝuojn ĝis ili estas tute trivitaj, homo povas loĝi sur tiom eta spaco, ke li povas vivi dum jaroj sen novaj domoj. Sed panon li bezonas, la ĉemizoj kaj roboj el kotono ne estas tiel eltenemaj kiel ledο. Karbon la homo bezonas por ne frostmorti, por havi lumon kaj helpforton por sia laboro. Feron la homo bezonas por iloj, por maŝinoj kaj ĉeokaze por pafiloj kaj kanonoj.

Ĉion ĉi *Mr.* Collins sufiĉe frutempe komprenis en sia vivo. Tial li uzis la karbon por enseliĝi.

Kiam oni elŝovis lin el la karbonegocoj, ĉar li estis tro danĝera, li devis serĉi alian vivonervon de la homoj, por

povi ludi kun potenco. Se oni posedas potencon, oni povas havigi al si ĉiujn ĝuojn, kiujn ofertas la moderna vivo. Se oni ludas kun potenco, oni povas elgustumi ĉiujn valorojn, kiuj faras la vivon de homo interesa kaj vivinda. Spekuladi kaj ludi kun potenco estas pli ekscitiga ka pli ĝuinda ol sidi ĉe la ruleto. Oni ne povas influi la ruleton. Ludi ruleton ne postulas inteligentecon. Ĉiu ŝtipkapulo povas fari tion. Tial oni trovas proksime de ruleto nenion alian krom ŝtipkapuloj, friponoj kaj damoj, kiuj atendas la gajnon de la ŝtipkapuloj.

Mr. Collins ne estis ŝtipkapulo. Li estis inteligenta. Kaj lia interno por eterne urĝis lin uzi sian inteligentecon.

Estis la tempo, kiam la aŭtomobilo faris siajn unuajn timemajn paŝojn. Sed nur malmultaj ekkonis la grandan estontecon, kiun havis la aŭtomobilo. La fido pri la nevenkebleco de la fervojo estis ankoraŭ netuŝita. La unuaj provoj kun flugmaŝinoj estis okazintaj. Ili kostis la vivon de multaj viroj, sed ili sukcesis. Oni povis jam flugi distancojn de kelkaj kilometroj kaj restadi tridek minutojn super la tersurfaco ĝis oni falegis kaj rompis la nukon al si, se oni ne jam antaŭe forbrulis. Ankaŭ la antaŭlaboroj pri la dizelmotoro estis sukcesintaj kaj montris al tiuj, kiuj posedis inteligentecon kaj kiuj ne rigardis la ekzistantan kiel la lastan saĝon de homaj kapabloj, jam la vojon, kiun iros la tekniko, kiun ĝi devos iri.

Mr. Collins ekkonis kun sia bona instinkto, ke la karbo kiel vivonervo de la homoj komencis sklerozigi, kaj ke venos la tago, kiam la karbo estos ne plu necesa, kiam oni eble eĉ povos rezigni pri ĝi. Ĉar jam tiam neniu, kiu posedis nur iom da prudento, pensis, ke oni povas hejti kaj movi aŭtomobilojn kaj aviadilojn kun karboj.

Tiel okazis, ke *Mr. Collins* kaptis la junan, freŝan kaj ne eluzitan novan vivonervon de la homoj: la nafton.

Li ankaŭ tuj tuŝis la ĝustajn lokojn, kiuj tiam estis ankoraŭ tute novaj. Li aĉetis terenojn en Kalifornio kaj en Oklahomo. Li aĉetis en regionoj, kie neniu geologo estis supozinta nafton. Kaj li sukcesis.

Li fondis la kompanion *Condor Oil*. Ĝi estis tre malgranda. El ĉiuj kompanioj preskaŭ la plej eta je kapitalo.

Sed tuj, kiam ĝi estis naskita kaj elpuŝis la unuan krion kaj faris la unuan plenan spirtiron, ĝi komencis vori manĝon. Kaj ĝi voris kaj voris. Ĝi voris ĉiujn aliajn etajn kaj mezajn kompaniojn kaj voris ĉiujn koncernatajn privatajn entreprenistojn. Kaj ĝi voris kaj voris ĝis ĝi estis tiom dika kaj ronda, ke ĝi staris kun peza staturo apud la plej grandaj nafto- kaj petrolkompanioj, respektata kaj timata. *Mr. Collins* estis tiel lerta, ke li evitis manovrojn, kiuj certan *Sinclair*, la plej potenca naftomagnaton implikis en unu el la plej grandaj kaj plej fetorantaj kapitalistaj skandaloj, kiujn la usona popolo, tiom riĉa je

kapitalistaj skandaloj, spertis en la lastaj jaroj. Skandalo, kiu tiom skuis je la fundamentoj de la kapitalisma sistemo, kiom kapablos tion socialista propagando neniam. Ke sistemo povas transvivi tian skandalon, ke la popolo eĉ povas ridi kaj aŭskulti satirajn kanzonojn en la Vaudeville-teatroj sen eĉ nur akuzi la sistemon, pruvas, kiel firme konstruita kaj sekura ankoraŭ staras tiu sistemo. Ĝi pruvas, ke tiu sistemo helpe de la rimedoj, kiujn rekomendas la socialistoj kaj bolŝevistoj, apenaŭ kaj nur pene, se efektive, povas esti renversita. En Usono certe ne, ankoraŭ ne. Kaj ĉiukaze ne kun la ofertitaj receptoj. *Mr. Sinclair* ne estis kondamnata, sed admirata, ke li estis tiel lerta kaj sperta, ke li eĉ sukcesis aĉeti al si la militecan pretecon de la nacio kaj ŝanĝi ĝin en nafton kaj en dolarojn. Kaj de jaroj la juristoj rompas la kapojn al si tiom, ke la cerboj eksangas por eltrovi laŭ kiu paragrafo de la usona leĝo propre povas esti persekutata *Mr. Sinclair* kaj liaj friponokunuloj sur la prezidantaj foteloj kaj en la parlamento. Krime okazis. Krime, laŭ kiu ĉiu civitano, kiu ne estas multfoja milionulo, devas esti punata per morto pro grava ŝtatperfido. Kvankam ne ekzistas malamiko, je kiu la ŝtato povus esti perfidata, ĉar

Meksiko havas siajn proprajn zorgojn. Sed ja povus ekzisti malamiko. Kaj ke malamiko povus ekzisti, tiu supozo devas esti konservata en la popolo, kaj tiu supozo devas esti nutrata kaj bredata, por ke la ŝtalfabrikistoj ne malsatmortu kaj la konstruistoj de kirasŝipoj sufiĉe da mono enkasigu, por povi elspezi ĝin en Parizo kaj Berlino kun siaj *Follies*-ĥorknabinoj, ĉar en Usono la malmoraleco kun ĥorknabinoj kaj similaj vivmalsatuloj estas malpermesita. Tial ĝi tiom multe kostas. Kaj tial *Mr. Collins* spite al siaj gajnitaj milionoj ĉiam estas en monbezono.

ĈAPITRO 07

01

Lia eterna monbezono havis radikon en la malfacilaĵoj, kiujn li havis pro damoj. Parte pro damoj ĝenerale, kaj parte pro certaj damoj, kiuj estis ĉirkaŭ li.

Kiel propre okazis, ke li edziĝis, tion li poste tiel precize jam ne plu povus diri. Sed li sufiĉe bone memoris, ke ne li edzinigis sian edzinon, sed ŝi lin. Ŝi nek kunportis monon en la geedzecon nek ŝi levis lin en socian rangon, kie li estus povinta trovi influriĉajn amikojn. La geedziĝo okazis, kiam li estis oficisto en asekurkompanio kaj enspezis tridek kvin dolarojn ĉiusemajne. Kun tridek kvin dolaroj en ĉiu semajno oni ja apenaŭ povas atendi geedziĝi en riĉiga maniero aŭ fariĝi membro de pli altranga kaj tial pli valora socia tavolo.

La geedziĝon antaŭiris nenio, ja tute nenio, kion oni povus nomi pasia amo aŭ eble eĉ amo romantika. La tuta okazaĵo deruliĝis tiel seke kaj sobre kiel la subskribo de la kontrakto de meblokomercisto kontraŭ rompoŝtelo. Ambaŭ, edzo kaj edzino tiam iutage estis sufiĉe surprizitaj,

kiam subite naskiĝis filino, ĉar ambaŭ ne tre penis pri tio, kaj ambaŭ aŭ ne trovis ion precipe okulfrapan dum tiu triminuta radiograma mesaĝo, kiu anoncis, ke ne estas tute neverŝajne, ke okazos naskiĝo

Ĉu li propre estas feliĉa aŭ malfeliĉa edzo, tiun penson *Mr. Collins* havis neniam. Rilate al sia geedzeco li estis neŭtrala. Li plenumis siajn devojn kiel eterne mondonanta subtenanto de la familio, kaj li plenumis siajn ceterajn devojn tiel ŝpareme kiel permeseblas kaj motivis tiun ŝparemon sufiĉe akcepteble kun la senkulpigo, ke li tro ekscese laboradas kaj tro nervozas.

Ĉar lia laŭleĝa edzino ne povis kontentigi lian malsaton pri damoj kaj neniam kontentigis tiun kaj li iutage malfermis la okulojn kaj trovis, ke ekzistas inoj, kiuj vere ŝajnas kapablaj senti ion similan kiel amon, li komencis serĉi tian inon. Li serĉis tian inon kaj trovis tiajn kaj aliajn.

Kiam li tiam grimpis pli supren kaj havis sufiĉe da rimedoj elekti la plej bonan, kio havigeblas, rafiniĝis lia gusto. La rafinita gusto kompreneble fariĝis sufiĉe

multekosta. Kaj ĝi fariĝis des pli multekosta ju pli tiu rafiniĝis. Kaj li rafiniĝis des pli ju pli grimpis *Mr.* Collins kaj ju pli da mono li povis elspezi. Ĉio ĉi okazis kvazaŭ per si mem.

Ke lia gusto estis atinginta altan gradon de rafiniĝo, eble la plej altan gradon, kiun viro de la speco de *Mr.* Collins entute kiam ajn povas atingi, pruvis sufiĉe, ke li kapablis gajni la amatan Betty kaj konservi ŝin. Nur per mono li ne estus estinta kapabla reteni ŝin; kvankam lia mono kompreneble devis plenumi gravan rolon en tiu entrepreno. La damo Betty postulis pli ol nur ĝuste monon, ĝi postulis ĉion ĉi de li, kion li akiris en la kuro de la jaroj, en kiuj li ĉiam serĉis la perfektan inon, en rilatoj kun multaj inoj, komence ĉe modestaj, kaj post evoluo ĉe la artistinoj de sia fako. Se li estus veninta freŝe kaj neevoluinta de sia edzino al Betty, li ne povintus esperi pri iuj sukcesoj ĉe ŝi, eĉ, se li estus havinta duoblon de la enspezoj, kiujn li havis tiutempe. Spite al sia mono Betty estus forpuŝinta lin, eĉ se ŝi havus nur kaputajn ŝuojn sur la piedoj. Ĉar Betty ne vendis siajn emojn. Ŝi donis kaj akceptis kvazaŭ kiel edzino.

La mono, kiun *Mr.* Collins uzadis je Betty, estis neniel disipita aŭ perdita, kiel la mono, kiun li elspezis por ĥoraj knabinoj. La monon, kiun li eldonis por Betty, egale kiom ajn, egale kiel, estis unu el liaj plej bonaj kapitalinvestoj. Tion li sciis bone, kaj tion sciis ankaŭ Betty sufiĉe bone. Tamen, kaj tio nun ankaŭ direndas por esti justa al *Mr.* Collins, li reale malproksimis de tio, rigardi sian rilaton al Betty kiel nuran kapitalinveston. Pro Betty kaj pere de Betty, li, la riĉa viro, gajnis certe je la unua fojo en sia ekscitiga kaj neromantika vivo la ekkonon kaj la komprenon por tio, kio kondukas du homojn kun la koroj kunen kaj kio kuntenas ilin.

Tiu ĉi ekkono kiel homon forte trafis lin. Kaj, se li ne estus jam nature tre robusta kaj sufiĉe nesentimentala laŭ karaktero, jen tia ekkono estus povinta ĵeti lin el la reloj. Sed tiel li estus perdinta ŝin, ĉar nur lia malsentimentaleco, lia plena manko pri romantiko faris lin eltenebla por Betty. Sentimentale dolĉaj frustradoj kaj anime kaj korpe vomigis ŝin.

Betty hejme jam sufiĉe estis provizita je denaska sentimentaleco. Tion faris certe la iomo de sveda sango,

kiu estis en ŝi. La plej grandan parton de sia sentimentaleco ŝi perdis, kiam, pro nuraj ekonomiaj kaŭzoj, disbloviĝis ŝia unua granda kaj profunda amo en ĉiaj ventoj. Tio estis diable dura bato kontraŭ ŝia vivo. Sed la bato liberigis ŝin de ĉiuj skorioj de burĝa primitiveco, kiu ĝis tiu decida horo ankoraŭ gluiĝis al ŝi.

Ŝi fine eliris el tiu katastrofo kiel persono, kiu konscie staras en la vivo. Kaj ŝi estis savinta grandan kaj pasian amikecon kun la unua viro de ŝia koro, amikeco, kiu estis pli daŭranta kaj pli granda je veraj valoroj ol iam povus fariĝi kiom ajn pasia amo.

Sentimentaleco estas nenie pli malhelpema ol en la vivo. Kaj sentimentaleco estas plej malhelpema en Usono, kie ĝi estas krimo kaj en multaj kazoj estas ankaŭ tre severe punata.

La lastan feblan restaĵon de sia sentimentaleco Betty tiam perdis kiel redakcia sekretariino, kie ŝi lernis disdoni vangofrapojn al sintrudemaj redaktoroj kaj reporteroj kun tia vehementa akreco kaj kun tia surpriza ofteco, ke ŝi ricevis la kromnomon Beaty, la batino.

Betty sub la influo de la plej sankta, en kiu ŝi nun troviĝis, elkreskis el la rolo de princino. Ŝi plenkreskiĝis al diino. En la aktuala momento al diino de venĝo, kies rigardo kaj kies gestado anoncis al la hometoj, kiuj ne akceptis ŝian volon, malfeliĉegon sen pardono. Tiel *Mr. Collins* ankoraŭ neniam vidis ŝin.

Sed tiel li ja ankaŭ neniam kuraĝis ludi kun ŝi kaj trakti ŝin, kiel li faris tion en la lastaj tagoj, en kiuj li provis esperigi ŝin per la promeso, ke li prizorgos la garaĝon kaj la domon, kaj tiam tute ne plu pensis pri tio, tuj kiam li ne plu aŭdis kaj vidis ŝin.

Tiel li povis trakti siajn ĥorknabinojn. Sed ne damon kiel Betty. En tiu kazo lia saĝeco, kiun li evidentigis tiel memcerte kiel gvidanto de la ekonomia vivo de la nacio, tute fiaskiĝis. Li nun ĵuris al si, ke li provos tion neniam denove.

Sen tio, ke ŝi diris plian vorton, li sciis, ke la afero nun fariĝos tre multekosta. Dekfoje pli multekosta ol ĝi estus

estinta, se li tuj je la unua tago, en kiu ŝi elparolis la deziron, estus lupreninta la garaĝon kaj la domon.

Nun ŝi postulis pli. Ŝi diris koncize: “Kiam vi aĉetos la domon?” Pri lupreno de la domo oni tute ne plu parolis.

„Jes, ja, do, kiam vi aĉetos la domon?” ŝi ripetis sobre.
„Lunde estas la festeto. Tiam la mebloj devos stari en ĝi, ĉio, ĝis la lasta ringo ĉe la kurtenoj. Kaj telefono kaj lumo. Mi volas bani ĉion en lumo, inundi kaj inundi ĉion per lumo. „Ĝentlemanoj“ - ŝi turnis sin rekte al la sinjoroj – „ĝentlemanoj, vi ĉiuj honorigos sinjoron Collins kaj min per tio, ke vi ĉeestos la festeton. Kunportu ĉion, kion vi deziras, ĉion inan, kion vi havas je amikoj. La festeto estos vere sen ĝenetoj. Parizo en Frisko, ĉu vi komprenas sinjoroj miaj? Do senĝenite. Ankaŭ importita predikanto ĉeestos por ligi geedzecojn kaj por pli malfrue eksigi ilin, se la geoj eltrovis, ke la paroj karaktere ne akordiĝas. Kaj se vi tiam matene foriros, vi estos tiel libera kiel antaŭe. La kostojn por la geedziĝo kaj eksedziĝo vi devas mem pagi. Tio estas privataj kostoj. Li faras ĝin malmultekosta. Imitado estas ĉiam pli malkara, kaj se vi edziĝas du – aŭ trifoje kaj eksedziĝas en la sama nokto, li konsentas al vi

rabaton. Estas svedo, sed li komprenas tion, kion vi deziras. En Svedio li estis efektive predikanto, en Stokholmo. Ili donis al li la veturmonon al Usono, ĉar li ne povis doni informojn pri perdita eklezia mono kaj kie ĝi restis. Collins, karulo mia, vi certe memorigos la sinjorojn, mi petas vin, pri la festeto.“

Ŝi iris renkonte al li, ĉirkaŭbrakis lin, kisis lin kaj foriĝis.

La sinjoroj ridis kaj ridis senĉese, dume ŝi rekomendis sian festeton telegramstile. Ili ĉiuj konsentis, ke ili venos. Ili diris tion serioze kaj kun fervoro. Kaj ili havis nur unu malagrablan penson, ke io povus interveni, kio malhelpus ilin ĉeesti la festeton. Ke ili ne devis prezenti siajn edzinojn, sed rajtis prezenti siajn amikinojn malpli enuigajn, kiuj ridis pri ĉiu ŝerco kaj komprenis tiun, lerte pliampleksigis la ŝercon kaj plej ofte tuj uzis praktike, promesis al la invititoj ĉiujn surterajn ĝuojn, kiujn la granduloj de la nacio bezonas por ne perdi sian elastecon kaj ne estu verdiktitaj pro nervozeco, kapdoloroj kaj sendormemo al labora malkapablo. Tiu, kiu laboras, ankaŭ ĝuu. Kaj kiu multe laboras, tiu ankaŭ ĝuu laŭ la valoro kaj gajno de sia laboro.

Estu jam nun dirite, ke ĉiuj sinjoroj de la kontrolkonsilio venis al la festeto; ke ĉiuj venis kun siaj amikinoj, aŭ kio ajn ili estis, kaj ke ĉiuj sekvamatene, longtempe post la kvara venis hejmen kun la konscio, ke ili ĉion estis ĝuintaj, kion ili atendis ĝui. Ĉiu minimume unufoje estis edziĝinta kaj unufoje eksedzigitita. Kaj se oni sentis sin

ankoraŭ sufiĉe forta en la lumboj, oni geedziĝis kaj eksgeedziĝis eĉ duan kaj trian fojon. Dek dolarojn kostis la geedziĝo, kaj dek dolarojn la eksgeedziĝo. Ankaŭ ĉambroj por la fianĉinoj ekzistis. La ĉambristinoj, kiuj devis zorgi pri la preteco de la fianĉinaj ĉambroj, ricevis por ĉiu malfermo de unu el la fianĉinaj ĉambroj dek dolarojn de la feliĉa edzo.

Tiel fine ĉiu riĉe pridonacite iris hejmen.

Oni atentis nur pri tio, ke ĉiu, kiu iris hejmen, ankaŭ ĝuste estis eksedigita; ĉar ripetite oni certigis, ke la predikanto estas aŭtentika kaj, ke la geedziĝo sekve de tio antaŭ la leĝo validas. Kion ricevis la junaj fianĉinoj ĉe la eksedziniĝo de siaj ekŝigintaj kaj solviĝintaj iamaj edzoj kiel kvitigan monon, la paroj devis fiksi inter si mem, ĉar oni volis eviti la kostojn por juĝista decido. La fianĉinoj diris ĉiuj jam antaŭ la geedziĝo, kiom ili atendis, se la geedzeco ankoraŭ en la sama nokto, ofte en la sama horo, estis ekŝigita. Tial ĉio iris pli harmonie, pli senĝene – sed ne, pli senĝene mi ne volas diri – multe pli glate, multe pli laŭorde, kun multe malpli da stultaĵoj kaj insultoj ol tio okazas kutime en la vivo, kie oni traktas serioze

aferojn, kiujn la homo neniam traktu serioze. Sed ne, ĉio devas esti tuj poreterne. Nu do, se vi fidas pri eterna ĝuo, pri eterna amo, pri eterna fideleco, jen vi ankaŭ devas pagi por via stulte naiva fido, tiel, kiel vi devas pagi al la eklezio, se vi kredas pri ĝi.

Kiam Betty estis foririnta, la konferenco estis daŭrigata. Sed neniu sciis ion por diri. Ĉiu havis aliajn pensojn. Pensojn pri la princino, pensoj pri la propra amatino, pensoj pri la komenciĝonta festo, pensoj pri la trembrila radio de dieco, kiu restadis dum kelkaj minutoj en la ejo, kie ĉio estis sendia, eĉ se tre riĉa. Kaj neniu ĉeestis, kiu ne rigardis sinjoron Collins tiutempe tiel kvazaŭ li estus de alia stelo. Kiel tia povas fali sur la sinon de viro tia kia *Mr. Collins*, al negocisto, eĉ se estas potenca negocisto ?!

Kaj tiuj sinjoroj, kiuj estas tiom ekzercitaj koncentriĝi kun sia tuta sagaco dum ĉiu minuto al kiu ajn afero, ne plu rezistis kaj decidis tranŝovi la konferencon. Milionoj de dolaroj sekve de tiu prokrasto kaŭzita de Betty, restadis por kelkaj tagoj pli longe en la manoj, en kiuj ili estis je tiu tago.

La fakto, ke ĉiuj sinjoroj promesis aperi je la festeto de *Miss Betty*, donis al *Mr. Collins* eĉ pliigitan potencon en la kompanio, ĉar ja estis ne nur la festeto de Betty, sed ankaŭ lia. Li pagis ja la tutan festeton. Kaj li proksimigis

ĉiujn sinjorojn tiom al si kaj kun tioma intimeco, ke tio estis nur favora al liaj planoj. Por veni ĉe tia tro petoliga festo al pura kaj plena ĝuo, oni devas rompi multajn leĝojn, ekz. pri bigamio, nudodancoj kaj alkoholkonsumado, leĝoj, kiuj verdiktas tiajn deliktojn per severaj punoj kaj ĵetas per koto al la laŭorde stampita burĝa honoro kaj honesteco de la granduloj de la nacio, se fariĝas konate. Tial konspirantoj kaj aliancanoj de tia festeteo ankaŭ ĉiam montriĝos preta, esti konspirantoj kaj aliancanoj pri negocoj, kun kies helpo oni povas pagi la kostojn por tiu festo kaj volas havigi la kostojn por alia festo eĉ pli petoliga.

Mr. Collins ĉe tiu festo povis studi siajn plej intimajn kunulojn pli bone ol en la konferencoj. Ĉi tie li lernis iliajn malfortajn flankojn, kie li povis kapti kaj subigi ilin, se ili ne volis sekvi lin ĉe la ellaborado de nova granda rabentreveno.

Tiel estis denove Betty, kiu levis lin al pli granda rango de potenco. Lia edzino ne kapablis al tio. Mankis al ŝi la talento ŝovi kaj gvidi la aferojn tiel, ke neniu vidis kiel kaj de kiu devenis la gvidado.

Estis aŭdaca ŝakmovo de Betty, ke ŝi ĝustatempe superruzis la sinjorojn helpe de la invito. Ŝi faris tion pro du kaŭzoj, kaj ŝi faris tute ne tiom spontanee kiel tio okazis ŝajne. Dum du sekundoj ŝi ekkomprenis la situacion kaj tuj atakis. Ŝi ekkaptis tuj la kernon. Ŝi sciis, ke tiukaze, se ŝi invitis la sinjorojn kaj tiuj konsentis, *Mr. Collins* ne plu povas elturniĝi. Li devis aĉeti la plej belan kaj plej multekostan domon, kiu havigeblis, li devis abunde plenigi la domon per mebloj kaj li devis aranĝi la feston tiel riĉe, ke influhavaj milionuloj dorlotitaj, ne enuas kaj ne karakterizas la festeton eble eĉ kiel „*rotten affair full of boredom*“, do kiel jam eskstermodan aferon plenan de enuo.

Tio estis unu el la kaŭzoj por ilia invito. La alia kaŭzo estis tute sopra kaj negoca. Ŝi helpis al *Mr. Collins*, sen tio, ke li estis diveninta tion, al intima amikeco kun tiuj potencaj viroj, kio estis utila por lia negoco kaj per tio al ŝia propraj enspezoj; ju pli li enspezis des pli ŝi povis elvringi el li.

Post kiam la sinjoroj estis invititaj kaj jesis tion, *Mr.* Collins efektive devis serĉi la plej multekostan domon kaj aĉeti ĝin. Estis palaco, riĉe meblita. La antaŭa proprajo de filmreĝino, kiuj pli enspezis kiel temploprotektanto de Venuso ol en la filmoj, kvankam ŝi enspezis ankaŭ en filmoj tri mil dolarojn ĉiusemajne. Sed tio estis nur simpla kromenspezo, kiu ĝuste sufiĉis por la subvestaĵoj. La filmreĝino lasis sin konstrui antaŭ ne longe novan palacon, kaj tiel tiu palaco tie fariĝis libera.

La palaco estis konstruita laŭ hispana kolonistilo. La interna korto estis kovrita per vitro, kiu estis mozaika kaj riĉe kolorita. Estis oportuneco de precipa maniero, ke la marmorbanejo, kiu estis ludonta dum la festeto tian gravan rolon, jam ĉeestis, en la interna korto kaj, ke la muntaĵoj de la banejo estis riĉe arĝentigitaj. La banejo estis hejtigebla kaj la tuta interna korto facile hejtigeblis ĝis tropika klimato. La banejo mem estis kutimiginta al similaj surprizoj kiel la estontaj kaj trovis sin ĝoje preta fari ĉion, kion oni deziris de ĝi. La lokoj por la tri orkestroj estis tiel bone kaŝitaj, ke oni nek povis vidi la

muzikistojn, nek la muzikistojn, kaj kio estis pli grava – ankaŭ neniel povis vidi tion, kion faras tiuj, por kiuj ili ludas muzikon. Ĉe ĉiu orkestro estis krome konfidata persono, fidinda negro, kiu transprenis la respondecon por la bona konduto de la muzikistoj, por eviti postajn ĉantaĝprovojn helpe de sukcesaj fulmfotografajoj. La muzikistoj sciis, kio okazis. Sed ili zorgis sin pri nenio. Ili ĉiuj havis familion, oni pagis ilin tre bone, kaj ili sciis, ke ĉe bona konduto ili estos komisiitaj por partopreno ankaŭ ĉe pli postaj festoj de aliaj gastigantoj. Kion ajn fian oni diru pri lukso kaj ĝuo, ili havas plej ofte la bonan je si, ke ili lasas enspezi aliajn. Tiel oni kreas ekvilibron, kiu tenadas la akson de la turniĝanta Tero en paco.

Betty trinkis nur tri glasojn da ĉampano, nur pro ĝentileco. Ŝi eĉ ne unufoje edziniĝis dum tiu festo, eĉ ne kun *Mr. Collins*. Kiam li aludis tian, ŝi alvokis unu el la liberaj fianĉinoj, kroĉis ambaŭ brake kaj kondukis ilin al la sveda predikanto. *Mr. Collins* lasis edzigi sin kaj Betty gratulis al la juna geo kaj transdonis ŝin al ĉambristino de la fianĉejoj. Betty estis lerninta regi la mondon kaj la virojn. La tutan semajnon post la festeto ĝemis *Mr.*

Collins en ŝia ĉeesto. Li volis sin eksedzigi de sia edzino por edzinigi sian Betty, li donis ŝin en sia frenezeco skribajn promesojn solenajn - jen danĝera afero en Usono – li preskaŭ sufokis ŝin en sia malsato al ŝi. Ŝi disŝiris la notitajn promesojn antaŭ liaj okuloj kaj ĵetis la pecojn sur lian vizaĝon.

Ekde de tiu tago li estus povinta murdi por ŝi.

Li falis en furiozon de potenmalsato. Li rezignis pri si mem. Tio estas: Li rezignis pri si kiel viro, kiu volas venki potencon por si mem. Li volis potencon por neniu alia celo plu ol por tio stari antaŭ la okuloj de Betty kiel la plej potenca, la plej prudenta kaj la plej aŭdaca. En malnovaj tempoj li nun estus ekmarŝinta kaj konkerinta kontinentojn.

Sed kontinentoj nun ne plu estas konkerataj per soldatoj el karno kaj sango. Kaj generaloj kaj ĉefgeneraloj perdis sian nimbon. Kiam generalo Pershing, laŭdire venkinta, hejmenvenis de la kampoj en Francio, oni jubilis al li. En la tago de la enmarŝo. Je la sekva tago li estis jam forgesita. La unua paĝo de la gazetoj, kiuj hieraŭ estis ankoraŭ plenaj de lia famo kaj samrangigis lin tiam kun Aleksandro, Cezaro, Vaŝington kaj Grant, hodiaŭ estis jam superitaj de la tondrado pri la falo de la ŝtalakcioj kaj de la proksimiĝanta diluvo de la bolŝevismo. Neniu pensis eĉ nur por momento pri tio meti lin sur la liston de la prezidantkandidatoj. Li estis ĝuste nur enoficigita helpkunula buĉisto de la nacio. Kiu nun havas plu

tempon zorgi pri senlaboraj buĉistoj?!

La armeo de *Mr. Collins*, kiun li elsendas por regi kontinentojn – li tute ne volas venki ilin – , estas de alia speco. Lia armeo konsistas el agentoj, kiuj ricevas premiojn. Liaj soldatoj estas ĉekoj. Liaj militplanoj baziĝas sur vetkonkuraj konsiloj, el la konsiloj pri la naftokonkurado.

Ne regas plu tiu la mondon kaj la homojn, kiu havas la plej grandan armeon, la plej bonajn kanonojn kaj la plej multajn aviadilojn, sed tiu regas la mondon, kiu posedas la nafton. Kion povas fari la plej granda batalestro, se *Mr. Collins* rifuzas doni la nafton al li? Jen neniuj aviadiloj portanta bombojn, siblante ŝprucigus venengason tra la aeroj. Jen neniuj milittanko rampus trans la batalkampon. Jen neniuj kamionoj transportus armeojn de unu fronto, kie ili ĵus ne estas bezonataj, al alia fronto, kie ili decidu la militon. Jen neniuj submarŝipoj veturus en la maroj. Jen moviĝus neniuj el la grandkalibraj kanonoj.

Se *Mr. Collins* diras: „Mi ne havas nafton!“, tiukaze oni devas akcepti tion, kaj neniuj rajtus kulpigi lin pri perfido

de l' ŝtato, ĉar neniu povus pruvi tion. Li havas la planojn de la longdistancaj naftoduktoj, de la alveturaj stratoj, de la putoj, de la pumpstacioj. Kun malmultaj komandoj li povas konfuzi ĉiujn aferojn tiel, ke neniu cent mil hektolitroj da nafto alkondukeblas sen tio, ke oni disipas samtempe nenecese cent mil hektolitrojn da nafto je forto.

Oni povas aŭdaci traskui la leĝojn pri la privatposeda rajto per tio, ke oni konfiskas ĉiun naftoposedon. Sed, se oni ne povas samtempe kunkonfiski la konojn pri la tiom komplika sistemo de la naftoproduktado, pri la disdivido kaj la transporto, jen tiu, kiu konfiskas ĝin, estas same tiom senhelpa kiel la franco, kiu konfiskis la transportsistemon de la Ruhr-regiono en Germanio. Ĝi moviĝas. Kompreneble. Sed ĝi moviĝas tiom komplike, ke la utilo estas manĝata de la movoj.

ĈAPITRO 08

01

Estis du tagoj post la festeto de Betty.

Mr. Collins venis en sian oficejon tridek minutojn antaŭ tagmezo. Li trovis suramasigitajn sur sia tablo la kalkulojn por la aĉetitan palacon, por la alimebligado de la domo, por la festeto, por la ĉampano. Ĉe la kontrabandado de ĉampano, de viskio kaj de aliaj specoj de alkoholaĵoj estas forkaptita bona kvanto. Miloj de dolaroj en la formo de koruptiga mono devas esti pagataj al la oficistoj de la kontrolinstanco pri prohibicio, altaj sumoj por punoj estas elspezendaj. Tiuj, kiuj por pli elstaraj personoj pasigas la puntempon en prizonoj, devas esti subtenataj, por ke ili ne maltrankviliĝu kaj ne fajfu ion, kaj por ke oni trovu ĉiam denove aliajn, kiuj transprenas novajn prizonpunojn. Ĉio ĉi esprimiĝas en la prezo de botelo da ĉampano. Kaj tial estas malmultekoste, se unu botelo da ĉampano kostas nur sesdek dolarojn. Kvincent boteloj da ĉampano estis en la festeto, la vinoj, likvoroj kaj la viskio ne kunkalkulataj. Ĉe

tia diboĉado kiel ĉe ĉiuj tiaj diboĉoj apenaŭ triono estas trinkata, la restaĵo estas disipita kaj elverŝita de la diboĉuloj en ebrio, en petolo, kaj dum fanfaronado.

Proksimuma takso de la kalkuloj, inklude de la palaco, sumiĝis al la ridinda sumeto da okcent kvardek mil dolaroj. La kalkuloj por la vestaĵoj kaj juveloj de Betty ankoraŭ ne surtabliĝis, ĉar la liverantoj de tiuj aĵoj estas ĝentilaj kontraŭ tiuj, kie la mono estas sekura.

Ambaŭ ĥordamoj de *Mr. Collins*, kiuj estis plej novdataj rilate al sia eniro en la vivon de la magnato, estis aŭdinta pri la festo. Ili ege koleriĝis, ĉar ili ne estis invititaj. Ili tial anonciĝis en sia plej kolera horo kaj seninterrrompe firme sieĝis sinjoron Collins, por ke tiu trankviligu ilian koleron. Ili minacis fari skandalojn, skribi leterojn al la gazetoj, leterojn al la eklezio, en kiu *Mr. Collins* estis ano, al la kontroloficistoj pri la prohibicio. Ili ne unuope detaligis tion dum sia telefongakado, sed ili diris: „Tiam mi faros hakitaĵon el vi, *sweet Daddy*, dolĉa paĉjo mia. Ambaŭ ĥorknabinoj ankoraŭ nenion sciis pri la alia. *Mr. Collins* sciis, kion signifas hakitaĵo. Ili ja ne farus hakitaĵon el li; ĉar *Mr. Collins* estis tro bona kaj tro grasa

kliento, por ke oni tro haste fuŝu la rilaton al li. Finfina bato estus farita nur tiukaze, se ĉiu espero perdiĝus povi reteni lin. La mildigo de ilia malico helpe de novaj vestoj, pelto kaj brilantbraceleto kiel aldonon, *Mr. Collins* taksis je proksimuma sumo da dudek kvin mil dolaroj.

Se ĉio estus laŭorde kune, kio ankoraŭ mankis en la monto de kalkuloj, kiuj tie jam ĉeestis kaj ankoraŭ atendeblis, jen sumiĝus entute en kvieta majesto ĉirkaŭ naŭcent mil dolaroj.

Mr. Collins diris ne laŭte: „*Purty in the neighborhood of one million nice little beautiful bucks*, tre proksime al unu miliono da bonaj kaj belaj dolaroj.“

Rimarko

purty = estas regiona slango = *pretty* = linda, beleta

Kiam li pripensis tion, li iom ŝanceliĝis, kvazaŭ li volus fali. Kvankam li kutimiĝis al grandaj sumoj. Tia elspezo, kiu senpere iras el lia poŝo, kaj kiu severe rigardate servis nur al plezuro, estis tiel forta rilate sian efikon, ke li retenis la spiron senkonscie dum kelkaj sekundoj kaj tiam profunde ĝemis.

Tiu giganta sumo renversis lian tutan privatan financon situacion. Lia cerbo konfuziĝis. Li ne sciis por la momento kiel li havigu tiun sumon sen ŝiri tiom grandan truon en sian monŝakon, ke apenaŭ restas espero povi ŝtopi ĝin. Estis tiel kvazaŭ subite trapuŝiĝis ferplato en bonan ŝipon meze de oceano kaj la akvo enpafiĝas kun tiom larĝa strio, ke ĉiuj pumpiloj estas senpotencaj kontraŭ tio.

Apud tiu sumo, subite elŝirita el lia buĝeto, ĝuste pagendis multaj aliaj elspezoj, kiuj ne reteneblis. Lia edzino volis iri al Parizo kaj vivi tie kelkajn monatojn, poste ŝi celis Germanion kaj Italion. Lia filino volis kaj devis iri al Britlando kaj al Dresdeno, por studi du jaron

en Eŭropo. Ankaŭ Flossy devis iri al Parizo, ĉar ŝi bezonis lertan kuraciston, kiu reguligu malatenteman amnokton kun *Mr. Collins*. En Usono tio estis tro danĝera. Krome Flossy bezonis, se tio estos okazinta, ripozon en la Mediteraneo. Ĉiuj ĉi elspezoj ne eviteblis kaj ne transŝoveblis. Kun la necesa vojaĝmono por edzino, filino kaj Flossy inklude, tio kostis ĉirkaŭ tricent mil dolarojn.

La pensoj, kiuj povas traflugi interne de dek sekundoj la cerbon de homo troviĝanta en granda ekscitiĝo – por ekzemplo, se tiu ĵus estas tuŝita ĉe brako de preterrapidanta aŭtomobilo kaj li konsciiĝas, ke li efektive nur je larĝo de alumeto malproksimis de la morto – apenaŭ ĉiuj lasas rakonti sin en ampleksa libro. La kapablo de la cerbo, en la stato de subita alfluo de sango, povi pensi rapide kaj tamen logike, estas nekredebla.

El la miloj de pensoj, kiujn *Mr. Collins* havis en la unuaj sekundoj, kiam konsciiĝis la sumeto al li, kiun li devis havigi, ĉi tie mencieblas nur kelkaj.

Unue li pensis pri tio mortpafi sin, por fuĝi de tia tasko plenumi tiujn postulojn. Sed tion li tuj rifuzis. Li estis karaktere multe tro forta por serĉi solvon helpe de tia fuĝo.

Tiam li pensis pri nuligo de la aĉetkontraktoj aŭ pri tio oferti la palacon helpe de makleroj al tuja vendo. Ankaŭ

tiu penso tiel rapide foriĝis kiel ĝi aperis. Ĉar tio, kion Mr. Collins iam decidis, tio estis decidita por ĉiam. Li estas multe tro fiero por konsenti, ke li faris iujn aferojn pro troa hasto. Se li vere volas vendi la palacon, tiam li vendos ĝin tiam, kiam li volas fari tion, kaj ne, se oni urĝas lin, ĉar li ne povas pagi postulitajn sumojn. Lia tasko estas fari monon por pagi tion, por kio li devigis sin.

Tiam li furioze ekkoleris pri Betty, ĉar ŝi tiel venkis lin, ĉar ŝi posedis tioman potencon pri li, ke li perdis sian pripensadon, sian sobran kalkulemon kaj sian juĝkapablon. Sed la kolero formortis jam dum ekesto. „Ja kiel ŝi kulpu pri tio?“ li diris kun fluantaj pensoj al si. „Ŝi ja vere ne kulpas tion; ĉar en tiu kazo se mi ne volas fari ion, mi ja ne devas cedi al ŝiaj deziroj. Se mi estas tiel hunde laca, ke mi faras tion, kion ŝi deziras, jen ŝi tute pravas trakti min laŭ tio, kion mi valoras.“ Samtempe li persvadis sin mem, ke li estas laca kiel hundo kaj sklavo de inaĉoj. Li estis viro tia, kia scias kion li volas havi kaj por scii, al kiu li donas ion kaj kial li donas ĝin. Tiel la ekestanta kolero kontraŭ ŝin ŝanĝiĝis en respekton. Li sentis profundan estimon al ŝi, ke ŝi estis tiel ruza trakti

lin tiel lerte, ke li devis fari tion, kion ŝi deziris. Li fariĝis tre fiero pri si mem kaj sentis sin tute supera al ĉiuj aliaj viroj, ĉar sukcesis al li gajni kaj reteni tian lertan damon, kiuj krome estis eĉ tiom eleganta kaj fiero. El tiu fiero kreskis ankoraŭ en la sama sekundo forta memkonscio. Denova fortosento trafluis lian sangon pro la penso, ke li posedas tiun damon kaj devas tragustumi streĉiĝojn pro ŝi. Liaj pensoj nun komencis laŭordiĝi. Li ekkoncentriĝis. Li falis en rapidan sopiron sinjorinon Betty nun teni brake kaj kisi ŝin, por esti certa, ke li posedas ŝin. Nur ŝi per si mem jam validigis tion, ke lia vivo havas sencon. Li komencis ami ŝin en tute nova maniero. Ne nur plu kiel inon, sed kiel la ununuran vivcelon. Kiel geniulinon, kiu estis pli ol tio, ĉar ŝi estis ankaŭ el karno kaj povis doni surterajn ĝuojn. La penso pri ŝi, la eksterordinara amo, kiun li sentis por ŝi, kiu fariĝis pli intima, ĉar li pentis, ke li fariĝis kolera pro ŝi, donis al li nekutiman energion. Ĉio pesimisma, kion li ĵus pensis, ĉio timema malaperis. Li bedaŭris subite, ke li devas pagi nur milionon kaj tricent mil da dolaroj. Li deziris, ke devus esti dek milionoj da dolaroj, kiujn li devus alporti. Li sentis la mondon tro malgranda kaj tro malvastiĝanta por lasi ludi siajn

fortojn, por kvazaŭ tiom kreski, ke bonfartigas lian fortosenton. Gajni milionon da dolaroj kaj kvincent mil dolarojn aldone, tio estis tute nenio. Eĉ ne estis inda por menciigi ĝin. Tio estis ĝuste nur la laboro por fuŝulo. Se li ekstartas, foje vere kaj serioze ekstartas, jen kirliĝas miliardoj de dolaroj. Ĉar la miliardoj de dolaroj devis perdi sian misteron kaj devis esti nenio pli ol senhelpaj objektoj, kun kiuj li ludis.

„Unu milionon kaj kvincent mil dolarojn?“ li laŭte elvokis. „Unu milionon kaj kvincent mil da dolaroj? Nenion pli, ĉu? Jen bagatelo. Kvin milionoj devos esti havigitaj. Betty, vi havu vian jaĥton. Vi havu la plej elegantan jaĥton, kiun kapablas konstrui la usona kontinento. Kaj se vi volas havi la jaĥton de la reĝo de Britlando krome, jen mi bankrotigos lin kaj aĉetos ĉiujn liajn jaĥtojn, ĉevalojn kaj kastelojn en aŭkcio. Unu milionon kaj kvincent mil da dolaroj. Kiaj longaj superflujaj paroloj pro nura krommono!“

Li fariĝis tiel laŭta, ke la privatsekretariino frapis la pordon, memgardeme malfermis la pordon kaj mallaŭte demandis: „Ĉu vi estis vokinta min, *Mr.* Collins?“

„Jes. Ne. Momenton. Revenu post minuto, Ida. Mi havas urĝajn leterojn.“

„Yes, Sir.“ Ida fermis la pordon senbrue.

Mr. Collins kaptis la telefonon: „*Lucky*, kiel vi fartas? Vespermanĝo hodiaŭ. Ĉu Siberts?

Aŭ, bone do, Siberts. Aŭskultu, kiel estas la ŝoforo? Bone, tenu lin firme ĉe la ŝnuro. La uloj ĉiam volas komandi. Repuŝu lin tuj je la unua tago al sia ĝusta rango. Kiel vi sukcesas pri la granda domo? Pli bone estas, se vi prenas plian viron, kiu scias labori. Eble ankaŭ knabinon plian. Do, je la dudek unua. Ni prenos vian aŭton. La verdan, ĉu? Ne, ho, ne. Mi prefere vidas vin en la pale blua. Ne, neniukaze. Dislimu vian hararon en la mezo, pli plaĉas al mi. Sed kial? Pli bone, se vi ne prenos la novajn ŝuojn. Ni volas ja danci. Novaj ŝuoj ĉiam rapide lacigas nin. Ĉu pli poste? Vi ja scias tion. Ĉe vi kompreneble. Mi sendos miajn vestojn kun oficeja kostumo hodiaŭ posttagmeze al vi. Mi havas por vi surprizon. Havas rilaton al perloj. Ne, mi ne diras. Do, je la dudek unua. Kison. *Bye,bye*. Mi estas enmeze de amaso de laboro. Ĝis, ĝis.“

Rimarko

Lucky = felicitulino

Kaj estis precize en tiu minuto, ke la sekretariino ree frapis la pordon kaj – ĉar ŝi estis konfidatino – tuj laŭ sia maniero mallaŭte envenis sen ĝisatendi la antaŭan '*Come in*', la frazon: 'Envenu!' Okazis jam foje al ŝi, ke ŝi tiel envenis dum *Mr.* Collins ĝuste kun – nu, ni diru, ĥorknabino – laŭ maniero konversaciis, laŭ kiu oni kutime ne konversacias en sia oficejo kun damo. Sed Ida havis takton. Oni eĉ ne rimarkis, ke ŝi envenis tien. Sed *Mr.* Collins sentis tion. Kaj kiam tiu damo estis foririnta, *Mr.* Collins envokis la sekretariinon kaj diris: „Ida, vi estas unu el la plej fervoraj sekretariinoj, kiujn mi havis kiam ajn. Vi komprenas vian laboron kaj vi havas takton. Ambaŭ aferojn mi ŝatas. Jen la asigno al la kaso, ekde lundo vi ricevos okdek dolarojn ĉiusemajne. Mi ankoraŭ havos leterojn pli poste.“

Ida ĝis tiu taĝo havis nur kvindek kvin dolarojn semajne. Ne pro la altigo de la salajro, sed pro la maniero, kiel *Mr.* Collins klarigis la aferon, pro la tono en lia voĉo, pro la fakto, ke li per neniuj mienoj, per neniuj palpebrumoj aludis ion aŭ silentigis ŝin, Ida adoris sinjoron Collins ekde tiu

tago kiel kvazaŭdion. Li estus povinta fari kun ŝi aŭ en ŝia ĉeesto, kion ajn li volas. Ŝi estus rigardinta ĉiun el liaj agoj kiel sakramenton.

Tio estis unu el kaŭzoj por la sukcesoj de *Mr.* Collins. Li vidis homon, kaj li sciis, kiel li devas gajni lin. Kelkajn li kriis suben, aliajn li diskutis suben, kaj aliajn li karesis suben. Kaj se nenio helpis, li batis ilin teren. Sed ĉiam ridetanta ĝentileco restis propra al li. Ĝentilentecon, kiu ne celis kaŝi ion, sed kiu estis aŭtentika, kaj tial ĝia efiko ĉiam estis certa.

Ida diris: „La sinjoroj ĉeestas, kun la raporto el Meksiko. Estas la afero pri Rozo Blanka.“

Kaj estis en tiu momento, kiam *Mr. Collins*, ankoraŭ troviĝis sub la impreso de la miliono kaj kvincent mil da dolaroj, kiuj estis pagendaj.

Estis en tiu momento, kiam lia forto, dum la pensado pri Betty, tiom gigantiĝis, ke li volis havigi kvin milionojn da dolaroj por aĉeti la plej elegantan jaĥton por Betty kaj devigi la reĝon de Britlando al bankrotdeklaro.

Estis en tiu momento, kiam la sinjoroj de la departemento pri terposedaĵoj de *Condor*-kompanio anoncigis sian ĉeeston ĉe interkonsiliĝo, por prezenti la raporton de la advokato Perez el Meksiko kaj por priparoli kaj decidi kun *Mr. Collins* tion, kio estis farenda: ĉu oni rezignu pri Rozo Blanka aŭ ĉu oni denove provu gajni la haciendon Rozo Blanka.

Kaj, ĉar oni ĝuste prezentis la raporton kaj transdonis ĝin por interkonsiliĝo, tial okazis, ke *Mr. Collins* vokis, ke li vokis kun sia tuta fortokonscio, en kiun li enfuriozigis sin dum la tri lastaj minutoj: “La terposedaĵon, kiun mi volas

havi kaj ne povas ricevi, ne ekzistas en la tuta granda universo. Eĉ se ĝi estus sur Jupitero, mi transigus ĝin malsupren. Rozon Blankan mi volas havi. Kaj neniue dio kaj neniue prezidanto de Meksiko kaj neniue kontraŭimperiisma ligo povas malhelpi min rompi Rozon Blankan. Mi volas ĝin rompi kaj mi rompos ĝin. – Dankon por hodiaŭ, ĝentlemanoj. Mi pripensas la aferon. Mi sciigos al vi, kiam mi sufiĉe antaŭpreparis la decidojn kaj planojn, por povi preparoli ilin kun vi. *So long. Good bye.*“

Post kiam tiu interkonsiliĝo kun la sinjoroj de la departemento pri terposedaĵo estis finita, oni serĉis denove en ĉiuj registroj en Meksiko, ĉu ne tamen ankoraŭ troviĝas fendeto, kie oni povus ataki la posedorajtojn de Hacinto Yanyez. Ne estis fendetoj. La posedorajtoj estis malnovaj kaj bonaj kaj ili ĉiuj estis renovigitaj laŭjure, se la leĝoj postulis tion.

La guberniestron de Jalapa oni denove urĝis ordoni la vendon de Rozo Blanka per precipa dekreto, kun la argumento, ke ŝtataj konsideroj pli alte rangas ol privataj rajtoj kaj ke pro ŝtata racio la vendo de Rozo Blanka estas ordigita. Helpe de *diputado*, do de deputito, kiun kondorkompanio gajnis por siaj interesoj, oni tuj lerte provis sugestoj al la guberniestro, kio estu la ŝtataj konsideroj.

La deputito sian versetojn bonege estis lerninta parkere, pli bone ol li subtenis sian propran edzinon, ĉar li ĉiam bezonis monon por io. Li provis klarigi al la guberniestro, ke la ŝtato nepre bezonas la enspezojn el la eksportdoganoj por la nafto, ke tiuj eksportdoganoj estas

vivkondiĉo de la ŝtato kaj de la tuta nacio. Pro tiu kaŭzo la produktado kaj la eksporto de nafto kun ĉiuj fortoj devas esti subtenata. La ĝenerala bonfarto pli alte rangas ol privataj rajtoj. Rozo Blanka eble entenas la plej riĉan naftokampon en Meksiko kaj guberniestro ja ne rajtas reteni la enspezojn el tiu nafto al la nacio pro malĝusta sinteno kaj pro respekto de la interesoj de kelkaj indiĝenaj familioj, kiuj transloĝigebus ien aliloken.

La deputito bonege estis lerninta parkere siajn versetojn, pli bone ol siajn ventajn kaj vantajn parolojn, kiujn li prezentis kutime en la *Camera de Diputados*, do en la meksika parlamento.

La guberniestro en Jalapa tamen ne lasis sin erarigi en sia opinio de la sentimentalaĉa deputito.

Li klarigis al la *advokato* Perez, kiu prezentis *Condor-Oil*-kompanion kiel ties agento en Meksiko kaj kiu estis antaŭsendinta la deputiton por fari pli klara la kazon: „Mi ankoraŭfoje ekzamenos la kazon precize. Ne estas mia intenco damaĝi al *Condor*-kompanio je kiu ajn maniero aŭ malfaciligi ilian seriozan laboron. Male, mi rigardas

ĝin mian tasko, tiom longe kiom mi estas ĉi tie guberniestro, akceli ĉiun produktadon, ĉu nafton, ĉu sukeron ĉu lignon aŭ kotonon aŭ fruktojn aŭ agrikulturon. Kaj ĉu temas pri fremda kompanio aŭ meksika, tio ĉi tie ne influas min. La konstituciajn rajtojn de ĉiu en Meksiko, ĉu civitano aŭ fremdulo, mi respektas. Mi promesas al vi, advokato, ke mi faros la plej bonan por helpi al *Condor*-kompanio ĉe la aĉeto de Rozo Blanka. Se mi povas konvinkiĝi, ke la posedo de Rozo Blanka por Kondor-kompanio nepre necesas, por akceli la produktadon de nafto. Mi tiukaze ankaŭ parolos kun *don* Hacinto kaj mi supozas, ke mi povas certigi, ke mi kapablas konvinki lin konsenti al la vendo de sia haciendo. Sed mi forgesas ja eĉ ne dum momento, ke ankaŭ *don* Hacinto havas rajtojn rilate al tiu ĉi afero, kiuj same tiel bone estas motivitaj, eble eĉ pli bone ol tiuj de Kondor-kompanio. Sed sen tio, ke mi precize ekzamenis la kontraŭon kaj malkontraŭon mi ne povas juĝi tion, kaj ankaŭ ne volas juĝi tion. Mi komprenas, ke ne nur temas pri *don* Hacinto mem, sed ke oni devas konsideri ĉi tie ankaŭ la sorton de sesdek aŭ sepdek meksikaj familioj.“

„Tiuj ĉiuj povas ricevi laboron ĉe Kondor-kompanio, aŭ ili povas esti transloĝigataj koste de la usona kompanio ien aliloken en la ŝtato“, interdiris *advokato* Perez.

„Certe oni povas fari tion“, diris la guberniestro. „Certe, *como no*, kial ne? Sed tiel simple tio tamen ne ŝajnas al mi. Tiurilate ne temas nur pri pure materia afero. Ankoraŭ aldoniĝas io tute anima. Ĉu vi ne atentis tion, *advokato?*“

„Mi ne scias, sinjoro guberniestro“, respondis sinjoro Perez, „kion vi opinias, kion vi celas.“

La guberniestro ridetis ironie. Li montris siajn brile blankajn dentojn, kiuj en la bruna vizaĝo brilis kiel eburo, kio pruvis, ke li heredis sufiĉe da indiĝena sango. Li diris: „*Don* Hacinto kaj la indiĝenaj familioj ja ne nur rezignas pri parceloj, kiuj anstataŭigeblus per terposedaĵo en alia regiono de la respubliko. Ili rezignas ja ankaŭ pri la tero, kiu estas ilia hejmlando, kiu estas la hejmlando de iliaj antaŭuloj, kiu en sia tero kovras la ostaron de iliaj honorataj patroj. Ili rezignas pri lando, kiu estis saturita kun la sango, kun la ŝvito, kun la esperoj, kun la malĝojo,

kun la ĝojoj de siaj gepatroj kaj de ili mem. Ili rezignas pri terpeco, kiu pro tiaj aferoj estas sankta al ili. Tiel sankta kiel por mi estas mia patrino, mia patro, mia edzino kaj miaj infanoj.“

Post pli longa paŭzo, en kiu nek sinjoro Perez, nek la guberniestro diris ion, la guberniestro ree paŝis al sia skribtablo kaj diris tre sobre: „Nu, do, advokato, kiel mi diris: Mi volonte estas komplezema al vi, pro malnova lerneja amikeco, kaj mi volonte pretas esti kompleza al la usona kompanio, se tio lasas akordiĝi kun tio, kion mi mem pensas ĝusta. Sed mi tamen volas diri jam nun al vi – kaj tio validu – ke tiukaze, se la kompanio ne havas tre bonajn kialojn, ke mi en tiu afero ne intencas ordoni ion, ke mi tion tiukaze lasas decidi *don* Hacinton mem, kion li volas fari. Li havas la rajton vendi aŭ ne vendi. Se oni povas konvinki min, ke la vendo de Rozo Blanka estas necesa laŭ ŝtatintereso, jen ni plu okupiĝos pri ĉio tio. Sed, se mi ne povas konvinki min de tiu neceso, jen mi fermos la kazon, laŭ la respondeco, laŭ kiu mi aŭ la ŝtato Verakruco estas koncernataj. Kion faras la familio, Perez? Ĉu Maria jam trapasis la ekzamenon de la medicino?“

„Ha, ankoraŭ ne. Ŝi ankoraŭ devas studi du jarojn. Mia edzino estas en Guadalajara ĉe mia bofratino.“

„Miajn salutojn, Perez. *Adios. Adios.*“

La sinjoroj skuis reciproke tre afable la manojn kaj *advokato* Perez forlasis la registaran konstruejon en tiu konscio, ke li estas venkinta.

Li telegrafis al la ĉefkomandejo de la kompanio en San Francisco:“ Guberniestro koncerne Rozo Blanka gajnita, ankoraŭ iom paciencu.

Post la forlaso de advokato Perez la guberniestro faris kelkajn notojn sur sia bloko, tiam li premis butonon el multnombraj butonoj de la sonorilsistemo kaj akceptis la ceterajn vizitantojn, kiuj anonciĝis je personaj konversacioj. Venis estroj de usonaj, meksikaj, britlandaj kaj nederlandaj kompanioj, venis laboristoj en laborkostumoj, venis sekretarioj kaj prezentantoj de laboristaj sindikatoj. Venis indiĝenoj el foraj regionoj de la ŝtato, venis instruistoj, inĝenieroj, arkitektoj, oficistoj de la elektraĵ societoj.

Tiel la guberniestro rapide forgesis Rozon Blankan.

Je sabato li vojaĝis al politika konferenco en Meksikurbo, konferenco, kiu estis kunvokita de la prezidanto de la respubliko. En tiu konferenco oni parolis ankaŭ pri tio, ke oni baldaŭ devos pensi pri tio, ke la paragrafoj de la konstitucio, kiuj estis kreitaj pere de la popolrevolucio, finfine ekvalidu, precipe tiuj paragrafoj, kiuj okupiĝas pri la tiraneco de la katolika eklezio kaj tiuj, kiuj deklaras la naturriĉon de la lando, precipe la nafton kiel

popolpropraĵon.

Jen la guberniestro ree memoris pri Rozo Blanka. Li denove notis ion en sia taglibro kaj substrekis ĝin plurfoje.

Revenante lunde li tuj lasis alporti al si ĉiujn aktuojn, kiuj havis rilaton kun Kondor-kompanio. Li vokis inĝenieron de la laboroficejo por kunlaboro al si. Kun li li studis ĉiujn planojn de la terposedaĵoj, kiujn posedas la kompanio, ili nombris la putojn, studis la statistikojn de ĝia produktado, ĝiajn produktantajn kaj mortajn putojn, ili studis ĉiujn parcelojn, kie la kompanio momente boris pro nafto kaj ĉiujn parcelojn, kie la kompanio ne boris, ili prikalkulis ĉiujn rezervojn kun naftohava terposedaĵo, kiuj tiam apartenis al la kompanio, kaj ĉiujn rezervojn je pridubinda terposedo, kiun la kompanio tiam havis sub sia kontrolo. Li notis ĉion bone, kaj tion, kion li ne sufiĉe bone komprenis, tion li lasis detale klarigi al si de la inĝeniero, kies precipa tasko por la registaro estis la gardado, kontrolado kaj inspektado de la naftokampoj.

Je la sekva vendredo li anoncis, ke li forpermesos tri

tagojn por inspektadoj kaj vojaĝis kun sia servisto al la haciendo Rozo Blanka por konatiĝi kun *don* Hacinto, aŭskulti ties opinion kaj por vidi la haciendon.

Li restadis du noktojn kaj duonon de tago sur la haciendo, manĝis kun Hacinto ĉe la sama tablo la saman simplan manĝon, kiun manĝis Hacinto, dormis en la lito, kiun oni povis prezenti al li, lito kies matracoj estis nur lignotabuloj, sur kiujn oni metis du el la kutimaj *petates*, do fragmitajn matojn. Pli bonan Rozo Blanka ne povis prezenti al li, ĉar ĝi ne havis pli bonan, pli bonan ĝi ne bezonis, pli bonan ĝi ne havis ekde pli ol kelkaj cent pasintaj jaroj. Pli bonan ĝi ne volis havi; ĉar ĝi estis tute feliĉa pri tio, kion ĝi havis.

La guberniestro vizitis kun Hacinto kaj Margarito ĉiujn familiojn, kiuj loĝis tiam sur la haciendo, iris en ĉiujn kabanajn, parolis kun ĉiuj homoj, karesis la infanojn, prenis tiun aŭ ĉi tiun sur brakon, donis al ili sukeraĵojn kaj moneretojn. Se li pasis kabanon por iri al la sekva, sekvis lin la tuta familio. Tiel iris de unu domo al alia, ĝis li, atinginte la lastan kabanon, havis post si ĉiujn familiojn de la haciendo, kun ĉiuj infanoj, hundoj,

azenidoj kaj porkoj.

Neniu en la tuta haciendo, ankaŭ ne Hacinto kaj Margarito, lacigis lin per tio, post ĉiu dua vorto diri 'sinjoro guberniestro', neniu diris flateman vorton al li, neniu provis kapti favoron, neniu penis ridetigi lin.

Sed en ĉiu kabano, en kiun li eniris, renkonte venis la dommastro al li, se li ne jam staris antaŭ la pordo, kapklinis kaj diris simple: „*A sus ordenas, Señor*, mi estas je via servo, sinjoro; la domo, en kiu vi troviĝas estas via domo.“

La dommastrino, ĉiam kun nuda infano surbrake, plukis tuj florojn kaj donis ilin al unu el la pli grandaj nudaj kaj je duono nudaj infanoj ĉirkaŭkurantaj, por ke tiu transdonu ilin al la guberniestro. Tiam la guberniestro, sekvata de ĉiuj iris en aro tra la kampoj de Rozo Blanka, rigardis la maizon la sukerkanon, la oranĝo- kaj citronplantejon, la *trapiĉe*, la elpregon, el kiu la sukerkano estis preme eligata, la kotonkampon, la papajoplantejon, la bananplantejon, la paŝtejon, kie la bovinoj staris, la muloj, la ĉevaloj, la azenoj. Ankaŭ la

papagon, kiu havis hidan porkon kiel amikon kaj kvereladis kun la aliaj porkoj, li devis rigardi ĉion, kio videblas, kaj li rigardis ĉion al si. Li rigardis ĉion tiel, kvazaŭ li troviĝus en ferioj kaj nenie en la mondo estis postlasinta oficon, kiu faras multajn zorgojn, kiu postulas multan laboron, kiu elvokas multe da envio kaj ĝojigas malmulte.

La guberniestro estis naskita kaj plenkreskinta en urbego. Li ĉiam vivis nur en la urbego, studis en Meksikurbo. De tempo al tempo oni invitis lin al amikoj, al la haciendoj de riĉaj meksikanoj, kiuj vivas simile al lordoj sur siaj terposedo. Sed pli ofte ili estas urbeganoj ol kamparanoj, kaj ili pasigas pli da semajnoj dum jaro en Meksikurbo, en Puebla, en Queretaro aŭ en San Luis Potosi ol sur sia haciendo, kies gvidadon ili translasas al sia *mayordomo*, al la mastro por domo kaj korto.

Je la unua fojo en sia vivo li nun estis sur haciendo, kies posedanto estas indiĝeno, kaj kie ĉiuj homoj, kiuj tie vivis, estas inidiĝenoj.

Okazis tute neatendite, ke subite moviĝis en li la

indiĝeno, kiu estis kvazaŭ en lia sango. Ĉar, kvankam li estis edukita kiel edukita usonano, kvankam li estis vestita kiel ĉiu usona urbegano, kvankam li vivis kiel ĉiu civilizita homo vivas en urbego, lia haŭtkoloro, la koloro kaj la melankolio de siaj okuloj, la koloro kaj fasketeco de lia hararo tamen tiom similis al tiu de Hacinto, ke ili aspektis, kvazaŭ la sama patrino estus naskinta ilin. La blanka sango, kiun li havis de hispanaj antaŭuloj en siaj vejnoj, ne estis sufiĉe forta montri eĉ nur spureton je li. La praraso de la kontinento estis tiel potenca, ke ĝi ensorbis la tutan fremdan eŭropan sangon, kiu estis en li, tiel, kiel ĝi sorbas ĉiun fremdan sangon iom post iom, kiu estas naskata ĉi tie. La fremda sango ja ne nur submetiĝas al la influo de la indiĝena sango per miksaĵo dum generado, sed ĝi submetiĝas ankaŭ al la influoj de la klimato, de la akvo kaj de la nutraĵoj, kiuj dum jarmiloj kreis la proprecon kaj unikecon de la indiĝena raso.

Kaj ĉar la indiĝeno moviĝis en li, validigis sin en tiu regiono, tial li nun kaj tie komencis senti kaj percepti kun la indiĝenoj. Aĵojn, kiujn li antaŭe ne komprenis, li nun komencis kompreni laŭsente kaj anime.

Kiam li estis parolinta al advokato Perez pri la hejmlando kaj la hemjlandaj rajtoj de la homoj sur Rozo Blanka, jen li parolis tute teorie pri la hejmlando. Tiel kiel oni ekzemple parolas pri la hejmlando en leĝoparagrafoj, per kiuj estu fiksata la nacieco kaj ŝtataneco de individuoj. La hejmlando en tiu kazo estis abstrakta nocio, kiu lasis esprimi sin per dokumentoj, per eltiraĵoj el la naskoregistro, kiu estis konfirmita kaj limigita, tute hazarda afero, kiu influeblis pere de la loĝloka ŝanĝo de la gepatroj kaj ankaŭ per intencaj kaj senintencaj eraroj en la registroj.

Sed nun ĉi tie la guberniestro rigardis la nocion hejmlando de flanko, kiu ĝis tiam estis fremda al li. Tiu hejmlando per leĝoj, per registroj nek difineblis nek influeblis. Tiu hejmlando estas afero de la animo. Tiu hejmlando estis io, kio kreis la homon. Urbeganon tiel kiel multajn kamparanojn kaj farmbienistojn oni povas transmeti en alian urbegon aŭ en alian farmon, kaj ili tuj ree estas hejme. Sed ĉie tie la homoj estis tiom unuiĝintaj kun la tero, ke ili ĉesis esti homoj, se oni elradikigis ilin el tiu hejmlando.

Tiel la la guberniestro, pro sia indiĝena sango, venis al la konvinko, ke neniŭ nafto surtere, neniŭ aŭtomobilo, neniŭ dizelmotoro estas sufiĉe valora por ŝanĝi ĝin kontraŭ la hejmlandon. Nafto kaj aŭtomobiloj kaj flugaparatoj estas belaj aĵoj, kiuj multe utilas al la homoj kaj multe plifaciligas ilian laboron; sed kion signifas al la homoj, precipe al tiuj tie, nafto kaj motoroj, se ili faras ilin kiel estaĵojn kaj anime multe pli povraj ol ili estas kun la hejmlando kiel vivbazon? Kun tiu hejmlando, kiu estas por li la esenco de ĉio, kio estas ĝojo, feliĉo, kontenteco, trankvilo, vivsekureco, amo, poezio, arto, religio, dia estaĵo, paradizo.

Ni ĉiuj, ni kompatinduloj ĝojas pri maŝinoj, pri aviadiloj, pri radioaparato, pri kinejo el la foro nur tial, ĉar ni perdis nian hejmlandon. La perdo de la hejmlando, postlasis nin obtuzigita kaj disŝirita. Por obtuzigi nin, por ne konsciiĝi pri nia perdo, pri nia doloro, tial ni bezonas gazolinon, kiu antaŭsorĉas nin rapidecon, por ke ni povu fuĝi pli rapide de ni mem kaj de niaj koraj bezonoj.

Ĉio ĉi nun tie konsciiĝis al la guberniestro. Ĉar li havis indiĝenan sangon kaj en sia sango ankoraŭ pli proksimis

al la hejmlando ol la blankuloj, kiuj perdis sian hejmlandon jam de jarmiloj, kaj de tiam senhalte ĉirkaŭhastas en la mondo, ĉiam pelataj kaj hastigataj, neniam havante tempon, neniam gajnante tempon, ĉu ili konstruas fervojojn kaj eksprestrajnojn, aŭ ĉu ili konstruas aviadilojn aŭ sendratan telefonon. Ili fariĝas ĉiam pli kaj pli senhaltaj, ĉiam pli pelataj, ili havas des malpli kaj des malpli da tempo ju pli ofte ili eltrovas ion por gajni tempon. Pelate de unu kontinento al alia, de Azio al Eŭropo, de Eŭropo al Usono, de Ameriko ree al Azio. Krome ili bezonas militirojn kaj mondmilitojn, por trovi novan hejmlandon. Kaj ĉiuj sciencistoj serĉas kaj serĉas vane por trovi, kie estas la hejmlando de la blankuloj.

Kaj la guberniestro interparolis kun Hacinto kaj Margarito kaj kun la ceteraj viroj. Li parolis kun ili kvazaŭ li estus konanta ilin de dek mil da jaroj. Li komprenis ĉion, kion ili diris kaj komprenis ĉion. Li komencis cii ĉiun. Li trinkis kun ili tekilon kaj *habaneron* el la sama botelo, kiu moviĝis de buŝo al buŝo.

Li, la indiĝeno, estis retrovinta hejmen, li aŭdis paroli

sian animon la unuan fojon al si, li havis la unuan fojon en sia vivo la konscion, ke li estas hejme, li estis la unuan fojon en sia vivo vere feliĉa, kontenta kaj kuraĝis senzorge ĝojante, kiel iu, kiu ne timas zorgojn.

Li detiris la elegantajn brunajn ŝuojn de la piedoj kaj lasis doni al si de Hacinto paron da malnovaj sandaloj. Li detiris la jakon, malbutonumis la kolon, ŝovis la kapon tra la fendo de tilmo kaj ĵetis ĝin sur sin mem. Li rulis al si cigaredojn el maizfolioj. Li manĝis tortiljojn kaj *frijoles*, fazeolojn. Li tiris la viandon de la bakitaj kokinetoj per la fingroj kaj trempis ĝin en la ruĝe brunan kreman saŭcon. Laŭ indiĝena maniero li pinĉprenis la salon per la fingroj kaj ŝovis ĝin tiel en la buŝon. Li demordis grandajn pecojn de la verda akra kapsiko kaj trinkis la kafon nigra kaj dolĉigita per la bruna kruda sukero, kiu estis produktata sur la haciendo.

La guberniestro devis rajdi ĉiujn ĉevalojn por diri, kiu estas la plej bona el ili.

Se la guberniestro estis en la urbo kun siaj amikoj, kaj se oni ne interparolis pri politiko, jen post certa tempo nek li

nek liaj amikoj sciis kion paroli plu. Kaj ĉar oni ne volis paroli sensencaĵon kaj ne disvastigi kaj elfetori klaĉon, la guberniestro kaj liaj amikoj sentis sin ĉiam sufiĉe senhelpaj. Tiam oni devis helpi sin per domenludo aŭ per ŝako aŭ bilardo aŭ per ludkartoj; ĉar oni ne sciis, kion komenci kun si kaj siaj amikoj kaj tamen ne volis fariĝi kompleta ŝtipkapulo.

Ĉi tie, en Rozo Blanka la guberniestro eĉ ne dum minuto ekdeziris domemon aŭ ludkartojn.

Li sidis kun Hacinto kaj Margarito en balancseĝoj en la portiko. Ĉiuj viroj de la haciendo ĉeestis. Kelkaj sidis sur la lignoŝtuparo, kiu kondukis de la kortego en la portikon, aliaj kaŭris sur la tersurfaco antaŭ la ŝtuparo, kaj aliaj kaŭris en la portiko sur la planko el diloj, pliaj sidis sur la balustrado de la portiko, kaj pliaj apogis sin kontraŭ la kolonoj. Ili ne miksiĝis en la interparoladon, kiun la tri viroj, balanciĝante en la seĝoj, kune havis. Ili aŭskultis nur por aŭskulti kaj por ekscii ion. Ifoje unu el la aŭskultantaj viroj flustris ion al alia viro. De tempo al tempo Hacinto aŭ Margarito alvokis unu el la viroj por demandi ilin pri io, kio koncernis la interparoladon,

sciigon pri la muloj, pri la brutaro, pri familio kaj kio plu estis en la vivo sur la haciendo.

La aĵojn, pri kiuj la guberniestro parolis kun Hacinto kaj Margarito, estis tiel prae simplaj, kiaj aferoj entute povas esti. Ili parolis pri maizo, pri sukero, pri salo, pri la prezo por bovoj kaj porkoj, pri ligno kaj arbaro, pri bonaj kaj malbonaj paŝtejoj, pri la gajno en aliaj haciendoj, pri la kvanto de la infanoj, kiujn havis diversaj familioj, pri malsanoj de certa viro aŭ de certa ino, pri kuraciloj por bovoj, ĉevaloj kaj muloj, pri la konsisto de la proksimaj vojoj, pri la longa distanco de la lernejo por tiuj infanoj, kiuj nur senregule frekventis la lernejon, pri la fakto, ke Hacinto ankoraŭ en la sama jaro volas konstrui lernejon sur la haciendo kaj, ke li pagos la instruiston, pri vetero, pri la kvanto de pluvo, pri sekeco, pri la pumoj, kiuj faŭkadas en la ĝangalo kaj de tempo al tempo fortrenis bovidon aŭ kaprinon, pri moskitoj, pri *henequen*, henekenon, kiun oni ekplantis kaj de kies fibroj oni faris de tiam sur la haciendo ĉiujn ŝnuregojn kaj lazojn kaj jam eĉ vendis la troajn kiel varon, kaj pri tio, kio krome okazas kaj sinsekvas sur granda haciendo.

Per neniŭ vorto la homoj parolis pri politiko. Ĉu *don* Manuel ĉu *don* Justo estis la prezidanto de la respubliko, pri tio zorgis tie neniŭ homo; ĉu la usonanoj intencis enmarŝi en la respublikon aŭ ĉu ili fanfaronas en la havenoj de Nikaragvo per kirasŝipoj kaj tie ekpafas kanonojn, tio estis por la homoj en la haciendo sen iu intereso. Ilia hejmlando ne estis la meksika respubliko, ilia hejmlando estis Rozo Blanka; kaj la aferoj, kiuj ne iel rilatis al Rozo Blanka, ne ekzistis por la homoj.

Tamen, spite al tio, ke ŝajnis kvazaŭ la viroj havus neniujn pliajn interesojn, kiuj etendiĝas trans ties vasta hejmlando, iliaj paroloj iafoje estis tiom plenaj de saĝo kaj de filozofio, ke la guberniestro pli ol nur unu fojon ekatentis, kaj kompare al tiuj paroloj trovis la opiniojn, kiujn li ie aŭskultis kaj legis, sufiĉe bagatelaj kaj sensignifaj, ne validaj por pripensado.

Tie li devis pensi ĉiam. Tute nova mondo malfermiĝis antaŭ li. Mondo, pri kies ekzisto li sciis nenion, kvankam li supozis, ke li studis ĉion, kio ekzistas surtere kaj en libroj. Ĉio tie estis simpla kaj natura. Ĉio tuj kompreneblis, ĉar ĉio radikis en naturaj aĵoj kaj okazaĵoj.

Nenio ŝajne estis komplika. Nenio estis vualita kaj kamuflita de paragrafoj, de formalajtoj kaj decidoj en la parlamentoj kaj superaj kortumoj. Tie ne estis leĝoj, neniuj kateĥismoj, neniuj statutoj, neniuj partiprogramoj. Kaj tamen la homoj tie vivis, kaj tamen ĉio iris sian vojon. Nenie estis kunpuŝiĝo, nenie konfuziĝo, nenie malklareco. La inoj ricevis ĉiuj multajn infanojn. Por ĉiuj estis nutraĵoj kaj ĉiuj plenkreskis, se ili estis transvivintaj la unuajn jarojn. Tie ne ekzistis problemoj. Tie ne ekzistis socialaj demandoj. Tie estis nek riĉuloj nek povruloj, nek ekspluatistoj nek sklavoj, kaj se vere ekestis kverelo, ĝi radikis en tiel simplaj kaŭzoj, ke unu vorto de Hacinto finis kaj decidis la kverelon tiel, ke ĉiuj agnoskis lian decidon kiel la solan kaj ĝustan. Tie ne ekzistis maljusteco, ĉar la justeco estis natura kaj memkomprenebla, ĉar neniuj pensadis pri justeco, ĉar la nocioj pri justeco kaj maljusteco tie tute mankis kaj ne povis evoluigi.

Rimarkoj

dilo = masiva plankobreto

frijoles = fazeoloj

henequen = speco de agavo, kies fibroj estas uzata por la

produktado de ŝnuregoj kaj lazoj

tilma = tilmo estas kruda kotona mantelo uzata de indiĝenaj

meksikaj kampuloj, nodita sur unu ŝultro

tortillas = tortiljoj, rostitaj maizoflanoj el muelitaj kaj kaĉigitaj
maizograjnoj, maizaj kukoj, maizaj panetoj

Vespere, kiam la nokto estis nigra, oni bruligis sur altarsimila bloko de ŝtonoj troviĝanta en la mezo de la korto grandan stakon da ligno, kiu iluminis la vastan placon de la hacienda korto. Tiel oni faris tion de multaj centoj de jaroj.

Tiam ĉiuj familioj kunvenis por danci.

Kelkaj viroj de la haciendo ludis sur violonoj, gitaroj kaj flutoj la dancmuzikon. Dum la dancoj plej ofte kantis tiuj, kiuj faris la muzikon kaj kelkaj el tiuj, kiuj ne dancis.

Ĉirkaŭ noktomezo aŭ iam tiam ĉiuj viroj kaj inoj komencis kanti sen danci ĉe tio.

Kaj tiam ili kantis sian nacian himnon, la kanton de sia hejmlando, la kantadon pri la hejmlanda ranĉo, la kanton pri Rozo Blanka, kiu proksime de la Barranca floras tiom familiara kaj paca de pratempoj.

*Se diros mi velkinta „ĝis“,
Rozo Blanka, vi plu floru.*

*Mia lasta viva spir'
estu la adiaŭkis'.*

La homoj kviete staris dum certa tempo, iluminate de la flagranta fajro de la altaro.

Tiam ili komencis pro urĝa sento ripeti ankoraŭfoje la lastan kantadon, akompanataj de la simpla muziko de la violonoj, gitaroj kaj flutoj:

*Cuándo llame la muerte a mi
Pensaré en ti mi Rosa Blanca
Y mi ultimo suspiro
Lleve dulces besos para ti.*

Hacinto kaj Margarito estis kunkantintaj la kanton. La lastan kantadon, kiam ĝi estis ripetata, kunkantis ankaŭ la guberniestro. Kaj kiam li kantis, li pensis, ke tiu himno estas same tiom bela, kiom la nacia himno de la meksika popolo. Kaj li pensis, ke la propra kanto pli esprimas ol la brile bela himno de la respubliko, kiu estas dolĉa kaj pasia samtempe, estas vere, sed tamen ne elspiras la pacon de tiu simpla kantado tiea, ĉar ĝi komenciĝas per tondranta militkriado, kiu ĉiujn gefilojn de la respubliko

alvokas al tio defendi sian belan landon kontraŭ la malamiko, kiu volas distreti ĝin.

Se la meksikanoj havus kiel popolo tiun fratecan amon, kiu unuigis tiujn homojn tie sur Rozo Blanka al familio, ili bezonus timi nek usonanojn nek britlandanojn; ĉar ili tiukaze estus pli sekuraj ol kun soldatoj kaj kanonoj. Ĉar neniuj fremda militarmeoj povas enpenetri vaste sur meksika tero, se ĝi ne trovas kunaliancinojn inter la meksikanoj mem. Tiel estis, kiam Cortes enmarŝis en Meksikon, tiel estis kiam MacMahon envenis en la landon, kaj tiel estis, kiam la usonanoj venis al Chapultepec kaj sepdek jarojn pli poste al Verakruco. La malamiko de la meksika popolo, lia plej granda malamiko sidas en la lando kaj ne ekstere. Tion pensis la guberniestro, kiam la hejmlanda kanto finfine elsonis estis kaj la homoj ree ekdancis.

La danco daŭris ĝis la unua eklumo de la matena stelo.

La guberniestro dancis kun la inoj kaj knabinoj.

Li forgesis balojn, parlamentparolojn, registarajn

negocojn kaj naftokompaniojn. Ĉio ĉi ne plu ekzistis en la mondo.

Estis nur plu en la mondo: danco, muziko, dolĉaj kantoj.
Estis nur plu surtere, iluminataj de ruĝe flava flagranta fajro, blanke vestitaj viroj kaj inoj en buntaj jupeoj kaj blankaj jakoj riĉe ornamitaj kun ruĝaj, verdaj, flavaj folioj kaj ornamitaj grimpotigoj. Estis nur plu ridantaj, dancantaj kaj ŝvitantaj inoj kun profunde nigraj okuloj, kun nuda bruna kolo kaj nudaj brunaj fortaj brakoj. Nur plu plenkreskiĝinaj inoj kaj knabinoj kun brilaj ĝojaj okuloj kaj kun lumantaj floroj kaj ruĝaj lanorubandoj plektitaj en la tre nigran dikan hararon .

Estis nur plu kantado en la mondo, nur plu ĝojo, senzorgemo, kontenteco, sekureco, flagranta fajro sur ŝtonaltaro.

Hejmlando kaj hejmlando. Nenio krom hejmlando.

Rimarko

Barranca = en Meksiko ĝi estas nomata ankaŭ la Kupra
Ravino aŭ Copper Canyon = montara formacio de la okcidenta
Sierra Madre.

La guberniestro estis reveninta al Jalapa.

Li ordonis, ke la advokato Perez venu al aŭdienco.

Kaj li diris al li: „Mi ankoraŭfoje precize ekzamenis la kazon *Condor Oil*. Inĝeniero Ramirez de la industria kaj labora departementoj helpis al mi. Li scias ĉiujn aktaĵojn kaj planojn. Ni konstatis la sekvan: *Condor Oil* estas laŭ grandeco la dua kompanio en Meksiko, se temas pri posedo kaj lizado de naftoterenoj. La kompanio ĝis nun nur kvardekono de siaj terposedaĵoj uzas por produktado kaj borado. Eĉ se la kompanio plu laborus en la sama rapideco kiel nun, kion mi ne supozas, ĝi havus ankoraŭ terposedaĵon por pliaj kvindek jaroj je sia dispono kaj sub kontrolo por produkti tiom da nafto, kiom ĝi bezonas. Do ne estas necese ankoraŭ pli da terposedaĵo – kaj nun eĉ devige – transŝovi al ĝi, por teni ĝin laborkapabla kaj produktiva. Ĝi ankoraŭ tute ne komencis prilabori eĉ nur dudekonon de tiuj el siaj naftokampoj, kiuj ne estas dubindaj kampoj, sed tutcertaj kaj tre produktivaj naftokampoj. Ni konstatis, ke la

kompanio eĉ ne ekboris tiujn kampojn, kiujn ĝi devus ekbori kaŭze de la koncesio, kiu estis koncedita al ĝi. Ni havas la rajton forpreni tiujn kampojn de ĝi kaj libere disponigi ilin al aliaj agopretaj kompanioj aŭ por la nacia produktado, ĉar ĝi ne plenumis la koncesiajn kondiĉojn. Ni provizore ankoraŭ ne pensas pri tio devigi ĝin al la plenumo de la koncesiaj devigoj por ne vekti la ŝajnon en Usono, kvazaŭ ni malfaciligus al fremdaj kompanioj la laboradon. *Condor Oil* do ne bezonas Rozon Blankan. Alia kompanio ne povas anstataŭi Kondor-kompanion, ĉar tiu ĉiun terposedon ĉirkaŭ Rozo Blanka tenas sub kontrolo kun siaj lizadoj, se tiu ne estas jam la posedo de *Condor Oil*.

Pro tiuj cirkonstancoj mi ne povas, eĉ se mi volus esti komplezema al vi kaj al Kondorkompanio, preteksti ŝtatan intereson por dekreti la vendon de Rozo Blanka. Tio estus maljusta kaj malvera.

Krome: La sama ŝtatintereso, kiun *Condor Oil* volas uzi kiel argumenton por levi sian produktadon, tiu sama ŝtatintereso devigas min lasi Rozon Blankan en la posedo, en kiu ĝi troviĝas hodiaŭ kaj jam dum centoj de jaroj. La

posedanto ne intencas vendi la haciendon. Kaj la ŝtatintereso pli devigas nin konservi Rozon Blankan kaj protekti ĝin kun ĉiuj fortoj de l' ŝtato ol transdoni ĝin por la produktado de nafto. *Condor Oil* kompanio estas registrita en Meksiko, sed ties akciuloj estas krom unu, kiun mi nomu la laŭleĝan meksikan akciulon, neniuj meksikaj civitanoj. Male al tio ĉiuj homoj, kiuj vivas sur Rozo Blanka kaj vivas de ĝi, estas meksikaj civitanoj, al kiuj ni ne rajtas forpreni la hejmlandon pro la sama ŝtatintereso, kiun Kondor-kompanio uzas kiel argumenton je sia favoro, estas ja hejmlando, je kiu ili havas konstitucian rajton en sia respubliko.

Kompreneble, se estus la kazo, ke la nafto abunde troviĝanta laŭ la indikoj de la geologoj en la Roza Blanka, nepre estus bezonata kaj ne sufiĉe da nafto povus estis havigata el la terposedaĵoj kontrolataj de la naftokompanioj, tiukaze oni devus oferi Rozon Blankan. Tia kazo tiu ne estas. Laŭ homa konsidero tia kazo ne eblos en la sekvaj kvindek jaroj. Kaj, se ĝi efektive iam realiĝos post kvindek jaroj, jen tio ne estas tasko mia decidi tion, kio tiam okazu kaj ne estas la tasko de la

federacia registaro. Tiam estos sufiĉe da tempo decidi la kazon kaj mi translasas la decidon al tiuj viroj, kiuj tiam vivos kaj regos. Kaj pro tio, kara *licenciado*, la kazo Rozo Blanka estas por mi finita, kaj tiom longe, kiom mi estas en la ofico, ankaŭ por la meksika registaro. Se la kompanio tamen atingas la aĉeton de Rozo Blanka de *don Hacinto* je privata maniero, jen tio estas afero, kiu iros trans miajn rajtojn kaj kompetenton. La registaro ĉiukaze ne povas ordoni ion tiurilate kaj ne ordonos ion.“

„Nu, jes“, diris la advokato Perez, „tiukaze *Condor Oil* do devas rezigni pri la ideo. Mi faris, kion mi povis fari.“

La guberniestro ekstaris, paŝis ĉirkaŭ la tablon kaj renkonte iris tute proksime al la advokato Perez. Li perfinge tuŝete puŝis lin afable sur la bruston kaj diris: „Jen tio, Perez, kion mi devis diri al vi oficiale. Kaj tio estas tio, kio kiel findokumento retroviĝos en la aktoj, koncerne ka kazon *Condor Oil Company* kaj Rozo Blanka. Persone mi volas diri tion al vi: Lasu la fingrojn for de Rozo Blanka. Estus domaĝe pri ĝi, se oni rompus ĝin, kaj se ĝi ŝanĝiĝus en fetorantan, bruantan naftokampon. Mi estis tie antaŭ ne longe. Ĝi estas juvelo.

Kaj loĝas homoj tie, indiĝenoj, mirindaj homoj, kiuj fariĝus friponoj kaj banditoj, se ili ne plu havus Rozon Blankan. Ni havas ja sufiĉe de tiaj kazoj en la respubliko. Ja kiuj estas ĉiuj ĉi banditoj kaj elrabistoj de trajnoj, kiujn ni havas? Ili ĉiuj estas homoj, kiuj perdis iun Rozon Blankan, kaj kiuj nun ne plu scias, kion ili faru kun si, kiuj en la urboj aĉiĝas kaj fiiĝas kaj tiam elprovas la plej malkaran elirvojon por teni sin vivaj, ili do ŝtelus kaj murdus. Krome ankoraŭ ion alia, povas veni la tago, ke ni, la meksikanoj bezonas nafton kaj ne scias, kie ni povas akiri ĝin, ĉar la gringoj tenas ĉion en la manoj. Tiam Rozo Blanka eble povos savi nin, povas esti eble eĉ nia lasta savo, ĉar la viroj antaŭ ni, precipe la kojoto Porfirio Diaz, vendis kaj ŝakris la landon. Tiam oni oferu Rozon Blankan, tiam oni oferu malgrandan hejmlandon, por ke pli granda hejmlando, la respubliko, la hejmlando de la meksika popolo, estu konservata. Jes, tio – tio estus do ĉio, kara *licenciado*. Se mi krome povas fari ion por vi, vi ja scias, vi ĉiam povas certi pri mia subteno.“

Perez iris rekte al *Western Union office* kaj skribis la telegramon por San Francisko: „Rozo Blanka perdita.“

Kiam li volis transdoni la telegramon al la oficisto, staris tie usona gazetisto, kiu volis sendi sufiĉe longan telegramon al *A.P. - Associated Press*, al Telegrafa Servo de la Unuiĝintaj Usonaj Gazetoj – kaj intertraktis kun oficisto en la angla la prezon por la telegramo.

Advokato Perez sentis sin subite kiel meksikano, kion li ŝajne longe estis forgesinta, ĉar Kondor-kompanio tre bone pagis lin.

Li diŝsiris la formularon kaj skribis novan.

Ĝi nun tekstis tiel: „Rozo Blanka *out*.“

Per tio li volis diri, ke Rozo Blanka tute ne plu gajneblis en la konkurso.

Kvankam li mem ne faris ion por ĝia konservado, li nun tamen sentis kvietan ĝojon, ke Rozo Blanka estis gajnita

por Meksiko.

Rimarko

out = ne plu atingebla

Ses tagojn poste li ricevis leteron de la ĉefkomandejo de *Condor Oil*, en kiu oni rekomendis al li transdoni lertmaniere centmil dolarojn al la guberniestro, se necesas, ankaŭ cent kvindek mil dolaroj estus je dispono laŭ la letero. Du ĉekoj troviĝis en la letero.

Perez respondis tuj kaj konsilis al Kondor-kompanio ne riski kiajn ajn subaĉetprovojn rilate la guberniestron, ili tiel povas nur perdi, kaj li povus tre fie reagi al ili, ĉar li ne estas de tiu speco, kiun oni montras en Usono en filmoj kaj en kiĉromanoj.

Tiam li verkis duan leteron, en kiu li sciigis al la kompanio, ke li finas sian oficon kiel meksika advokato de Kondorkompanio, ĉar li estas tro ŝargata kun aliaj negocoj.

Skribinte la leteron kaj metinte ĝin en la koverton, li pripensis certan tempon.

Tiam li diris al si: „Tio estus stultaĵo. Se mi volas helpi kaj havi influon, mi devas plu partopreni kaj ne rajtas forlasi

la kompanion. Se mi elirus, mi estus tute sen potenco. Tiukaze eble ĉasanto de seksmatraculinoj, kiu disipas sian tempon kaj sian monon en la kabaredoj, transprenos la oficon. Kaj por povi aranĝigi kun siaj inaĉoj kaj siaj konjakboteloj, li ĉiam ĉasas dolarojn kaj vendas sian animon kaj la animon de ĉiuj aliaj kaj faras ĉion, kion tiuj tie komandas, ĉu honoro, ĉu ne honoro.“

Li disŝiris la ekŝigan leteron kaj estis plu la advokato de la kompanio. Sed en la alian leteron li ankoraŭ enskribis, ke li urĝe konsilas lasi Rozon Blankan ekster konsidero, ĉar la ĝenerala opinio en la lando rilate al fremdaj naftokompanioj kaj iliaj manipuladoj momente ne estas tre favora.

Kiam *Mr. Collins* legis la leteron, li diris al sia unua vicprezidanto: „Tiu *advokato Perez* estas unu el la plej bonaj advokatoj, kiujn ni povas havi tie en Meksiko. Li havas bonegajn kontaktojn al la registaro kaj al la tri guberniestroj, kiujn ni bezonas en la negoco. Li estas prudenta ulo. Diplomato. Sed li ne estas sufiĉe fridasanga. Por certaj aferoj li ne uzeblas. Ni prefere engaĝu al ni krome trotuarrandpoluriston, fiadvokaton,

angulstaranton, kiu komprenas kiel premi la dikfingran najlon sur maleolan tendenon. Mi pensos pri tio.“

ĈAPITRO 09

01

Kiu ne konis pli bone *Mr. Chaney Collins*, tiu povus supozi, ke li rezignis pri Rozo Blanka kaj forgesis ĝin, ĉar li ne ekscitiĝis, kiam alvenis la telegramoj kaj leteroj de sinjoro Perez. La tuta ekscitiĝo, kiun li intencis dediĉi al Rozo Blanka, esprimis sin en tiu tago, kiam alvenis la informo de sinjoro Perez, ke Hacinto ne volas vendi la haciendon, eĉ ne por la fantaziprezco ofertita al li. En tiu ekscitiga horo, kiam ŝarĝis lin la miliono kaj kvincent mil da dolaroj kiel devo, li ĵuris al si, ke li devas havi Rozon Blankan. Kun tiu promeso, kiun li donis al si mem, la afero estis decidita por li je daŭro. Ricevi Rozon Blankan estis nun nur plu demando pri tempo kaj pri la necesa detala laboro.

Mr. Collins estis simila al grandanima murdisto. La plej granda ekscitiĝo montriĝis nur en tiu horo, en kiu murdo estis decidita. Se la murdo, do la ago, iam estis decidita,

tiukaze li fariĝis fridasanga kaj sobra, povis trankvile kaj klare pensi pri tio, kiel pri la solvo de matematika tasko. Eĉ ne spuro de ekscitiĝo nun plu povus influi liajn planojn. Tio estis alia kaŭzo de lia grandeco kaj de liaj sukcesoj, ke li havis la ekscitiĝon de ludanto nur en la horo de la decido, en tiu horo, en kiu plano aŭ pli bone celo estas fiksata, kaj ke li neniam plu ekscitiĝis, post kiam la celo estis fiksita, sed ke li restis sobra. Liaj pensoj laboris tute mekanike, se temis pri tio fari la unuopajn ŝakmovojn. Se la celo estis metinta, jen por la koncernatoj ne plu eblis fuĝo. Ili estis kvazaŭ enfermitaj en granda ejo, ili supozis sin nur liberaj, ĉar ili vidis pordojn; sed ili ne sciis, ke la pordoj estas fermitaj.

Sed la vandoj de la ejo kunŝoviĝis pli kaj pli, enfermis la prizonulojn pli kaj pli malvaste ĝis fine venis la tago, kiam la vandoj mortpremas la prizonulon kaj oni elprenas lin disrompita kaj morta por ĵeti lin sur la amasigitan rubon de la antaŭaj viktimoj.

Mr. Collins estis devigita aĉeti kredite la milionon kaj kvincent mil dolarojn de sia banko. Li devigis sin kvitigi tiun krediton ĝis certa tempolimo. Kaj ĉar li entreprenis kovri ne nur tiun milionon kaj kvincent mil dolarojn, sed havigi aldone ankoraŭ tri milionojn kaj kvincent mil dolarojn por aĉeti por Betty la plej elegantan jaĥton de la Tero kaj ankoraŭ kelkan plian, li estis en vero provizore same tia prizonulo kiel la viktimoj, kiujn li elserĉis al si. Sed li estis prizonulo, kiu havis volon, aktivecon kaj la liberon senĝene moviĝi, kiu sciis celojn kaj vojojn por liberiĝi el la kaptiteco, dume liaj viktimoj devis defendi sin kaj anstataŭ la aktiveco posedis nur sian pasivecon. Ili ne povis ataki, kaj ili devis defendi sin laŭ lia volo, kun kiu li gvidis la atakon. Ili ankaŭ jam pro tio havis malavantaĝon, ĉar ili ne vidis, kie estas la malamiko, kiu estas la malamiko, kun kiuj armiloj li batalas, kiujn aliancinojn li havas kaj kie li atakas. Tiel por ili la malsukceso estis jam decidita en la sama momento, en kiu li komencis la atakon.

Ankaŭ el la aktualaj negocoj de la kompanio li estus

povinta elvringi la monon, kiun li volis havigi; sed ĝi estus kostinta pli da tempo ol tiu, pri kiu li disponis por tio.

Anstataŭ ekbori samtempe dudek novajn putojn, li povis ordoni, ke samtempe kvindek novaj putoj estu ekborataj. Li povis kalkuli je tio, ke el kvindek putoj ĉirkaŭ dek ĝis dek kvin putoj havas nafton. Sed laŭ la sperto en la kampoj, en kiuj estis borata, apenaŭ atendeblis, ke la unuopaj putoj produktas pli da nafto ol du mil ĝis ok mil hektolitrojn ĉiutage. Ĉu puto estas morta, do ne produktas nafton, aŭ ĉu puto produktas mil hektolitrojn da nafto ĉiutage, aŭ cent mil hektolitrojn ĉiutage, tio estis egala, se temis pri la borokostoj. Ĉiu puto borenda kostis preskaŭ la samon, ĉu ĝi estas morta aŭ ĉu ĝi produktas nafton.

Do, se *Mr. Collins* volis enspezi dum tre limigita tempo kvin milionojn da dolaroj pli ol li enspezis kutime, jen *Condor Oil Co., C.O.C.*, kiel ĝi estis koncize nomata en la naftonegoco, devis enspezi ene de kurta tempo – por ne perdi tempon per multaj vortoj – ducent milionojn da dolaroj pli ol ĝis tiam, per precipe ekstreme pelata produktado, por ke la akcioj, la premioj kaj tantiemoj de

Mr. Collins ebligu tiun kromenspezon.

Se la produktado tiom ekstreme estos pelata helpe de sukcesintaj boradoj kaj per lertaj spekuladoj kaj merkataj manipuladoj, jen ne nur *Mr. Collins* enspezus post malmultaj semajnoj pli ol ĝis tiam, sed tiel ankaŭ ĉiuj ceteraj akciuloj kaj membroj de la kontrolkonsilio. Tial *Mr. Collins* havas ĉiujn tiujn homojn kiel aliancantojn, ĉar ankaŭ ili ĉiuj havas siajn precipajn kromelspezojn por aliaj damoj similaj al Betty, por jaĥtoj kaj similaj necesaj kaj nemalhaveblaj distroj. Kelkaj el ili salutis altigitan dividendon el siaj akcioj kun pli da ĝojo ol eble *Mr. Collins* mem. Ĉar ĉiuj, spite al siaj grandegaj posedoj ie firmopinĉiĝis, ie estis implikitaj en iujn spekuladojn, devis kontentigi ĉantaĝistojn kaj ĉantaĝistinojn, aĉetis ion kaj akceptis devigojn. Kaj al ĉiu el ili kroĉiĝis frakrande armeo da pigruloj, kiuj volis vivi en lukso, armeo da parencoj kaj neparencoj, kiuj ne lasis forskui sin. Ĉar preterglitis multaj el iliaj negocoj, certe la plej multaj el ili, ĉiam nur je larĝo de haro la maŝojn de la leĝo, kaj iafoje eĉ glitis en senpripensemaj momentoj en la maŝojn, tial ĉiam denove devas esti pagataj policaj potenculoj,

juĝistoj kaj politikaj atletoj, cent mil dolaroj oni devas pagi al tiu politika partio, kiu ĝuste gvidas la rudron, ni diru ekz. la Respublika Partio. Kaj se afero fariĝis tro tikla, jen oni devas konstrui preĝejon aŭ hospitalon aŭ bibliotekon, por ree povi liberiĝi el la maŝoj. Armeojn de agentoj kaj spionoj oni ĉiam pagas. Gazetojn oni devas elaĉeti aŭ bone pagi.

La aliancanojn, kiujn *Mr. Collins* havis, estis la plej bonaj aliancanoj havigeblaj. Ili bezonis neatendite altan kromenspezon tiel urĝe kiel li. Kaj ili estis ankaŭ tial bonaj kaj la plej bonaj aliancanoj, ĉar ĉiuj havas siajn konektojn. La bofrato de unu el ili estas polica prezidanto, la frato de la alia ĉefprokuroro, la kuzo de alia estas ano de la Kongreso, kaj la fratino de plia parenco havas kiel duan litkunulon membron de la kabineto.

Kun tiaj aliancanoj kompreneble bone kaj facile eblas batali.

La indiĝeno Hacinto Yanyez ne havis tiajn bonajn aliancanojn. Tial li ankaŭ en tiu kazo denove havis malavantaĝon.

Kion ajn *Mr. Collins* estus povinta fari por atingi siajn celojn kaj por venkigi siajn planojn, tiuj kiuj sidas ĉe la granda trogo estus donintaj sian sankcion, tiom longe, kiom tiuj planoj havas la sukceson, kiun oni atendas de ili, do elvingi pli altan dividendon. Kaj ĉiuj faras la plej bonan por tio, por ke la planoj efektiviĝu. En la longaj disbranĉigitaj kanaloj fluas kelkaj dekoj de dolaroj ĉeokaze ja eĉ ĝis tiu policisto, kiu neniukaze povas nutri de sia laŭorda salajro sian grandan familion kaj frekventigi siajn gefilojn la kolezion por studado, por ke li ne devas fariĝi policisto kiel li aŭ stenotipistoj, sed bankoficistoj, kiuj tiel plu proksimiĝas al manĝotrogo ol la patro.

La socialistaj kaj komunistaj gazetoj havas ĉeokaze tielnomatajn „porkarcerajn redaktorojn“, kiuj en kiu ajn formo transprenas ĉiujn punojn, kiuj trafas la gazeton, por ke la valoraj labormembroj restu konservitaj al la gazeto.

Tian „karcerredaktoron“ havis ankaŭ Kondorkompanio. Tiu estis tiam certa *Mr. Abner*, origine de germana deveno. Lia patro ankoraŭ nomiĝis Ebner. *Mr. Abner* frekventis la kolecion kaj la universitaton. Se li ne estus farinta tion, li eble tiam estintus honorinda ŝoforo aŭ mekanikisto kaj baraktiĝus laŭleĝe kaj brave tra la vivo. Li estus generinta bonajn usonajn civitanojn, fine iutage mortintus kun deco kaj dum semajno estus priplorata kaj laŭfake funebrata de lia postrestinta vidvino kaj de tiuj nove generitaj usonaj civitanoj, post enkasigo de lia vivasekuro.

Sed *Mr. Abner* volis iri kun blanka kolumo, ankaŭ dum labortagoj. Kaj tial li venis post la sukcesa trapaso de siaj studoj kiel partnero pli juna en la oficejon de advokato,

kie li devis fari ĉiujn tiujn bagatelajn aĉajn kazojn, kiujn advokato kunakceptas por povi doni okupon al sia officeja personaro, por ke ili ne suĉu la kraĵonojn kaj rigardu el la fenestro.

Mr. Abner estis ankaŭ jam „karcerredaktoro“ en tiu advokata officejo. Ĉiun fian kaj ventecan aferon, kiuj kolektiĝis ĉe la advokato, devis respondeci *Mr.* Abner, la pli juna partenero de la firmao. Li estis la fetorfara advokato, dume la pli maljuna partnero ĉiam tenis siajn manojn puraj kaj enkasigis ĉiun monon, ĉu venis el la odoraĉo de kota eksgeedzigo aŭ el la sterkokloako de ĉantaĝo aŭ el la kompensodeva postulo de fripono, kiu per ŝtono disbatis sian tibion kaj tiam ĵetis sin antaŭ elegantan aŭtomobilon, kiu ne surveturis lin, sed nur preterveturante lin tuŝetis, kaj fine elvringis el la asekuro de la aŭtoposedanto tri mil dolarojn, sumon, el kiu la Abner-partenero pli maljuna ricevcis duonon. Al *Mr.* Abner sukcesis kapti okupon ĉe *Condor Oil Company* per ĉiuspecaj komplikaj kaj distorditaj padoj kaj helpe de magazena vendistino, per kiu li fariĝis litobofrato de membro de la kontrolkonsilio de Kondor-kompanio. Li

ricevis sepdek kvin dolarojn semajne kaj tricent dolarojn kiel kristnaskan premion kaj fariĝis la sesa advokato de Kondor-kompanio.

Mr. Collins, kiu havis tre perceptemajn okulojn por la talentoj de sia granda personaro, baldaŭ ekkonis la ampleksajn kapablojn de *Mr. Abner* kiel „karcerredaktoro“. Por pli avantaĝe povi uzi lin, *Mr. Collins* enrangigis lin kiel trian vicprezidanton pli maljunan por semajna salajro de cent dudek kvin dolaroj. Li donis du akciojn al li kaj rajton je premio por aferoj, kiujn *Mr. Abner* mem elcerbumis. *Mr. Collins* estis dirinta al li ĉe la ranga altigo ligita kun salajra, ke *Mr. Abner* por ĉiuj aferoj, kiujn li manipulas, devas transpreni la tutan respondecon, ke li nun rajtas rifuzi la oferton, se li volas fari tion, sed ke li, se li estos akceptinta ĝin, estas ligita.

Mr. Collins estis honesta. Li eltrovis, ke oni povas pli bone labori, se oni malkaŝe diras al koncernato por kio tiu taŭgas kaj por kio ne. Kaj li diris ankaŭ tuj al *Mr. Abner*, ke tiukaze, se li akceptis kaj la aferoj ekfumas kaj li eble eĉ distordus la babililon, ke oni tiukaze tiel draste

blovos la marŝon al li, ke li sentus sin feliĉa, se li de tiam ankoraŭ povus purigi la botojn al kiu ajn ie en Usono.

Mr. Abner ja ne estis flavbekulo, kaj li sciis tuj, kion *Mr.* Collins opiniis. Vespere en iu angulo oni tradraŝus lin, kaj draste! Kaj se la tradraŝaj vundoj ekcikatriĝus, jen *Mr.* Abner povus transloĝiĝi al oriento aŭ okcidento aŭ sudo aŭ nordo aŭ centren, kaj li tamen estus eĉ ne du semajnojn en okupo sen tio, ke la firmao n eestus jam ricevinta leteron kun la enhavo, ke *Mr.* Abner krimis nekredeblan rompon de la konfido, ke li estas malfidinda, ĉar li havas ŝanceliĝeman babililon. Eĉ se la firmao estus havinta la intencon plu okupi sinjoron Abner, ĉar en ĝi eble ŝanceliĝema lango ne povus damaĝi konsiderinde, tamen neniuj firmao, ĉu malgranda, ĉu granda, volis perdi la favoron de la potenca *Mr.* Collins, kaj *Mr.* Abner devus migri plu, kaj se li tre bonŝancus, li estus povinta labori kiel reportero je komisipago. Kaj tio estus estinta dorna liteto, Dio kompatu la kunkrucumiton!

Sed *Mr.* Abner ne estis dorlotita. Skrupulojn li ne havis.

Pli teruraj aferoj ol en sia unua advokata oficejo ne povis

okazi. Krome Kondorkompanio neniun, kiu manĝis por ili koton, lasis rusti en prizono. *Condor Oil Company* sciis la valoron de laboro kaj pagis la plenan valoron. Tiel *Mr. Abner* akceptis la karceran postenon kun ĉiuj kondiĉoj, kiuj estis ligitaj al ĝi kaj ankoraŭ eble estus ligotaj al ĝi, sen tio, ke tiuj estis menciitaj.

04

Estis tiu *Mr. Abner*, kiu nun estis vokata en la privatan oficejon de *Mr. Collins*.

Post kiam *Mr. Abner* sidiĝis, post kiam oni ofertis al li unu el la plej bonaj cigaroj, *Mr. Collins* sidiĝis vidalvide al li.

„*Abner*, mi havas specialan aferon por vi“, komencis *Mr. Collins*. „Afero, kiun mi volas konfidi nur al vi, ĉar mi scias inter ĉiuj sinjoroj neniun, kiu povus trakti tiun aferon pli lerte kaj pli prudente ol vi.“

Tiel ankoraŭ neniam iu parolis en sia vivo al *Mr. Abner*. *Mr. Collins* nun estus rajtigita postuli de li, ke li sola vojaĝu al Tibeto, ke li tie ŝtelu la budhaofiguron el la

templo kaj transportu ĝin al Usono. *Mr.* Abner farus tion aŭ almenaŭ provus.

„La afero estas tiel, Abner. Ni havas tie sube en Meksiko, en la ŝtato Verakruco grandajn naftokampojn sub kontrolo. Meze de ĝi, kaj tre maloportuna al ni, estas ranĉo, aŭ kiel oni tie sube certe diras, haciendo. Nomiĝas La Rozo Blanka. Kia stulta nomo por farmo! Sed la homoj ja estas tiel. Ni ne povas ŝanĝi tion, se ni ne foje tie firme kaptas la okazon. Nu do, la haciendon ni devas havi, ĉar ĝi malhelpas nin libere moviĝi. Ĝi havas multe da nafto. Ni esperas tie en tiu tereno pri putoj kun kvindek mil aŭ eĉ okdek mil naftobareloj. La posedanto estas indiano havanta pedikojn. Parte stultiĝinte kiel ĉiuj tiuj indianoj. Mi ne scias, kion li celas. Barelo da brando sufiĉus por li. Kaj kelkaj brilaj miloj de ormoneraj dolaroj transŝovitaj al la urbestro de la komunumo, al kiu apartenas la haciendo. Sed ekde la revolucio la homojn tie sube ĉiujn kaptis la megalomanio. Ili parolas ĝis iliaj buŝoj falas el la ĉarniro kaj pensas, ke ili devus havi la tutan nafton por si mem aŭ por la nacio, kiel ili diras. Ni ofertis al la freneziĝinta nigrulo, kiu posedas la haciendon, po mil

dolaroj por hektaro, proksimume po kvar cent dolaroj por *acre*, akreo. Ĉu vi eble pensas, ke tiu fajroglutisto volas vendi por tiu sumo? Li ne volas. Kaj la hektaro tie malsupre averaĝe valoras du dolarojn. Sub la reĝimo de la malnova Ruprecht Porfirco Diaĉ aŭ kiel ajn la ruza vulpo nomiĝis, ni aĉetis milojn de hektaroj da terposedo por po dudek kvin cendoj. Kompreneble kun milo por la bonzo, kiu oficiale havis ion por diri pri tio. Sed kiel menciite, ekde la revolucio tiuj koruptaj kadetoj obstiniĝis kiel maljunaj muloj. La advokatoj, kiujn ni havas tie malsupre ne valoras eĉ nur avelon. Ili kostas al ni amason da mono kaj faras nenion. Ili sidas dum la tuta tago kaj la tuta nokto en sia haremo. Tion vi ja scias, ke regas tie malsupre en Meksiko ankoraŭ la poligamio, ĉu?“

„Mi scias“, konformis *Mr. Abner*. „Mi ĝuste hieraŭ denove legis tion, en novelo de la gazeto „*Action Stories*“.

„Jes ja, tiel vi ja scias kaj konas la landon kaj la homojn, kiuj tie primitive loĝas. Ĉu vi scias, kiom da generaloj ili tie malsupre havas? Tion vi ne scias. Sed mi eksciis tion de *Mr. Halburn*, kiu estis tie malsupre en la lasta somero. Tiuj havas tiom da generaloj, ke ĉiu unuopa soldato havas

sian propran generalon. Kaj kiam soldato mortas, jen kune duelas du generaloj, kaj tiu generalo, kiu postvivas, tiam ree ricevas soldaton, kiun li rajtas komandi, por ke li povu esti plu generalo. Ankaŭ la agentoj, kiujn ni tie malsupre havas, taŭgas nenion. Ili ĉiam nur telegrafadas dietojn kaj subaĉetajn monojn, kiujn ili devas pagi. Sed, se ni volas havi ion de ili, jen ili skribas, ke momente ne eblas fari ion, antaŭ ol ni ne sendas armilojn por helpi al la banditoj kaj ribeluloj renversi la registaron. Vi do ekkomprenas, Abner, ke oni rekte kaj sur rekta vojo povas atingi nenion. La homoj ne komprenas, kie troviĝas ilia bonŝanco. Mi nun konvinkiĝis, ke nek la advokatoj nek la agentoj serioze faris ion por sukcesigi la aĉeton de la haciendo. La homoj ne komprenas la psikologion de la aĉetado. Tial ili ankaŭ ne bonstatiĝas kaj eterne almozpetadas nin. Se ni rekte povus intertraktadi kun la indiano – li ĉirkaŭkuradas nude, kiel oni diris al mi – jen ni povus klarigi lin, kiun avantaĝon por li havas vendi sian haciendon por bona sumo, kaj aĉeti ie en Meksiko aŭ en Arizono pli grandan kaj pli belan ranĉon kun ĉiuj maŝinoj kaj bonaj stratoj kaj bona vendomerkato por liaj produktoj.“

Mr. Abner interrrompis haste kaj diris: „Nun mi komprenas, *Mr.* Collins, kio estas farenda. Ni devas venigi la indianon ĉi tien en la oficejon. Tiam ni povos bombardi lin.“

Mr. Collins propre ne estis pensinta venigi la indiĝenon Hacinto al San-Francisko. Li pensis pli pri tio, ke oni provu ebligi kunvenon kun Hacinto en ties lando, eble en Meksikurbo aŭ en San Luis Potosi, por ke oni tiam lasu intertrakti kun li kapablajn homojn, kaj por ke oni distru lin en la urbo, ebriigu lin, vizitu kun li filmteatrojn, por ke oni lin superruzu per donacoj por li kaj lia edzino, kaj por ke oni hezitu lian forvojaĝon kun ĉiuj rimedoj tiom longe, ĝis li estos konsentinta. Pli laŭ tiu maniero *Mr. Collins* imagis tion al si, kiam li diris, ke oni devu intertrakti kun li rekte.

Sed la interdiro de *Mr. Abner* kondukis lin al la pli bona ideo. Se sukcesas logi Hacinton al Usono, eble eĉ al San-Francisko, jen la aĉeto de Rozo Blanka estas certigita.

Kaj post kiam *Mr. Abner* mem faris tiun proponon *Mr. Collins* tuj ŝanĝis sian planon kaj diris: „Tio estas la plej bona, la ununura, kion ni devas fari. Ni devas venigi la viron ĉi tien, ĉi tien al San-Francisko, en nian oficejon. Ĉi tie ni fiksos kun li la lastfinan prezon kaj trankvile

klarigos al li la avantaĝojn, kiujn li gajnos el la vendo. Ni montros al li ĉi tie belajn ranĉojn kaj ofertas ilin al li por interŝanĝo. Tiuj ja forlogos lin. Jen li ja mem vidos, kio ĉio fareblas per mono. Li tute ne volos reiri al sia malnova, trivita kaj kotigita haciendo. La homoj tie ankoraŭ vivas en la ŝtonepoko. Vi ne povas imagi tion, Abner, sed estas vere, ili frotas la maizon ankoraŭ sur ŝtono kiel kavernhomoj.“

Mr. Collins ofte estis estinta en Meksiko, kelkajn jarojn dufoje, por inspekti la naftokampojn, kaj por informi sin ĉe la fonto. Sed kiel ĉiuj el lia speco li sciis tute nenion pri la lando kaj pri la homoj loĝantaj en ĝi. Ja de kio li sciis tion? Li loĝis en la hotelo Imperial en Tampiko, li manĝis nur en usonaj restoracioj kaj en aŭtomobilo hastegis de naftokampo al naftokampo. En la naftokampoj li tute ne rigardis la meksikajn laboristojn. Li apenaŭ parolis kelkajn vortojn kun la usonaj drilistoj kaj tempkontrolistoj pri la speco de la tereno, en kiu ili drilis. Kaj dum li hastegis kun sia aŭtomobilo tra la kamparo, li preterflugis la kabanon de la indiĝenaj kamparanoj sen eĉ rigardi nur por momento la vivon de tiuj homoj. Li

vidis nur la fragmitajn kabanajn, la palmtegmentojn, la argilajn domojn kaj nudajn infanojn, la nudapiedajn virojn kaj inojn, la ĉirkaŭkurantajn porkojn kaj kokinojn, kiuj ĉiam estis en la vojo de lia aŭto. Sed pri la lando li sciis nur tion, kion li legis en usonaj gazetoj kaj en la romanoj kaj noveloj en la ĵurnaloj, kiuj publikis tielnomatajn *thriller*-verkojn, ekscitigajn sensacirakontojn. Se li eksciis ion pri Meksiko, jen ĉiam nur ion pri banditoj, pri ribeloj, pri revolucioj, pri revolveraj interpafadoj en la parlamento, pri koto, pri nesciado, pri superstiĉa katolikismo. Jen tiu Meksiko, kiun li sciis.

Tamen ekzistis ekvilibro en la mondo: Se la meksikano aŭdis ion pri Usono, pri la *Estados Unidos*, jen ĉiam estis nur milionuloj kaj miliarduloj loĝantaj tie, ĉar usonanoj, kiuj ne estis almenaŭ milionuloj, ne ekzistis. Ne laŭ meksikano. Ĉiu usonano estas milionulo. Kaj se li ne estas milionulo, jen li ne estas usonano. Laŭ la opino de la meksikanoj vivas ĉiuj usonanoj nur en nubskrapuloj, ĉar aliaj domoj en Usono ne ekzistas. Kaj ekzistas nur unu usonano, kiu faras ion alian ol monon kaj elrabi la

povrajn usonanojn. Kaj tio estas *Mr. Limber*, *un hombre muy simpatico*, tre simpatia homo, kies nomo nur malfacile elparoleblas, pro kio la meksikanoj anstataŭ *Mr. Lindberg* simple diras *Mr. Limber*, kaj ĉiu scias, kiu estas celata.

Tiujn detalajn sciojn de popolo kontraŭe al najbara popolo ni devas danki al la kleriga laboro de la gazetaro. Ĉar ĉiu scias, ke la gazeto havas nur unu grandan taskon, tio estas klerigi la homojn kaj proklami nenion alian krom la puran veron.

Kaj tion, kion *Mr. Collins* ne lernis el gazetoj kaj ĵurnaloj pri Meksiko, kaj pri la meksikanoj, tion li eksciis el la anekdotoj, kiujn oni rakontis reciproke en hotelo por forpeli la enuon. Anekdotoj, kiuj ne estis eltrovitaj en Meksiko, sed prenitaj el *Life*, el *Judge* kaj el aliaj usonaj ŝercmagazinoj.

Tiel estis tute kompreneble, ke *Mr. Collins* taksis ĉiujn meksikanojn, kaj momente precipe la kontraŭstareman indiĝenon Hacinto Yanyez tiel, ke ili senprobleme aldoniĝis al liaj scioj pri Meksiko kaj la meksikanoj. Ke surtere povas ekzisti homoj, kiuj ne komprenas la valoron de la mono, ne sciantaj, kia mirinda, kia sankta afero estas mil belaj brilaj dolaroj, tio estis io, kion *Mr. Collins* ne povis kompreni. Li ankaŭ ne akceptis, ke io tia povus ekzisti. Li estis konvinkita, ke la alto de sumo povas movi homon fari aŭ ne fari ion. Sed, ke povus esti homoj, al kiuj mono estas indiferenta, kaj kiuj multe pli ŝatas aliajn aferojn kaj aĵojn ol monon, tion li ne akceptis. Kaj se iu asertis, ke iu alia aĵo, materia aĵo aŭ anima afero povas esti pli valora ol *money*, ol eĉ la plej alta sumo de ĝi, tiukaze estis laŭ lia opinio nur truko por elvringi pli altan sumon.

„Do, ĉu nun via tasko estas komprenita, *Mr. Abner*?“ *Mr. Collins* daŭrigis sian paroladon. „Vi devas konduki tiun viron, tiun *don* Hacinto ĉi tien. Mi translasas tute al via prudento kiamaniere vi atingas la celon. La sumoj, kiuj

necesas por tiu celo estos je via dispono. Kompreneble mi avertas vin pro unu afero: neniun krimon, Abner. Tion mi ne subtenus. Antaŭ ĉio vi ne rajtas kidnapi la viron, vi ne inside ŝtelu kaj forkonduku kaj tiam gvidu lin ĉi tien. Eble eĉ narkotigite. Tio estigus kaĉon, kiun vi mem devus pagi. Tion mi diras nun eksplicite. Ĉar tio ne helpus nin. La meksika registaro tiukaze povus kontesti la kontrakton, kaj ni abismiĝus. La viro devas veni libervole. Kiel vi tion realigas estas nun afero via. Mi pensas, ke vi estas sufiĉe prudenta kaj inteligenta por fari tion lerte. Tial ni ja elektis vin, *Mr.* Abner, por tiu komplika laboro. Se la viro estas ĉi tie en San-Francisko, vi ricevas precipan premion dekmil-dolaran, sub la kondiĉo kompreneble, kiel mi jam diris, ke vi ne uzas perforton kaj ne krimas ion por konduki lin ĉi tien. Mi ja klare esprimis min, *Mr.* Abner, ĉu? Bone. Se la viro tiam estos ĉi tie, via tasko esence estas plenumita. solvita. La cetera, kiu tiam estos farenda, estas la tasko de aliaj sinjoroj, kies specialaĵo estas fini aĉetojn. Vi vojaĝos, eble ankoraŭ en tiu ĉi semajno, al Meksiko por studi la kazon ĉe ties fonto kaj por trovi la ĝustajn rimedojn. *That's all.* Per tio ni finis la paroladon. Vi nun scias vian taskon. Rilate la detalojn mi

tute fidas al via lerto.“

Rimarko

That's all = Jen, ĉio! Tio estas ĉio.

Tiel necese kaj tiel urĝe kiel *Mr.* Collins bezonis kvin milionojn da dolaroj, tiel necese kaj urĝe *Mr.* Abner bezonis premion da dek mil dolaroj kaj precipan rekonon de la kompanio por bona laboro.

ĈAPITRO 10

01

La sovaĝa avido de *Mr. Collins* al la posedo de Rozo Blanka estis tute ne pura profitavido, kvankam li ne dum momento perdis sian celon el la okuloj havigi kvin milionojn da dolaroj kiel kromgajnon.

Lia klarigo por lia brutala agado ne estis tute tiel senskrupule kapitalista kiel eble ŝajnas al iu, kiu estas nur malproksimulo. Li efektive ne estis monstro. Kiel homo li estis nek murdisto nek fripono. Kiel homo li estis aminda. Alie Betty eĉ ne tagon estus tolerinta lin kiel sian amikon kaj amaton. Se li estus vizitinta la haciendon Rozo Blanka, li estus havinta la kapablon kompreni kaj percepti la esencon de Rozo Blanka, tiun de sia posedanto kaj tiun de siaj enloĝantoj. Se li estus povinta vidi ĝin kun amo anstataŭ nur kun negoca intereso, tiukaze li certe estus estinta tiu homo, kiu kun sia tuta potenco estus protektinta Rozon Blankan kontraŭ disrompiĝo kaj velkado. Sed malprokisime de ĝi, fore de ĝia animo, li rigardis ĝin nur kiel objekton. Li rigardis ĝin nur kiel

usonan ranĉon.

Neniu usona ranĉo, kiun li sciis, estis hejmlando. Neniu el la farmistoj, kiujn li konis, pensis eĉ nur minuton pri tio fari el la bieno, en kiu li vivis, hejmlandon. Tiu, kiu aĉetis bienon, laboregis preskaŭ ĝis kolapso por prosperigi ĝin. Sed li ne prosperigis ĝin kun la intenco formi el ĝi daŭran hejmon, sed li prosperigis ĝin kun la intenco vendi ĝin kvindek procentojn aŭ cent kvindek procentojn pli kare ol li aĉetis ĝin. La bieno estis negoca objekto, kiel vendejo aŭ kiel lignoplaco. Neniun farmiston ligis kun sia bieno iu anima bendo. La ranĉo estis rigardata nur laŭ la valoro kiel monenspeziga morta objekto. Tiel ankaŭ la brutaro, kiu troviĝis sur ĝi kaj tiel ankaŭ la fruktarboj, kiuj staris tie. Se bienisto plantis novajn arbetojn, li faris tion ne kun la sankta penso, ke ankaŭ la sekvaj generacioj volas havi pomojn, pirojn, nuksojn, oranĝojn, kaj ke ni devas postlasi tiujn fruktojn al ili, tiel, kiel niaj antaŭuloj plantis por ni arbetojn. La bienisto nur tial plantis la arbetojn, ĉar li povis vendi bienon kun multaj plantitaj fruktarboj pli kare ol sen arboj, ĉar la bieno tiukaze promesis al la nova posedanto

pli altan gajnon. Se bienulo estis prosperiginta malkaran bienon kun sia laboro, li rapidis trovi aĉetanton, kiu pagas altan prezon al li, por ke li, la nuna posedanto, ree ie alie povas aĉeti malkaran bienon, kun la intenco prosperigi ĝin kaj ĝin kaj poste pli kare vendi.

Kiel oni povas atendi, ke *Mr. Collins* komprenas Rozon Blankan, se li vivas en tia regiono kaj konas nur tiajn bienistojn. Li ja eĉ ne sciis, ke Roso Blanca signifas *The White Rose*, Rozo Blanka. *Mr. Collins* rigardis Rozon Blankan nur kiel bienon, kiel nenion plian. Kaj ties posedanton li rigardis nur kiel kaprican meksikanon, kiu estis aŭdinta de la milionaj gajnoj, kiuj estas eligataj el la naftokampoj, kaj kiu nun provas elvringi kiel eble plej grandan prezon el sia bieno.

Kiu prenas la rajton al si akuzi certan *Mr. Collins*, viron, kiu estas la produkto de sia ĉirkaŭaĵo, kiel mi estas la produkto de mia ĉirkaŭejo kaj de mia sperto? *Mr. Collins* agis tute laŭ la cirkonstancoj, laŭ la influoj, kiuj subigis lin. Li ne povis agi alie. Kaj se li estus aginta alie, jen li ne estus estinta naftomagnato. Kaj se ni sekvas al la aferoj ĝis la lasta konsekvenco, efektive fine povas okazi, ke la homaro ne havas nafton, la nafton, kiun ĝi bezonas tiom urĝe en la stato de la nuna civilizacio. La nafto, kiu fariĝis tiom grava, tiom nemalhavebla, ke oni batalos en la sekva granda milito pro ties baza celo nur pi la posedo de nafto

kaj pro ties malgranda helpservisto, la kaŭĉuko. Ĉiu peco de tero, kiu havas nafton, lastfine povas esti Rozo Blanka por tiuj, kiuj vivas sur ĝi. Kaj se ĉiu peco de terposedo estus Rozo Blanka kaj sentimentale volus esti rekonata kiel Rozo Blanka, jen do neniu nafto estus je dispono. Tio, kio tiukaze devus okazi por ricevi la necesan nafton, estus tute la sama, eble kun kelkaj ŝanĝetoj, kion tiam faris *Mr. Collins* por rompi Rozon Blankan.

Por ĉiu siaj agoj *Mr. Collins* havis pravigon, kiu permesis al li en ĉiu unuopa kazo trankviligi sian konsciencon, se delikto montriĝis vere tro bruska kaj de tempo al tempo havis eĉ konsekvencojn, kiujn li nek intencis nek antaŭvidis. Nuda profitavido je daŭro eĉ la plej obstinan krudan mongajniston ne povas liberigi de memakuzoj kaj de maltrankvilaj pensoj. En ĉiuj homoj troviĝas pli forta aŭ pli malforta timo pri venĝo pro tio, kion ili faras aŭ jam faris. Tiu venĝo ne ĉiam havas rilaton al la venĝo post la morto, kiujn kredas kelkaj homoj. Tiu venĝo ankaŭ ne havas rilaton al venĝo, kiu estas realigata survoje de kriminala juro, tiel do, ke la homo ekkarambolas kun la leĝoj kaj antaŭ juĝisto devas pravigi sin por siaj agoj.

Ne, la venĝo, pri kiu temas ĉi tie, kaj kiun ĉiuj homoj per sia instinkto sentas kaj timas, estas de alia maniero. La homoj timas, ke fia ago, kiun ili krimis, povus sekvigi venĝon je ili mem aŭ al tiuj, kiujn ili amas. Kelkaj homoj timas, ke ĉiu havaĵo, kiun ili gajnis je neleĝa kaj insida maniero povus perdiĝi iam poste. Aliaj timas, ke ili post malica ago estas persekutataj de malfeliĉo en sia plia vivo,

ke ili fariĝas malsanaj aŭ je daŭro malsaniĝas. Kaj se ili mem ne estas trafataj, ke tiukaze iliaj infanoj aŭ edzinoj aŭ plej bonaj amikoj devas suferi pro tio. Multaj tiom enprofundiĝas en tiu supozo, ke ili atendas, ke ĝuste tiel, kiel ili krimis al alia, oni krimos iutage al ili mem.

Tio estas unu el la psikologiaj kaŭzoj, kiuj instigas preskaŭ ĉiujn homojn meti limon, kiun ili ne kuraĝas transpaŝi. Ĉiu homo scias, ke li ne estas la Ĉiopotenca, ne tiu, kiu pli fortas ol ĉiuj aliaj. Ĉiu scias, ke li povas fali iel en la manojn de pli forta, kiu traktas lin tiel kiel li traktis aliajn. Tiu instinkto estas tio, kio ununure ebligas la socian kunvivadon kaj kunan agadon de homoj. Tiu instinkto estas tio, kio malhelpas malican homon nokte detrui fervojrelojn. En tiu trajno povus ja sidi iu, kiun la viro tute ne volas pereigi. Krome iutage ankaŭ alia povus imiti tion kaj detrui la relojn, se li mem sidas en la trajno kaj li mortus pro tio. El la sama kaŭzo ankaŭ neniu normala homo torturas kaj turmentas alian homon, kiu estas en ties potenco kaj ankaŭ malofte nur besto pro pura ĝojo je la torturado.

Ĉiu homo serĉas pravigon por si por motivi la malican kaj

nesocialan de tio, kion li faras, por ŝajniĝi tion malpli malica kaj malpli nesociala.

Neniu reĝo, neniu prezidanto, neniu grupo de kapitalistoj iniciatas militon sen tio, ke ili pravigas la militon per la aserto, ke ĝi servas al la komuna bonfarto, ke ĝi neeviteblas pro tiuj aŭ ĉi tiuj kialoj, ke la respekto al aliaj popoloj, do la honoro, eldevigas la militon. Sen morala pravigo oni ne komencas militon. Kaj trovi bonan pravigon estas la unua tasko de tiuj, kiuj supozas, ke ili bezonas militon. Ju pli bone estas la pravigo des pli certe estas la sukcesoj de ĉiuj agoj, kiuj postulas kunagadon aŭ bonintencan toleremon de aliaj homoj. Tio kompreneble ne malhelpas, ke multnombraj agoj okazas, kaj ke multaj deliktoj estas entreprenataj, ĉe kiuj oni tute ne serĉas pravigon, ĉar estas tro komplike trovi bonan pravigon kaj, ĉar la ago pro iuj kaŭzoj neprokrasteblas. Tio estis la kazo ĉe la granda rabentrepeno de *Mr. Collins* en la karbokonfuziĝo, kiun li estis provokinta.

La pravigon, kiun *Mr. Collins* havis por siaj aktualaj agoj, ne estis artifika, ne pravigo, kiun li elpensis per rafinita maniero kaj metis je sia dispono, por ke li povu prezenti sin al siaj kunhomoj sen embaraso.

Li diris al si: La homoj bezonas nafton. Kaj morgaŭ ili bezonos eĉ multe pli da nafto ol nun. En la sekva monato ili bezonos centzfoje pli da nafto. Kaj en la sekva jaro la homoj bezonos kvinmilfoje pli da nafto ol nun, se oni povos iam aĉeti flugmaŝinon por kvincent dolaroj kaj se ĝi estos tiom simple stirebla, ke ĉiu povas flugi per ĝi sen endanĝerigi per tio sin mem aŭ aliajn. Pli kaj pli da dizelmotoroj anstataŭas la varpormaŝinojn, pli kaj pli da lokomotivoj estas hejtataj per nafto. Pli kaj pli da gravaj produktoj estas produktitaj el nafto. Do, la homoj bezonas pli kaj pli nafton, kvankam ili bezonas nur la saman kvanton de tritiko, kotonon kaj ledon.

Condor Oil Company estas unu el la plej fortaj kompanioj de la Tero. Kondor-naftokompanio tenas gigantan parton de naftohavantaj terenoj en siaj manoj, en Kalifornio, en

Oklahomo, en Meksiko, en Venezuelo, en Kolumbio. Kaj ĉar tio estas tiel, *Condor Oil Company* transprenis la respondecon havigi al la homoj la necesan nafton. Kun la respondeco ĝi samtempe transprenis la devigon havigi la nafton, por ke la homaro ne vivu en mizero pro mankanta nafto. Ĉar mi estas la prezidanto de *Condor Oil Company* mi devas atenti pri tio kun ĉiuj miaj kapabloj, ke ĉiam pli kaj pli da nafto ekzistas ol hodiaŭ estas bezonata. Ĉar morgaŭ kaj postmorgaŭ estos eĉ pli bezonata, kaj se mi ne antaŭzorgus, se mi ne konsiderus, ke ĉiuj putoj post pli aŭ malpli da tempo elĉerpiĝas kaj ke multnombraj putoj, kiujn oni drilas, tute ne produktas ion, jen povus okazi, ke la homoj iutage ne havos sufiĉe da nafto je dispono, ke la maŝinoj haltus, ke la motoroj malsatmortus, la fervojoj ne veturadus, la ŝipoj ne altransportus necesajn krudmaterialojn el fremdaj landoj kaj dek miloj ja, cent miloj de laboristoj estus sen salajro. Kaj se io tia okazos, tiukaze oni riproĉos tion al mi, al la prezidanto de la potenca *Condor Oil Company*, mi tiam estos respondeca por ĉiu malbono, kiu ekestos pro la manko de nafto. Kion mi povas fari kontraŭ tio? Mi devas havigi la nafton kaj devas teni ĝin preta por la homaro, por ke ĝi ne suferu

mizerojn. Se mi pro tio enspezas monon, ni diru, se mi tre bone enspezas pro tio, jen tio estas nur pago, kiun la homaro ŝuldas al mi pro mia peno, por mia antaŭzorgado, por miaj sendormaj noktoj, por mia lerteco, per kiu mi scias havigi la nafton.

Kial mi kulpu tion, se farmistoj estas forpelataj de siaj terposedoj, kiuj fariĝis hejmlandoj por ili? Mi ne estas respondeca por tio, se ili eble eĉ murdas sin mem, ĉar ili ne povas elteni la perdon de sia hejmlando. Ja ankaŭ kelkaj postiljonoj pendumigis sin, ĉar la homoj ne plu volis aŭskulti ilian gajan vipoknaladon kaj iliajn kantojn sur la poŝtkorno, sed preferis veturi per la fervojoj, ĉar tiu estis pli malkara, pli oportuna kaj pli rapida.

Ke tiu bastarda fripono Abner, ulo, kiun mi ne povas flari pro sia fieco, nun iras tien malsupren por rompi la nukon al Rozo Blanka, estas ja efektive tre malĝojiga. Damne, kaj de Dio malbenite! Sed milfoje pli malgaja ĝi estos, se la homoj iutage ne havos nafton. Mi ne kreis tiun ĉi mondon. Tion scias la kara Dio tie supre en la ĉiela alto. Tial mi ankaŭ ne respondecas por tiu ĉi freneza mondo. Mi ankaŭ ne eltrovis la nafton kaj neniam tro serioze

zorgis pri tio, por kio la homoj propre volas havi ĝin. Sed la homoj ja volas havi ĝin, ĉar ili bezonas ĝin, kaj mi havas la devon doni ĝin al ili, ĉar mi scias, kie ĝi troviĝas. Kial la kara Dio, kiu estas tiel ĉioscianta kaj tiel ĉiopotenca, ne faris tion ĉion alie kaj pli bone? Rilate al multaj aferoj mi estus farinta pli bonan.

Mr. Collins eble ne estas tre eksterordinara homo, sed je lia pravigo apenaŭ troveblas eraro.

ĈAPITRO 11

01

Mr. Abner lernis la hispanan en kolegio. Sed kiel tio ĉiam iras kun fremda lingvo, kiu estis lernata en lernejo: Kiam li venis al Meksiko, li trovis, ke la meksikanoj – laŭ lia opinio – ne komprenas la propran gepatran lingvon.

Li trabaraktiĝis per lingvaj gestoj kaj iutage estis alveninta en Tukspam, en tiu eta urbeto, de kie li celis gvidi sian atakon. Li ne tuj marŝis rekte al Rozo Blanka, ĉar li volis studi en Tukspam unue la terenon, sur, kiu li intencis batali.

Siajn unuajn tagojn li pasigis per vagado en la *cantinas*, en kantinoj kaj en la *pool-rooms*, do en la bilardaj salonoj. Li esperis, ke li eble povus ekscii ion, kio estas utila al li.

Tie li konatiĝis al mestizo, kies patro estis usonano, kiu en tiu lando de la facila vivo pli kaj pli perdis sian disciplinon, tute triviĝis, sin plene subiĝis al la drinkado kaj kun indiĝenino, kun kiu li vivis, produktis infanon,

tiun mestizon, kies nomo estis Frigillo.

Frigillo kiel knabo foriris al Usono, laboris tie en ĉiuj imageblaj laborbranĉoj, estis pro ŝtelado plurfoje en prizono. Fine la usonaj instancoj deportis lin al sia hejmlando Meksiko. Li parolis sufiĉe la anglan. Tio tre helpis al li trovi bone pagatan laboron kiel kolonestro de meksikaj peonoj en la naftokampoj.

Tiu regula laboro en la naftokampoj ne tro plaĉis al li. Li starigis sin sur la propraj piedoj kaj fariĝis varba agento por la naftokampoj. Li varbis por la kompanioj peonojn, kiuj devas labori en la kampoj. Por ĉiu varbita viro li ricevis provizion, kiu po viro laŭ la cirkonstancoj sumiĝis je tri pesoj ĝis dek du pesoj. Li vere bone enspezis tiel; ĉar la homoj ofte alternis. Kaj se ili ne sufiĉe ofte alternis, li sciis kiel forŝovi la homojn pro iu preteksto, tiel, ke la kompanio devis mendi novajn laboristojn ĉe li.

Momente li pigris, ĉar ĉiuj kampoj estis prizorgitaj kun uloj kaj la salajroj tiel bone estis, ke la homoj preferis ne alterni tiom ofte.

Frigillo kompreneble havis personan intereson pri tio, ke novaj kampoj estas malfermataj por la naftoproduktado, ĉar tio estigis novan bezonon je laboristoj kaj tiel facile enspezitan monon por li.

Ne tuj en la unua tago de ilia interkonatiĝo, sed ankoraŭ en la sama semajno *Mr.* Abner komencis paroli pri Rozo Blanka. Li sentis sin favorata de Fortuno, ke li estis trovinta tiun mestizon. Li diris neniun vorton pri tio, ke li estis pro la haciendo Rozo Blanka en Meksiko. Li rakontis Frigillon, ke li estas tie por aĉeti naftoriĉan terposedon.

Rozo Blanka estis konata por tio esti naftoriĉa tereno. Kaj ankoraŭ pli konata estis en la tuta federacia ŝtato la fakto, ke granda usona naftokompanio volas aĉeti la haciendon Rozo Blanka, sed ke *don* Hacinto ne jesis la vendon. Oni parolis pri kvin milionoj da dolaroj, kiujn tiu kompanio laŭdire proponis al *don* Hacinto.

Rimarko

cantinas = estas ankaŭ en Meksiko kantinoj, bierejoj, restoracietoj, stacidomaj restoracioj ktp.

„Al tiu viro mankas ja klapo en la kapo“, diris Frigillo al *Mr. Abner*, kiam ili parolis pri la kazo. „Kian grandiozan vivon tiu viro povus havi. Kaj kiom da centoj de laboristoj, kiuj nun devas elmigri al Usono, povus trovi tie bonan laboron. Estas via vico, *Mister.*“

Mr. Abner kaj sinjoro Frigillo ludis bilardon kaj *Mr. Abner* lasis gajni la mestizon por agordi lin afabla kaj parolema.

„Finite la far'!. Vi ree gajnis la ludon“, diris *Mr. Abner*, dume li observis la lastan kuglopuŝon de Frigillo kaj reblankigis sian bilardbastonpinton per freŝa kreto, por aludi tiel, ke li atendas novan ludon kun espero.

La nova ludo komenciĝis, kaj ambaŭ viroj parolis kvazaŭ preterire ĉiam pri Rozo Blanka kaj pri *don Hacinto*, interŝovante kelkajn vortojn pri la ludo.

„Tio povas esti ja nur beno por tiu viro kaj la povruloj, kiuj devas laboraĉi ĝis renverso sur la haciendo por kelkaj centavoj, se eblas vendi la terposedon bone. Tiuj povruloj

havas ja tute nenion de la vivo. Ili apenaŭ povas aĉeti al si botojn kaj en kinejon ili venis neniam.“

„Sed, *Mister*, diris Frigillo, „tio ja ĝuste estas tio, kion mi ĵus volis diri al vi. Kiom da mono la homoj povus enspezi kaj kiom ili povus bonfarti! Kun ridado ili povus enpoŝigi kvar aŭ kvin pesoĵ ĉiutage kaj tio dum nur ok horoj ĉiutage. Kion ili havas nun? Sepdek centavoĵn ĉiutage. Se ili vere ricevas tiom. Tion mi eĉ ne supozas, ke ili havas sepdek centavoĵn ĉiutage. Kaj tio iras tiel de la unua kokokrio ĝis la plej profunda nokto. Nu, ĉu vi scias, *Mister*, la puŝon, kiun vi ĵus faris, tiun mia malgranda maldekstra piedfingro faras pli bone. Kie vi propre lernis ludi la bilardon? Nun foje bone observu min, kiel ni en Meksiko traktas tian kuglon. Tiun mi puŝas blinde.“

„Nu, tiel tio ne estas, *señor*, ankaŭ ni povas poŝbilardi. Atendu nur, kiam foje sukcesos kugleto al mi. Jen vi povas voĵaĝi de Novjorko ĝis Los-Anĝeleso, kaj vi tamen ne ree vidos tian elegantan puŝon. Ĉu vi tion vidis, *hombre*. Tiel ludas ni kun meksikanoĵ. Kaj tion mi povas fari tuj plian foĵon, kaj multe pli fajfiga. Fulmotondro kaj sputaĵo, tiu vere foje fie forglitis. Kian aĉan sorton de

kreto vi havas ĉi tie? Tio ja ne estas kreto, sed lipopomado. Kial vendas *Don Cazimpo*...”

„Hacinto li nomiĝas, J-A-C-I-N-TO. Hacinto, Hacinto Yanyez. Nu, kial li ne vendas? *Qien sabe*, kiel mi sciution! Eble ne sufiĉas lin, kio estas ofertata al li. Li certe havas sian prezon.“

Mr. Abner puŝis la bilardbastonon sur la plankon kaj blankigis la pinton denove per kreto. Ĉe tio li diris: „Eble la advokatoj, kiuj intertraktas kun li, ne scias kiel aranĝiĝi kun la viro. Ili ne scias kiel oni konvinkas viron de sia avantaĝo.“

Frigillo etendiĝis trans la bilardon por rekapti kuglon el komplika situo. Kiam tio sukcesis al li, li opiniis: „Tiel certe estas. La advokatoj ne havas intereson pri tio, ĉu li vendas aŭ ne.

Ili ricevas sian monon kaj pri la cetero ili ne zorgas.“

„Mi vere havas bonan intencon por aĉeti la terposedon“, diris *Mr. Abner*, dum li observis la ludon de Frigillo. „Mi havas eminentajn negocistojn je dispono, kiuj pagus ĉiun

sumon.“

„Nu, foje aŭskultu min“, interdiris Frigillo, „se vi havas tiom da mono post vi, tiukaze, tiukaze, ĉu vi scias, *Mister*, kial vi ne invitas veni *don* Hacinton al Usono? Vi pagas laŭorde la vojaĝon, kaj kiam vi havos lin transe, ja la homoj, kiuj volas riski la monon, tute trankvile povas interparoli pri la prezo kun li.“

„Tio estus ideo, *señor*. Sed, ĉu vi do pensas, ke li faras tian vojaĝon?“

„Ne, tion mi ne pensas“, diris Frigillo. „Tion mi certe ne pensas, ke Hacinto farus tian vojaĝon. Ne kvazaŭ per si mem, tute sen kialo. Sed, se vi trovas bonan kialon, kial ne? Ĉiu homo ja volonte faras iam vojaĝon. Sed Hacinto – , tion mi ne supozas, ke li vojaĝas tiom malproksimen. Sen kaŭzo ne. Kompreneble, li ja ne scias, kio estas fora. Mi ne pensas, ke li jam vojaĝis pli longan distancon en sia tuta vivo ol ĝis Jalapa.“

„Ĉu vi ne povus eltrovi kialon, sinjoro, kiu estas tiel bona, ke li jesas la vojaĝon? La vojaĝon tien kaj reen mi volonte

pagus. Mi pagus ankaŭ tiukaze, se li fine ne vendus. Sed ni tiukaze almenaŭ provis ĉion.“

Frigillo rigardis trans la tablon, kaj dum li pripensadis la kuglon, kiel plej bone puŝi ĝin, li diris senpripenseme: „Kialo. Kialo, ĉu? Ja, mi ne scias – nu, mi prenas la kuglon foje de maldekstre kaj metos ĝin al la eĝo proksime de la angulo. Mistrafite. Mi vere pensas, la kreto tute ne taŭĝas. Sed, *Mister*, vere ne, se vi nun ne pli bone enŝteliĝas inter la kuglojn, jen vi hodiaŭ gajnos eĉ ne unu ludon.“

„La tablo ŝajne ne estas bone ekvilibrata. Tiu certe ne estas horizontala laŭ pesilo. Ĝi estas oblikva. Mi vetas kvin dolarojn, ke la tablo iomete kliniĝas en la maldekstra angulo.“ *Mr.* Abner ĉirkaŭiris la bilardtablon kaj rigardis el ĉiuj flankoj horizontale trans la tablon, kun tia grava mieno, kvazaŭ la sortoj de l' mondo dependus de tio, ĉu la tablo staras precize horizontale. Reirinte al la loko, de kie li volis meti la bilardbastonon al la kuglo, li denove blankigis la pinton de la stango kaj diris: „Vi ja bone konas la viron Hacinto, *señor*, ĉu?“

„Kompreneble mi konas lin“, respondis Frigillo. Mi konas lin tiom bone, kvazaŭ li estus mia frato propra.“

„Tiukaze ja ne devus esti malfacile por vi, *señor*.“

„Kio? Kio ne devus malfacili?“ demandis Frigillo.

„El trovi kialon, por ke *don* Hacinto veturu al Usono. Aŭskultu, je mia vorto! Se sukcesas al vi trovi bonan kialon, por ke *don* Hacinto vojaĝu kun mi, ankaŭ vi enspezu pro tio.“

„Kiom?“ demandis Frigillo, dum li mankaptis sian kuglon.

„Nu, ni diru cent pesoj en oro“, diris *Mr.* Abner.

„Cent usonajn dolarojn.“ Ĉe tio Frigillo ŝovis sian kuglon tiel, kvazaŭ la cent dolaroj rilatus al la kuglo.

„Konsentite, *señor* Frigillo, cent usonajn dolarojn, se *don* Hacinto sidas kun mi en la trajno.“

„Kompreneble ne jam morgaŭ. Tiel rapide tio ne

realigeblas“, diris Frigillo. „Mi ja ankaŭ tute klare esperas, Mister, ke tiukaze, se vi aĉetas la terposedon kaj produktas nafton sur ĝi, mi ricevas la komisipagon por la laboristoj, kiuj ĉi tie estas bezonataj.“

„Pri tio ne necesas longa babilado.“

„Kompreneble vi ricevus la komisipagon“, diris *Mr. Abner*.

Frigillo rigardis *Mr. Abner*, metis la kapon foje sur la dekstran ŝultron, foje sur la maldekstran kaj fine opiniis: „Ni ja eble devas fiksi tion iom perskribe. Sed mi ja ne estas bebo, kaj scias, ke ankaŭ la skribita havas sian hokon. Sed je mia sekureco mi nun tuj volas diri al vi, ke tiukaze, se vi rompas la interkonsenton, kiun ni faris ĉi tie, mi povas fari al vi tiom da koto, ke vi kaj ĉiuj viaj monsakuloj eĉ ne plu povas pepi ion. Ĉu vi komprenas min? Bone, tiukaze ni ja ĉion tute ĝisdetale priparolis.“

„Ekzistas eĉ ne la plej eta intenco“, diris *Mr. Abner*, „ĉirkaŭiri la kondiĉojn. Kiu helpas, al tiu oni helpas. Kaj agenton por la varbado de laboristoj ni bezonas. Do, kial

kvereli? Ĉu vi aŭ alia viro ricevos la komision aŭ iu sinjoro Z aŭ X, tio laŭ principo estas egale al ni. Sed vin ni konas, kaj tial vi estas preferata. Estas ja klare dirite kaj logike.“

„Jen via kuglo, *Mister*“, diris al tio Frigillo. „Eble vi puŝu ĝin tute akre de dekstre malsupre kaj celu ĉi tiun punkton de la balustrado. Jen, kien mi montras al vi. Tiel mi traktus la kuglon. Nu, mi ja pensis tion jam antaŭe, tiun vi perfekte mistrafis. La diablo sciu, kie vi lernis tion, kion vi nomas bilardludado. Mi nomas tion, kion vi ludas 'ĵetkubado per ovoj'. Sed homoj havas ja foje tre strangajn ideojn pri la bilardludado. Ankaŭ rilate la bilardon ekzistas justuloj kaj pekuloj, tiel kiel ĉie.“

Frigillo prenis al si tempon pro la afero. Li devis tion ĉion bone pripensi, kiel li diris al *Mr. Abner*. Li ankaŭ ne havis multe da intereso je tio, ke okazu rapide. Ĉar, tiom longe, kiom la gringo estus ĉi tie, li povus vringi el li ĉiutage dek kvin ĝis dudek pesojn ĉe la bilardo. Tiel facile oni perlaboras la monon ne ĉiam. Kaj se oni estas trovinta enspezigan okupon, oni devas elteni dum certa tempo je ĝi.

Sed tiam iutage, proksimume semajnon poste, *sinjoro* Frigillo ŝajne estis pretiginta sian planon. *Mr. Abner* intertempe lernis ankaŭ, kio estis la kaŭzo de la prokrasto. Li pli penis kaj Frigillo ne plu tiom enspezis ĉe la bilardo. Tiel la mestizo perdis la intereson je tio plu retenis la gringon. La plano, kiun *sinjoro* Frigillo estis elpensinta, estis interkonsilata, kaj *Mr. Abner* trovis lin uzebla.

Ili luprenis ĉevalojn kaj iumatene ekrajdis por vidi *don* Hacinton kaj la haciendon Rozo Blanka.

Ili venis al la haciendo. La mestizo prezentis *Mr. Abner* kaj diris al Hacinto: „

Don Hacinto, ĉi tie estas usonano, kiu volas aĉeti bonajn kaj fortajn rajdoĉevalojn, kiuj ĉi tie en tiu regiono naskiĝis kaj plenkreskiĝis, ĉar li volas uzi ilin en la naftokampoj por inspektadaj rajdoj.“

La indiĝeno rigardis al *Mr. Abner*, kaj ĉar *Mr. Abner* malferme rigardis al lia vizaĝo kaj alridis *Hacinton*, la fremdulo plaĉis al li.

Li diris fine: „Mi havas ĉevalojn, bonajn fortajn ĉevalojn, kiuj naskiĝis ĉi tie sur la haciendo. Estas malgrandaj hirte aspektantaj *caballitos*. Sed ili estas fortikaj kaj persistaj kiel muloj. Prezvalore rilate la nutradon. Ne *lastimado*, ne vunditaj, neniuj lezitaj makuloj sur la dorso.

Rajdopretaj ĉevaloj. Mi povas vendi al vi kvar, kvin, eble eĉ ses da ili. Ĉu vi volas vidi la ĉevalojn? Tiukaze mi vokos *Margariton* kaj li povos kapti la ĉevalojn sur la paŝtejo kaj konduki ilin ĉi tien.“

Mr. Abner estis apoginta sin kontraŭ fosto de la portiko kaj diris lace: „Estas hodiaŭ jam sufiĉe malfrue, *don* Hacinto. Ni ankaŭ estas tre lacaj pro la longa rajdado. Eble mi restados unu aŭ du tagojn ĉi tie, kaj ni povos trankvile preparoli la negocon. Mi ankaŭ volas iom ĉirkaŭrajdadi la aĉetebajn ĉevalojn, por observi kiel ili moviĝas sub la selo.“

Li komprenis pri ĉevaloj tute nenion.

La indiĝeno diris: „*Es su casa, señor*, la domo estas je via dispono. Mi volonte akceptas la honoron esti preta je via servo, señor, a *sus apreciables ordenes*.“

Tiam li vokis trans la vastan korton: „Miguelito, prenu la ĉevalojn de la *caballeros*, rajdu kun ili malsupren al la rivero por trinkado kaj konduku ilin tiam al la ĉirkaŭbarita paŝtejo. Atentu, ke la stalono ne mordas la *caballeros*. Ŝmiru al la ĉevaloj *Bickmorin*-vazelinon sur la malglatajn de la seloj vundfrotitajn dorsomakulojn, por kuraci ilin kaj jen antaŭe ĉe la kolo de Prieto surŝmiru la antisepsaĵon Kreolin, por ke la vermetoj elrampu.“

Li frapis la postpartojn de la ĉevaloj kaj kaptis ilin per dikfingro kaj montrofingro en la naztruojn. La ĉevaloj flaris kaj henis, kiam ili perceptis la odoron de kamaradoj sur la paŝtejo.

„*Muy bien*, kompreneble, patrono, mi faros ĉion tion“, diris Miguel kaj li komencis okupiĝi pri la ĉevaloj.

Rimarkoj

caballo = ĉevalo

caballero(s) = sinjoro(j)

caballito = ĉevaleta

La viroj paŝis en la domon.

Indiĝena knabo alportis pelvon kun akvo, sapon kaj mantukon kaj ofertis ilin al la viroj. Ili lavis siajn manojn. Tiam la knabo alportis sur servopleto du grandajn glasojn kun akvo, kaj la du alvenintoj gargaris la buŝon kaj tralavis la gorĝon ĝis ĝi estis pura de la vojopolvo.

Don Hacinto intertempe alportis la *Habanero*-botelon, li jam enverŝis tri glasojn kaj ili bonvenigis sin reciproke per salutoj.

„Jen bona *habanero*“, diris Frigillo, rigardis la botelon kaj la etiketon.

„Estas bone“, jesis *don* Hacinto. „Estas de San Juan Bautista, el Tabasko. Farita el vinberoj.“

Mr. Abner, por same diri ion, interĵetis: „Jes, vi meksikanoj estas bonŝancaj. Vi estas libera popolo. Ni ne tiom bonŝancas kiom vi. Se ni trinkas gluton, ni scias neniam ĉu ni estos poste blindaj aŭ ne. Ili povas glui sur

la botelojn etikedojn, kiuj estas tute grizaj pro aĝo, kun la surprisitaj vortoj *Scotch Whisky*, skotviskio, per antikvaj francaj literoj. Tio tute ne estas pruvo, ke en la botelo vere estas viskio. Povas esti ankaŭ kalia cianido, kaj oni devas esti ĝoja, ke oni rimarkas tion, antaŭ ol oni prenis tro ampleksan gluton. Tiu habanero estas efektive bona. Tion mi tute ne sciis, ke vi povas fari en Meksiko tian bonan brandon.“

„Ĉu vi ankoraŭ volas havi plian glaseton de ĝi, por postlavado, *señor* ?“ demandis Hacinto ridante kaj bonhumore.

„Bone, *well then*, ankoraŭ plian, sed haltu! Nur duonplenon, *señor*. Ni – mi timas – ni, ja ni perdis la kutimon kaj renversiĝas laŭlonge jam post trinkado de la enhavo de fingroĉapeleto.“

Ili ĉiuj ankoraŭ trinkis je tri kvaronoj plenigitan glason, por postlavado, kaj por ke la unua en la stomako ne sole enuu, ili lastfine postverŝis ankoraŭ tute plenan glashavon en la gorĝon.

Post tio ili ĉiuj bonfartis kaj kontentis.

Tri krude faritaj balancseĝoj estis metitaj en la portikon, kaj la viroj komencis paroli, pri ĉio ebla.

La mestizo unue turnis la interparoladon al Usono, pri tio, kiom riĉaj la homoj tie estas, kiom altaj estas la domoj, kion oni ĉion povas vidi en la teatroj, ke en Nov-Jorko la ferjovo veturas sub la tero kaj je aliaj lokoj alte super trans la domojn, ke la fervojo tie eĉ transveturas sub la rivero, ke oni sidante en sia loĝoĉambro povas aŭskulti per radioricevilo la muzikon, kiu estas ludata dudek mil mejlojn for en Rusujo aŭ en Ĉinio kaj, ke la medicindoktoroj tie malfermtranĉas homon tute laŭ la longo, ĉion elprenas el la korpo kaj ellavas ĉion kaj poste ree enmetas kaj la tutan korpon ree fermkudras kaj, ke je la sekva tago la viro jam denove povas promeni. *Don* Hacinto ja sciis, ke tiaĵoj tute ne povas estis veraj, ke oni rakontis tion nur tial ĉi tie por povi amuziĝi. Kompreneble li tamen sciis, ke tio aŭ tio eble efektive estas ĝusta; ĉar li ja vidis iutage aviadilon, kiu zumante transflugis la haciendon.

Sed *Mr.* Abner montris bildojn el Usono, kaj jen *don* Hacinto povis vidi, ke la domoj efektive estas tiom grandaj, kaj ke oni vere profunde devis rampi sub la teron por povi eniri en la trajnon, kiu preterrapidegis sub la tero. Tial vere ĉio estis prava, kion Abner ĉi tie rakontis. Ankaŭ tio, ke la medicindoktoroj fortranĉas kapon de homo, riparas ĝin kaj poste ree kapblas alkudri ĝin. Se la homoj flugas kiel birdoj tra la aero kaj kun aparatoj povas aŭskulti tion, kio en Ĉinio estas parolata, jen efektive ĉio eblis. De *Mr.* Abner li ja ne vere tuj estus akceptinta ĉion, ĉar li estis fremdulo, pri kiu oni ne sciis, ĉu li parolas la veron, ĉar li ja ankaŭ ne tute ĝuste povis paroli kaj oni ĉiam je duono devis diveni, kion li propre volas diri. Rilate al Frigillo estas jam iom alie. Ankaŭ Frigillo ja ne ĉiam parolis la tutan veron. Tio estis ĝusta, tion ankaŭ Hacinto sciis. Neniu miraklo, ĉar la patro de Frigillo estis ja fremdulo. Sed almenaŭ Frigillo estis je duono indiĝeno. Hacinto konis ĝin de kiam li estis knabo, kaj tial oni jam povis akcepti pli de li ol de la fremdulo. Frigillo ja krome longe restadis en Usono kaj parolis la fremdan lingvon tiel bone kiel la gringo.

Se nun la gringo diris ion, kio ne estis tute akceptinda al Hacinto, tiukaze li rigardis Frigillon. Kaj se Frigillo konfirmis tion per kapklinado aŭ parola konsento, jen Hacinto kompreneble sciis, ke la dirita estas vera.

Fine ili sidigis sin por vespermanĝi. *Mr.* Abner ne tute povis decidi sin pri la manĝo. Li estis foje en Los-Anĝeleso, en meksika restoracio, pro scivolo. Tiam li supozis, ke la manĝoj kiuj estis prezentataj en tiu restoracio, estis fantazimanĝoj, kiujn oni donis al vizitantoj por kontentigi ties scivolon.

Sed nun li vidis ĉi tie en la haciendo, ke la homoj en Meksiko efektive tion manĝas, kio estis ofertita al li en tiu restoracio. La tortiljoj ne estis laŭ lia gusto kaj la amasoj da verda kaj ruĝa piproj en la manĝo estis la kaŭzo por tio, ke li devis trinki la tutan akvon el argilaj kruĉoj dum la manĝado. En Tukspam li manĝis en restoracio usonajn manĝojn. Sed ĉi tie en la haciendo li male al tio fine foje devis konduki laŭ la moroj de la lando. Li sopiris al blanka pano, butero, ŝinko, bifstekoj, multe da frida lakto kaj *cookies* kun sodogusto.

Rimarkoj

cookies = keksoj

habanero = mezkalo, alkoholaĵo simila al tekilo

Post la manĝo la viroj ree sidis en la balancseĝoj en la portiko, fumis multe kaj parolis eĉ pli.

Sur la altarŝtono en mezo de la vaste etendiĝanta korto antaŭ la centra domo de la haciendo brulis la potenca ŝtiparo por doni lumon.

Griloj kantis en la proksima vepro kaj en la kampoj. De tempo al tempo blekis bovino, tiam snufis ĉevalo. Mulo trumpetis, kaj azeno blekis kun plendanta voĉo. Tre malproksime, en unu el la kabanoj, tra kies latbarilecaj vandoj trembriletis la lumo de la kuirfornoj, bojis hundo. Kelkaj aliaj respondis. Ĉe la latbariloj de la kortego junuloj laŭpremiĝis kiel ŝtelirantaj ombroj. En la anguloj subridetis knabinoj. El la kuirejo oni aŭdis la gakadon de la kuiristinoj kaj inter tiu la profundan trankvilan plenan voĉon de la mastrino de l' domo, kiu seĝobalanciĝis sur la stamfita argila planko de la kuirejo kaj fumis cigaredon post cigaredo, ĉe tio observante la knabinojn, ordonante ilin kaj ridante kun ili, flirtante, ŝercante en la sama tempo. La infano de unu el la kuiristinoj plorante

ĝemetadis kaj oni aŭdis voki la inon: „*Dame el probrecito*. Donu foje la kompatindan bebon al mi. Vi traktas ĝin neglekteme. Ĝi ja devas krei, tiu kompatinda eta almozpetulo.“ La infano sur la sino de la ino tuj trankviliĝis. Ŝi blovis la tabakfumon facile karesante sur la vizaĝon de la bebo, por forteni ĉirkaŭflirtantajn moskitojn. Porkoj gruntis, interpuŝiĝis kaj kvikis.

La ĉielo estis profunde nigrablua katedralo kun oraj butonetoj, firme fiksitaj al la volbita mano de la universo.

Kaj *Mr.* Abner cerbumis kaj kalkulis kiel li volas dividi la dekmil dolarojn, kiuj estis certigita al li.

Je la sekva mateno la viroj rigardis la ĉevalojn. *Mr.* Abner, sekvante la konsilon de Frigillo, laŭdis la ĉevalojn trans ĉiun honestan mezuron, kvankam ili estis nur kutimaj meksikaj bienoĉevaloj, sen raso, ne malkaŝantaj la volon al celata bredado.

Ĝojigis Hacinton, ke li aŭdis tioman laŭdon pri siaj ĉevaloj de fremdulo. Ĉar li estis tre fiera pri siaj ĉevaloj kaj siaj muloj.

La indiĝeno estis tiel ĝoje akordigita pro la laŭdo, ke li donacis ĉiujn ses ĉevalojn al *Mr.* Abner kaj decide rifuzis akcepti eĉ peson.

Li diris al *Mr.* Abner: „Se vi tiom laŭdas la ĉevalojn, sinjoro, mi vere ne povas vendi ilin, tio dolorigas mian koron. Ili tiukaze ankaŭ tute ne havas prezon. Mi jam nur plu povas donaci ilin al vi kiel memoraĵon de Rozo Blanka.“

Frigillo puŝis *Mr.* Abneron firme en la flankon, en tiu momento, kiam Hacinto karesis ĉevalon kaj ĝin bonkore

kaj adiaŭante frapetadis sur la buŝon.

„*Señor*“, diris nun *Mr. Abner* kun voĉo kvazaŭ li devus perforte kaŝi sian kortuŝon, „la honoro, kiun vi elmontras al mi per la donaco de la ĉevaloj, de tiuj belegaj ĉevaloj, – mi povas – mi vere ne scias... Ne, mi ne povas akcepti tion. La ĉevaloj estas tro karaj por akcepti ilin kiel donacon.

Jen la indiĝeno diris simple: „Bonvolu, *señor*, ĉu vi efektive volas suferigi tiom mian koron kaj malakcepti honestan donacon, kiun Rozo Blanka ofertis al vi? Tion mi ne supozis, ke vi povus esti tiel malĝentila. Tio estus hontindaĵo, kiun vi kaŭzus al mi. Mi de nun tute ne plu povus vendi la ĉevalojn, de kiam mi scias, ke vi tiom ŝatas la ĉevalojn kaj tiom amas ilin. Mi ne plu povas repreni la ĉevalojn. Ili estas via propraĵo, *son suyos, señor*.“

Estas ja tamen ne tiel, ke la indiĝeno en vero fordonacis la ĉevalojn tute. Laŭ la moro de la meksikanoj kaj de la meksikaj indiĝenoj li atendis kompreneble kontraŭdonacon. Tion postulas la ĝentileco. Ĝentileco, kiun praktiki, la fremdulo en Meksiko kutime forgesas.

Intence aŭ senintence, tio ne ĉiam facile decideblas. La meksikano, se li elkore ekŝatas iun, fordonacas la ĉemizon de la korpo kaj lian edzinon aldone al tiu viro, kiun li volas honori. Li pensas ĉe tio neniam pri kontraŭdonaco. Neniam. Sed li havas embarasan guston en la buŝo, se la kontraŭaĵo ne aperas. Ne pro la materia valoro, kiu estas ligita al la kontraŭdonaco, sed pro la sento, ke la afero evoluiĝis nur je duono. Li sentas tiam, ke li ne estis komprenata, ĉar la ĝentileco kaj la honorigo, kiun li intencis elmontri, ne estis respondata kun la sama ĝentileco kaj honorigo. La harmonio estas disŝirita. La mondo ne plu estas en ekvilibro. Li havas la senton, ke li mem ne estas samgrade priatentata kaj honorata, kiomgrade li honoris kaj atentis la alian. Kaj tia sento ĉiam dolorigas, eĉ ĉe homoj, kiuj ne certigas sian atenton per donacoj, sed nur per nenidiraj vortoj. Monon oferti kiel kontraŭdonacon, estus ofendo, kiu povus konduki al mortiga malamikeco, se la meksikano ne scius, ke la fremdulo staras sub la influo de aliaj moroj ol li mem. *Mr.* Abner ricevis duan puŝon en la flankon.

Pro tio li rememoris sian rolon kaj diris, preskaŭ kun

ploroj en la okuloj: „*Señor*, Yanyez, la honoron, kiun vi elmontras al mi, estas tiel korege, tiel sincere opiniata de vi, ke mi sentas min devigita akcepti la donacon de la ĉevaloj de vi. Mi povas diri al vi, ke la ĉevaloj estas por mi pli valoraj ol se estus nur bestoj. Ili memoru min pri Rozo Blanka kaj pri vi, kiu vi elmontris al mi, al fremdulo tian grandan afablecon, kiun mi neniam estus atendinta trovi en Meksiko. Esti trovinta vin kiel amikon ĉi tie, faras al mi vian belan landon Meksiko valora kaj kara kiel mian hejmlandon. Mi dankas al vi multajn multajn milajn fojojn por la donaco tiom karega, pri kiu mi ne supozas, ke mi povas rekompenci ĝin je kiu ajn maniero. Hacinto ĉirkaŭbrakumis *Mr.* Abner kaj tenis ĝin tiel ĉirkaŭfermita dum longa tempo, frapadante lin ĉe tio sur la dorson. Tiam ili skuis reciproke la manojn. Kaj per tio flanke de la indiĝeno estis konkludita amika pakto, kiu estis celata tiel grandanime, ke ĝi validas eĉ plu por la infanoj de *Mr.* Abner.

Mr. Abner iris paŝon antaŭen kaj reen. Tiam li denove ekstaris antaŭ *don* Hacinto kaj diris: „Malfacilas al mi trovi ion, per kio mi povus rekompenci vian malavaran donacemon kaj gastamon, *señor*. Kiel la plej grandan honoron kaj ĝojon, kiun vi povas fari al mi, mi rigardus ĝin, se vi estus dum semajno aŭ pli bone dum du semajnoj mia gasto en mia hejmolando. Mi montrus al vi ĉion ĉi, kion ni priparolis ĉi tie, la ĉiele altajn domojn, la fervojojn sage rapide transirantajn sub la rivero, en kiuj ni veturus, la kinejajn bildojn parolkapablajn, la radioricevilojn per kiuj ni aŭdas la muzikon, kiu estas farata de ĉinoj en Ĉinio, kaj ni ankaŭ entreprenus vojaĝeton en aviadilo. Tiel, ke vi foje rigardus la Teron de supre. Per tiu ĉi vojaĝo, kiun mi kompreneble pagas tien kaj reen, tion vi devas permesi al mi, *señor*, mi volas rekompenci vian tiel afablan gastamon, kiu estis ofertata al mi en via domo. Mi havas krome ranĉon en Kalifornio...”

Nun *Mr.* Abner komencis mensogi.

„ – kaj mi havas ankaŭ mulbredon. Sed mi ne bredas tiom malgrandajn mulojn, kiom vi havas ĉi tie. Ne, mi bredas la grandajn mulojn, tiujn grandajn bestojn, kiujn vi ja povas vidi ankaŭ ĉe la meksika artilerio kaj ĉe la meksikaj mitralregimentoj.“

Tiujn mulojn Hacinto estis rigardinta en ilustrita aldonaĵo en la dimanĉa eldono de „*Universal*“, la granda gazeto en Meksikurbo, kiun li estis ricevinta de stratkomercisto en Tukspam. La bildojn kun la gigantaj muloj de la meksika armeo li estis eltranĉinta kaj gluinta al la vando en la loĝoĉambro. Tie *Mr.* Abner estis rigardinta la bildojn kaj li nun lerte sciis uzi la tie ilustritajn grandajn mulojn por siaj celoj.

„Ke ekzistas tiom grandaj kaj fortaj muloj“, diris *don* Hacinto, „mi ne estus supozinta ĝis mi vidis la bildojn. Tiukaze mi certe havus multajn ĝojojn, se mi povus bredi tiajn mulojn ĉi tie.“

„Tio estas certa, *don* Hacinto“, kapjesis *Mr.* Abner, „estas ĝojo bredi tiajn mulojn, jam pro ili mem, eĉ se oni tute ne pensas pri la prezoj, kiujn oni povas ricevi por ili. Mi ne

pensas, ke mi povus rekompenci tiel bone la valorplenan donacon farintan de vi per la ĉevaloj, kiel en tiu kazo, se vi elmontrus al mi la honoron akcepti tri ĉevalinojn kaj virazenon kiel kontraŭdonacon, por komenci per tio novan mulobredon, kiu apud la ĝojo, kiun vi havas ĉe tio, samtempe estos bela daŭra memoro pri la ravaj tagoj de amikeca interŝanĝo de pensoj kaj spertoj, kiujn ni ĉi tie travivis kune sur via bela ranĉo.“

Mr. Abner kapablis paroli. Tion oni certe devas agnoski al li post tiu ĉi ekzemplo. Li povis paroli pli bone ol juda komercisto pri jam uzitaj vestaĵoj el la *Lower Eastside* en Nov-Jorko. Mr. Abner estus forbabilinta la inferon de la diablo, se li havus intereson pri tio. Sed la infero momente ne interesis Mr. Abneron. Laŭ la reguloj de la kristana eklezio, je kiu li cent-unu-procente kredis kiel bona fidela usona civitano, laŭ la civitanpatento, la infero al li estus iutage tiomege certa, ke li nun vere ne devis zorgi pri tio. Ĉar nur tiukaze, se la reguloj de la metodistoj ne tute baziĝas sur la vero, li havus la kvietan esperon tamen albordiĝi en la ĉielo.

Pro la intima pakto de amikeco, per kiu la indiĝeno sentis sin ligita kun *Mr. Abner*, la indiĝeno perdis ĉiun atentemon kaj ĉiun misfidon al la fremdulo.

Ni, kiuj ni estas nek indiĝenoj, nek meksikanoj, povas eltiri nin el tia invito, kiu ŝajnas al ni suspekta, aŭ kiu estas maloportuna al ni per tio, ke ni diras: „Dankon por la granda honoro, sed mi havas ĝuste nun neniun tempon por vojaĝo. Eble iam pli poste.“ Sed meksikano, kaj eĉ multe malpli indiĝeno, ne povas tiel facile liberigi sin el la maŝo, per kiu oni volas kapti lin. Lia karaktero ne permesas elbarakti sin per nenidiraj vortoj.

La mestizo Frigillo konis siajn homojn bonege. Tial la konsilo, kiun li donis al *Mr. Abner* por enspezi la centdolaran kaptopremion, estis tiom efika.

Ĉar same tiel, kiel *Mr. Abner* grave estus ofendinta *don* Hacinton, se li estus rifuzinta la ĉevalodonacon, same tiom Hacinto estus ofendinta *Mr. Abner*, se li ne akceptus la ofertitan vojaĝon, la gastamon kaj la breditajn ĉevalojn.

La indiĝeno multe pli estus ofendinta la fremdulon, ĉar la fremdulo ja akceptis la donacon. Ankaŭ la pakto de amikeco ne permesus rifuzon. Kaj fine ankaŭ Hacinto ne estis tiel bone ekipita per bonaj artifikoj kaj efikaj elturniĝoj por trovi kialon por la rifuzo sen ofendi kaj kore vundi la amikon. Kion valoras amikeco, se ĝi estus minacata de rompiĝo jam ĉe la unua pruvo de amikeco?

Kompreneble, se *don* Hacinto estus sciinta, ke la vojaĝo al San-Francisko kaj reen kostis ĉirkaŭ ducent kvindek dolarojn, se li estus sciinta kiom multekosta estas bonaj bredobestoj en Usono, tiukaze li eble estus estinta pli memgardema kaj unue bone estus pripensinta ĉi tion . Sed li estis jam tiel lert kaptita kun la helpo de la mestizo, ke eĉ, se li estus sciinta ĉiujn prezojn, li tiukaze supozus, ke *Mr.* Abner simple tiom alte taksis la ĉevalojn, ke ili valoris tian karan kontraŭdonacon. Kaj tiu alta takso de la ĉevaloj, nur tiom pli estus venkinta *don* Hacinton, ĉar li estis tre fiera pri siaj ĉevaloj kaj ĉar la agnosko de la valoro, kiun li vidis je siaj ĉevaloj, signifis honoron por li, la bredistinton de la ĉevaloj.

Tiel la indiĝeno pro siaj propraj moroj, pro sia propra

karaktero estis kaptita. Kaj neniŭ homo surtere sidas pli firme en kaptilo ol tiu, kiu estas kaptita en tiaj aferoj. Kaptu homon je tio, kion li nomas sia honoro, kaj li donas al vi sian dion, sian mondkoncepton kaj sian dek unujaran filinon kiel kromaĵon. Tiel tia damnita afero kiel duelo, en kiu estas mortpafita tiu, kies honoro estis senhonorigita de tiu, kiu mortpafas lin, pruvas pli ol psikologoj en libregoj vane provas pruvi.

Frigillo sciis la lokon, kie meksikano kaj des pli certa *don* Hacinto estas vundebla. Ne nur la lanco de Hagen, sed eĉ venenmuŝo, generita kaj naskita en sterkejo povas mortigi iun Siegfried, se ĝi konas ties vundeblan lokon.

Post tri tagoj *don* Hacinto estis vojaĝpreta.

Mr. Abner nun tiom certis pri la indiĝeno, ke li pagis jam en Tukspam la kaptomonon al Frigillo; kaj ĉar ĉio tiel glate deruliĝis, li pagis ne cent, sed eĉ ducent dolarojn al li.

De Tukspam *Mr.* Abner kaj *don* Hacinto veturis trans la laguno per motorŝarĝboato al Tampiko.

Mr. Abner nun kun sia viktimo estus povinta vojaĝi sur la vojo ĝis San Luis Potosi kaj tiam al El Paso. Sed li pripensis la aferon kaj elektis la vojon Monterrey-Laredo. Laŭ tiu vojo li jam estos eliginta *don* Hacıinton de Meksiko post tago kaj dek du horoj, dume sur la alia vojo tio estus daŭrinta du tagojn pli longe.

Alveninte en San-Francisko *Mr.* Aber luprenis tuj meblitan domon, kies situo kaj karaktero ŝajnis favoraj al siaj celoj. Li raportis al la privatoficejo de *Mr.* Collins la alvenon de la indiĝeno.

Oni tuj komencis interkonsiliĝi kion fari.

Don Hacinto de *Mr.* Abner fine estis kondukita en la konstruaĵon de *Condor Oil Company* kaj oni nun per ĉiuj fortoj kaj artifikoj prilaboradis la viron konsenti la vendon de la haciendo Rozo Blanka.

Sed rilate tiun aferon *don* Hacinto sciis tute precize kion li volis. Tial ĉiuj intertraktoj ŝanĝis nenion. Unu miliono da dolaroj, kiuj kiel lasta oferto estis cedita al li, ne tro impresis lin, eĉ dek milionoj da dolaroj ne estus ŝanĝinta ion. Por li Rozo Blanka estis bieno, kiu ne vendeblis, tiom malmulte, kiom iu povas vendi la neceson devi manĝi kaj trinki.

Kiam nun ĉio estis provita, kiam fine rezultiĝis, ke ankaŭ ĉiuj pliaj provoj kaj ofertoj movi *don* Hacionton al vendo

estus malsukcesaj, *Mr. Collins* petis *Mr. Abneron* pri
privata interparolado. La privata interparolo okazis sen
atestantoj.

Don Hacinto en San-Francisko estis trovinta konaton. Tiu viro en la proksimeco de Tukspam plenkreskiĝis, tie geedziĝis kaj mallonge post la nupto kun lia edzino estis transloĝinta al San-Francisko, kie li malfermis butikon. La nomo de tiu viro estis Espinosa. Ial *don* Hacinto pri tio nenion estis dirinta al sia amiko *Mr.* Abner, ke li trovis tiun konaton. Tiu meksikano Espinosa pli poste povis klarigi kelkon, kiam li estis ĉe la meksika konsulo kaj rakontis tion, kion li sciis. Eble estis feliĉo por li, ke *don* Hacinto neniam menciis tiun konatecon, ĉar sinjoro Espinosa en la kuro de la afero fariĝis tre maloportuna al *Condor Oil Company*. Sed kiam Kondorkompanio aŭdis pri la viro, estis tro malfrue tiel aŭ tiel ŝtopi lian buŝon. Se la plano ne estus tiom bone preparita kaj plenumita, ĝi estus povinta fiaskiĝi pro sinjoro Espinosa. Sinjoro Espinosa ne sciis multon, sed la malmulton, kion li sciis konfirmis ĉion tion, kion divenis la meksika konsulo en San-Francisko kaj la meksikaj oficistoj en sia hejmlando.

Iutage *don* Hacinto de *Mr.* Abner estis invitita en la aŭtomobilo veturi kun li al la ranĉo de *Mr.* Abner. *Mr.* Abner kompreneble ne havis ranĉon.

Kaj kiam ili estis malfrue vespere sur ŝoseo, la aŭtomobilo estis haltigita de uloj, kiuj embuskis ie tie. *Don* Hacinto ricevis per klabo fortan baton sur la kapon. En la zumado, kiu trasagis lian cerbon, li pensis pri Rozo Blanka, pri la malnova ĉarrado en la korto, pri grandaj muloj, pri ĉevaloj, pri Margarito, pri la papago kaj pri Domingo, sian plenkreskintan filon. Eble li pensis pri aliaj aferoj. Sed la menciitaj verŝajne efektive estis tiuj, pri kiuj li pensis. Li ne estis tute senkonsciigita. Li rektiĝis je duono kvazaŭ li volus diri ion al *Mr.* Abner, kiu estis sidanta apud li. En tiu momento li ricevis plian fortan baton, kiu lasis kolapsi lin. Li estis tiritita el la aŭtomobilo kaj *Mr.* Abner veturis plu. Oni senvestigis Hacinton ĝis la nuda haŭto. Oni vestis lin per ĉifonitaj vestaĵoj. Poste dua aŭtomobilo proksimiĝis, en kiu tiuj alvenis, kiuj estis stopis la aŭtomobilon de *Mr.* Abner. La indiĝeno, kiu nun aspektis tute kiel ĉifonulo, estis metita

mezen de la vojo, la aŭtomobilo malproksimiĝis certan distancon kaj tiam rapidegis kun granda rapideco trans la korpon, zorgeme atentante, ke la radoj de unu flanko ruliĝis trans la kolon de Hacinto. La aŭto reveturis kaj veturis duan fojon trans Hacinton. La viroj elpaŝis kaj prilumis Hacinton per poŝlampo. Ili ekzamenis lin skrupule, kaj kiam ili vidis, ke li estas morta, tute morta, ili reiris en la aŭtomobilon kaj rapidegis transen al la urbo.

Mr. Abner veturis alian vojon, por reveni al la urbo.

La morta korpo de *don* Hacinto je la sekva mateno estis trovita. *The coroner*, la oficiala kuracisto, kiu konstatas la morton, raportis; kaj *don* Hacinto estis enterigita je la kostoj de la federacia ŝtato.

La raporto konstatis, ke povra ĉifonita viro, evidente meksikano, laŭ la manoj farmlaboristo, kiu ŝteliris trans la limon por trovi laboron en Usono, en la nokto estis transveturigata de pluraj aŭtomobiloj. Nek la nomo de la viro, nek la numeroj de aŭtomobiloj estis konstateblaj. Por ebligi pli malfruan identigadon, oni mezuris la mortan korpon, oni konstatis la kolorojn de la hararo kaj de la okuloj. Oni serĉis precipajn rekonilojn de la korpo kaj trovis ilin, kaj fine oni fotis la vizaĝon kaj la profilon. La identigan raporton oni transdonis en Los-Anĝeleso al la polica departemento por identigado, en kies tereno la morta korpo estis trovita. Tie troviĝas la raporto, kaj tie ĝi troviĝos, ĝis detruos iam tertremo la urbon kaj ĉiujn oficialajn dokumentojn. Ĉar neniu surtere havas intereson je morta korpo de meksika farmlaboristo, kiu enŝteliĝis en Usonon.

ĈAPITRO 12

01

Du semajnojn poste *Condor Oil Company* sendis al la registaro en Jalapa la vendodokumentojn de la Roza Blanka por konfirmado. La posedoŝanĝo estis registrita. La dokumentoj konsistis el vendokontrakto en alto da kvarcent mil dolaroj. Por tiu sumo la kompanio pagis la stampomarkojn, la impoŝtojn kaj la registradon. La kontrakto estis subskribita de Hacinto Yanyez, de la unua vicprezidanto de Kondorkompanio, de du atestantoj kaj de advokato de la kompanio. Al la kontrakto estis aldonita afidavito, ĵurdeklara dokumento de oficiale ĵurligita usona notario, kiu konfirmis la vendon kaj la subskribojn. Ĉiuj dokumentoj estis laŭordaj, aŭtentikigitaj de la meksika konsulo en San-Francisko, same la tradukoj en la hispanan estis aŭtentikigitaj de li. Li ja ne devis aŭtentikigi multon, nur la subskribojn kaj la oficialan plenpovon de tiu notario.

Kompreneble, severe laŭ la leĝo la vendo estus devinta okazi en la oficejo de la usona konsulo kaj en ĉeesto de

meksikaj konsulejaj oficistoj, por ke ĝi havu netuŝeblan validon. Sed la afidavito de la notario povas esti pridubata senoficiale, sed oficeje kaj oficiale ĝi neniam povas esti kontestata aŭ eĉ atakta sen konduki al diplomataj komplikaĵoj, kiujn oni volonte evitas ĉe tia objekto, tiom pli ĉar la vicprezidanto de la kompanio, liaj du atestantoj, la kompania advokato kaj la notario en ĉiu rilato estas honorindaj kaj estimindaj civitanoj, kiuj havas bonegan reputacion kaj – grava afero – politikan influon. Eĉ nur tute mallaŭta dubo je ĝia laŭleĝeco povas konduki al tre malagrablaj kaj embarasigaj sekvoj.

Tial do la dokumentoj estas bonaj kaj sen hezito registritaj kiel plenvaloraj dokumentoj.

Post la registrado pasis monato.

Tiam en Rozo Blanka alvenis la inĝenieroj de la kompanio, por mezuri ĝin.

Tuj ekestis kveraloj en la haciendo.

La plej maljuna filo de Hacinto kaj sinjorino Yanyez, la edzino de Hacinto, kontraŭstaris la ĉirkaŭmanipuladon de la inĝenieroj. La viroj loĝantaj en la haciendo, ĉiuj alvenis, kaj se la inĝenieroj ne rapide estus retiriĝintaj, tiukaze estus okazintaj teruraj bataloj.

La inĝenieroj asertis, ke la kompanio aĉetis la haciendon. Tion kontestis la filo, la edzino, Margarito kaj ĉiuj viroj, ĉar ĉiu sciis, ke Hacinto neniam intencis vendi la haciendon. La inĝenieroj ne havis kopiojn de la dokumentoj ĉe si, kaj tiel ili kompreneble ne povis fari ion alion krom forvojaĝi.

La kompanio telegrafis la registaron en Jalapa kaj petis pri militeca protekto ĉe la transdono de la haciendo.

Nun la guberniesteo eksciis ion de la afero, je la unua fojo; ĉar li havis nenion komunan kun la registrado de la dokumentoj. „Tiukaze io ne estas en ordo“, li diris kiel unuan frazon al sia sekretario. Li tuj ordonis alporti la aktuojn, rigardis ilin zorgeme kaj tiam diris: „La dokumentoj estas ĝustaj, ili havas la sigelon kaj la subskribon de nia konsulo. Sed mi ne komprenas sinjoron Yanyez. Li tute ne pensis pri tio vendi la haciendon. Kompreneble la sumo estis nun pagita en la alto de kvarcent mil dolaroj, dume antaŭe estis ofertita al *don* Hacinto nur kvarcent mil pesoj. Tio estas almenaŭ tiom grandega diferenco pri la prezo, ke tiu diferenco eble estis decida por *don* Hacinto. Kion oni sciu, kion la uloj krome promesis al li.“

Li resendis la aktuojn reen en la registrejon de aktuoj.

Kelkaj aliaj aferoj estis traktendaj. Kiam li jam trarigardis

tiujn, li ekstaris, bruligis cigaredon al si, iris al la tablo de la sekretario en la apuda ĉambro kaj parolis al li laŭ maniero kvazaŭ li volus ordigi siajn pensojn per la parolado kaj gvidi ilin en certa direkto.

„Tamen mi ne komprenas“, diris iam la guberniestro – la sekretario ankoraŭ ne sciis, ke la guberniestro seninterrompe estis pensinta pri la kazo Rozo Blanka, dum li ĉesigis aliajn aferojn – „tamen mi ne komprenas“, ripetis la guberniestro, „kial necesas la militeca protekto. Se li estas vendinta la haciendon, kaj por tiom alta sumo, kial la homoj do ne transdonas la haciendon? Ĉu li mem ne ĉeestas? Ĉu li ankoraŭ ne revenis?“

Al li penso tiel emfaze trasagis la cerbon, ke li ektimis.

Nerveze haste li komandis al la sekretario: „Tuj oficiale telegramu al telegrafo- aŭ telefonstacio kiel eble plej proksime al Rozo Blanka, ke mi tuj kiel eble plej rapide deziras vidi la plej maljunan filon, kaj se eblas, sinjorinon Yanyez, provizitaj per leteroj aŭ telegramoj, kiujn ili eble estis ricevintaj de *don* Hacinto dum lia ĉeesto en San-Francisko. *Don* Hacinto kunvenu, se li jam alvenis. Mi

estas konvinkita“ ,diris la guberniestro kun alia voĉo, por komprenigi, ke tio ne estu parto de la telegramo, „don Hacinto ne estas en la haciendo, alie tie ne povus okazi kvereloj. Sed kie li estas do?“

„Eble li travivas kelkajn bonajn tagojn en San-Francisko, kun tiu amaso da mono“, diris ridante la sekretario.

„Tio eblas. Sed mi ne supozas tion. Kelkajn tagojn jes ja, konsentite. Oni ja ne rekonas homon, se li subite ricevas multe da mono sur la manojn.“

Al tio diris la sekretario: „Povas esti, ke li rigardas bonan ranĉon al si, por tie aĉeti ion por si mem, en Kalifornio.“

„Ankaŭ tio eblas“, respondis la guberniestro. „Sed ŝajnas, ke liaj homoj hejme de li tute ne havas sciigon, eĉ ne informon pri la vendo. Stranga tio estas en ĉiu kazo.“

Plian fojon surtabliĝis aliaj aferoj, prilaborendaj de la guberniestro.

Ŝajnis, ke li ne povis liberigi sin de la kazo en siaj pensoj. Kiam li revenis je la deksesda al la oficejo, li ja diris al sia

sekretario: „Jen la afidavito en la aktuoj. Por kio en la tuta mondo en tiu kazo estas necesa afidavito? Tio ja tute ne necesas.“

„Sed tio ja tamen ŝajnas necesa al mi“, objëtis la sekretario. „Ĉar la vendokontrakto ne estis subskribita en la meksika konsulejo, kiel propradire estus devinta okazi, tial la kontraŭuloj kiel anstataŭaĵo enmetis por tio la afidaviton de oficiala notario. Eble la konsulo ne ĉeestis.“

„Jen ja anstataŭanta prezentanto estas en la konsulejo“, diris la guberniestro.

„Konsentite“, opiniis la sekretario, „sed eble la anstataŭanto ne havis tiajn ampleksajn rajtigojn.“

La guberniestro skuis la kapon: „Ĉe la finfarado de tia grava kontrakto, kiu rilatas al posedoŝanĝo en fremda lando, precipe tiukaze, se temas pri la posedoŝanĝo el la mano de samŝtatano en la manojn de fremda eksterlandano, oni ankaŭ povas atendi kelkan tagojn pliajn ĝis la konsulo revenas, aŭ ili estus povintaj vojaĝi al Los-Anĝeleso por tie finfari la vendon.“

„Sed la kompanio havas sian domicilon en San-Francisko“ rimarkis la sekretario. „Por la kompanio respondecas la meksika konsulejo en San-Francisko.“

„La kompanio volis tute certi, tial la afidavito de la notario“, diris la guberniestro. „Sed, se ĝi volis tiom certi, estus estinta plej sekure iri al nia konsulo kaj tie finfari la kontrakton dum lia ĉeesto. Ke la kontraktintoj evitis tion viziti nian konsulon, estas ja ĝuste tio, kio ŝajnas al mi tiom stranga.“

„Sed, sinjoro guberniestro“, diris la sekretario, permesu, bonvolu, nia konsulo konfirmis la dokumentojn.“

„Ja kion li konfirmis? Kion do? Li konfirmis la pravigitecon de la subskriboj, kiuj ŝajnas persone konataj al li, laŭ tio, kio estas menciita en lia konfirmigo. Li krome konfirmis, ke la notario, kiu skribis la afidaviton, estas *a public notary*, oficiale ĵurligita publika notario, kies ofico kaj plenrajtoj laŭleĝas. Pli nenion. Sed restas neniu alia elirvojo al mi. Do, plian telegramon al *Condor Oil*, ke militeca protekto estas preparata kaj se necesas, en malmultaj tagoj estos je dispono. Tiom longtempe,

kiom la kontrakto ne kontestebblas, la kompanio havas
ĉiujn rajtojn je sia flanko.“

Kelkajn tagojn pli poste la filo kaj la edzino de Hacinto venis al Jalapa. Oni tuj vokis ilin al la guberniestro.

Li konis ambaŭ homojn persone pro lia vizito en Rozo Blanka.

Ili ambaŭ aspektis tre afliktitaj. Ili portis siajn zorgojn kaj siajn sendormajn noktojn senkaŝe en la vizaĝo.

La guberniestro estis karega al ili. Li lasis senti ilin, ke ili povas fidi lin.

Li ofertis cigaredojn al la filo kaj al la edzino ĉokoladon el kartonskatolo, kiun li tiris el tirkesto de sia skribtablo.

Kiam li donis la skatolon al ŝi, por ke ŝi elprenu kelkajn pecojn, li komencis rideti kaj diris: „Pardonu, Doña Concepcion, ankaŭ vi prefere fumas cigaredojn. Jen, bonvolu, provi tiujn.“ Li donis lian sian ledan cigaredujon al ŝi, kaj la ino elprenis cigaredon, ridetante, kun ploroj plenigantaj ŝiajn okulojn.

„Kie estas *don* Hacinto?“ demandis la guberniestro.

„Tion ni ne scias“, diris la ino. „Ni faras al ni tiom da zorgoj pri tio, kio povus esti okazinta al li. De kiam li forvojaĝis kun la usonanoj, ni ne plu aŭdis ion de li.“

„Li vendis Rozon Blankan al la kompanio.“

„Tio estas mensogo“, kriis ambaŭ, la ino kaj la juna viro.

„Tion li ne faris. Li ne vendas Rozon Blankan eĉ por cent mil milionoj da pesetoj“, aldonis sole la ino.

La guberniestro prenis la dokumentojn, kiujn li lasis alporti sin kaj transdonis ilin al la ino: „Jen la vendodokumentoj, *doña* Concepcion.“

La ino tralegis supraĵe la enhavon sen vere legi ĝin. Si venis al la subskriboj kaj kriis: „Tion Hacinto ne skribis, tiun nomon.“

La guberniestro demandis haste: „Kial vi supozas, ke *don* Hacinto ne skribis tion?“

„Simple, simple“, kriis la ino ekscitite, „li ja tute ne povas skribi, eĉ ne unu leteron li povas skribi.“

La guberniestro saltis supren kaj la sekretario kriis:
„Guberniestro.“ Por momento diris neniu ion.

La guberniestro rigardis sinjorinon Yanyez laŭ maniero, kvazaŭ li ne vidus ŝin.

Tiam la ino parolis ekscitite: „Li ja tute ne povas skribi ion, Hacinto mia. Li neniam lernis tion, li ankaŭ ne povas legi. Ĉion, kio skribeblas en la haciendo, skribas mi. Mi lernis ĝin en lernejo. Mi frekventis sep jarojn la lernejon Escuela Mixta, la miksitan lernejon en Tukspam. Nun skribas ĉion mia Domingo apud mi, kiun ni same sendis en la lernejon, sed Hacinto ne povas skribi ion.“

„Do, Hacinto ne povas skribi ion“, diris la guberniestro kaj ree sidiĝis.

La ino, ankoraŭ tenante la dokumentojn en la mano, rigardis kiel perdita ankoraŭfoje trans la subskribojn, vidis ankaŭ la subskribon de la kvitanco, komparis ilin ambaŭ kaj tiam diris: „Krome, sinjoro guberniestro, la

nomo estas skribita malĝuste. Ni skribas nian familian nomon ne kun ipsilono en la mezo, sed kun 'n' kaj kun ondosigno sur tio. Nur komence ni skribas la nomon kun ipsilono, sed ne en la mezo.“

La guberniestro prenis la dokumentojn el la manoj de la ino, rigardis samtempe sur la subskribojn kaj diris: „Tio estas ĝusta. Tion mi komence tute ne rimarkis. La usonanoj skribas Yanyez en la mezo kun ipsilono, ĉar ili ne havas 'n'-on kun ondosigno. Sed meksikanoj neniam verkas la nomon tiel. Jen miraklo, ke la konsulo ne rimarkis tion.“

„Neniu miraklo“, enmiksiĝis la sekretario, „ke la konsulo ne rimarkis tion. Ĉiu viro povas skribi sian nomon tiel, kiel ĝi estis transprenita de sia patro. Ĉe la skribado de nomoj la reguloj de la ortografio ne estas uzataj. Kaj ĉu la nomo estas verkata tiel aŭ tiel, ĝi laŭ prononco restas ja ĉiam la sama.“

„Aŭskultu min nun bone, *doña* Conception“, diris la guberniestro afable al sinjorino Yanyez. „Ni tuj malfermos ekzamenadon pri tio, kio estas ĝusta kaj kio

malĝusta je la afero. Mi ne rajtas diri al vi oficiale tion, kion mi pensas; ĉar la dokumentoj laŭleĝe rigardate, estas tute sen manko. Egale, kio ajn post tio povas kaŝiĝi je malĵustecoj. Mi estas devigata kiel guberniestro agnoski la dokumentojn kiel laŭrajte ekzistantajn, kaj mi estas devigata, tiun, kiu kaŭze de tiuj dokumentoj havas la rajton nomi sin posedanto helpi al liaj rajtoj. Se ne alikaze, tiel do kun militeca perforto.“

„Tion do signifas“, diris sinjorino Yanyez ektimigite, „ke ni ne plu posedas la haciendon, ke ni kaj ĉiuj homoj devas foriĝi de nia tero.“

„Tio estas ĝusta, *doña* Conception. „La kompanio momente havas avantaĝon. Jen ni povas fari nenion. La kompanio tiukaze povas voki la usonan registaron je helpo kaj la usona registaro tiam devigos nian registaron je diplomatia vojo transdoni la haciendon al la nova posedanto kaj subtenos lin ĉiumaniere, eĉ kontraŭ siaj propraj civitanoj. Se vi, *doña* Conception, povas montri similajn posedodokumentojn de haciendo, kiu troviĝas en Usono, jen la usona registaro tie supre al vi devus same tiel bone helpi kiel nia registaro devus helpi al la usonaj

civitanoj ĉi tie en Meksiko, se ne pridubeblaj dokumentoj klarigas la posedrajtojn. Tio estas internaciaj rajtoj, kiuj ĉikaze uzendas. Kaj nur tiukaze, se ni kapablas pruvi, ke la dokumentoj neleĝe aŭ eĉ krime estas atingitaj, ke do la dokumentoj malĝuste redonas la efektivajn faktojn, ni povas interveni kaj heziti la posedotransprenon, ĝis klare kaj ne pridubleble estas konstatebla la efektiva laŭrajta posedanto. En tia kazo, tiu plu posedus la haciendon kaj uzus ĝin je sia avantaĝo, kiu momente havas ĝin en posedo. Tio estus do vi kaj via filo. Sed ni ne povas lasi vin en la posedo, ĉar ĝis nun la dokumentoj devas esti rigardataj kiel aŭtentikaj. Klare dirite, la dokumentoj por si mem estas aŭtentikaj. Ni, sed nur ni ĉi tie, pridubeblas la aŭtentikecon de la subskribo de don Hacinto. Ke tiu subskribo estas neaŭtentika, ni devas pruvi unue.“

„Sed Hacinto ja ne povas skribi“, ripetis la ino obstine.

„Tion mi jam scias, sinjorino. Sed ni devas pruvi tion. Kaj tio estas malfacila.“

Ĉu malfacile?“ vokis la ino mirigite.

„Malfacile, se mi ĉion devis skribi, ĉar li ne kapablis skribi, ĉu?“

„Iu estis ja povinta konduki lian manon, doña Conception. Ni ankoraŭ ne scias tion ĝis nun.“

„Pri tio sinjorino Yanyez ankoraŭ ne pensis. Ŝi vidis foriĝi ĉiujn esperojn, kiuj ekfloris.

„Vi devas pripensi, sinjorino“, diris la guberniestro, „ke la subskribo kaj la finfina vendo de pluraj personoj estis konfirmita. Ĉiuj estas homoj, kiuj troviĝas en respektataj oficoj.“

„Tiuj homoj estas trompistoĵ“, kriis sinjorino Yanyez.

„Vi rajtas diri tion, sed ne mi. La kontrakto kaj la subskriboj estas krome oficiale konfirmitaj de ĵurligita notario.“

„Ĉiuj notarioj kaj licenciados estas trompistoĵ“ diris la ino.

„Povas esti“ diris la guberniestro ridante. „Sed, se mi aŭ

nia konsulo en San-Francisko dirus, ke la usona notario estas trompisto, tio povus bone konduki al milito inter nia lando kaj Usono. Tiel simple la afero ne lasas solvi sin je via favoro. Bedaŭrinde ne. Mi ne pensas, ke Hacinto estas vendinta Rozon Blankan. Tio estas certa. Sed kion mi supozas, tio oficiale ne validas. Mi venas nun al tio, kion mi ankoraŭ devas diri al vi, Doña Conception. Dolorigas min devi diri tion al vi, sed estas mia devo kiel guberniestro. La kompanio estas laŭ la nomo en la posedo de la haciendo. Vi devas cedi al ĝi, kaj ĉiuj homoj devas forlasi la haciendon. Kontraŭ tio fareblas nenio. Se trompo okazis, kaj se ni povas pruvi la trompon, vi rericevos Rozon Blankan, kun anstataŭaĵo por ĉiun damaĝon, kiun vi suferis materie. Sed momente vi havas malavantaĝon. Mi tuj ekkomunikos al la kompanio, kaj mi provos movi la kompanion, ke vi kaj kiom eble plej multaj familioj povos restadi plu en la haciendo, ĝis ili ĉiuj estos finintaj la rikolton. La kompanio certe ne tuj komencos drili je ĉiuj lokoj samtempe, tiel, ke postrestos sufiĉe da loko por vi kaj multaj aliaj familioj.“

„El ĉiuj tiuj kaŭzoj, kiujn mi diris al vi, mi petas vin ne

fari komplikaĵojn al la tiaj inĝenieroj. La inĝenieroj estas tute senkulpaĵ. Ili estas laboristoj, kiuj estas pagataj de la kompanio kaj tial devas fari tion, kion la kompanio komandas al ili. Ĉu vi promesos al mi, Doña Concepcion, kaj ankaŭ vi, filo de Hacinto, “sekvi al mia peto kaj provizore agnoski la posedoŝanĝon?”

„La posedoŝanĝon ni ne rekonas, neniam, neniam“, vokis la ino ekscitite. „Ni eĉ ne havus la monon. Nur se Hacinto mem diras al mi, ke li vendis la haciendon, jen mi volonte volas akcepti tion, eĉ se oni estus ŝtelinta la tutan monon de li. Sed tiom longe, kiom Hacinto ne mem diris tion al mi, mi rekonas nenion kaj akceptas nenion kaj asertas, ke estas abomeninda trompo de la gringoj, kiuj volas havi nian haciendon.“ Ŝi silentis.

La guberniestro rigardis ŝin trankvile, sen diri eĉ nur vorton.

Kaj sub la rigardo de la viro, kiu tiel afable kaj klare estis parolinta al ŝi, kiu estis estinta ŝia gasto, kaj tie en ŝia domo estis tiel gaja, ŝi komencis trankviliĝi, kvazaŭ ŝi sidus kontraŭe al sia patro, kiu celis nur bonon al ŝi

Ŝi glutis plurajn fojojn, kvazaŭ ŝi devus subpremi ploradon aŭ vortojn, kiujn ŝi ne volis diri.

Tiam, ankoraŭ nun plu silente sub la trankvila rigardo de la guberniestro, ŝi diris fine tute trankvile: „Bone, sinjoro guberniestro, la inĝenieroj venu kaj laboru tiom, kiom ili volas. Mi diros al ĉiuj homoj, ke oni lasu ilin en paco.“

La guberniestro ekstaris, ĉirkaŭiris sian tablon, venis al la ino, kaptis senhaste ŝiajn manojn, kvazaŭ kiel de infano, skuis la manojn kaj fine kisis ilin. Tiam li diris same tiel mallaŭte kiel la ino estis parolinta: „Mi dankas al vi, Conchita“ – Conchita estas la karesnomo por Conception – „mi dankas al vi, ke vi plifaciligas mian oficon. Ne forgesu, ke vi havas amikon je mi. Ne nur kiel guberniestro, sed pli ol via amiko kaj kiel amiko de Hacinto, mi promesas al vi, ke mi laboros per ĉiuj fortoj eltrovi la veron. Kaj mi promesas al vi, ke, se mi estos trovinta la veron, ke tiam Rozo Blanka ne por nenio estis rompita. Eĉ, se ĝi eble ne plu povos flori en sia beleco, ĝi ja tamen ne forvelku, neniam forvelku. Ĝi havu frukton, kiu maturiĝas. Kaj la komenco de la maturo estu la komenco de la liberigo de la lando kaj de siaj civitanoj,

por ke ni posedu landon, en kiu ĉiu rozo, ĉu blanka ĉu ruĝa havu la liberon flori tiel bele kiel ĝi volas kaj kiom longe ĝi emas al tio.“

La ino ne komprenis liajn vortojn. Sed ŝi sentis ilian sencon kaj ĝi portis ĝin en sia koro, same al la eterna kredo de la homoj pri fina liberiĝo el ĉiuj turmentoj.

Rimarko

licenciado = advokato

ĈAPITRO 13

01

La guberniestro vojaĝis fine de la semajno al Meksikurbo. Li volis viziti la advokaton Perez, sed ne trovis lin en ties oficejo.

Je la malfrua posttagmezo la guberniestro iris en restoracion, al kie li estis interkonsentinta renkontiĝon kun kelkaj senatanoj por tie interkonsiliĝi plurajn aferojn pri politikaj temoj. Kiam li eniris en la grandan halon de la restoracio, li vidis en niĉo sidi la advokaton kun ties edzino, kiam ili trinkis teon. Li iris tuj al li kaj petis lin pri konciza interparolado. Ambaŭ viroj sidiĝis al unu el la etaj tabloj.

„*Don* Hacinto vendis Rozon Blankan, ĉu?“ diris la guberniestro sen iu enkonduko.

„Jes ja, tio estas prava“, respondis sinjoro Perez, „mi, kiel leĝa reprezentanto, sendis la aktuojn por registriĝo al la registaro.“

„Ĉu io frapis vian atenton je la dokumentoj?“ demandis la guberniestro.

Advokato Perez rigardis severe supren: „Kial, sinjoro guberniestro? Jes, frapis mian atenton, ke la dokumentoj ne estis suskribitaj en la ofico de nia konsulo. Sed tio povas havi bonajn kaŭzojn. La dokumentoj estas laŭleĝe konfirmitaj de usona notario. Ĉiuj ceteraj subskriboj kaj la tradukoj tamen estas konfirmitaj de nia konsulo, kiu konas ĉiujn subskribintojn persone.“

„Ĉu nia konsulo konis ankaŭ *don* Hacinton persone, kiam li konfirmis la subskribojn?“ demandis la guberniestro.

„Tion mi ne povas scii“, respondis sinjoro Perez.

„Ĉu vi jam de ni ricevis la oficialan konfirmigon, ke la dokumentoj estas registritaj?“ demandis la guberniestro.

„La oficialan konfirmigon mi ankoraŭ ne havas en la manoj, sed sinjoro Jazmines de la oficejo por registrado sciigis al mi je mia demando, ke la registriĝo estis okazinta“, diris sinjoro Perez.

„Estas ĝuste. La registriĝo okazis“, konfirmis la guberniestro. „Antaŭ ol vi sciigas al la kompanio, ke la registriĝo estas okazinta, mi volas ankoraŭ paroli kun vi. Se iel eblas, jam morgaŭ, ĉar mi devas reveturi postmorgaŭ matene.“

„Bone“, respondis la advokato. „Kvankam morgaŭ estas dimanĉo, mi estos je la dek-unua en mia oficejo kaj ni povos paroli tie solaj kaj senĝenitaj.“

„*Bueno*, do morgaŭ je la dekunua“, diris la guberniestro. „Mi petas vin nun pri via kompreno, *licenciado*, sed jen la sinjoroj, kun kiuj mi devas intertrakti.“

Kiam la guberniestro kaj la advokato je la sekva mateno frue kunsidis, la guberniestro tuj elpafis demandon pri la celata. Ĉu ne kaptis vian atenton, ke *don* Hacinto tiel rapide vendis, tuj kiam li estis tie en San-Francisko?“

„Ne, tio ne frapis mian atenton. Tiom malpli multe, ĉar oni tiam pagis al li en dolaroj, sumon, kiun mi ofertis al li nur en pesoj. Tian altan sumon li ŝajne ne povis rezisti.“

„*Don* Hacinto estas subskribinta la kontrakton, sur la originalo kaj sur ĉiuj kopioj“, diris la guberniestro.“

„Jes, tion li faris“, konfirmis la advokato.

„Ĉu vi scias, *licenciado*“, demandis nun la guberniestro, ŝajne tute trankvile, „ke *don* Hacinto ne povas skribi ion?“

„Kion?“ kriis sinjoro Perez. „Li ne povas skribi?“

„Ne, eĉ ne literon.“

Post certa tempo, dum kiu li trankvile pripensis ĉion,

diris sinjoro Perez: „Eblas, ke oni kondukis la manon al li. Tio estas leĝe permesata.“

„Ĝuste. Sed tiukaze, ĉe tia grava dokumento, ĝi devas esti eksplicite konfirmita de notario. Same estus, se je la loko de la nomo de subskribinto, kiu ne scias skribi, figuro aŭ tri krucoj estas desegnataj.“

„Jes, vi pravas, guberniestro“, diris la advokato, „Tio devus esti konfirmita, por ricevi leĝan firmigon.“

La guberniestro pripensis dum certa tempo.

Lastfine li diris: „Nun kelkaj aliaj demandoj, *licenciado*, kelkaj juraj aferoj.“

„Bonvolu, demandu.“

„Ĉu vi pensas ĝin ebla, ke la atestantoj, kiuj subskribis, la notario de la kompanio, la oficiala notario kaj la vicprezidanto, estas friponoj?“ demandis la guberniestro.

Sinjoro Perez laŭte ekridis: „Sed, sinjoro guberniestro, kia demando! Kiel mi povas scii, ĉu ĉiuj ĉi homoj estas

friponoj? Ili ĉiuj estas estimataj sinjoroj, respektindaj viroj antaŭ la leĝo kaj antaŭ la granda publiko. Kion ili eble estas laŭ sia vera karaktero, kiu ne estas konata al la publiko, kompreneble povas scii neniu. Kaj tio, kion nek la leĝo, nek la publiko scias ne rajtas fari zorgojn al ni, kion ajn ni pensas eble laŭ nia privata opinio.“

„Tiel nekutima mia demando tamen ne estas“, pravigis sin la guberniestro. „Mi volas diri ĝin pli precize. Se ĉikaze okazas krimo, aŭ ni diru pli milde, neleĝeco, ĉu vi supozas, ke tiom da respektindaj viroj helpus ĉe tia konsekvencoplena kontraŭleĝeco?“

„Ne, tion mi ne supozas“, diris la advokato. „Ĉiu unuopa el tiuj sinjoroj eble povus kulpigi sin pri grava kontraŭleĝeco, kial ne? Sed neniu el ili farus ion neleĝan en komuneco kun aliaj. Tio estas danĝera. Tia viro estas ĉiam en la mano de tiu, kiu estis atestanto. Por tio tiaj viroj estas tro inteligentaj kaj tro memgardemaj.“

„Jen tio, ĝuste precize tio, kion pensis mi“, respondis la guberniestro. „Do, se en tiu kazo okazis neleĝeco, jen efektive eblas, ke neniu el la atestantoj scias, kio okazis,

ĉu?“

„Mi ne tute komprenas, kion vi celas, guberniestro.“

„Bone. Do, mi celas tion: Ĉu ĉiuj atestantoj samtempe ĉeestis, kiam *don* Hacinto subskribis la kontrakton kaj la kopiojn?“

„Tion mi ne povas scii“, diris la advokato laŭ la vero.

„Kompreneble ne, sinjoro Perez, kompreneble vi ne povas scii tion; ĉar vi mem ne ĉeestis. Kiel kutime deruliĝas tia kontraktsubskribado?“

„Ha, guberniestro, nun lastfine mi ekkomprenas tion, kion vi celas“, diris sinjoro Perez. „Kontrakto, precipe tiom grava kontrakto kiel ĉi tiu, ĉe kiu temas pri konsiderinde granda objekto, propre devus esti subskribata – por pravigi ĉiujn cirkonstancojn – en ĉeesto de ĉiuj subskribantoj. Propre tiel estu, sed plej ofte tio ne okazas, kaj la leĝoj diras malmultajn precizaĵojn pri tio. En multaj kazoj – mi povas diri el mia propra praktika sperto – en la plej multaj kazoj okazas tiel: Respondeculo de la kompanio – ĉe tiu ĉi objekto estis la

unua vicprezidanto, subskribas la kontrakton, kiu estas antaŭmetata al li de la kompania advokato aŭ de alia persono. Li subskribas ĝin en lia oficejo samtempe kun cent aliaj kontraktoj kaj leteroj. Plej ofte li eĉ ne vere rigardas tion, kion li subskribas, ĉar li fidus al sia personaro. Tiam la kontrakto estas antaŭmetata al la alia kontraktano, jen do al sinjoro Hacinto Yanyez. Ankaŭ tiu subskribas lin en la ejo, kie la kontrakto estas metata antaŭ li, eble en sia hotelĉambro. Tiam la kontrakto estas transdonata al unu el la atestantoj kaj poste al la alia, al ĉiu el ili unuope. Ĉiuj ĉi subskribuloj konas sin plej ofte persone kaj scias la reciprokajn parafojn, kiuj krome plej ofte estas registritaj. La kontrakto tiam, se necesas estas transdonata al la notario, kiu konfirmas la subskribojn, ĉar li same persone konas ĉiujn subskribulojn kaj scias ties subskribojn. Iujn dubojn li ne havas, ĉar la kontrakto estas transdonita al li de honorinda kaj konata kompanio, pri kies honesteco ne ekzistas dubo. Tion oni tiel faras, kaj plej ofte oni devas fari tion tiel, ĉar tre ofte estas tute neeble kunhavigi ĉiujn subskribulojn samtempe je la sama loko kaj je la sama horo. Unu el ili eble loĝas en Ĉikago, alia en Albeno, plia en Fenikso. Se do alvenas

kontrakto kun la subskriboj de tiaj estimataj kaj konataj sinjoroj kaj eĉ kun la konfirmigo de notario al nia konsulo, aŭ al alia konsulo, jen li tute ne dubos doni la oficialan konfirmigon. Plej ofte li tute ne havas la tempon por detale trarigardi la kontrakton kaj longe cerbumi pri tio, ĉu je la subskriboj eble io ne estas en ordo aŭ ne. Nuntempe oni tre ofte devas havi fidon reciproke. Se oni ne farus tion, sekvus tiom da tempoperdoj, ke interrompiĝus la tuta ekonomia vivo.“

„Estas do sekve eble“, diris nun la guberniestro, „ke alia persono, kaj ne *don* Hacinto subskribis.“

„Tio kompreneble eblas. Kaj ĉe la tuta kontraktfarado nur unu persono devas scii la veron, dume ĉiuj aliaj subskribintoj efektive estas senkulpaj kaj oni eĉ ne povus riproĉi ilin laŭ la realaj cirkonstancoj, ke ili agis neglekte, ĉar la tuta negoca deruliĝo okazis en la ĉiutaga kaj kutima maniero.“

„Estas tute tiel, kiel mi pensis tion, kiel eble okazis“, diris la guberniestro. „Ni konsideru la kazon plu. Se nun unu el la plej gravaj subskribuloj, por ekzemplo *don* Hacinto,

malaperas el la mondo, tiukaze neniam pruveblos, ke li ne subskribis la kontrakton.“

„Tamen, sinjoro guberniestro“, kontraŭdiris la advokato. „Oni povas kompari lian subskribon fare de ekspertoj, tiujn sur la kontrakto kaj en la kopioj kun aliaj subskriboj iam kaj ie farintaj de *don* Hacinto, tiaj, kiaj ne pridubeblas esti legitimaj subskriboj de lia persono.“

„Sed tia pruvo ne havigeblas“, interdiris la guberniestro, „se ne ekzistas pli fruaj subskriboj de *don* Hacinto.“

„En tia kazo do kompreneble ne“, diris advokato Perez.

La guberniestro pripensis tion dum kelke da tempo. Tiam li diris: „Verŝajne la viro, subskribinta por *don* Hacinto, estis meksikano, kiu eble eĉ povis legitimigi sin kiel viro kun la nomo Yanyez. La nomo Yanyez ja vere ne estas ofta, sed sufiĉe ofte ekzistanta por povi preteksti iun helpe de tiu nomo. Tre bone eblas, ke la pretekstita viro tute ne sciis ion, ke li subskribis ion, pri kies enhavo li komprenis ne multon. Oni enmanigis kelkajn dolarojn al li, kaj la povra diablo faris tion, kion oni postulis de li,

ĝojante pri tio, ke li tiel facile povis perlabori dudek aŭ kvindek dolarojn. Eblas, ke tiu viro post la subskribo foriĝis. Kiom tie transe validas povra meksika laboristo?! Oni mortbatas ilin dekoje. Kaj neniuj ekscias tion. Se ĉi tie en Meksiko usonano estas mortbatita de banditoj, jen tion tuj ekscias la tuta mondo, kaj la tuta mondo indigniĝas pri la malsekureco en Meksiko.“

Subite simile al tondrobato la voĉo de la guberniestro draŝis sur la advokaton: „Ĉu vi, Perez, scias ankaŭ, ke *don* Hacinto ankoraŭ ne revenis el Usono?“

Sinjoro Perez subite timigite rektiĝis: „Kion vi diras? Ne revenis?“

„Ne, li ne revenis“, ripetis la guberniestro. „Neniuj hejme de li ricevis iun sciigon. Neniuj scias, kie li estas, neniuj scias, kie estas la mono, kiun li ricevis.“

„Tio ja ne estas ebla, guberniestro“, diris la advokato pli kaj pli ekscitiĝante. „Tio ja tute ne povas esti!“

„Sed estas tamen tiel“, kapklinis la guberniestro: „Kaj nun mi volas diri al vi tion, kion pensas mi. *Don* Hacinto ne

estas subskribinta la kontrakton; ĉar unue li ne volis vendi Rozon Blankan. Kaj due li ne povis skribi. *Don* Hacinto ne vendis la haciendon. Subskribis iu meksika laboristo por kelkaj dolaroj. Tio estis ruza, ĉar ni ja skribas la literojn iom alie ol la usonanoj. Se estus subskribinta usonano, oni tuj estus ekvidinta, ke la subskribinto ne estas meksikano. Oni uzis laboriston aŭ lernejan knabon por ŝajnigi la subskribon tiom mallerta kiel kutime aspektas la subskribo de malmulte skribolerta samlandano. Laŭ mia firma konvinko oni murdis *don* Hacinton tie transe, ĉar oni ne sukcesis konvinki lin pri la vendo de ties haciendo.“

„Sed tio estas ja impertinenta, kion vi diras, sinjoro“, vokis la advokato.

„Neniel impertinentas“, diris la guberniestro serioze. „Vi ja ĵus konfirmis al mi kiel tiaj kontraktoj estas subskribataj, ke do la subskribuloj ne ĉiuj samtempe kaj je la sama loko devas ĉeesti por la kontraktsubskribado, ĉar ĉiu persono fidus al la honesteco de la aliaj. Mi koncedas, ke tio estas laŭleĝa ago, ĉar – vi ja donis al mi la kialojn – alikaze ofte ne eblus finfari kontrakton, ĉar

oni ne povas kunhavi ĉiam ĉiujn personojn. Ankaŭ mi subskribas la plej multajn kontraktojn kaj leterojn antaŭmetatajn al mi de miaj kunlaborantoj, konfidante la fidinecon de miaj sekretarioj. En la kazo de *don* Hacinto kompreneble ekestis eblo fraŭde akiri kontrakton. Mi estas konvinkita, ke *don* Hacinto ne ricevis la monon, kaj se li tamen ricevis ĝin, oni forprenis ĝin de li tuj kiam li estis murdita.“

„Mi ne povas akcepti tion“, diris sinjoro Perez. „Mi konas la prezidanton de la kompanio, tiun Mr.Collins persone. Li ne postlasis la impreson en mi, kvazaŭ li estus kapabla doni sian konsenton al tia horora ago.“

„Vi, kiel advokato, kara Perez, devus esti sufiĉe heziteme juĝi la homojn nur laŭ ilia impreso, kiun ili faras al aliaj. Ja ne temas pri fia murdo en la kutima senco. Fian murdon tia viro kompreneble ne entreprenas. Sed en tiu kazo la murdo laŭ la konvinko de la viro estas necesa pro la interesoj de lia kompanio. Li, tiu prezidanto, rigardas tian murdon pli kiel murdon politikan. Kaj ĉe politikaj murdoj la konscienco kutime sekvas al aliaj vidpunktoj ol ĉe murdo, kiu servas al pure personaj interesoj. Eble la

murdo ne estis parto de la planoj de la prezidanto. En liaj planoj nur la posedo de la haciendo estis la celo. Li komisiis al iu ulo sukcesigi la vendon de la haciendo, je ĉia prezo. Tiu ulo, kiu ne posedis la intelekton kaj trankvilon de la prezidanto, elektis tiam la plej rektan kaj plej krudan vojon por plenumi la komision transdonitan al li. Tiu ulo povus esti estinta tiu viro, kiu estis en la haciendo, kaj kiu logis *don* Hacinton al Usono. Sed tio estas nur supozo.“

„Ĉu ne eble ĉio estas nur supozo, kion vi ĉi tie diris al mi, señor *gobernador*?“ demandis sinjoro Perez.

„Hieraŭ ĉio estis nur supozo. Hodiaŭ, post la interparolado kun vi, kiu klarigis al mi la manieron kiel tiaj kontraktoj estas subskribataj kaj konfirmataj, mi certas, ke mia supozo estas ĝusta aŭ almenaŭ tre proksimas al la vero. Ni havas nun nur plu unu eblon eltrovi la veron. Ĉe ĉiuj krimoj oni ĉiam faras eraron. Ankaŭ ĉikaze oni certe faris eraron. Kaj mi supozas – mi ĉifoje emfazas tion, ke mi ĝin nur supozas – , ke la kontrakto estis subskribita, post kiam *don* Hacinto jam estis murdita aŭ post kiam oni lerte – kiel tio tie ofte

okazas – iel akcidentigis lin, en ĉasado, en trajno aŭ en aŭtomobilo aŭ ĉe la banado aŭ ĉe velado. Ni devas provi trovi la korpon de Hacinto por povi konstati, kiam li mortis. Se ni tiam eltrovos per komparo, ke la kontrakto estis subskribita nur post kiam *don* Hacinto estis jam morta, jen ni estos pruvinta la trompon.“

„Io tia certe estas komplika“, opiniis la advokato.

„Tion mi scias, *señor* Perez. Estas nur ideo de mi. Sed mi sekvos al tiu ideo. Mi petas vin, ke vi helpu min ĉe tio. Vi ja ne estas nur la reprezentanto de tiu kompanio, sed vi estas ja ankaŭ meksikano, ĉu ne, *señor* Perez?“

„Kun mia tuta koro, *señor gobernador*, tion mi ne devas certigi“, diris la advokato sincere. „Kaj en tia kazo, vidalvide al tia fia krimo, ĉe kiu temas pri pura rabado de parto de nia lando, mi estas des pli meksikano kaj spite al ĉio. Spite al la obstineco kaj lanteco de *don* Hacinto, mi lernis lin respekti kaj estimi, dum miaj pluraj vizitoj en lia haciendo. Kaj mi rajtas sincere koncedi al vi, ke mi ekhavis profundan respekton al li, kiam li – spite al la suramasigitaj ormoneroj sur sia tablo – rifuzis la vendon

finfine. Kaj kvankam mi perdis riĉan provizion, ankore mi ĝojis, ke li ne vendis tiun belan terpecon da hejmlando al la usonanoj, ke tia bela peco da tero, kiu naskis tiajn homojn kia li estis kaj ĉiujn aliajn tie, al kiuj mi konatiĝis, ne ŝanĝiĝis al fetoranta kaj bruanta naftokampadejo. Kaj tio estas mia honesta opinio, *governador*.”

„Nu bone“, diris la guberniestro, „ni turnu nin al la agado. Skribu al la kompanio, ke vi ankoraŭ ne ricevis la konfirmigon de la registriĝo, kio ja laŭas la veron. Vi povas senĝene aldoni, ke laŭ privataj sciigoj, kiujn vi ricevis, la registrado estis okazinta. Tiam skribu krome, ke ĉi tie ĉe la registaro intertempe leviĝis duboj. Diru sincere, ke montriĝis, ke *don* Hacinto ne povis skribi. Kaj diru fine, ke la registaro havas intereson ekscii, kie *don* Hacinto troviĝas por pridemandi lin pri kelkaj detaloj en la kontrakto.“

„Haltu!“ interrompis lin la advokato. „Tion mi ne skribos, ĉar en tiu kazo, se *don* Hacinto ankoraŭ vivas, oni nun ankoraŭ poste provos forigi lin, por liberiĝi de tia maloportuna atestanto.“

„Tio estas la vero. Tion mi ne pripensis“, diris la guberniestro. „Diru simple, ke *don* Hacinto ankoraŭ ne revenis hejmen, kaj, ke lia familio havas intereson je tio ekscii, kie li troviĝas, ĉu tie oni povus ekscii ion pri li.“

ĈAPITRO 14

01

En la haciendo Rozo Blanka ekde nun laboris la inĝenieroj kun plena forto.

La maizkampojn, sukerstaŭdojn, oranĝo- kaj citronarbojn oni krude fortranĉis, por liberigi lokon por la arganoj. Per maĉetoj oni elhakis aŭtovojon kaj ebenigis ĝin por altransporti per pezaj kamionaroj la materialon, la vaporkaldronojn kaj maŝinojn. Ĉiuj familioj, kiuj tiel subite devis forlasi la kampojn kaj siajn kabanon, ricevis po ducent kvindek pesojn elpagitajn de la inĝenieroj, por rapidigi ties formarŝon. La pago por la rezigno, kiu samtempe validis kiel rezignopago por la perdo de la maturiĝantaj rikoltaĵoj, estis pagata per arĝentaj unupesomoneroj, por ke la monsumo aspektu sufiĉe multe, kaj por ke per tiuj arĝentomontetoj estu malpliigita kaj kuracita la doloro pri la mortanta hejmlando. Daŭris nur kelkajn tagojn ĝis ankaŭ la familio de *don* Hacinto devis forlasi la haciendon.

La inĝenieroj estis bonkoraj. Ili vidis la veigajn dolorojn

de la homoj, kiuj estis forŝiritaj de siaj praradikoj. Kaj por esti komplezemaj al ili kaj por montri, ke ili ne havas kulpon je la disrompado de hejmlando, ili veturigis kun la malplenaj aŭtoj la havaĵon de la familioj tien, kien la homoj volis migri.

La kompadroj kondukis siajn familiojn al malgrandaj lokoj, kiuj estis proksime al ilia perdita hejmlando, ĉar la viroj ĉiuj ricevis bone pagatan laboron en la nove aranĝita kampadejo. Ili ricevis po tago kvar pesojn kaj kvar pesojn kaj duonon.

La mestizo Frigillo ricevis la komision por la varbado de tiuj homoj. Neniam antaŭe li havis tian facilan kaj agrablan komision en sia vivo. Li ne devis vojaĝi por serĉi homojn, ne devis pagi ties vojaĝmonon kaj tute ne devis peni pri io, ĉar ĉiuj homoj estis tuj ĉemane, ĉar ili ja ne sciis kien iri kaj, ĉar ili eĉ ĝojis tiel rapide trovi alian porvivon, post kiam la nunaj kaj estontecaj rikoltoj estis forprenitaj de ili.

La familio de *don* Hacinto setlis en Tukspam. Ili estis ricevintaj por la domo kaj la rikolto du mil pesojn kiel

reziĝnopagon. La edzino ne volis akcepti la monon. Pro fiero. Ŝi ne volis havi monon de rabistoj kaj murdistoj enmane, kiel ŝi diris. Sed la filo estis pli prudenta. Li sciis, ke la patrino, kiu ja ne plu estis juna, kaj ankaŭ la pli junaj gefratoj, bone povis utiligi la monon. Kaj tial li akceptis la monon kaj donis ĝin al sia patrino, kiam ili aĉetis en Tukspam malgrandan *tienda*-n, do malgrandan butikon por kio ajn, por ke la patrino havu okupon kaj sekuran enspezeton.

Li mem, la filo, laboris dum kelke da tempo kiel kolonestro en la nova naftokampadejo. La inĝenieroj, ĉiam atentante pri tio, ke oni mildigu dolorojn kaj kuracu malbonon kiam ajn tio eblas, post kelkaj semajnoj trejnigis lin ŝofori, kaj Domingo veturigis la materialkamionojn de Tukspam al la kampadejo. Li ricevis nun dek pesojn ĉiutage. Ĉar li estis tre lerta kaj volema, la inĝenieroj trejnigis lin kiel drilisthelpanton, jen li perlaboris dek kvin pesojn ĉiutage. Pli poste li avancis eĉ pli kaj fariĝis fine sperta drilisto, kiu kiel tia enspezis kvincent usonajn dolarojn monate kaj ricevis bonajn premiojn por ĉiun naftproduktantan puton, kiun li drilis.

La rakontisto de tiu ĉi rakonto ne havas la intencon estigi malĝustajn sentimentalecojn kaj emociige etosajn efikojn, por ke la leganto povu paroli pri bela kaj kortuŝiga historio, kiu temas pri la rompado de delikata rozeto. Tial la rakontisto sciigas laŭ la vero, ke ne nur la inĝenieroj, sed ankaŭ la direktorio de *Condor Oil Company* fervore helpis malpli dure sentigi al la iamaj loĝantoj de la haciendo almenaŭ materie la pardonon de sia hejmlando. Kaj krome laŭ la vero la rakontisto devas diri ĉi tie, ke multaj el la viroj, se ne eble ĉiuj, adaptiĝis post malmultaj semajnoj al la novaj rilatoj tiel bone, ke ili baldaŭ apenaŭ estus estintaj pretaj ŝanĝi sian novan vivon kontraŭ la antaŭan. Ili ĉiuj portis nun bonajn vestojn, ĉiuj surhavis nun ŝuojn kaj botojn, ankaŭ la inoj, ĉiuj infanoj frekventis la lernejon, kaj la inoj laboris nun malpli streĉige ol antaŭe. Kaj ĉiuj homoj sen escepto, precipe la infanoj, vivis ĉiun tagon, pli kaj pli obeante al modernaj higienaj principoj.

Materiale rigardate ĉiuj koncernatoj nun pli bone estis ekipitaj por la ĝenerala vivo ol antaŭe. Ili estis ne nur plu

loĝantoj de eta loko de la Tero, kie ili sciis nenion pli pri la mondo kaj aliaj homoj ol iliaj okuloj vidis ĝis la horizonto. Ili fariĝis pli kaj pli homoj, kiuj konscie vivis en granda mondo, en pli granda hejmlando, en la respubliko Meksiko. Ili sentis la grandon de l' mondo kaj la amplekson de homara kunlaboro ĉirkaŭ la tutan Teron. Iliaj malamikoj pli frue estis la najbaroj sur la haciendo, kiuj sekvis tuj post la plej proksima najbaro. Sed tiu malamikeco foriĝis kun la kreskado en pli grandan mondon. Ili sentis tute delikate la unuan ĝermadon de tiu penso, ke ĉiuj homoj sur la Tero estas unueco, ke ili ĉiuj formas grandan frataron. Ili vidis en la filmoj, kiujn prezentis en la kampadejoj fervoraj lertaj entreprenistoj, pri negocoj tion, kion aliaj homoj faris tre malproksime de ili, kiel ili agis, kiel ili pensis, kiel ili laboris, kiel ili amis, kiel ili traktis siajn infanojn, kiel ili trompis kaj mensogis sin reciproke. Tiel ili vidis, ke aliaj homoj ne estas tiom diversaj de ili mem. Kaj tio fortigis la fratecan ligan al aliaj homoj kaj aliaj popoloj. Ili aŭskultis radioaparatojn, kiujn alportis usonaj inĝenieroj kaj naftistoj en la kampadejojn. Ili aŭskultis muzikon kaj vortojn el aliaj landoj, aŭskultis la paroladojn de la

prezidanto de la respubliko Meksiko, aŭskultis la paroladojn de kuracistoj, instruistoj, instruktoroj, artistoj, inspektistoj pri saneco, kiuj komisie de la meksika registaro devis plenumi la taskon, porti konojn, sciojn kaj bonajn konsilojn en la plej forajn regionojn de la respubliko Meksiko. Ili renkontis aliajn laboristojn, kiuj venis el aliaj ŝtatoj de Meksiko, kiuj vidis multon kaj travivis multon. Tiel aperis antaŭ la korpaj kaj spirantaj okuloj de tiuj homoj tute nova mondo, pri kies ekzisto ili antaŭe neniam eksciis ion. Mondo, kiu iam ŝajnis al ili tiom fora kiel planedo en la kosmo. Kaj nun ili vidis tiun foran mondon, vivis en ĝi, vivis kun ĝi, komprenis ĝin pli kaj pli kaj sentis sin baldaŭ kiel membroj de tiu nova pli granda mondo, ne kiel indulgatoj, sed kiel rajtigitaj kaj necesaj membroj de tiu nova mondo. Ĉar ili lernis – kiam ili nur iom aranĝiĝis kun la nuna ĉi-tiea granda mondo – ke oni bezonis ilin en tiu granda mondo, ke ili estis necesaj, eĉ se ili alportis nur ferajn tubojn kaj helpis ĉe tio enmeti tiujn en la driltruojn. Tiu laboro estis grava, ĉar, se neniu malŝarĝadis kaj altrenadis ilin, la aŭtomobiloj ne povis ricevi gazolinon kaj ili ne povis veturi. Tiel ili ankaŭ baldaŭ elsentis, el bona pura naturinstinkto, ke ili estas

same tiel gravaj en la mondo kiel la inĝenieroj kaj drilistoj. Ili perdis belan hejmlandon, karan hejmlandon, pri kiu ili iam supozis, ke ili ne povus transvivi ties perdon. Sed kiam ili lernis vidi kaj kiam ili komencis vekigi el sia obtuzeco, el siaj malgrandaj praaj kutimoj, ili ekkonis, ke ili anstataŭ de la malgranda malvasta hejmlando estis gajnintaj pli grandan hejmlandon; kiu havis aliajn belecojn. Kaj dume la malnova malgranda hejmlando ĉiam ŝajne restis tio, kio ĝi estis, la nova pli granda hejmlando estis de alia speco. La nova hejmlando ne staris kviete ĉe la horizonto. Ĝi kreskis kaj kreskis, kreskis kun ĉiu tago de novaj ekkonoj al pli kaj pli granda hejmlando, kiu ŝajne ne havis limojn, kiu ampleksis ĉiujn homojn, ĉiujn landojn, ĉiujn pensojn pensatajn. Je animo kompreneble perdiĝis multo kun la pereado de la iama malgranda hejmlando. Multaj aĵoj kaj aferoj aspektis nun aĉaj. Multaj aĵoj kaj aferoj mankis al ili, tio, kio iam faris ilin riĉaj pri sentoj en sia natura kvieta ĝojo.

Pli frue, en sia malgranda hejmlando ili havis anime riĉigajn sentojn, sed mankis al ili la talento esprimi tiujn sentojn ĝuste kaj klare kaj profundigi kaj pli vastigi la

proprajn belajn sentojn en la interŝanĝo kun aliaj homoj.

Nun la sentoj anime estis ofte malpli riĉigaj, sed ili lernis klarigi pli kaj pli tiujn sentojn al aliaj homoj per vortoj kaj el la vortoj de siaj kunhomoj – kiuj siaflanke povis paroli pri siaj propraj sentoj kaj spertoj – por gajni novajn trezorojn, per kiuj la perdo de la pli fruaj belaj sentoj estis sufiĉe rekompencata. Kompreneble ankaŭ ĉie tie, en la vivo kun aliaj homoj, kun krudaj, ne sensitivaj pensopigraj homoj, venis ofte fia kaj malica en ilian vivon. Sed tiu, kiu sciis deskui tion, kiu disponis pri sufiĉe da fortikeco ne atenti la durajn kubutpuŝojn de kelkaj krudaj kunhomoj, tiun la fia trafis malpli, kaj li partoprenis nur je tio, kio estas bela kaj bona.

Observate kiel tuto, kaj rigardate sen antaŭjuĝo, ekskludante ĉiun naivan sentimentalecon oni certe devas diri: La homoj perdis multon kaj gajnis multon pro la perdo. Kaj venis tago, monatojn poste aŭ jarojn poste, sed la tago iam venis, kiam ĉiuj povis diri plenrajte: Ni fariĝis pli riĉaj ol ni estis; ni fariĝis pli grandaj ol niaj patroj estis, ĉar ni nun estas civitanoj de la Tero kaj kio estas eĉ pli, ni estas nun konsciaj civitanoj de la Tero; ni estas

konsciaj civitanoj de l' Tero, ĉar ni komprenas la Teron kaj la ceterajn homojn kaj pli kaj pli komprenas ilin. Kaj ĉar ni komprenas pli da homoj, tial nia amo fariĝis pli granda. Kion pli grandan la homoj surtere povas gajni ol tion, ke ilia amo fariĝas pli granda!

ĈAPITRO 15

01

Advokato Perez sendis sian skribon rekte al *Mr. Collins*, por eviti, ke la enhavo fariĝu konata al subrangaj personoj.

Mr. Collins tuj vokigis *Mr. Abneron*.

„Kion mi diris al vi, Abner? Li alparolis lin diable severe. „Ĉu mi ne diris al vi, ke vi ne krimu ion. Mi ankaŭ diris al vi, ke mi ne transprenas la respondecon por stultaĵoj kaj, ke mi glate kaj senkompate transdonas vin al la instancoj, se vi krimas aferojn, kiujn mi ne povas kovri. Rilate al stultaĵoj ni ne scias pardonon. Mi lasas vin fali ĝis la manoj de l' ekzekutisto, kiel vi meritas tion, se vi ne povas plenumi taskon sen riproĉo.“

Mr. Abner paliĝis.

„Ĉu io malkaŝiĝis?“ li diris nelaŭte kaj timeme.

„Jes, ĉio.“ *Mr.* Collins diris ĝin fride kaj senkompatate.

„Jen mi povas aĉeti nur plu revolveron al mi“, diris *Mr.* Abner senhelpe.

„Se vi ankoraŭ havos tempon por tio, Abner. Vi havos apenaŭ dudek kvar horojn, ulo. Kaj aĉetu al vi bonan revolveron, kiu ne mistrafas en la ĝusta momento. La meksika konsulo havas la aferon en la manoj.“

Mr. Collins laboris, kiel nur vere granda geniulo scias labori.

Li havis siajn agentojn kaj detektivojn je dispono, dum la tuta tempo. Kaj estis kapablaj personoj.

Ankaŭ la meksika konsulo havis bonajn detektivojn. Meksikanoj, kiuj estis naskitaj en Usono kaj kiuj plej ofte estis uzataj de la konsulo por observi tiujn el siaj samlandanoj, kiuj en la limŝtatoj de Usono sekrete preparis revoluciojn kontraŭ la hejmlando Meksiko kaj kontrabandis armilojn trans la limon al Meksiko. Ili ĉiuj nomis sin patriotoj. Unuopuloj el ili estis honestaj homoj, kiuj serioze supozis, ke ili estas utilaj al sia patrolando, se ili pro revolucioj kaj ribeloj faras maloportunaĵojn al la meksika registaro.

Tiuj homoj estis la porfiristoj, la adeptoj de la renversita sistemo de diktatoro Porfirio Diaz. Tiuj viroj supozis esti honestaj viroj. Ili opiniis, ke oni povas servi al Meksiko nur per tio, se la malnova konservativa sistemo de Porfirio Diaz en Meksiko ree ekregas. Ili opiniis, ke Meksiko povas prosperi nur tiukaze, se la usonanoj, la angloj, la germanoj, ja ĉiuj fremduloj investas sian kapitalon por eltransporti la naturtrezorojn el Meksiko. Tiu sistemo mastrumadis pli ol tridek jarojn en Meksiko, kun la sukceso, ke en la flortempo de tiu sistemo en la

jaro 1910 naŭdek kvin procentoj el la meksikanoj ne havis ŝuojn je la piedoj kaj vestis siajn korpojn nur per ĉifonoj, kun la sukceso, ke la tuta popolo estis tiom sklavigita, kiom malofte popolo estis sklavigita, kun la escepto de malmultmembra reganta klaso, sistemo, kiu tiom malmulte edukis la popolon, ke dum la eksplodo de la revolucio okdek procentoj de la popolo nek povis legi nek skribi.

Krome tie estis tiuj honestaj meksikaj patriotoj, kiuj pro tio volis sekrete prepari revoluciojn, ĉar ne plaĉis al ili kelkaj personoj en la oficialaj oficejoj de la respubliko Meksiko, ĉu pro tio, ke ili volonte mem estus kaptintaj tiujn postenojn, ĉu pro tio, ĉar tiuj personoj instaligintaj sin en la oficejoj ne ebligis al ili enspezi monon.

Krome estis tie tiuj ne tro honestaj meksikaj patriotoj, kiuj estis uzataj de la usonaj kaj anglaj kapitalistoj kiel iloj, sen tio, ke ili sciis tion.

Kaj lastfine krome tie estis tiuj grandiozaj patriotoj, kiuj lasis pagi sin tute malferme de usonaj kompanioj kaj magnatoj, por instigi ribeliojn en Meksiko, kiuj estis tiel

bonvenaj al la usonaj kompanioj kaj bankieroj, ĉar ili pro tio sukcese povis entrepreni financajn spekulaciojn.

Ĉiujn ĉi patriotojn la meksika registaro en Usono devis observigi per specialaj agentoj por protekti siajn civitanojn kaj sian landon kontraŭ damaĝon, en tiu grado, en kiu tio estis ebla laŭ la fortoj de la meksika registaro.

Kazo, kiel la skandala krima rabo de la Rozo Blanka povis efektive konduki al ribelio en Meksiko aŭ al armita enmarŝo de usonaj trupoj en la terenon de Meksiko, se la meksika registaro ne estus aginta tre memgardema. Diplomataj demandoj pri informoj kaj diskutoj pri la laŭleĝeco aŭ kontraŭleĝeco de la vendokontraktoj estus povintaj konduki al embarasigaj implikiĝoj, se oni perdus siaflanke la paciencon, ĉar la rilatoj inter la du potencoj ekde la revolucio estis sufiĉe streĉitaj, tiel, ke necesus nur fajrero por ekflamigi la fajron.

Iutage venis meksikano al la meksika konsulo en San-Francisko por tie registrigi la naskon de filo, por ke la filo estu plu meksika civitano.

La konsulo enpaŝis la oficejon ĝuste en tiu momento, kiam oficisto surskribis la personajn indikojn de tiu viro. Li demandis pri la naskiĝloko de la viro kaj la viro respondis laŭte: „Tukspam, *Estado Veracruz*.“

Pro tio la konsulo haltis kaj alparolis la viron: „Vi estas el Tukspam, sinjoro, ĉu?“

„*Si, Señor, a sus ordenes.*“

Ĉu vi scias tie en la proksimeco la haciendon Rozo Blanka?

„Mi scias ĝin, sinjoro.“

„Ĉu vi konas sinjoron Hacinto Yanyez?“

„Mi konas lin, li estas la posedanto, la estro de Rozo Blanka.“

„Jes, tiun mi celas“, diris la konsulo.

„*Don* Hacinto estas nun ĉi tie, en San-Francisko, sinjoro. Aŭ li almenaŭ estis ĉi tie antaŭ kelke da tempo.“

„Ĉu vi parolis kun li?“

„Jes, ni estis kune diversajn fojojn kaj sidis dufoje kune en la restoracio de sinjoro Palido“, diris la viro.

„Ĉu *don* Hacinto ion pri tio diris al vi, ke li volas vendi Rozon Blankan?“ demandis la konsulo.

Li diris al mi, ke li venis kun usonano, kun certa *Mr.* Abner ĉi tien al San-Francisko. Tiu usonano invitis lin veni ĉi tien por donaci al li kelkajn breditajn azenojn kaj ĉevalinojn, kiel kontraŭdonacon por ses ĉevaloj, kiujn *don* Hacinto estis donacinta al li. *Mr.* Abner volis persvadi lin, ke li vendu Rozon Blankan al li. Li fine ofertis al li kvincent mil dolarojn por la haciendo. Tion ĝi tute ne validas, tiu Rozo Blanka, sinjoro.“

„Nu, en ordo“, interrompis lin la konsulo, „parolu plu pri tio, kion vi scias.“

La konsulo intertempe pere de la guberniestro en Jalapa jam sciigis pri ĉiuj detaloj, tiel, ke li bone sciis demandi pri la kio kaj la kiel ĉe la okazo, kiu nun prezentis sin tiel favore al li.

„*Don* Hacinto diris al mi“, daŭrigis la viro, „ke li neniam vendus Rozon Blankan, eĉ ne, se oni ofertus du milionojn da dolaroj por ĝi. Mi diris al li, ke li devas scii, kion li faras. Kaj mi vendus la haciendon, se mi estus en lia situacio. Sed li ne volis aŭdi ion pri tio, kaj li diris, ke li neniam pensas pri tio vendi Rozon Blankan, ke li ne povas fari tion pro la multaj familioj, kiuj vivas en la haciendo, kaj ke li ne volas, ke veturas trans la tomboj de siaj gepatroj la aŭtomobiloj.“

„Ĉu vi jam foje vidis *don* Hacinton ebria ĉi tie?“

„Iom. Tio aspektis stulte al mi, ĉar *don* Hacinto trinkas malmulte da alkoholaĵoj. Li diris al mi, ke *Mr.* Abner ĉiam denove instigis lin trinki tian, kaj ke li ne volas rifuzi trinki tion, ĉar li ne volas esti malĝentila.“

„Ĉu li do diris ion al vi, ke li estis sur la ranĉo de *Mr.*

Abner por rigardi la bredobestojn?“

„Li diris al mi, ke *Mr. Abner* neniam havis la tempon por veturi al la ranĉo. Kaj li diris tiam krome, ke li komencas supozi, ke *Mr. Abner* tute ne havas ranĉon kaj tute ne bredobestojn.“

La konsulo diris al tio: „Ĉu *don Hacinto* loĝis ĉe vi aŭ en hotelo?“

Li diris al mi, ke li loĝas kun *Mr. Abner* en ties domo. Tio devas esti ie en la *Brenton Street*.“

„Ĉu *don Hacinto* diris al vi, ke li ricevis multe da mono?“

„La malon, sinjoro konsulo. *Don Hacinto* diris al mi, kiam mi vidis lin lastan fojon...“

„Haltu, kiam vi vidis lin je lasta fojo?“

„Merkrede antaŭ, antaŭ – kvar, kvin, sep, merkrede antaŭ dek unu semajnoj.“

„Vi scias la tagon precize, ĉu?“

„Jes, sinjoro, ĉar mi tiutage estis aĉetinta ĉekon ĉe la banko, kiun mi devis sendi al Meksiko por sarapeoj, kiujn mi volis importi. Antaŭe mi neniam marĉandis ĉi tie sarapeojn. Sed mi pensis, ke tio eble povus esti bona kromnegoco.“

„Kaj je la tago...“ la konsulo hezitis.

„Jes, estis ĝuste je tiu tago, ĉar mi renkontis *don* Hacinton antaŭ la banko kaj ni iris kune en ĝin. Kaj li observadis kiel oni faras tion, se oni aĉetas ĉekon. Multe da mono li ne havis, ĉar li diris al mi, ke povas esti, ke li devos pruntepreni monon de mi por la reveturo, ĉar *Mr.* Abner tute ne parolis pri la reveturo, kiun li ja promesis al li.“

„Pli malfrue vi do ne plu vidis *don* Hacinton, ĉu?“

„Ne. Kaj mi supozis, ke li tiam estis forvojaĝinta. Sed mi ja tre miris, ke li ne venis al mi por adiaŭ sin. Ni estis ja bonaj amikoj, ankaŭ en pasintaj tempoj. Li konas mian edzinon kaj konas ĉiujn miajn parencojn, kiuj ankoraŭ vivas en la proksimo de Tukspam.“

„Tio estas bona. Lasu vian adreson ĉi tie. Mi eble ankoraŭ bezonos vin. Mi ankaŭ tuj volas diri pro kio. *Don* Hacinto ne revenis al Meksiko. Li nenie trapasis la limon, kaj, se estas tute certe, ke vi vidis lin je tiu merkredo antaŭ dek unu semajnoj lastan fojon, jen li subskribis kvin tagojn pli poste la vendokontrakton por la haciendo Rozo Blanka.“

„Tion mi ne povas imagi. Li ne volis vendi ĝin. Mi ankaŭ sen tio ne povas imagi tion. Hacinto ne povis skribi, eĉ ne sian propran nomon.“

„Tio estas prava. Ĉu li diris al vi, ke li eble lernis skribi sian nomon en la vojaĝo kun *Mr.* Abner aŭ en ties domo? Eble *Mr.* Abner instruis ĝin al li.“

„Tion mi ne povas imagi, sinjoro konsulo. Io tia estus estinta tiom grava en lia vivo, ke li estus parolinta pri tio al mi.“

„Tion ankaŭ mi pensas“, diris la konsulo.

„Hacinto krome ne estas la viro, kiu tiel rapide povus lerni skribi dum tiom mallonga tempo. Literon eble jes, aŭ du aŭ tri da ili. Sed ne la kompletan nomon. Ne

Hacinto, sinjoro.“

„En ordo. Mi informigos vin, se mi vin bezonos ankoraŭfoje. Knabon vi havas, ĉu? Bona meksika civitano, do!“

„Kaj fortika, sinjoro.“

„Kiel li nomiĝu, la *muchacho*?”

„Emilio, sinjoro konsulo, *a sus ordenes*. Adiaŭ do.“

La konsulo iris en sian oficejon kaj telefonis tuj al unu el siaj agentoj. Posttagmeze li diktis la raporton al Jalapa.

Rimarkoj

A sus ordenes = Je via dispono.

Brenton Street = Brenton-strato

muchacho = knabo, junulo

sarapeo (ne en NPIV) = vesto el la vestoj, kiujn oni portas Meksiko, kvarangula bunta teksita kovrilo lano, origine simple metita ĉirkaŭ la korpon, pli poste kun entranĉo por la kapo, simila al ponĉo.

„*Si, Señor, a sus ordenes.* = Jes, sinjoro, je via dispono.

Tukspam (Tuxpam), *Estado Veracruz* = Tukspam, la federacia ŝtato Verakruco.“

Mr. Collins rigardis sinjoron *Abner*, kiu ŝajne ne povis solvi sin de sia ektimiĝo, kaj li diris: „Ĉu vi scias, ke tiu viro *Yanyez* ne povis skribi? Eĉ ne sian nomon?“

Mr. Abner sidiĝis rapide, por ke li ne falu.

„Damnite! Tion mi pripensis neniam“, li diris ŝvitante.

„Tio ja estas, kion mi celis“, diris *Mr. Collins*. „Vi ne pensis pri tio. Ja kiu komisiis vin falsigi la nomon?“

Mr. Abner ricevis puŝon de interne. Lia vizaĝo, kiu disiris kiel pasto, refirmiĝis kaj li diris:

„Mi ja instruis skribi la viron envojaĝe kaj en mia hejmo.“

„Tre prudente, *Abner*. Sed helpas al vi neniel. Vi ne atentis. Li renkontis ĉi tie samlandanon. Li multe parolis kun li. La samlandano elbabilis diversajn aferojn, ĉe la konsulo, jam ĉio estas en la aktaĵoj. Advokato *Perez* ĝin havas jam ĉi tie en la letero. Tiu viro *Yanyez* ĉi tie parolis al sia samlandano, ke li ne povas skribi.“

Tio ne estis ĝusta, kion *Mr. Collins* diris ĉi tie. La samlandano laŭ la raporto de sinjoro Perez diris nur, ke sinjoro Yanyez ne rakontis ion pri tio, ke li lernis skribi intertempe.

„Tio pri la nomo ja ne tiom gravas“, diris *Mr. Collins*. Li preparis pli gravan. Ĉar tio, ke sinjoro Yanyez ne eksplicite estis parolinta pri tio, ke li ne lernis skribi intertempe, estis tre bona. Tio signifis la savadon de la subskribo kaj per tio la savadon de la kontrakto.

„Tio pri la nomo ne estas tiom grava. Ni tuj kun notario en via ĉeesto kun via jurdeklaro certigos, ke sinjoro Yanyez lernis skribi en la vojaĝo, por ke li povu trapasi la limon.“

„Jes, tion mi konfirmos“, diris *Mr. Abner*, kiu supozis, ke la maŝo komenciĝas malfermiĝi.

„Ne temas sole pri la nomo“, ripetis *Mr. Collins*.

„Pli terure estas, ke *janitor*, la pordisto de la domo, kiun vi luis, vidis kiel vi forveturis kun Yanyez en aŭtomobilo. Ke vi, sed ne Yanyez je la sekva tago de la veturo revenis,

ke agentoj de la meksika konsulo, kiuj estas nekonataj eĉ al ni, en via domo kaj en la garaĝo ĉion kontrolis kaj trovis tie sangon kaj kelkajn sangomakulitajn nigrajn indianajn harojn en via aŭtomobilo. Oni fotis tion. La haroj estas en la meksika konsulejo, tion mi scias de niaj agentoj. Do, kaj nun vi aŭdos eĉ pli, Abner, idiota pugnodraŝisto, kiu vi estas.“

Mr. Abner sidis kunkaŭranta en sia seĝo kaj ŝajne ne plu aŭskultis al *Mr.* Collins.

Mr. Collins trankvile daŭrigis tion, kion li volis diri, kun tre frida voĉo: „Ni havas la kvitancojn, ke Yanyez ricevis de ni kvarcent mil dolarojn en la formo de ok ĉekoj. Tiuj ĉekoj en banko estis elaĉetitaj. Ankaŭ tion scias la meksika konsulejo. La viro Yanyez laste estis vidita kun vi. Li loĝis en via domo. La monon li ne sendis hejmen. Kion vi do pensas, sinjoro Abner, kiu devas havi la monon? Ĉu vi ne opinias, ke laŭ la opinio de la prokuro tiu devas havi la monon, kiu kun Yanyez forveturis en aŭtomobilo kaj revenis sola kaj en kies aŭtomobilo estis trovitaj sango kaj sangomakulitaj indianaj haroj, kaj en kies domo Yanyez vivis, en la domo, kiun oni mallonge

antaŭ la alveno de Yanyez rapide luis? Ĉu vi ne opinias, Abner, ke oni unue pensos pri tiu viro, kiu forlogis sinjoron Yanyez el Meksiko por havi lin ĉi tie en sia domo, do al tiu viro, kiu plej bone sciis, kiom da mono Yanyez havis kaj kie li konservis ĝin?“

Mr. Abner diris nenion kaj ne moviĝis. Li estis griziĝinta kaj kunŝrumpinta. Lia hararo estis hirta kaj malseka.

Mr. Collins premis butonon.

Tiam venis la notario, la unua vicprezidanto, sekretario kaj la unua advokato de la kompanio.

La notario skribis la afidaviton, en kiu *Mr.* Abner ĵuris la ĵuron, ke li estis instruinta al sinjoro Hacinto Yanyez en la vojaĝo la skribadon de lia nomo, por ke Yanyez povu trapasi la limon, ke li krome ĉeestis, kiam Yanyez subskribis la vendokontrakton, la kopiojn kaj la kvitancojn por la ĉekoj.

Post kiam la sinjoroj foriris, kiam *Mr. Collins* kaj *Mr. Abner* estis solaj, diris *Mr. Collins* trankvile: „Vi estas maldungita de nia kompanio. Jen la oficiala atesto. Estas skribite en ĝi, ke vi foriras libervole, por transpreni postenon en Ĉinio.“

„Dankon“, diris *Mr. Abner* koncize, kiam li transprenis la ateston, kiu troviĝis en koverto.

„Ĉu vi ankoraŭ bezonas pli da mono, *Abner*, aŭ ĉu sufiĉas al vi tio, kion vi jam enspezis pro la afero?“ demandis *Mr. Collins*. Intence aŭ sen intenco li metis ironian tonon en sian demandon.

„Mi ankoraŭ povus bezoni kvindek mil dolarojn“, diris *Mr. Abner*, kiu ŝajne estis retrovinta sian ostosekan trankvilon pro la oficiala agado de la notario.

„Vi estas senhonta kiel – mi ne scias al kiu mi komparu vin“, diris *Mr. Collins*.

Kaj impertinente respondis *Mr. Abner*: „Diru trankvile,

ke tiel avide kiel la prezidanto de naftokompanio.“

„Tio vere ne necesis, ke vi diris tion, Abner“, diris Mr. Collins. „Tio vere ne necesis, ĉar ĝi estas tro triviala. Sed tio pruvas al mi nur denove, ke mankas menso al vi. Se vi havus nur spuron de menso, vi ne estus estinta kapabla fari tian vicon da stultaĵoj. Oni ja certe povas fari vicon da stultaĵoj, sed tuj tri dekoj da ili, ja kvindek stultaĵojn, por tio necesas tro da idioteco. Sed tio ja ne estas mia tasko eduki vin. Sed konsilon mi tamen volas doni al vi. Mi ne scias, kion vi intencas entrepreni, ĉu la revolveron ĉu rapidan forvojaĝon, sed kion mi konsilas al vi, tio estas la sekva: Kion ajn vi intencas fari, faru ĝin interne de dudek kvar horoj; ĉar en tiu kazo, se Huerta ne baldaŭ ekbatos en Meksiko, jen vi ne plu trovos elirvojon. Tiam vi eĉ ne plu havos la tempon ŝarĝi la revolveron.“

Mr. Abner bonŝanĉis. Huerta ekatakis, kiel atendis tion la naftokompanioj. Ĉu ili ankaŭ ordonis tion ataki je tiu tempo, oni ne tiom baldaŭ ekscios.

La meksika registaro ne plu havis tempon zorgi pri tia eta afero kiel Rozo Blanka; ĉar la granda patrio de tiuj, kiuj estis savintaj la landon en longa kaj tre ŝtreĉiga revolucio por la meksika popolo, eniĝis en la danĝeron, ke ĝi ree perdiĝas al tiuj, kiuj priploris la pereon de malnovaj putriĝintaj rilatoj kaj malamis ĉion, kio ne surgluis la falsigitan orbrilon de la porfirismo.

Huerta sukcesis konkeri kaj defendi Verkrucon kun la helpo de generaloj, kiuj ne povis akiri en la nova tempo tiel senpene tiujn grandajn enspezojn, kiujn ili havis en la malnova reĝimo. La guberniestro en Jalapa devis forlasi sian oficon. Kiel kolonelo li transprenis batalionon por batali kun la registaro kontraŭ Huerta. Samlandanoj kontraŭ samlandanoj. Patroj kontraŭ filoj. Fratoj kontraŭ fratoj. La Huerta-trupoj ekkaptis ankaŭ la potencon en Jukataniao. Ili pafmortis la laboristoguberniestron de la

ŝtato. Kaj por esti tute certaj, ankaŭ la filon. Ĉien, kien Huerta venis, komencis pafmortigado kaj pendumigado de la laboristaj gvidantoj kaj de la sindikatistoj.

Naftocisternŝipoj de la usonaj kompanioj enportis en la profundoj de siaj malplenigitaj cisternoj la armilojn en Meksikon por pli kaj pli profunde kirligi la landon.

Sed Tampiko, kiun Huerta same tiel facile estus povinta konkeri, restis neokupita; ĉar de tie estis transŝarĝata la riĉo de la lando, la nafto, pri kiu temis la fratomilito. Tiu haveno devis resti malfermita por montri, kie la komisiantoj loĝas kaj kiuj ili estas.

ĈAPITRO 16

01

Rozo Blanka fariĝis nun *Condor*-parceloj de 119 ĝis 176. Ĉi tie oni laboris. Ĉi tie oni produktis. Ĉi tie oni enspezis miliardojn da dolaroj, dume la meksika popolo ŝajne ŝtipkapuliĝis kaj reciproke disbatis la kapojn kaj disŝiris reciproke la korpojn, por ke ĉi tie en tuta kvieto kaj sen la maloportuna inspektado de la registaro povu esti fortransportata la riĉa nigra tremanta sango de la meksika tero, la nafto.

La meksikanoj ja tute ne zorgis sin pri tio, kion la grandaj kompanioj en tiu tempo de l' fratobatalo rajtis fari kaj, ke ili faris, kion ajn ili volis. Oni ne atentis koncesiojn, rompis kontraktojn, justeco kaj maljusteco intermiksiĝis. Tion, kion oni ne ricevis libervole, oni eldevigis per murdo, per rabo, per deportadoj. La meksikanoj al la kompanioj refoje estis komplezemaj, faris tion, kion ili volis. Ili interbatiĝis kun siaj fratoj, dume la fremdaj magnatoj trankvile detiris de ili ridante kaj mokante la lastan ĉemizĉifonon de sur la korpoj. Ilia lando, kaj la

bonfarto de ilia popolo ne estis grava al la meksikanoj. Multe pli grava al ili estis, ke ne sinjoro Ikso estis guberniestro kaj sinjoro Ipsilono ne prezidanto kaj sinjoro Z ne ĉefurbestro. Kiu fariĝu guberniestro aŭ prezidanto aŭ ĉefurbestro, tio krome estis indiferenta al ili. Se nur ne estis tiu, kiu momente ĝuste estis. Ili ankoraŭ ne tiom maturiĝis por ekkompreni, ke ili per la disŝirado de sia propra popolo estis nur la iloj de magnatoj. Ili supozis esti grandaj patriotoj, supozis, ke ili liberigas sian landon kaj estis tamen nur la sklavoj de fremdaj kapitalistoj. Ĉar, se venis al la fino, pagis ne la fremdaj kapitalistoj la elspezojn, sed ree la meksika popolo.

Tiel povis okazi, ke oni forgesis Rozon Blankan kaj la parceloj de 119 ĝis 176 de *Condor*-naftkompanio monde famiĝis.

La haciendo Roza Blanka estis surŝmirita, kovrita per nafto, plenigita per fumo, kota. Ĝi estis plenigita de la anhelado, de la ĝemegado, de la tondrado, pumpumado kaj faŭkado de la maŝinoj, de la pumpiloj, de la pezaj kamionoj. Kun sia enuiga laciga ritmo la driloj kun metaltintanta klakado supreniĝis kaj malsupreniĝis, tage kaj nokte kaj nokte kaj tage. La drilistojn mortbatis flankensvingiĝantaj tuboj, la drilisthelpantoj estis frakasitaj de falantaj leviloj, aliaj helpantoj estis kaptitaj de la pezaj ŝtalkingloj kaj ŝiritaj pecon post peco sur la kablordan. Sed driloj kun metaltintanta klakado supreniĝis kaj malsupreniĝis, supren kaj malsupren, tage kaj nokte kaj nokte kaj tage.

Kiu eniĝis en la „karnomuelilon“, tiu ne plu estis kalkulata kaj tuj forgesita. Tuj aliaj ĉeestis, kiu priservis la drilistan dion. Ĉar oni pagis tridek dolarojn ĉiutage por

tiu viro, kiu kondukis la drilon, la driliston. Kaj por tridek dolaroj ĉiutage oni devas riski ion.

Oni laboris kun furiozeco, kiu ĝis tiam estis neimagebla. La bona tempo, kiam la meksikanoj reciproke sabromortigas kaj pafmortigas sin, eluzendis. Neniu dum tiu tempo atentis la laŭleĝan validecon de la koncesioj kaj kontraktoj. Tial elen do ĉiu nafto, kiu kiel ajn eligeblas! Ĉar tiukaze, se la meksikanoj ree konkordiĝas, la agrabla tempo de la neleĝeco estas pasinta; tiam eĉ la kontraktoj de Rozo Blanka povus estis kontrolata.

Tial eksteren la nafton!

Kaj la kompadroj, ĉiuj portis tubojn, kaj ili aspektis kiel kurantaj sklavoĵoj ligitaj al ĉenoj. Ĉio, ja ĉio aspektis tiel, kiel Hacinto iam vidis tion en sia vizio.

Tiam fine la unua puto de Rozo Blanka ekproduktis. Po tago cent dudek mil hektolitrojn. Oni telegrafis ĝin en la tutan mondon. La tuta mondo aŭskultis pri tio. Nur ne la meksikanoj. Tiuj batalis pri tio, kiu ne estu prezidanto. Ili ne havis tempon legi telegramojn kaj observi, kion oni faras kun ilia tero.

Kvar tagojn poste la dua puto produktis, naŭdek mil hektolitrojn ĉiutage. Kaj ĉiu hektolitro, ĉiu barelo da nafto estis bela verda usona dolaro en la poŝojn de la akciuloj de *Condor Oil Company*.

En la sama semajno la tria puto produktis centdek mil hektolitrojn ĉiun tagon. Kaj tiel tio iris nun ĉiun tagon. Cent mil bareloj da nafto, sesdek mil, cent dudek mil, kvardek mil da ili.

Mr. Collins sidis en sia oficejo kaj legis la telegramojn de la produktantaj putoj. La putoj ŝajne vetkonkuris pri tio, kiu el ili povas produkti la plej multajn naftobarelojn.

„La jaĥto de la reĝo de Anglio por Betty, ĉu?“ diris *Mr.* Collins. “Ne por mi. Ne por Betty. Rilate la jaĥton, kiun Betty nun ricevos, la jaĥto de la reĝo de Anglio aspektu kiel ne plu uzata fiŝistoboato.”

Li prenis la telefonon kaj interparolis kun Betty. Alparolis ŝin: „*My empress*, mia imperiestrino“. Princino ne plu sufiĉis al li. Tial li levis ŝin en la rangon de imperiestrino. Mankis al li nur plu la katedralo, en kiu li pensis kroni sin, ŝin je lia flanko. Sed jen li memoris, ke li promesis preĝejon al la baptistoj. Kaj estas domaĝe, ke oni ne povas kroni sin kiel imperiestron en Usono. Ne pro li mem, sed certe pro Betty, oni akceptus lin imperiestro.

Kiam li demetis la telefonon, lia unua sekretariino, Ida, enportis gazeton.

Ŝi tenis la gazeton ekscitite en mano kaj diris: „*News*,

Mr. Collins, gravaj novaĵoj.“

Li tuj legis la grase presitajn literojn de la kaplinio:

*USONANO MURDITA EN HAZARDLUDEJO
DE SINGAPORO PRO LAŬDIRA TROMPO*

Mr. Collins rigardis al *Ida*. Kial intereso lin usonano, kiu en Singaporo en hazardludejo de siaj kunludantoj estis pafmortita pro trompa ludado?! Tio okazas ankaŭ en Ĉikago kaj en Nov-Jorko kaj San-Francisko. Se li okupiĝu pri tiaj aferoj, jen li devus legi gazetojn dudek horojn ĉiutage. Li ne komprenis la sekretariinon *Ida*. De kiam ŝi interesiĝas por la sensacioj de reporterroj?

Sed kiam *Ida* diris: „Legu do la tekston, *Mr. Collins*“, li reprenis la gazeton kaj supraĵe legis la enhavon. Aha, *well*: Laŭ la ŝippakaĵa karto trovita en poŝo de la pafmortigito, li estas usonano, certa *Mr. Abner* el San-Francisko.

„Domaĝas pri tiu viro!“ diris *Mr. Collins* al *Ida* kun bedaŭranta tono. Propre domaĝe pri li. Por nafto li ja ne uzebliis, li faris stultaĵojn, sed li estus estinta tute bonega

prezidanto de ŝtalkorporacio. Li havis la nervojn por tio, mankis al li nur la trankvilo kaj iom pli de la unuanimeco de karaktero. Tion pruvas sia trompludado.“

Sed tiam li jam estis forgesinta lin. Kaj por ĉiam. Ĉar li demandis tuj: „Ĉu novaj *cables*, telegramoj de Meksiko, parcelo nr-o 119 kaj la sekvaj?“

„Ok da ili“, diris Ida koncize kaj donis la malfermitajn telegramojn al li.

„Kiom da mortaj?“ li demandis, dume li rapide trafoliumis la telegramojn.

„Neniu“, diris la sekretariino.

Kun tiu ĉi mallonga respondo la sekretariino rivelis, ke ŝi ne plu estis nur kutima sekretariino. Intertempe ŝi fariĝis pli. Ŝi fariĝis nafto. Ŝi pensis nur en nafto kaj komprenis la naftolingvon tute klare.

En la kampadejo *Lote* nr-o 119 – nr-o 176 la hastiga laboro fariĝis pli kaj pli furioza. La premioj por gvidanta drilisto, kiu trovis produktantan puton, estis eĉ pli altigita por sproni la laboristojn al ĉiam pli furioza laboro. La drilisto donis de sia premio al ĉiuj, kiuj laboris je lia puto, partojn. Li lasis vivi, sed nur tiujn, kiuj furiozis kun li. Montru al la proleto dudek-dolar-bileton kaj li tuj fariĝos kapitalisto. Ĉu vi ne akceptas tion? Provu. Premioj nun efikas pli bone ol pli frue helpis skurĝbatoj.

Se oni ĉe kvar aŭ kvin putoj ĉe la sama tago ekboris, jen ricevis tiu drilisto, kiu trovis inter tiuj putoj sian ekproduktantan unue, krom sia kutima premio ankoraŭ krompremion tri-mil-dolaran. Ankaŭ la kompanio lasis vivi. Vivi kaj lasi vivi. Sed ĉe tia freneza furiozado pasis nun ne plu tago, sen tio, ke peono aŭ du aŭ tri aŭ eĉ

drilista helpanto aŭ aldona drilisto restis sur la bataalkampo de l' nafto, se oni ne kunkalkulas la multnombrajn vunditojn kaj kripligitajn. Kaj se denove viro estis frakasita aŭ alia eniĝis en tordiĝantan maŝon de ŝtalkingo kaj lia tuta korpo rompiĝis, kvazaŭ li estus enfermita de giganta serpento, jen kvazaŭ hajlis de diablaj sakroj, pro la interrompo, kiu povas fuŝi la premion. Ĉar oni unue devas fortiri la korpon, por ke oni povu labori plu.

Pro tio, kiam *Mr. Collins* demandis: Kiom da mortaj?“
Ida, lia inteligenta sekretariino, eĉ ne dum sekundo pensis pri tio, ke *Mr. Collins* povus esti demandinta pro la nombro de la mortaj viroj, kiujn kostis tiuj ok putoj.

Ŝi tuj komprenis, ke li nur volis scii, kiom da mortaj, do kiom da neproduktantaj putoj, tielnomataj „*dry holes*“ – sekaj truoj – estas inter tiuj ok novaj ekproduktantaj putoj. Ŝi sciis la naftolingvon.

La mortajn virojn oni ne menciis en la telegramoj, ĉar ĉiu telegramvorto kostis tridek ok centavojn. La mortaj viroj reaperis en la monata raporto. Ĉe la monata raporto oni

povis meti plurajn listojn en leteron, kiu kostis nur dek centavojn.

Ili ja pli bone povis memgardi, tiuj uloj. Naftokampo estas ja ne infanĝardeno. Por mortintoj kaj homoj, kiuj ne plu kapablas bone protekti sin en tiu ĉi mondo, ne estas loko.

Kial afliktu nin la homoj? Grava estas nur la nafto.

F I N O

GLOSARO

adobe-domo = kabaneca dometo farita el argilaj tegoloj

always ready = ĉiam preta por uzado

As sure as death = certa kiel la morto

A sus ordenes = Je via dispono.

Barranca del Cobre = en Meksiko ĝi estas nomata Kupra Ravino aŭ *Copper Canyon*, jen montara formacio de la okcidenta *Sierra Madre*

Brenton Street = *Brenton-strato*

caballo = ĉevalo

caballero = sinjoro, ĝentlemano

caballero(s) = sinjoro(j)

caballito = ĉevaleta

cabron = virkapro, fikemulo

cantinas = estas en Meksiko kantinoj, bierejoj, restoracietoj, stacidomaj restoracioj ktp.

caramba = fulmotondro

castaneda = azilhejmo por frenezuloj

chunk = ŝtipkapulo, malsaĝulo

claro = klara, klare

cochino = fiporko

cocinera = ĉefino de de kuirejo

comadre = baptopatrino

Como estas? = Kiel vi fartas?

compadre = baptopatro, kunpatro

cookies = keksoj

copita = glasteo

de veras = serioze

dilo = masiva plankobreto

diputado = parlamentano, deputito

el estúpido = stultulo, ŝtipkapulo

el jacal = la remizo

el padrino = la patrono

Episcopal Church = usona protestanta eklezio, kiu ankaŭ en aliaj landoj ekzistas, nun ne plu tiom grava, ĉar nur unu procento de la usonaj estas membroj de tiu eklezio. Tamen kvarono de la usonaj prezidantoj estis membroj de tiu eklezio.

frijoles = fazeoloj, faboj

gracias = dankon

habanero = mezkalo, alkoholaĵo simila al tekilo, skotviskio kun kapsiko kaj pliaj ingrediencoj

henequen = speco de agavo, kies fibroj estas uzata por la produktado de ŝnuregoj kaj lazoj

hidalgo = 10 pesoj

hired persons = luprenitaj personoj

Isthmus = Istmo en Meksiko

licenciado = advokato

lote = parto de terposedaĵo, parcelo

Lucky = feliĉulino

macho = virviro

Madam = sinjorino

madrina = patronino

mamacita = rendevupanjo

masa = la tortiljopasto

mayordomo = mastro por domo kaj korto

metate = frotmuelilo

money = mono

muchacho = knabo, junulo

mulo = estas miksaĵo el vira azeno kaj ina ĉevalo

muy buen dinero = multe da mono

out = ne plu atingebla

padre = patro

padrecito mio = paĉjo mia

plaza = foirplaco

purty = estas regiona slango = *pretty* = linda, beleta

Que paso? = Pri kio temas?

rebozo = meksika ŝultrotuko

sabado = sabato

Santa Purrissima = Sankta Nemarkulita (Sankta Virgulino)

sala = ĉambro, gastĉambro, enirhalo ks

San Juan Baŭtista = Johano la Baptisto

sarapeo (ne en NPIV) = vesto el la vestoj, kiujn oni portas Meksiko, kvarangula bunta teksita kovrilo lano, origine simple metita ĉirkaŭ la korpon, pli poste kun entranĉo por la kapo, simila al ponĉo.

„*Si, Señor, a sus ordenes.* = Jes, sinjoro, je via dispono.

tan morena = la knabino

Teapot Dome Scandal = temas pri subaĉetoj pro naftokampoj sur terposedo de la usona ŝtato Vajomingo en la jaro 1921.

That's all = Jen, ĉio! Tio estas ĉio.

tilma = tilmo estas kruda kotona mantelo uzata de indiĝenaj meksikaj kampuloj, nodita sur unu ŝultro.

tortillas = tortiljoj, rostitaj maizoflanoj el muelitaj kaj kaĉigitaj maizograjnoj, maizaj kukoj, maizaj panetoj

Tukspam (Tuxpam), Estado Veracruz = Tukspam, la federacia ŝtato Verakruco.“

United States of America = Usono

„*What's the bloomin' idea, you little shrimp?!* = Kion vi propre pensas al vi, malkuraĝa nano!

White House = Blanka Domo en Usono, registarejo

Wobblies = membroj de sindikato en Usono kaj Meksiko